


The Australian Esperantist

Numero 259

JANUARO-FEBRUARO 1990

Registered by Australia Post
Publication no. WBG 2488



Rimanta slango (Ralph Harry)...p.3

Nekrologo: Arthur James Cocking (Robbie Robertson)...p.4

Provu vian vortoscion (Donald Broadribb)...p.5

La vorto "Boŝmano" (Bernard Golden)...p.7

Recenzo: Sed Nur Fragmento (Trevor Steele/Ruth McGrath)...p.11

Rakonto: "La bananoj putris" (Donald Broadribb)...p.15

Konkursoj no. 5 & 6...p.25

Recenzo: Problemsolva Originala KJ-Metodo...p.26

Novaj libroj...p.27

English supplement

THE AUSTRALIAN ESPERANTIST

Oficiala organo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio

Redaktoro: Donald Broadribb, 46 Great Eastern Highway, Bakers Hill WA 6562. Telefono: (09) 574 1307.

Prezidanto: Trevor Steele, 7 O'Callaghan St, Holland Park QLD 4121.

Vicprezidantoj: Vera Payne, 36 Donegal Rd, Floreat Park WA 6014.

Justice K. Enderby, 2 Phoebe St, Balmain NSW 2041.

Sekretario: Ray Ross, 41 Agnes St, Sunnybank QLD 4109.

Vicsekretario: Herbert Koppel, GPO Box 2122T, Melbourne Vic 3001.

Kasisto: Owen Loneragan, 16 Deverell Way, South Bentley WA 6102.

Libro-servo: Tom Elliott, PO Box 230, Matraville NSW 2036.

Korespondaj kursoj: John Moore, 7 Pelican St, Emu Park QLD 4702.

Membreco: \$25, por individuo, klubo, aŭ federacio; \$30 por familia membreco (ĉiuj ĉe la sama adreso); \$15 (minimume) por pensiulo aŭ studento. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto aŭ al la Libro-Servo.

Bonvolu avizi la redaktoron se via adreso estas neĝuste presita sur la adreslipeto, aŭ se vi ŝanĝas vian adreson aŭ/kaj nomon.

Sendu ĉiujn komunikaĵojn, artikolojn, librojn por recenzo kc. al la redaktoro. Lindato por alsendo de presotaĵoj por la venonta numero: 1 marto.

SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO

verku artikolon!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de THE AUSTRALIAN ESPERANTIST, "ni vere bezonas artikolon pri..."? Do sendu al ni tiun amatan eseon, ideon, rakont(et)on, esprimon de vidpunkto, ŝercbildon. Ni ĉiuj volos legi ĝin! Preparante la tekston, bonvolu atenti la ĉi-sekvajn postulojn: la teksto devas esti klare tajpita, kun duobla spaco inter la linioj, kaj marĝenoj de almenaŭ 2 centimetroj. Tajpu sur nur unu flanko de ĉiu folio. Metajpitaj tekstoj estos malakceptitaj. Por konservi la lingvonivelon de ĉi tiu gazeto la redaktoro rajtas lingve korekti ĉiun tekston antaŭ aperigo. Se la disponebla spaco aŭ la stilo de la verko necesigos tion, la verko povos esti mallongigita de la redaktoro. Ni ne povas promesi aperigon en la tuj sekvonta numero, krom se temos pri kronologie urĝaj tekstoj. Ankaŭ anglalingvajn tekstojn por la angla suplemento ni bonvenigos.

RIMANTA SLANGO

de RALPH HARRY

La "Cockneys" de Londono heredigis al Aŭstralianoj la rimantan slangon. Anstataŭ "pub" oni diris "rubbedy-dub", por "wife" oni diris "trouble and strife", kaj "Sydney" fariĝis "Steak and kidney" k.t.p. "I lay my head on the pillow and go to sleep" estas por Cockney "I lay my lump of lead on the weeping willow and go to bo-peep". Nia familiara esprimo "to rabbit on" venis el rimanta slango. Ĉu vi scias ĝian originon?

Mi demandis al mi ĉu estus eble havi tian rimantan slangon ankaŭ en Esperanto. Mi pripensis, kaj trovis, ke ja estas eble. Mi defias al vi traduki la jenan rakonton el esperanta rimanta slango:

En *maro kaj tero* (1) estas *junulino kaj bubo* (2) de *tigro kaj elefanto* (3). Ĉiu *Aŭgusto kaj Septembro* (4) estas bona *kaŭzo kaj efiko* (5). Kutime ni kunvenas en *ribelo kaj perturbo* (6) post *arĝento kaj oro* (7) sed en Decembro okazas *krajono kaj peniko* (8) apud la *nokto kaj tago* (9). Kun ĉiu *Aŭgusto* (9) venas la *monata magazino* (10) kaj *je via sano* (11). La *putro kaj ŝanĝo* (12) konsistas el *boto kaj ŝuo* (13) kun *teleroj kaj tasoj* (14) *kaptiloj kaj retoj* (15) kaj *hundo kaj kato* (16) kun *milito kaj lukto* (17). Estas ankaŭ *komenco kaj fino* (18) aŭ *grafo kaj duko* (19). Poste la *damo kaj fanto* (20) parolas kaj junulo deklamas *floron kaj semon* (21). Tion oni nomas "*La Apostrofa Vinbero*" (22).

Ekzemple, "maro kaj tero" estas "Kanbero", "La Apostrofa Vinbero" estas "Zamenhofa Vespero"!

Provu vian talenton deĉifri rimantan slangon por traduki la supran tekston, antaŭ ol rigardi la ŝlosilon! Se distras vin la ludo, eble vi mem deziros alsendi "importojn kaj eksportojn" (23) en "buŝo kaj lango" (24).

(Ŝlosilo sur paĝo 26.)

NEKROLOGO

ARTHUR JAMES COCKING

raportas ROBBIE ROBERTSON

Arturo naskiĝis en Mayfield NSW, la plej juna el sep infanoj, en hejmo finance malriĉa sed ame riĉega. Atinginte la deksepan jaron li venis al Sidnejo kaj studis en la Sidneja Kolegio por Instruistoj. Li instruis dum kelkaj jaroj en etaj kamparaj lernejoj, sed revenis al Sidnejo en 1941 por studi en la Universitato, kie li gajnis la diplomon B.Ec. Dume li iĝis muzikisto en la Petersham Militista Muzikistaro, kaj pretendis, ke li estas la plej mallerta muzikisto en la plej bona muzikistaro.

En 1942 li edziĝis kun Phyllis Witheridge el Marrickville, kaj post kelkaj jaroj estis sendita al Wellington, kie li aliĝis al la baptista eklezio. Li pasie amis muzikon kaj kantadon, pro tio li establis ĥoron kaj virkantistaron. Li aĉetis pianon, elektran orgenon kaj du buŝharmonikojn, kaj lernis ludi ĉiujn.

Dum kvin jaroj en Wellington li studis per korespondkurso por akiri la diplomon BA en 1953. Poste li instruis en Taree, Manly, Narrabeen kaj Sidnejo, kaj finfine emeritiĝis kiel lernejestro de la mezgrada lernejo en Mosman.

Lin ĉiam interesis lingvoj, kaj li komencis studi Esperanton en 1969 en la Vesperlernejo de Manly, kie li poste instruis klasojn dum multaj jaroj. Li instruis Esperanto-klasojn ankaŭ en la Wesley-Lernejo por maljunuloj. Ĉiumonate li estris studgrupon pri la Sankta Biblio en Esperanto. En la kadro de la somerlernejo en Adelajdo 1989 li instruis grupon por komencantoj. Li estis ankaŭ vizprezidanto de la Esperanto-klubo ĝis 1988.

Li mortis subite, sen doloro, en la komenco de novembro 1989. Partoprenis la funebran ceremonion multaj amikoj el la kluboj de Manly kaj Sidnejo. Ni en AEA ĉiuj kondolencas liajn vidvinojn kaj filinojn.

PROVU VIAN VORTOSCION
kompilita de DONALD BROADRIBB

1. Ĉu kanono estas
 - a. speco de muzikaĵo
 - b. liturgia himno
 - c. speco de sukero
2. Ĉu kantono estas
 - a. vorto signifanta "ŝtato" en Svislando
 - b. liturgia muziko
 - c. metala skatolo
3. Ĉu kapsulo estas
 - a. metala ĉapo por fermi botelon
 - b. speco de herbo
 - c. vundita soldato
4. Ĉu kapuĉo estas
 - a. kapvesto
 - b. franciskana monako
 - c. speco de kafo
5. Ĉu karafo estas
 - a. simio
 - b. botelo
 - c. pafilo
6. Ĉu karmina estas
 - a. heroino en opero de Bizet
 - b. dentmalsano
 - c. ruĝa
7. Ĉu karoo estas
 - a. senkafeina imitaĵo de kafo
 - b. emblemo sur ludkarto
 - c. fama filozofo
8. Ĉu anso estas
 - a. pordmalfermilo
 - b. naĝbirdo

- c. unu fino de intesto
9. Ĉu bronko estas
- malsano
 - parto de la spiraparato
 - riverfiŝo
10. Ĉu cis* estas
- "silentu!"
 - greka litero
 - maltrans
11. Ĉu ĉevrono estas
- kurbesto parenca al antilopo
 - nomo de fama hotelo
 - trabo subtenanta tegmenton
12. Ĉu deca estas
- 10^2
 - prava, justa
 - kompleza
13. Ĉu taliĝo estas
- restaĵo post elpremo de suko el vinberoj
 - parto de la korpo
 - permesita speco de venĝo (latine: lex talionis)
14. Ĉu ungo estas
- fabela besto
 - kreskaĵo ĉe la ekstremo de fingro
 - arkforma akvomaso kiu leviĝas kaj refalas ĉe la mar-surfaco
15. Ĉu torfo estas
- materiolo trovebla en marĉoj
 - la supra parto de la homa korpo
 - plata kuko

LA VORTO BOŜMANO

leksikologia verko de BERNARD GOLDEN

En mia artikolo "Oni uzu fakajn terminojn, esprimojn kaj nomojn - sed nur fake!" (AKADEMIAJ STUDOJ 1989 p.54-55) mi akcentis, ke eĉ en laika kunteksto estas necese ĝuste uzi terminojn kaj proprajn nomojn, kiuj apartenas al diversaj fakoj, ĉar ili pro tio havas precizajn signifojn. Tiu postulo devas esti observata eĉ pli rigore fare de aŭtoroj, kiuj glosas la koncernajn leksikajn elementojn en siaj artikoloj, kaj leksikografoj, kiuj registras ilin en Esperanto-vortaroj enhavantaj difinojn. Ekzemplo de mispaŝado sur tiu ĉi tereno estas la nekontentiga traktado de "boŝmano", ĉar la formo de la vorto varias, kaj ĝia difino estas jen mankhava, jen erara.

Enkonduko de "boŝmano" en Esperanton

Unue, ni spuru la historion de la nomo en Esperanto. Manke de etimologia vortaro de Esperanto, la tasko malkovri, kiam ĝi estis uzita la unuan fojon, kaj kiu enkondukis ĝin, estas tre malfacila. Utiligante la konsultlibrojn en mia hejma biblioteko, mi sukcesis akiri donitaĵojn, kiuj ebligas rekonstruon de parto de la historia bildo

PIV (PLENA ILUSTRITA VORTARO, 1970) registras du formojn de la nomo: ĉe "buŝmen/o" (p.133) estas resendo al la preferata formo "boŝman/o" (p.120). Laŭ la formoj de la nomo en du etnolingvoj, la angla bushman kaj la franca boschiman, estas konjekteble, ke "buŝmeno" devenas de la pluralo de la angla nomo, bushmen, dum la etimo de la dua esperanta variaĵo estas la franca nomo, en kiu la unua vokalo estas "o". Apogas tiun etimologion la formo "boŝman/o", registrita de G. Waringhien en sia franca-esperanta vortaro (1957). Tamen eĉ nuntempe, ne ĉiuj aŭtoroj uzas la formon rekomenditan de PIV. En ELPAFU LA SAGON (1983) Tibor Sekelj tradukis poemojn el diversaj indiĝenaj popoloj; troviĝas inter ili esperantigita poezio de la "buŝmanoj" (p.49, 96, 114, 160, 169). Rimarku, ke la dua silabo de la nomo estas "man", spegulanta la singularan formon de la angla etimo.

Pli frue, en 1954, Max Butin kaj Josef Sommer en sia esperanta-germana vortaro registris "boŝmen-o" kiel tradukon de la germana "Buschmann". Tiu ĉi esperanta formo estas hibrida, ĉar ĝi havas la "o" de la franca etimo en la unua silabo, kaj la plurala "men" de la angla en la dua silabo. Du jardekojn pli frue, "buŝmano" aperis en la sveda-esperanta vortaro (1934) de Jensson, Lindén kaj Gerdman. Eugen Wüster registris la saman formon, "buŝman-o", en sia esperanta-germana enciklopedia vortaro (1923). Mi ne sukcesis spuri la nomon en Esperanto al pli frua fonto, do provizore, ŝajnas, ke Eugen Wüster enkondukis "buŝmano" en la fruaj 1920-aj jaroj surbaze de la germana etimo "Buschmann".

La etnolingvaj nomoj a. bushman/bushmen, f. boschiman kaj g. Buschmann havas kiel etimon la nederlandan "bosjesman", konsistantan el du morfemoj, "bosje", diminutivo de "bos" (arbaro) kaj "man" (viro). Tamen, en Esperanto, same kiel en la franca lingvo, "boŝman-" estas unu morfemo.

La neologismo "boŝo"

Lastatempe la neologismo "boŝo" estis enkondukita de Ralph Harry kaj Volo Guelting kaj registrita en AŬSTRALIA-ESPERANTA VORTARO (dua eldono, 1985). Ĝi estas la ekvivalento de a. bush ("sovaĝejo, kamparo, arbaro; regiono ekster la urbo, precipe en parto kun arboj kaj nelogata"). La aŭtoroj ne povis esperantigi la anglan vorton "bush" per "buŝo", ĉar tiu vorto jam ekzistas en Esperanto kun alia signifo, do ili elektis "boŝo", kiu hazarde estas identa kun la unua silabo de "boŝmano" kaj rilatas al ĝi semantike laŭ etimologia analizo. Ili donas kelkajn tradukojn de esprimoj en la aŭstralia angla lingvo:

<u>to go bush</u>	iri boŝen, sovaĝiĝi
<u>wild bush horses</u>	sovaĝaj boŝaj ĉevaloj
<u>bushranger</u>	arbara, boŝa, sovaĝeja bandito
<u>bushwalker</u>	arbara, boŝa, sovaĝeja promenulo

Difinoj de "boŝmano"

Pli dornhava aspekto de la uzo de "boŝmano" en Esperanto

koncernas ĝian difinon. Laŭ PIV ĝi signifas "nigra popolo nomada en Suda Afriko". Okulfrapa eraro estas la karakterizo "nigra popolo". La boŝmanoj ne estas negroidoj. Dua difino troviĝas en GLOSARO: LA POEMAROJ DE EDWIN DE KOCK (1988): "ano de ĉasista raso primitiva kaj malmultnombra de Suda Afriko" (p.4). Tie ĉi "ĉasista raso" anstataŭas "popola nomada" de la difino en PIV, kaj aldoniĝas du novaj elementoj: "primitiva" kaj "malmultnombra", ambaŭ malprecizaj kaj subjektivaj.

Tria, pli ampleksa priskribo de la boŝmanoj aperas kiel glosa sekvanta la poemon "Nebula Tago" de Arno Kucharzik (FONTO 76, aprilo 1987, p.26-28):

Flaveca, malaltstatura praindiĝeno nenegra, parolanta lingvon ĥamidan, loĝinta multloke en Suda Afriko antaŭ la alveno de kaj la nigraj kaj la blankaj homoj. Nuntempe ili troviĝas ĉefe en Bocvano kaj Namibio. La vivmaniero de tiu popolo neolitika estis kaj certgrade ankoraŭ restas nomade ĉasista kaj senagrikultura. Lastatempe, tamen, ĝi komencas cedi al tiu de la ĉirkaŭaj popoloj. (p.27)

Pluraj novaj faktoj aperas en tiu ĉi enciklopedieca difino -- sed enestas ankaŭ eraroj! Unue, la lingvo de la boŝmanoj ne apartenas al la ĥamida grupo (la egipta, berbera kaj kuŝida lingvoj) sed estas koisana lingvo. En la sama subfamilio troviĝas ankaŭ la hotentota lingvo. Due, se la boŝmano vivas kiel nomadaj ĉasistoj kaj ne okupiĝas pri agrikulturo, ilia ekonomio estas paleolitika, ne neolitika. Neolitika ekonomio karakteriziĝas ĝuste per terkultivado kaj bestbredado, du agadoj, kiuj ne akordas kun la vivmaniero de nomadaj ĉasistoj.

Antaŭ ok jaroj mi kontribuis la sekvan koncizan difinon al la SLIPARA VORTARO de Rüdiger Eichholz:

membro de flavbruna popolo kun malalta staturado, apartenanta al sendependa rasa grupo, vivanta kiel nomadoj en la suda Afriko, kaj havanta kiel ekonomian bazon la ĉasadon de sovaĝbestoj kaj kolektadon de sovaĝvegetaĵoj.

Antaŭ du jardekoj antropologo taksis la nombron da boŝmanoj je 50 000 ne miksitaj kun aliaj popoloj. *_*

La plej grava romano
de nia jardeko

TREVOR STEELE:

SED NUR FRAGMENTO

Nun havebla de la
AEA Libro-servo
PO Box 230
Matrville NSW 2036

448p. Bindita
\$25

Sed Nur Fragmento

recenzas RUTH McGRATH

SED NUR FRAGMENTO de Trevor Steele. Chapecó-SC Brazilo: Fonto, 1987. 448p., bindita. \$25 de la AEA Libro-Servo.

[Noto de la redaktoro: kvankam ĉi tiu libro surhavas la daton 1987, pro specialaj problemoj ĉe la eldonejo ekzempleroj atingis la librovendistojn grandkvante nur decembre 1989.]

Oni ne tro miru ke SED NUR FRAGMENTO estas nur la dua romano en Esperanto verkita de Aŭstraliano kiu ĝis nun eldoniĝis - la alia jam antaŭ 70 jaroj! - ĉar sukcese verki romanon ne estas bagatela afero. Kiel atentigis William Auld (VERECO, DISTRO, STILO: ROMANOJ EN ESPERANTO, 1981), "por finverki romanon, aŭtoro bezonas ne nur talenton, sed ankaŭ nekredeblan obstinon... Romanverkado estas granda fizika kaj intelekta laboro..." Des pli rimarkindas, ke temas pri longa verko, lingve kaj enhave atentinda.

SED NUR FRAGMENTO ne estas romano en kiu la "intrigo" ĉefgravas. Tamen, ja enestas rakontfadeno. La epoko de la romano estas antaŭ iom pli ol jarcento. Barono Nikolaj Ivanoviĉ Maklin estas rusa sciencisto edukita en la Universitato de Heidelberg, kie li estis disĉiplo de ateista profesoro Kehl kiu fervoris pri la "Grandioza Mozaiko" - la sintezo de ĉiaj sciencoj laŭ rigora materiismo kaj nepre konstatebla leĝaro. Al la tasko elserĉi kaj konigi erojn de tiu mozaiko Maklin sin dediĉas kun entuziasmo, elektante pasigi jaron sur la preskaŭ nekonata Vera Insulo [tropika insulo inter la Hinda kaj Pacifika Oceanoj]. Tie lia laboro estas multflanka scienca esplorado, sed plejparte antropologia.

Poste la scenejo ŝanĝiĝas al Kvinslando, kien laŭ sugesto de Layton, kamarado el la Hejdelberga periodo, Maklin migras, esperante ricevi gvidan postenon en la starigo de scienca instituto. Sekvas konatiĝo kun la politika kaj scienca elitoj de la kolonio, orientiĝo - kaj amo. Ne mankas konfliktoj. La idealisma Maklin, kiu evitis reiri al Eŭropo ĉar li ne volis ke oni profitu lian restadon sur la Verda Insulo por pravigi koloniigon de tiu lando, trovas ke ankaŭ en Aŭstralio li

ne povas eviti politikon. Estiĝas ankaŭ konflikto inter amo kaj lojaleco.

Gravaj temoj de la romano estas imperiismo-koloniismo kaj rasismo (kaj ankaŭ iagrade seksismo). Oni povas objeti, ke la aŭtoro prezentas rigardon al la 19a jarcento tra la okuloj de la 20a jarcento. Tamen, tiuj temoj ankoraŭ havas signifon por la kompreno de la nuna Aŭstralio. Kiel oni ja povus atendi, Magistro Steele kun faka lerto skizas la historian fonon de sia rakonto, nur "modifante" kelkajn cetero ne tre gravajn faktojn. Lerte kaj nerekte li konigas iujn informojn koncerne nian landon pri kiuj alilandanoj ofte estas nesciantaj aŭ emas preteratenti, ekz. la vasteco de la kontinento, la inter-koloniaj ĵaluzoj, la malfido de la provincoj al la malproksima ĉefurbo. Sed antaŭ ĉio la aŭtoro prezentas specifan parton de la kontinento kun ĝiaj apartaj geografio kaj klimato en difinita periodo de la historio kun ĝiaj esperoj kaj problemoj - entute ĝia unika etoso. Do ni havas en SED NUR FRAGMENTO pli ol la unuan vere aŭstralian romanon (ĉar LILIO DE E.A. Synotte, kvankam supozeble verkita en nia lando, tamen ne rilatas al ĝi) sed la unua "regiona" romano internaciolingva el Aŭstralio.

Por enkonduki la romanon kaj interligi la disajn partojn Steele utiligas interesan kaj atentokaptan teknikon. Li surscenigas onklecan maljunan universitatan bibliotekiston kiu klarigas ke li amasigis dokumentojn de kaj pri Maklin laŭ peto de iu studento kiu volas diserti pri la fama pasintjarcenta sciencisto. Kiam la studento forlasis la projekton la bibliotekisto decidis mem surpreni la laboron, asertante ke lia tasko estis nur "iom ordigi kaj editori tekstojn de Maklin...foje enmetante klarigajn alineojn..." La maljunulo nepre blagas, ĉar granda parto de la romano estas verkita el la vidpunkto de ĉionscianto. Cetero, abundas vervaj interparoloj kiujn li neniel povus ĉerpi el la "Privata Taglibro", se juĝi per la specimenoj de tiu dokumento kiujn li prezentas.

Ĉi tiu multifaceta verko meritas multe pli detalan analizon ol eblas en la kadro de mallonga recenzo. Ŝajnas al mi ke kelkaj epizodoj estas elstare bonaj. Mi pensas interalie pri la "nokto de Kodi", kiam Maklin vole-nevole fariĝas atestanto

supernaturaj fortoj; pri la filozofia diskuto inter Maklin kaj Layton kontraŭ fono de elektra ŝtormo (p.242-247); kaj sur iom malsama nivelo, la brile redonita interparolo de sia kruda lingvaĵo per kiu la trajne veturanta Maklin informiĝas pri la planita anekso de la Verda Insulo (p.276-278).

Mi trovas Maklin kredebla kaj simpatia heroo kies personeco evoluas de la Kehl-inspirita maksimumo "antaŭ ĉio honesto" al amara konstato, ke pravas la aserto de Layton ke "La bonulo ĉiam devas elekti inter sinmortigo kaj kompromiso kun la mondo" (p.274). De ateista-materiisma kredo li venas al agnosko de spirita dimensio en la vivo. Sed pri la heroino Belinda kaj la "amrakonto" mi estas malpli kontenta. Mi kredas ke almenaŭ parto de mia problemo kuŝas en mia sento ke la interrilatoj inter Maklin kaj Belinda estas tro "modernaj". Steele verŝajne subtaksas la pudoron aŭ ŝajnpudoron de la periodo. Li tute ne aludas pri la fakto ke la korpoj de tiutempaj blankaj virinoj estis kvazaŭ ŝirmitaj de karapaco - fortika korseto garnita per bartoj kiu iasence simboligis la "netuŝeblecon" de la portanto. Bonmora junulino de tiu periodo supozeble ne aludus pri la seksrilato, eĉ en konversacio kun la amato. Simile, mi sentas ke la interpersonaj rilatoj ĝenerale estus pli formalaj ol bildigitaj ĉi tie. Krom tio, mi trovas nesufiĉe konvika la telepation de la heroino. Estas kurioze, ke ankaŭ Synotte uzis kredon pri transmigrado de animoj kiel temon en sia romano, sed en la romano de Steele tiu kredo estas grava temo kaj laŭ mia juĝo bezonas pli trafan prezentadon. Ĉar tiaj fenomenoj kuŝas ekster la vivsperto de la plejmulto da homoj tiu tasko kompreneble estus prekaŭ nesupereble malfacila.

Mi, lingva konservativulo, sorbante la prozon de Steele, konfesas min lernanto. Lia stilo estas simpla, rekta kaj klare flulegebla, sed kun riĉa vortprovizo, utiligante ankaŭ vortojn iam etikeditajn aŭ "poeziajn" aŭ "neologismajn" - vortoj kiaj "leĝera", "trista", "olda", "fola", "rojo", "hojli". Troviĝas aliaj interesaĵoj - la verbigo de "tamen" kaj adverbigo de ĉu, ekzemple, kaj la uzo de inta anta kaj onta kiel memstaraj vortoj. Legado de la romano estas faciligita per la disdivido de ĉapitroj en multajn mallongajn erojn. Transiroj de ero al ero estas profesiece glataj.

SED NUR FRAGMENTO trovis indan veston. Ĝi estas bele bindita kaj klare presita sur bonkvalita papero - je surprize malalta prezo. Preseraroj ne multas kaj apenaŭ ĝenas la komprenon. Jen vere havinda verko. Aĉetu, legu, kaj fieru ke la aŭtoro, Trevor Steele, estas nia tre talenta kaj energia samlandano.

[Postnoteto de la red.: sur p.11 de la ĉisupra recenzo, 12a linio de malsupre, pro komposteraro presiĝis "Vera Insulo" anstataŭ "Verda Insulo". Bonvolu korekti.]

-o-

ANONCETOJ

Indekso de THE AUSTRALIAN ESPERANTIST 1986-1989, kompilita de Ralph Harry, haveblas. Por akiri ekzempleron, sendu al li adresitan koverton kun poŝtmarko. Ankaŭ haveblaj de li estas indeksoj por pli fruaj jaroj de TAE kaj de antaŭaj aŭstraliaj Esperanto-gazetoj. Adreso: Ralph Harry, 8 Tennyson Crescent, Forrest ACT 2613.

La Nacia Esperanto-Biblioteko de la AEA planas eldoni katalogon de sia libraro. Intertempe, oni povas peti de ĝi bibliografiojn pri specialaj temoj. Krome, ĝi bonvenigos donacojn de nove eldonitaj libroj aŭ de mono por tiajn aĉeti. Por detaloj, skribu al Ralph Harry (adreso donita supre).

La AEA Libro-Servo atentigas ke la nova gazeto "Sovetia Esperantisto", celanta aperi dufoje ĉiumonate, aboneblas je \$33 por jaro ĉe la AEA Libro-Servo.

Antaŭkongreso por la UK en Kubo okazos 7-11 julio 1990 en Meksiko-Urbo, Meksiko (prezo: US\$614 por unuopulo). La oficiala postkongreso vizitonta la urbojn Taxco kaj Oaxaca okazos 21-28 julio, 1990 (prezo: US\$902 por unuopulo). Bonvolu peti aliĝilon kaj detalojn kiel eble plej frue, de la Esperanto Vojaĝ-Servo, 578 Grand Avenue, Oakland CA 94610, Usono. (El Aŭstralio la telefon-numero estas 0011 1 415 836 1710).

La nombro da membroj de AEA kreskis je ĉ. 10 pasintjare.

21st Annual Summer Workshop June 18 - July 6, 1990 San Francisco University

Now in its twenty-first year an intensive three week program for those interested in Esperanto studies. The San Francisco State University gives three semester-units credit for students enrolled for a degree. Overseas students are specially encouraged. Courses are at all levels:

Basic Course (594): Welcome to Esperanto. For students completely new to the language.

Intermediate Esperanto I (595): Gaining Confidence in Esperanto. Conducted in Esperanto, the course includes a systematic review of structure and vocabulary, and stresses conversational ability.

Intermediate Esperanto II (596): Esperanto in Practice - Language and Literature. Students with a good basic understanding of and capability in the language will explore the realms of music, travel and culture, with special reference to literature and traditions.

Advanced Esperanto (597): Esperanto Literature and Linguistics. Conducted entirely in Esperanto, this course will have two focuses. One is literary, dealing with stylistics, translation, and recent original Esperanto novels. The other focus will be linguistic. The class will discuss the structure of Esperanto and the role the language plays in contemporary society.

Directed Studies in Esperanto (699) for those who wish to work on a special project. Admission subject to the approval of the instructors.

Methods of Teaching Esperanto (598): optional, to be taken in conjunction with (596) or (597).

Details from Cathy Schultze, 410 Darrell Road, Hillsborough CA 94010 USA.

AFRICA FOR ESPERANTO!

We have already published details of the desperate plight of Africans who, because of personal and national poverty, are unable to obtain teaching materials and literature in Esperanto. The Esperanto League of Western Australia has begun contact with an African Esperanto Club in order to extend practical support.

There is now an urgent need for funds to assist with postage costs and the provision of learning materials.

Any individual or group in Australia who wishes to help enthusiastic but needy African learners can send their contributions. Even a few postage stamps would be gratefully received [see below, "Send a stamp for Africa!"]. Any spare international reply coupons would also be very welcome. And a specific request has been received for dictionaries and vocabularies. (Any old copies of the Nixon or the Edinburgh?) Even money will be gratefully accepted!

Please send contributions to:

David Poulson
(Co-ordinator of African Activity, E.L.O.A.)
41 Cloister Ave
Manning WA 6152

SEND A STAMP FOR AFRICA!

If we can find 30 sponsors willing to send a postage stamp of A\$1.10 value each month it will be enough to finance a whole year's support activity and help to African Esperantists. I appeal to all Aussie Esperantists to send me one overseas air-mail stamp per month this year. Failing that, an aerogramme (cost: only 60¢), and failing that, any unused Australian stamp. Everyone can afford to help the spread of Esperanto in the Third World. Send your stamps or aerogrammes to the address given above.

Making our mark in libraries

In January this year 4000 specially printed Esperanto Bookmarks and 250 copies of the first lesson of a free introductory correspondence course in Esperanto were distributed to 50 public libraries in Perth. The text of the bookmark reads as follows:

Esperanto allows people from different countries to communicate with each other fairly and equally. Since 1887 the International Language has evolved into a mature, living language, wholly appropriate to the needs of our modern world.

If you plan an overseas trip, you can find Esperantists offering friendship and practical assistance in 105 countries. If unable to enjoy the benefits of overseas travel - bring the world to you. Esperanto speakers from many countries are looking eagerly for Australian penfriends.

Lesson 1 and a free postal course in Esperanto is available from your public library or by telephoning 387 1520. Expert tutors will introduce you to ESPERANTO - your First Second Language.

Any other club in Australia who wishes to try this inexpensive method of advertising Esperanto is welcome to contact David Poulson (address on opposite page) for details, costs, etc.

RADIO ESPERANTO

A table summarising Esperanto broadcasts throughout the world for 1989 reveals a total of 5462 broadcasts totaling 2138 hours, for the most part on short wave. Stations broadcasting in Esperanto were from Austria (Vienna), Brazil (Rio de Janeiro and Sorocaba), China (Beijing), Hungary (Budapest), Italy (Rome), Yugoslavia (Zagreb), Cuba (Havana), Poland (Warsaw), USSR (Tallinn, Vilnius), Switzerland (Bern), and the Vatican.

(Details in Dec. 1989 issue of Esperanto pub. U.E.A.)

WINDOW ON THE WORLD

U.S.S.R.

The Azerbaijan Journalists' Union, in conjunction with the Bakya Esperanto Club and the Esperanto Cooperative "Sunradio" have begun publication of a unique tabloid, the "Sovetia Esperantisto", intended to be published twice monthly. What makes this journal unique is that it is published in three languages, Esperanto, Turkish, and Russian side by side. Its goal is to help the various peoples in the Soviet Union understand and appreciate the many cultures in that vast country, to advertise products both within and outside of the Soviet Union, as well as to keep readers up to date on Esperanto activities. With full colour pictures, issue number 2 featured, among other things, recipes for traditional Azerbaijani deserts. Address: Sovetia Esperantisto, a K 3, Baky-146, 370146, U.S.S.R.

By decision of the UN and UNESCO, 1991 has been declared the Year of Russian Culture. The now legalised Esperanto groups in the USSR have begun work on projects supporting this declaration on both the national and international levels.

ECOLOGY

The Universal Esperanto Congress in Brighton, England, August 1989 passed the following resolution:

Realising the fact that protection of the environment has become a priority issue for humanity, we - representatives of Esperantist national [and international] organisations - have agreed to the foundation of the International Ecological Esperanto Federation, a world wide union of associations, organisations, institutions and individuals for the purpose of preserving and improving the environment and human health through the application of Esperanto as a working and bridging language. We support action pursuant to the "Agreement on International Co-operation for the Protection of the Environment with the help of Esperanto" (Warsaw, 1987 - Brighton, 1989).

CUBA 1990

Universal Esperanto Congress (U.E.A.) in Havana, Cuba, July 14-21.
International Esperanto Youth Congress (T.E.J.O.) in Playa Girón, Cuba, July 21-28.

LA BANANOJ PUTRIS

rakonto de DONALD BROADRIBB

Johano komfortigis sin en la fotelo. "Nu, efektive, mi vizitas vin kun speciala celo. Fakte, ni bezonegas rakonton. Mi esperas ke vi helpos."

"Ĉu la PERTA LITERATURA REVUO tiom devas serĉi?" Mi ridis. "Kiu estas la limdato?"

"Nu, mi esperis ke vi jam havas pretan, verdire. Oni komencos la kompostadon morgaŭ, kaj ĝis nun ni akiris nur poemojn. Certe vi povos iel trovi taŭgan rakonton. Eble manuskripton kiun eldonisto malakceptis, aŭ vi neniam opiniis presinda...ion."

"Tiajn manuskriptojn mi enrubejigis antaŭ longe," mi diris. "Sed mi povas proponi ion. Fikcian rakonton novan mi nuntempe ne havas, sed mi povas rakonti al vi veran epizodon. Temas pri la kaŭzo pro kio mi ĉesis profesii kiel psikanalizisto. Se mi ŝanĝus la nomojn vi povus kredigi ke ĝi estas fikcia. Kompreneble necesus uzi pseŭdonimon por mi. Jen, mi rakontu ĝin nun, kaj kasedo registru ĝin. Via sekretario povos tajpi ĝin, se vi volos, kaj vi povos redakti ĝin laŭvole, kaj sendi ĝin sufiĉatempe al la kompostisto." Mi prenis kasedon, ŝovis ĝin en la magnetofonon kaj komencis rakonti.

"La tuta afero okazis antaŭ multaj jaroj, dum mi ankoraŭ aktive profesiiis. Estis feria lundo. Mia edzino, Alice, kaj la geinfanoj* estis irintaj al la insulo Rottnest por la feritagoj. Dimanĉon, nokte, mi kredis aŭdi nekutimajn sonojn, sed mi decidis ke nur temas pri la kato ludanta. Lundon matene mi enportis la ĵurnalon kaj eniris mian oficejon por trovi miajn leg-okulvitrojn, kiujn mi estis lasinta sur la skribtablo. Imagu kiom surprizis min vidi knabinon parte kuŝantan sur la tablo antaŭ la malfermita fenestro. Ŝi estis ekspaciento mia, Bella Andersson. Unue mi supozis ŝin dormanta, sed post nur momento mi ekkonsciis ke ŝi estas morta. Mia arkivkesto estis malfermita, kaj mia notaro pri Bella kuŝis sub ŝia kapo. Klare ke ŝi estis leganta paĝon, sur kiu estis skribita teksto de sonĝo kiu multe interesis min

siatempe. La sonĝo ĉeftemis Pine-Gapon, kaj ni siatempe diskutis ĝin rilate al ŝia imago ke malamikoj serĉas ŝin kaj ke ŝi devas esti tre sekreta. En ĉi tiu ŝtato neniu leĝo protektas la konfidencecon de komunikoj inter paciento kaj ties terapistoj, kaj mi ne volis ke oficialuloj tralegu miajn notojn kaj faru miskonkludojn, do mi tiris la notaron de sub ŝia kapo kaj elprenis ĉiujn sonĝojn skribitajn por mi, kaj miajn notojn pri niaj diskutoj. Poste, mi remetis la notujon en la arkivan keston, fermis ĝin kaj ŝlosis ĝin. Mi portis la elprenitajn paĝojn al la ĉambro de mia filo David, kaj kaŝis ilin sub lia matraco. Kion fari post tio? Mi ne sciis kiajn regulojn oni havas, sed mi supozis ke la polico devos okupiĝi pri la afero, ĉar mi rezonis, ke la sola metodo per kiu Bella povus esti enirinta la domon estis perforto de la fenestro de la oficejo. Do mi telefonis 000 kaj post nelonge du viroj venis al mia pordo, policisto kaj polickuracisto.

"Nu, ŝajnis kvazaŭ la infero mem alvenis. Neeviteble la polico estis suspektemaj tuj kiam ili ekvidis la knabinon. La kuracisto priridis mian komenton ke eble okazis kormisfunkcio, tuj kiam li rigardis ŝian vizaĝon. Pasis apenaŭ sekundoj antaŭ ol ekspertoj svarmis en la oficejon por inspekti ĉiun milimetreron. Frue posttagmeze ili ricevis raporton ke Bella estis venenita per kunmiksitaĵoj barbituraĵoj kaj alkoholo. Ankaŭ neeksplikablajn aferojn ili rimarkis. Nu, mi ja insistis ke mi sen ia dubo ŝlosis la fenestron pasintvespere. Mi certis pri tio, ĉar tiuvespere mi laboradis ĉe la tablo kaj tre malvarma venteto eniris per la fenestro, sekve mi fermis kaj ŝlosis ĝin. Sed la polico montris al mi ke tute ne ekzistis eĉ indikileto ke iu perforte malfermis la fenestron. Sekve nur la dompordo restis kiel ŝia ebla enirejo, sed ĝi havas aŭtomatan seruron. Do iu en la domo sendube enlasis ŝin, sed tiel ne povis esti ĉar nur mi estis en la domo. Sed plej surprize estis kiam la geinfanoj revenis. Ili revenis sen Alice. Ili rakontis ke tuj kiam ili atingis Fremantlen por eniri la pramon ŝi telefonis iun kaj poste diris ke ŝi ne povos akompani ilin al la insulo Rottnest. Ĉar ni jam rezervis dometon tie por la ferieto, ili pluiru sen ŝi. Ŝi aĉetis du prambiletojn por ili kaj formarsiis. Kaj post tio ŝi neniam estis revidita. Neniam."

siatempe. La sonĝo ĉeftemis Pine-Gapon, kaj ni siatempe diskutis ĝin rilate al ŝia imago ke malamikoj serĉas ŝin kaj ke ŝi devas esti tre sekreta. En ĉi tiu ŝtato neniu leĝo protektas la konfidencecon de komunikoj inter paciento kaj ties terapistoj, kaj mi ne volis ke oficialuloj tralegu miajn notojn kaj faru miskonkludojn, do mi tiris la notaron de sub ŝia kapo kaj elprenis ĉiujn sonĝojn skribitajn por mi, kaj miajn notojn pri niaj diskutoj. Poste, mi remetis la notujon en la arkivan keston, fermis ĝin kaj ŝlosis ĝin. Mi portis la elprenitajn paĝojn al la ĉambro de mia filo David, kaj kaŝis ilin sub lia matraco. Kion fari post tio? Mi ne sciis kiajn regulojn oni havas, sed mi supozis ke la polico devos okupiĝi pri la afero, ĉar mi rezonis, ke la sola metodo per kiu Bella povus esti enirinta la domon estis perforto de la fenestro de la oficejo. Do mi telefonis 000 kaj post nelonge du viroj venis al mia pordo, policisto kaj polickuracisto.

"Nu, ŝajnis kvazaŭ la infero mem alvenis. Neeviteble la polico estis suspektemaj tuj kiam ili ekvidis la knabinon. La kuracisto priridis mian komenton ke eble okazis kormisfunkcio, tuj kiam li rigardis ŝian vizaĝon. Pasis apenaŭ sekundoj antaŭ ol ekspertoj svarmis en la oficejon por inspekti ĉiun milimetreron. Frue posttagmeze ili ricevis raporton ke Bella estis venenita per kunmiksitaĵaj barbituraĵoj kaj alkoholo. Ankaŭ neeksplikablajn aferojn ili rimarkis. Nu, mi ja insistis ke mi sen ia dubo ŝlosis la fenestron pasintvespere. Mi certis pri tio, ĉar tiuvespere mi laboradis ĉe la tablo kaj tre malvarma venteto eniris per la fenestro, sekve mi fermis kaj ŝlosis ĝin. Sed la polico montris al mi ke tute ne ekzistis eĉ indikileto ke iu perforte malfermis la fenestron. Sekve nur la dompordo restis kiel ŝia ebla enirejo, sed ĝi havas aŭtomatan seruron. Do iu en la domo sendube enlasis ŝin, sed tiel ne povis esti ĉar nur mi estis en la domo. Sed plej surprize estis kiam la geinfanoj revenis. Ili revenis sen Alice. Ili rakontis ke tuj kiam ili atingis Fremantlen por eniri la pramon ŝi telefonis iun kaj poste diris ke ŝi ne povos akompani ilin al la insulo Rottnest. Ĉar ni jam rezervis dometon tie por la ferieto, ili pluiru sen ŝi. Ŝi aĉetis du prambiletojn por ili kaj formarsiis. Kaj post tio ŝi neniam estis revidita. Neniam."

"Pardonu," interrompis Johano, "sed estas malfacile kredi ĉi tion vera. Kial oni ne menciis la aferon en la ĵurnaloj aŭ la TV? Murdo kaj malapero, nu kiel povus ne ekscitiĝi la publiko?"

"Tamen tiel estis," mi diris, "Pri la tuta afero oni simple ne raportis al la informilaro. La polico ek de la komenco konservis absolutan silenton. Vi baldaŭ komprenos la kialon.

"Efektive min mem ne tre surprizis la malapero de Alice. Fojfoje necesis ke ŝi forkuru senaverte, kaj mi do devis inventi motivon - ke okazis krizo en ŝia familio en Novjorko, aŭ ke ŝi devis ĉeesti funebrajn ritojn por parenco, aŭ ion tian. Ni eĉ havis preta stokon de tiaspecaj mensogoj. Ŝi kutime postlasis noton por mi sur la fridujo, kiam ŝi devis abrupte foriri, por ke mi sciu kiun mensogon uzi se iu volos scii kial ŝi forestas. Do mi supozis ke en Fremantle ŝi eksciis pri io urĝa, kaj mankis al ŝi sufiĉa tempo por reveni hejmen. Mi supozis ke sendube ŝi telefonos aŭ sendos leteron post kelkaj tagoj, se tiel longe ŝi devos forresti."

"Nun," protestis Johano, "mi devas postuli eksplikon. Kian laboron povus havi via edzino, por necesigi ĉion tian?"

"Oficiale," mi diris, "ŝi estis fakraportisto pri medicino. Ŝi iam studis medicinon, kaj ankaŭ ĵurnalismon. Do ŝi fariĝis eksperta raportisto pri neatenditaj medicinaj aferoj kiuj bezonus la scion de eksperto por klarigo al la publiko."

"Sed kial tiom da sekreteco?" Johano demandis.

"Raportservoj konstante rivalas unuj la aliajn," mi diris. "Unika eksperta raporto pri ia vere grava medicina trovo povas multon valori por raportservo vendonta la raporton."

"Vi tute ne konvinkas min," Johano diris. "Mi ne kredas ke legantoj kredus ĝin."

"Vi ja estas la redaktoro. Mi nur diras al vi tion, kio

okazis. Unue la polico supozis ke temas pri duobla murdo. Ili teoriis ke Bella kaj mi sekrete amoradis - laŭ ilia teorio Bella kaj mi kune konspiris murdi Alicen kaj iel kaŝi la kadavron tiumaniere ke oni ne trovos ĝin nek restos io indikanta murdon. Poste - laŭ ilia teorio - mi murdis Bellan, kaj mi malferte lasis la fenestron malfermita por ŝajnigi ke temas pri enveninta ŝtelisto. Nu, mi povis rapide malpruvi tiun teorion, ĉar mi telefonis la aviadservojn kaj demandis pri personoj forflugintaj dum tiu semajnfino. Ili respondis jese, ke ŝi ja mendis bileton por aviadilo ironta Amerikon. Mi tion komunikis al la polico, kaj ili enketis kaj trovis ke efektive ŝi ne nur mendis bileton sed eniris la aviadilon frue dum la mateno de lundo. Ili ankaŭ trovis ion tre strangan - kvankam la aviadilistoj insistis ke ŝi ja estis en la aviadilo kiam ĝi forflugis, ŝi neniam atingis Amerikon. La amerika dogano havis tute nenian indikon pri ŝia alveno.

"Nu, diverskiale tio ne surprizis min. Mi konis la agadmanieron de mia edzino tre bone, komprenu. Sed kio tre maltrankviligis min estis ke iu murdis Bellan Andersson. Kontraŭe al mi, tamen, la polico kredis nun scii ĉion. Ili nun teoriis ke Bella sciis ke mia edzino forestos dum tiu semajnfino, ke ni interkonsentis ke ŝi venu al mi dimanĉnokte - nokte, kompreneble, por ke la najbaroj ne vidu ŝin - sed Alice iel eksciis pri la plano kaj gvatis. Kiam Bella alvenis, ŝi murdis ŝin, poste ŝi iris al la flughaveno kaj forflugis antaŭ ol ni trovis Bellan murditan. Mi kredas ke la polico ankaŭ kredis ke mi ja aŭdis bruojn, do ke mi helpis aranĝi la scenon post la murdo, sed kompreneble ili havis nenian pruvon, se efektive ili kredis tiel. Ili povis nur supozi. Do kvankam ili hmis kaj hois kaj senĉese demandadis, ili finfine devis rezigni pri la afero. La oficiala raporto pri Bella estis 'venenita de iu(j) nekonato(j)' aŭ io tia."

"Eble ŝi mortigis sin," Johano komentis. "Ia bizara provo venĝi sin kontraŭ vi per sinmortigo en via oficejo kie oni neeviteble supozos ke temas pri murdo?"

"Sendube ili pripensis ankaŭ tiun eblon," mi diris. "Tamen, ja estus nur supozo. Lasu min fini la rakonton. La vero estas

tiel nekredebla, ke mi dubas ke vi kredos ĝin, same kiel vi ne kredas la rakonton ĝis nun.

"Mian filon Davidon tute ne kontentigis la enketado farata de la polico, do li decidis iom mem detektivi. David teoriumis, komprenu, ke li scias pri Bella Andersson ion sciatan de neniu alia persono. Ŝiaj inicialoj interesis lin, B.A. Okazis tiel: li rimarkis la paperfoliojn sub la matraco tuj kiam li enlitiĝis kaj kompreneble tio kuriozis lin. Li tralegis la foliojn kaj rimarkis plurajn menciojn pri komputiloj. Tio ja ne surprizis lin, ĉar Bella estis profesia komputilprogramisto. Kio interesis Davidon estis ke ekzistas kontraŭleĝa grupo en Perto kiu nomas sin la Aŭstralia Nuksfendila Suito*, kiu okupas sin per fendado de komputilprogramoj, inter alie."

"Mi tute ne komprenas," diris Johano.

"Kiam oni laŭleĝe aĉetas programojn por komputilo, la programoj havas sekretan kodsinalon kiu nebligas ke oni faru kopiojn. Laŭ la ĵargono, 'fendi' signifas trovi metodon nuligi la efikon de tiu protektanta sekreta kodo. La merkato por kontraŭleĝaj kopioj estas tre granda, speciale por kopioj de la tre multekostaj programoj. De tio estas nur paŝeto al 'hakado' kiu en la ĵargono signifas trovi metodon uzi speciale protektatajn komputilojn kiuj postulas ke oni uzu ian sekretan kodon por funkciigi ilin. Ekzemplo estas la aŭtomataj bankmaŝinoj, por kiuj ĉiu kliento havas propran sekretan numeron por utiligi la maŝinojn. Jen la fako de grandskala krimado nuntempe. Kompreneble fari ion tian estas kontraŭleĝe, do fendistoj kaj hakistoj zorge kaŝas siajn nomojn. Sed se oni konas la ĝustajn personojn... Nu, David estis jam akirinta multajn programojn pere de La Aŭstralia Nuksfendila Suito, kaj li eksuspektis ke eble Bella Andersson estis parto de tiu grupo. Nuksoj kaj nuksfendiloj plurfoje rolis en ŝiaj sonĝoj - la sonĝoj kiujn mi kaŝis sub lia matraco. Mi mem neniam sukcesis kompreni tiujn menciojn en la sonĝoj. Do li komencis detektivi por trovi ian lignon inter Bella kaj la Suito."

"Kio finfine okazis al la sonĝoj?" demandis Johano. "Ĉu la

polico ricevis ilin?"

"Ne. Mia filino Helen metis ilin en sekurkeston en banko."

"Kaj ili restas tie nun?"

"Jes. Ŝi planas priverki la tutan aferon iam, kiam tio estos sendanĝera. Kial vi demandis?"

"Nur ĉar vi diris ke temas pri veraj eventoj, kaj mi sciolis ĉu ekzistas ia pruvo."

"Vi eldonos ĝin kiel fikcian, memoru. Do tute ne gravas ĉu ekzistas pruvo," mi akre komentis. "Negrave ĉu aŭ ne kred-ebla, ĝi estas vera. Lasu min fini la rakonton. La detektivado de David inter siaj konatoj komputilistaj rezultigis la scion ke unu el la Suitanoj havis la inicialojn B.A., kaj tio ŝajnis bona komenckloko. Se Bella Andersson estis parto de la Suito, tio ne nur klarigas tion, kion mi diris, sed ankaŭ ion alian. Komprenu ke estis multaj mencioj pri Pine-Gap en ŝiaj sonĝoj. Mi sciis ke ŝi forte oponis Pine-Gapon,* kaj mencioj pri ĝi verŝajnis ke ŝi estas parto de la Suito."

"Kial?"

"Eble vi ne memoras, sed la informilaro dum kelkaj tagoj tre ekscitis la publikon per raporto pri infano kiu pretendis ke per sia hejmkomputilo li manipulis la komputilojn en Pine-Gap. Komprenoble oni oficiale proklamis tion neebla ... la oficiala raporto estis ke la infano eble povis haki en la komputilsistemojn kiuj uzas la telefonretaron, sed ke Pine-Gap ne uzas la telefonretaron por siaj komputiloj, krom por mendi manĝaĵojn kaj tiaĵojn. Eble tio estas vera. Sed nur pensu: La komputiloj en Pine-Gap devas esti iel kunligitaj kun tiuj en Vaŝingtono - eĉ kvankam oni oficiale neas tion - kaj la plej verŝajna metodo estas radiokodsinaloj uzantaj sateliton. Se oni posedus la necesajn aparatojn kaj scion, oni povus manipuli la sinalojn."

"Kaj vi imagas ke juĝa Bella Andersson disponis pri tia ekiparo?" demandis Johano malkredtone.

"Tiel juna ŝi ja ne estis. Sed ne. Mi dubas ke ŝi mem havis la necesan ekiparon je sia dispono. Sed eble ŝi havis scikapablon vendeblan al personoj kun tia ekiparo."

"Do, nun, laŭ vi, ŝi estis sekreta agento de la rusoj. Mi supozas ke post tio vi diros ke via filo trovis ke ŝi estis edukita en Moskvo kaj ke ŝi sonĝis ke rusoj persekutas ŝin ĉar ŝi decidis riveli ĉiujn sekretojn al la aŭtoritatuloj kaj fariĝi bona aŭstraliano amanta sian landon. Kaj la rusoj murdis ŝin, kaj ili decidis kulpigi vin pro kialo nekonebla."

"Eble tio farus bonan rakonton," mi diris. "Konsideru uzi ĝin se al vi ne plaĉas la vero. Ne. Mi ne kredas ke rusoj apartenas al la afero. Ŝi ja estis bona aŭstraliano amanta sian landon; sed se ŝi sciis akiri sekretan informon, mi preferas kredi ke ŝi diskonigus ĉion al la informilaro kiel pruvon ke la rusoj facile povus lerni sekretojn el Pine-Gap. Tio pruvus ke Pine-Gap estas grava celo por nuklea bombado se ĝi kolektas sufiĉakvalitan informaron."

Do kia rilato estas inter ĉio ĉi kaj vi kaj via edzino? Ĉu vi iam ricevis mesaĝon de via edzino?"

"Jes. Efektive, ĉirkaŭ semajnon post la murdo, mi ricevis poŝtkarton de ŝi, poŝte stampitan en Romo."

"Kion ŝi skribis?"

"Kodmesaĝon: P.N.G. bona. Estas bedaŭrinde pri la bananoj, sed ili ne estis konserveblaj. Ame, Sylvia."

"Ĉu via edzino ne nomiĝis Alice?"

"Tiel. Mia fratino nomiĝas Sylvia. Alice ĉiam uzas ŝian nomon kiam ŝi sendas mesaĝon al mi, por ke tro legemaj personoj ne interesiĝu pri la mesaĝoj."

"Kion signifas la mesaĝo?"

"La kodo estas tre simpla. Oni forprenu la centran vokalon de la unua vorto, kaj restas 'P.G. estas bona. Estas bedaŭr-

inde ke Bella Andersson ne estis konservebla."

"Do, via edzino efektive murdis ŝin."

"Tiel ŝajnas."

"Kiel vi eksplikis al oni ŝian malaperon, ke ŝi neniam revenis."

"Mi elpensis kialon: ke ni kverelis inter ni kaj ŝi reiris al Ameriko kaj ni neniam reenkontiĝis. Tio akordis sufiĉe kun la teorio de la polico por ke ĉiu estu kontenta."

"Ĉu vi ankoraŭ komunikas kun ŝi?"

"Jes. Ŝi sendas fojfoje mesaĝojn. Kvazaŭ venintajn de mia fratino, kompreneble."

"Pardonu, sed la rakonto estas tro amatora por nia revuo. Sed eble mi konservos ĝin, por ke alia verkisto prilaboru ĝin por atingi adekvatan nivelon." Johano malfunkciigis la magnetofonon kaj enpoŝigis la kasedon.

"Kial la rakonto ne taŭgas? Kiel ĝi estas amatora?"

"Nu, se vi ne amoradis kun Bella, kial ŝi estis en via oficejo? Kaj kial kaj kiel via edzino murdis ŝin?"

"Bella estis en mia oficejo por nuligi ĉiujn notojn miajn pri ŝi, tion mi supozas. Pri la kielo, mi povas nur konjekti. Eble Alice invitis ŝin kaj nevidate metis la barbituraĵojn en ŝian trinkaĵon. Post tio ŝi malŝlosis la arkivkeston por Bella -- Alice havis propran ŝlosilaron por ĝi."

"Kial ŝi malŝlosis ĝin?"

"Por ke Bella povu detrui la kulpigajn notojn el la arkivo, kompreneble. Alice ne volis ian mencion pri Pine-Gap. CIA agentoj ne estas tiom naivaj, certe vi scias tion."

"Do nun vi diras ke via edzino estis CIA agente?" Johano estis videble ankoraŭ pli malkredema.

"Kompreneble ni ... ŝi estis. Estas. Kial, laŭ via supozo, ni venis al Perto? Kaj pro kia alia kialo la polico plene silentus pri la murdo kaj ne raportus ĝin al la informilaro? Kaj ne provus plu persekuti Alicen? Estas klare ke iu superulo ordonis ke ili ĉesigu la enketon."

"Kaj tial ili ankaŭ tiel ĝentile traktis vin," komentis Johano. "Ili eĉ ne veturigis vin al la policstacio por demandadi aŭ ke vi 'helpu la enketon', laŭ ilia amata frazo."

"Mi supozas ke tiel estis."

"Kaj kial ĉio ĉi devigis vin ĉesi profesii kiel psikanalizisto?"

"Nu, ĉar la naturo de mia profesia agado nun estis sciebla, kompreneble mi ne plu povis praktiki."

"La naturo de via profesia agado estis sciebla? ... Mi komprenas. Estante psikanalizisto vi povis trovi ĉiujn sekretojn de viaj pacientoj kaj informi Alicen. Sed koncernatoj sciiĝus pri la evento en via domo malgraŭ la silento de la informilaro pri ĝi."

"Se David povis trovi la ligan inter Bella Andersson kaj la Suito, do ankaŭ ĉiu alia persono kun sama suspektemo povus sciiĝi pri ĝi. Jes. Kaj sekve tiu enketus pli zorge kaj rapide trovus la vojon al mi. Do nia aranĝo ĉi tie ne plu estis uzebla. Do mi retiriĝis kaj komencis karieron de verkisto."

"Kaj ĉu viaj sukcesaj rakontoj estis bazitaj sur informoj de pacientoj?" demandis Johano.

"Plejparte."

"Do plu verku tiel. Ĉi tiu absurda rakonto estas tro nekredbla. Oni kredus ĝin nek kiel veron, nek kiel fikciaĵon. Mi bedaŭras. Jen via kasedo." Johano tiris kasedon el sia

poŝo kaj transdonis ĝin al mi. Estas vere ke ĝi aspektis identa al la TDK kiun mi uzis por registri la rakonton. Sed identa ĝi ne estis, ĉar la protektpeceto sur ĝia malantaŭo ne estis rompita, malsimile al tiu, kiun mi uzis, kies derompitan peceton anstataŭis malgranda glubendeto. Mi ne komentis sed prenis la kasedon kaj dankis.

Post la foriro de Jonano, mi enmagnetofonigis la kasedon kaj funkciigis la aparaton. Mi aŭdis longan mesaĝon de Alice, kiu sin nomis Sylvia, uzantan nian kodon. Ŝi salutis min kaj la infanojn. Mi decidis konservi ĝin. Helen povos meti ĝin en la sekurkeston de la banko, post aŭskulto.

Estis interese scii ke la kasedo de Johano venis de Alice. Do nun Johano estas la agenteo en Perto. Amuzis min, demandi al mi, ĉu li kredis mian absurdan pretendon ke ne mi sed Alice murdis Bellan. Verŝajne tion mi neniam scios. Kompreneble neniam aperis mencio pri la afero en la PERTA LITERATURA REVUO.

....

*Geninfanoj = ge-infan-nj-oj = "the kids". "-nj-" ne nur pro feminismo, sed ankaŭ ĉar "-ĉj-" rezultigus la nedeziratan afikson -aĉ:- geinfaĉjoj.

*Titolo de fame konata muzikverko de Ĉajkovski, konsistanta el muziktemoj el lia baletto "La Nuksfendilo".

*Pine-Gap estas la nomo de "sekreta" usona elektronikspiona bazo en Aŭstralio. Oficiale oni pretendas ke la perkomputile registritajn trovojn oni transsendas al Vaŝingtono du- aŭ tri-foje dum ĉiu semajno per aviadilo.

Pro la nun disvastiĝanta sento de glasnosto via redaktoro decidis aperigi ĉi tiun raporton, utiliginte la kasedon, kiun Helen provizis el la sekurkesto. La nomo "Johano" estas falsita por protekti lin. Ĉu li plu estas CIA agenteo en Perto ni ne scias. Ankaŭ la nomoj de la aŭtoro, lia edzino, lia fratino, kaj liaj infanoj estas falsitaj, laŭ lia peto prezentita frue en la rakonto.

[La red.]

KONKURSO NUMERO 5

Sendis plene ĝustan respondon nur unu persono: Alan Towsey de Tahmoor NSW. La konkurso konsistis el du demandoj: "En sia traduko de la Malnova Testamento Zamenhof tradukis la hebrean nomon de Dio (Javeo) per "La Eternulo". (a) Kial li faris tion? (b) Kiel oni povas pravigi la specifan tradukon de la nomo per "La Eternulo"? Alan Towsey respondis:

(a) La nomo YaHWeH (YaHVeH) de Dio estis por la Hebreoj tiel sankta, ke ili neniam eldiris ĝin, ĉiam anstataŭigante ĝin per 'aDoNaI [= mia(j) Sinjoro(j)].* Zamenhof do ne volis laŭlitere esperantigi la Sanktan Nomon.

(b) Oni ĝenerale kredas, ke la nomo YHWH devenas de la hebreaj vortoj HaYaH (esti) kaj/aŭ HaWaH (ekzisti), eble kombinaĵo de ambaŭ, tiel esprimante la eternecon de Dio, en duobla, emfaza nomo kiu do signifas "Mi estas eterne." (Komparu Eiron 3:13-14: "Kaj Moseo diris al Dio: Jen mi venos al la Izraelidoj, kaj diros al ili: La Dio de viaj patroj sendis min al vi; tiam ili diros al mi: Kia estas Lia nomo? Kion mi diru al ili? Kaj Dio diris al Moseo: MI ESTAS, KIU ESTAS. Kaj Li diris: Tiel diru al la Izraelidoj: La Estanto sendis min al vi... Tia estas Mia nomo por eterne...") "La Eternulo" estas do tre trafa traduko de YaHWeh.

*Por indiki tion, en la hebrea Biblio oni metas la vokalojn de 'aDoNaI kun la konsonantoj YHWH. (En la hebrea, oni skribis en la komenco nur la konsonantojn. Poste, oni komencis uzi la konsonantojn H Y W por la longaj vokaloj A I U, kaj, en la 6a aŭ 7a jarcento P.K., oni komencis indiki ĉiujn vokalojn per signoj (streketoj kaj punktoj) super aŭ sub la konsonantoj, t.e. ekster la vorto.) La anglaj tradukintoj de la Biblio en 1611, ne bone komprenante tiun kutimon, prononcis tiujn vokalojn inter la konsonantoj YHWH (YHVH), tiel kreante la anglan vorton "Jehovah".

KONKURSO NUMERO 6

En kiu romano de Graham Greene estas satiro pri Esperanto kaj Doktoro Zamenhof? Resumu la satiron kaj donu takson pri ĝia praveco. Limdato: 1 marto 1990.

RESPONDOJ POR "PROVU VIAN VORTOSCION"

1.a; 2.a; 3.a; 4.b; 5.b; 6.c; 7.b; 8.a; 9.b; 10.c; 11.c; 12.b; 13.b;
14.b; 15.a.

ŜLOSILO POR "RIMANTA SLANGO"

1. Kanbero; 2. klubo; 3. Esperanto; 4. membro; 5. amiko; 6. urbo
7. laboro; 8. pikniko; 9. lago; 10. edzino; 11. infano; 12. manĝo
13. barbekuo*; 14. kolbasoj; 15. kotletoj; 16. salato; 17. frukto
18. vino; 19. suko; 20. prezidanto; 21. poemo; 22. zamenhofa
vespero; 23. raportoĵn; 24. rimanta slango.

*barbekuo = viando rostita sur krado (v. PIV p.575. s.v. krado II.1.) super brulaĵo, kutime eksterdome. "Rostokrado", proponita en PIV ne distingas inter endoma forno en kiu rostokrado estas provizita, kaj sendependa eksterdoma rostokrado, kiu estas specialforma aparato populara por piknikoj kaj dumsomere eksterdomaj neformalaj manĝoj.

(La red.)

-0-

LIBRO PRI PROBLEMSOLVADO

recenzas DONALD BROADRIBB

ENKONDUKO AL PROBLEMSOLVA ORIGINALA KJ-METODO, de Kawakita Jiro. Tokio, Japana Esperanto-Instituto, 1989. 48p. Speciale mendebla pere de la AEA Libroservo, prezo ĉ. \$8.00.

Kawakita Jiro fondis specialan metodon por solvi problemojn en preskaŭ ĉiu fako de la vivo kaj laboro. Kvankam ekzistas 600-paĝa detala libro pri la metodo, eldonita japanlingve kaj laŭanticipe ankaŭ eldonota en Esperanto, la metodon devas instrui zorge trejnita persono, kompetenta pri ĉiuj detaloj. Kursojn tiucelajn provizas la Esplor-Instituto Kawakita en Japanio (kredeble nuntempe nur en la japana lingvo).

La problemsolva metodo mem aspektas kiel apliko de ordinara logiko, sed Kawakita diras ke lia metodo estas patentita. Kiu interesiĝas, tiu legu ĝin.

NOVAJ LIBROJ

Lastatempe la Libro-Servo de AEA enstokigis la sekvantajn verkojn aperintajn post la preparo de la Librokatalogo 1990 kaj la suplementa listo en nia Novembro-December numero 1989. AEA-membroj rajtas ricevi 5% rabaton. La poŝtkosto estas kutime \$2.50 por sendaĵo, negrave ĉu por unu, ĉu por pluraj verkoj.

527. Lingvo kaj Vivo, de Waringhien. \$35.50

553. Vere aŭ fantazie, de Piron. (Facilaj rakontoj por progresantoj). 215p. \$15.50

404. Kromosomoj, de Lorjak. 150p. \$13.00

594. Tinĉjo la krabo kun oraj pinĉiloj, de Herge/Gonin. (Kolora bildstrio). 62p. \$14.00

601. La nova realismo, de Volgelmann. 184p. \$20.00

26. Insigno #7 (ronda broĉo 20mm kun la vortoj "Esperanto Lingvo Internacia") \$4.20

BONVOLU KOREKTI: la nova eldono de la FUNDAMENTO DE ESPERANTO (335p.) kostas \$18.00. [La prezo donita en nia lasta numero estis transskriberaro.]

Mendojn sendu al: Libro-Servo de AEA, PO Box 230, Matraville NSW 2036.

Verkoj neenstokigitaj estas speciale mendeblaj pere de la AEA Libro-Servo.

-0-

RECENZANTOJ BEZONATAJ


Ofte venas al la redakcio libroj por recenzo, kaj personoj dezirantaj fojfoje prepari recenzojn estas petataj komuniki kun la redaktoro. Ni ne povas pagi honorarion, sed la recenzitaj libroj estos donacitaj al vi. Bonvolu indiki kiajn librojn vi povas recenzi, ekz. poezion, sciencajn aŭ teknikajn verkojn, verkojn pri komputilado, librojn por komencantoj, por infanoj, lernilojn, kc. Skribu al la redaktoro, Donald Broadribb, 46 Great Eastern Highway, Bakers Hill WA 6562.

The Australian Esperantist

Numero 260

MARTO-APRILLO 1990

Registered by Australia Post
Publication no. WBG 2488



Analoj de 1989 (Horo)...p.3

Nekrologo: Bill Leah (Robbie Robertson)...p.7

JAGE (Niĉjo Nicholas)...p.8

Recenzoj: Kamelo Sjangzi, Antikvaj filozofoj de Cinio, Mi Juna, Bovino kaj teksistino, Sanco por feliĉo, Kuriozaj floroj kaj arboj, Vojaĝoj finiĝas, amantoj kuniĝas, Eŭropo, Nov-Zelanda Esperantisto, Fakte aŭ fantazie, kc. ...p.9-20

Provu vian vortoscion (Donald Broadribb)...p.21

AEA Kongreso januaro 1990 en Melburno...p.23

Novaj libroj...p.27

English supplement

THE AUSTRALIAN ESPERANTIST

Oficiala organo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio

Redaktoro: Donald Broadribb, 46 Great Eastern Highway, Bakers Hill WA 6562. Telefono: (09) 574 1307.

Prezidanto: Trevor Steele, 2/9 Main Avenue, Coorparoo Qld 4151.

Vicprezidantoj: Vera Payne, 36 Donegal Rd, Floreat Park WA 6014.

Justice K. Enderby, 2 Phoebe St, Balmain NSW 2041.

Sekretario: Ray Ross, 41 Agnes St, Sunnybank QLD 4109.

Vicsekretario: Herbert Koppel, GPO Box 2122T, Melbourne Vic 3001.

Kasisto: Owen Loneragan, 16 Deverell Way, South Bentley WA 6102.

Libro-servo: Tom Elliott, PO Box 230, Matraville NSW 2036.

Korespondaj kursoj: John Moore, 7 Pelican St, Emu Park QLD 4702.

Membreco: \$25, por individuo, klubo, aŭ federacio; \$30 por familia membreco. (Ĉiuj ĉe la sama adreso); \$15 (minimume) por pensiulo aŭ studento. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto aŭ al la Libro-Servo.

Bonvolu avizi la redaktoron se via adreso estas neĝuste presita sur la adreslipeto, aŭ se vi ŝanĝas vian adreson aŭ/kaj nomon.

Sendu ĉiujn komunikaĵojn, artikolojn, librojn por recenzo kc. al la redaktoro. Limdato por alsendo de presotaĵoj por la venonta numero: 1 marto.

SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO verku artikolon!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de THE AUSTRALIAN ESPERANTIST, "ni vere bezonas artikolon pri..."? Do sendu al ni tiun amatan eseon, ideon, rakont(et)on, esprimon de vidpunkto, ŝercbildon. Ni ĉiuj volos legi ĝin! Preparante la tekston, bonvolu atenti la ĉi-sekvajn postulojn: la teksto devas esti klare tajpita, kun duobla spaco inter la linioj, kaj marĝenoj de almenaŭ 2 centimetroj. Tajpu sur nur unu flanko de ĉiu folio. Netajpitaj tekstoj estos malakceptitaj. Por konservi la lingvonivelon de ĉi tiu gazeto la redaktoro rajtas lingve korekti ĉiun tekston antaŭ aperigo. Se la disponebla spaco aŭ la stilo de la verko necesigos tion, la verko povos esti mallongigita de la redaktoro. Ni ne povas promesi aperigon en la tuj sekvonta numero, krom se temos pri kronologie urĝaj tekstoj. Ankaŭ

ŜVARCECAJ ANALOJ DE 1989

de Horo

En jaro kiam la Akademio de Esperanto finfinfine kuraĝis rekomendi la uzeblajn nomojn de membroj de Unuiĝintaj Nacioj, multaj landoj spertis tiajn ŝanĝojn per migrado kaj socia aŭ politika evoluo, ke iliaj nomoj aŭ titoloj komencis ne tuttute akordi kun la nova idealisma realaĵo, super ĉio kiam rilatas al koloroj. Ju pli longe mi pripensis tiun problemon, des pli konfuzita mi fariĝis.

Ekzemple, en Urslando alinome Kursvetunio la ruĝa monolita (unulita) unio de komunistaj sovetaĵ respublikoj ekŝanĝiĝis al multpartia kaj multnacia ŝtato, aŭ eĉ grupo da blankaj ŝtatoj, tamen kun nigra merkato. Ĝia nomo pli taŭge estus "Polusursio" aŭ eĉ, prenante la nomon de tiu sendependa membro de Unuiĝintaj Nacioj, "Beloursio", kiu signifas ne "bela Ursio" sed fakte "Blanka Ursio". La kaŭzoj de la transformiĝo aŭ reorganizo (urse pertrockio) ne estas tre klaraj. Eble estis rezulto de la reveno al la patrujo de miloj da soldatoj, kiuj vizitis amikojn en Afganistano (antaŭe Afgan-io/-ujo/-lando). Tie ili spertis la freŝan liberan aeron de la montaroj, kaj la sendependan vidpunkton de Kabeulo. Eble estis dank'al la influo de inaj tenisludantoj, kiuj in-sistis ke oni permesu al ili enretigi kaj reteni la premi-monon, kiun ili gajnis en kapitalistaj tenisejoj. Sed la plej kredebla teorio estas, ke la blankiĝo de la Ruĝa Imperio estis rezulto de la malpermeso de vodko fare de Gobiĉefo. Sekvis periodo de malgajeco, nomita glasnostalgio. La nura solvo estis importi viskion el la Okcidento, por kio oni bezonis financon helpon. Por tio kamaradumis Mikelo (kromnomo de la urso) kun Georgo, la Prezidanto de Aglolando. Por tio li riskis sian vivon sur la Ŝtormoza Mediteraneo, kie li trovis, ke la akvo ne estas malalta. Por tio li persvadis sian amikon, la veteranon, Andreon la grumon amikan, emeritiĝi. Por tio li rivelis la eraojn kaj erarojn ne nur de Stalono, sed ankaŭ de la fratoj Markso kaj Leonino. Fine por tio li aŭdace vizitis la Vatikanon kaj invitis Lian Papan Moŝton viziti moskeon. Sed tio kreis problemeton. Sendube Lia Sankta Moŝto deziros viziti ne nur la moskeon sed ankaŭ la preĝejojn ĉirkaŭ la Ruĝa Placo. Eble estus diplomatia gesto al gasto renomi tiun placon: Placo de Sankta Bazilo, aŭ Bazilika Placo, aŭ Placo de Johanno aŭ Paŭlo. Kaj kiam la Papo vizitos la Artmuzeon de l'Ermitejo, oni nepre devos preni la okazon por renomi la urbon: Urbo de Sankta Petro, ĝia antikva nomo. Anticipe la ursona gazeto "Tempo" nomis Gobiĉefon la plej renoma viro de la jardeko.

La Poloj, kiuj dum 44 jaroj flameleone skarlatiis kontraŭ la fono de

la Ruĝa Armeo, kvankam ilia flago estis duone blanka, ankaŭ paliĝis kaj poliĝis. Post kelkaj strikoj kaj aliaj pacaj demonstracioj de solidareco, oni instalis nekomunistan registaron. Karmezina polucio estis anstataŭita de la kara meze blanka. Oni esperis, ke la kreditoraj kapitalistoj donus tute blankan paĝon, sur kiu oni povus reskribi la historion kaj kiu estus tute libera de ŝuldoj. Eĉ oni povus eble ricevi, same kiel la burĝoj de okcidenta Eŭropo post la Dua Mondmilito, subvencion provizitan de la impostpagistoj de la Eŭropa Komunumo kaj de Aglolando. Oni eĉ konsideris la restarigon de Duklando, honore al antaŭa filmstelulo de Aglolando. Almenaŭ en estonteco oni ne parolos eĉ ŝvarce pri Varsovieto! Kaj oni povos kanti, anstataŭ la "Internacian" la Krizante-mon aŭ Leŝkanton!

En Germanio, por marki la 40-an datrevenon de la akcepto, fare de UN, de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, oni decidis testi la promeson, ke "ĉiu rajtas eliri el kiu ajn lando, inkluzive la propran, kaj reveni en sian landon". La homoj de Orienta Teŭtonio, la tielnomita Demokratia Respubliko, komencis migri okcidenten. Unue ili preferis viziti laŭvoje siajn najbarojn en Ĉeklando kaj Ostroregno. Sed fine germana efikemo triumfis, kaj oni komencis vojaĝi rekte. Tiam la muroj de limjaroj estis per la sankta armeo disbatitaj. Oni eĉ ekparolis pri la reunuiĝo de Teŭtonio, por simpligi la nomon kaj flagon. Kaj por eviti la duoblajn literojn oni planis la renomon de Bonno: Berlino. La ĉefministro, tiu kun la pseŭdonimo "Hela aŭ Koka Kolo" vizitis la ruinojn de la antikva muro kaj promenis tra la Brand-burĝa Pordego, renomita honore al la duonurbestro Vilĉjo Brando. Dum oni atendis la venontan balotdonadon oni libere disdonadis buleojn kaj bultenojn.

En Ĉeklando estis ankaŭ reblankiĝa movado en kiu neĝo ne estis ĝeno. Oni konstante amasiĝis sur la granda Placo de Prago por kanti la kristnaskan kanton: "La Bona Reĝo Venceslaso", kiun oni ne kantis post la printempo de 1968. Ĉar spertaj demokratiaj profesiaj politikistoj mankis, oni instalis kiel Prezidanton de la Respubliko poeton, pseŭdonime "Avelo", kiu gajnis nobelpremion pro literaturo. Kaj kiel prezidanton de la parlamento oni nomis emeritiĝintan liberpensiulon, duba Ĉeko, kiu malaperis post la printempa foiro de 1968. La ĉekaj tenisludantoj nun investas parton de sia kapitalo en sian hejmlandon, kiu eble renomiĝos Ĉekario. Eble estos aparta Slavaĉio kaj Morusavelio, aŭ eble reaperos la antikva Bohemio, el kie fontis la enmigrintoj al Parizo, la ĉefaj roluloj de la verda opero.

En Madjario oni decidis, ke en ĝemela ĉefurbo oni ne rajtas havi unulitan partion, kiu posedu la tutan ŝtatpotencon. Pli bone estu bunt-partia, eĉ se la elektoj estos iom kostaj.

En Jahurtio, la lando de acidigita lakto, multaj homoj migris vole nevole orienten, ĉefe nevole, en landon kie la virinoj portis turkan jupon, anagramatike kurtan jupon, aŭ minijupon, kaj povis reteni kurtajn nomojn. La ĉefurbo de Jahurtio restas Sofio, kie ĉiu estas anagramatike soifa. Tie pro la manko de vodko oni revivigas la produkton de naciaj drinkaĵoj. Ĉar oni komprenis, ke la kom-ekonomio ne sukcesis, oni ekopiniis, ke estus pli bone esti en la kom-unumo eĉ se ĝi entenus ankaŭ kurtajn membrojn.

En Rumenio, dank'al la protestoj de Esperantistoj kaj aliaj konservemuloj kontraŭ la detruo de tradiciaj vilaĝoj, oni ribelis kontraŭ la ruĝaj politikistoj. El la ribelo venis libero. La diktatoroj devis forlasi la plezurojn kaj palacojn, kiuj neniel estis loko simila al la hejmo. Kiam la ĉefaĉo deziris resti ruĝa la armeo insistis, ke li akompanu ilin, kune kun sia edzino, por ceremonio antaŭ la televidfotiloj. Post tio oni kuraĝis manĝi iom da nutraĵo produktita en la lando anstataŭ eksporti ĝin por pagi la koston de la granda blanka elefanto en la ĉefurbo, kies nomo estis Burokratretejo, mallonge Bukaresto. Nun la homoj povas iomete malbuki la zonojn. Oni ankaŭ komencas preparadon por pli bunta politika vivo.

Sed en unu lando la blanka ondo ne ŝvelis, kaj arkaika komoruĝa reĝimo restis en potenco je la fino de la jaro. Por eviti konfuzon, ĉar ĝia popola nomo ne derivas el "Albanejo" sed signifas "blanka lando", oni sugestis, ke oni ŝanĝu la titolon al "Ruĝio" aŭ "Sklarlatio" aŭ eble "Karmezono". Alia skolo preferus ke la landnomo devenu el la ĉefurbo, ekzemple Tiranio!

Ankaŭ en la plej granda insulo de la Antiloj ĉio restis neŝanĝita. La fidela ĉefo de la Kompartio rememorigas al la junuloj, ke mono kaj kapitalistoj produktas krimulojn - tiajn kiajn oni spektas en la video-filmoj kiaj "Fieco de Miami" aŭ "Dallas" en Aglolando. En tiuj urboj la hav-uloj aŭ hav-anoj estas pli potencaj ol la nehavananoj. Eble estus utile, por eviti komplikaĵojn, paroli kaj kanti, kiel faras la kantist-ino esperanta, pri "Haveno". Ankaŭ la vortoj "Kubismo" kaj "Kastro" kaj "Fideliro" povus kaŭzi konfuzon al neklera Esperantisto.

Oni devas, do, daŭre studi la situacion por elekti pli taŭgajn nomojn se estas nova revolucio en la Maro de Karibda.

En Azio estis ankaŭ politikaj seismoj en 1989. En Pekino, t.e. Bej-ĝingo, la studentfloroj kantis pri la demokratio - "regado de la popolo fare de la popolo kaj por la popolo" kaj ne "regado de la politiko fare de la politikisto kaj por la politikistoj", kiel diris Abrahamo Lincoln (Link'n). Sed la armeo ruĝa de liberigo estis tiel laca post sia longa marŝado, ke ĝi decidis ripozi danke kaj tanke sur la korpojn de la studentoj. Tiel la komplotoj de la kontraŭsocialistoj estis silentigitaj je la prezo de kalkaj radikaloj kaj kontraŭknaĵoj. Komprenoble, oni devos ŝanĝi la nomon de la Placo. Ĉar tie ne regas por la popolo ĉiela paco, ĝi nepre devas fariĝi la "Ruĝa Placo".

Dume la ĝemelurbo de Viktoria-Kolonio preparis sin por ruĝiĝo post kelkaj jaroj. Plejparte la enmigrintoj el Londono deziras hejmeniri al siaj ŝatataj Blankaj Klifoj, kaj multaj ĝemikoj deziras akompani ilin. Aliaj komencas ekzerci la flameleono-dancon. Sed kion fari pri la dek-mil-oj da vetemuloj kiuj venis boate al la kolonio? Tiuj kiuj rifuĝis pro teruro de la Ruĝa Rivero rajtas ricevi azilon, ĝis iu pli riĉa aŭ pli spachava lando bonvolos ilin akcepti. Sed tiuj, kiuj venis nur por ĝui la blankajn lumojn de la Kolonio estos sendataj, sendate, reen al la Suda Lando, kies nomo estos Ruĝriverio.

La registaro de Filiplando daŭrigis sian batalon kontraŭ la ruĝaj arbaruloj kaj samtempe kontraŭ la armeanoj, kiuj preferis la interesojn de la korpuso pli ol tiujn de la korinklino. La konservuloj deziris verdigi la landon per la reveno de smeralda poŝtmarko, sed la Prezidantino, kvankam ŝi estas verda kore, dekretis: "Unue ĉeko poste ĉerko"!

En Ostralia (ne konfuzenda kun Ostrio) la antaŭa blanka lando rapide fariĝis verdegata. Pro la alproksimiĝo de la klasbatalo, aŭ nacia balotado, la partioj elpensis konservajn programojn. La liberuloj anoncis, ke ili savos la pavon. La laboruloj solene ĵuris, ke oni ne detruos la akcipitron. Evidente eĉ la ruĝa centro estas minacata de verdigaj programoj, kaj la aborigenoj devos adopti la esperantan flagon.

Nur en Esperanti/uj/olando, same kiel en Okcidento estas nenio nova. La Prezidanto ekŝiĝis ... vivu la Prezidanto! La brajtonanoj transdonis la flagon al la havenanoj. La brustosteloj brilas verde. Kaj la Aŭstralia Esperanto-Asocio seminarias kaj seminarias konstante.

NEKROLOGO
BILL LEAH 1916-1990
 laŭ informo de **ROBBY ROBERTSON**

Bill Leah naskiĝis en 1916 kaj ĉeestis lernejon en Hyde apud Manĉestro. Li aniĝis en la skolta movado, kie li komencis lerni Esperanton. Forlasinte la lernejon kaj la skoltojn, kiam li atingis sian 15an jaron, li lernis Ĉarpentadon en la Militista Metilerna Kolegio. Post kvar jaroj oni sendis lin kiel militiston al Egiptio, kie li lernis novan metion kaj iĝis eksperto pri radioaparatoj.

Li estis sendita al Singapuro, kie li amikiĝis kun eŭropanoj, singapuranoj, malajzianoj, kaj ĉinoj. Rasismo ĉiam estis anatemiita de Bill. Kiam la malvenko de Singapuro estis neevitebla, oni forsendis grupon de la plej lertaj metiistoj perŝipe por eskapi de la insulo, sed malamikaj aviadiloj sinkigis la ŝipon. Post kelkaj horoj en la maro Bill estis savita kaj surteriĝis en Sumatro. Kun aliaj postvivantoj li trovis vojon tra la Ĝangalo al haveno, kaj estis portita al Kolombo. Li rakontis pri tio en sia libro LA KURTENO DE LA SULTANO.

En septembro de 1944 li surteriĝis kun la Aerportita Divizio en Arnhem kaj restis en malliberejoj ĝis la fino de la mondmilito. Denove li renkontis Esperanton kiel utilan komunikilon, kiam kaptitaj rusaj militistoj troviĝis apud la britoj. Je la fino de la milito la kaptitoj devis marŝi longdistance orienten tra la neĝo, kaj Bill perdis ambaŭ kruurojn pro frostvundo, pri kio li rakontis en sia libro LA VOJO IEN.

En 1952 Bill migris en Aŭstralion kun siaj edzino kaj filino. Li laboris metiiste pri radioaparatoj kaj televidiloj, kaj hobia serĉis gemojn en la kamparo, senzorge pri la manko de kruroj. Li marŝis ankaŭ demonstracie kontraŭ la milito en Vjet-Namo kaj kontraŭ la rasapartigiĝo en Sudafriko. Renkontinte Fritz Mueller-Soraŭ, konatan fervoran esperantiston, en Sidnejo, li interesiĝis denove pri la lingvo, sed opiniis, ke tempo mankas al li por studi ĝin. Tamen forlasinte Sidnejon kaj loĝante en Gunnedah, li studis perkoresponde kaj sukcesis en la elementa kaj la supera ekzamenoj, kaj komencis grupon en Gunnedah.

Bill kun sia edzino Sheila ĉeestis kelkajn aŭstraliajn kongresojn, kaj la Universalajn Kongresojn en Budapeŝto kaj Varsovio. Li restas en la memoro kiel elstara ekzemplo de homo kiu triumfis kontraŭ granda handikapo dum utila kaj feliĉa vivo.

JAGE

raportas Niĉjo Nicholas

JAGE (Junulara Aŭstralia Grupo Esperantista) anoncas jen sian fondiĝon. Tiu neformala kaj nehierarkieca grupiĝo celas provizi organizan substrukturen por gejunuloj esperant-lingvaj kaj -simpatiantaj, sub la aĝo de 35 jaroj. La adreso de la JAGE-sidejo (ĉe la sekretario) estas: 17 Renowden St, Cheltenham Vic 3192. Membrokotizo estas \$8, kiun oni pagu al la kasisto: P O Box 218, Belair SA 5052.

Ni insiste petas al la AEAanoj, ke ili helpu al JAGE jene:

sendu al la sekretario la adreson de ĉiu potenciala JAGE-membro, pri kiu vi scias. Ni ĉi-momente havas nur dekon da adresoj, kaj firme kredas, ke ekzistas almenaŭ plusa deko ĉi-lande.

helpu al instruado de la lingvo ĉe JAGE-filioj (universitataj kluboj ktp.)

la federacioj helpu per disponigo de libroj kaj eventuale prunto-rajtigo al JAGEanoj, krom per subtena abonado de taŭgaj gazetoj (Kontakto, Monato, Juna Amiko, La Kancerkliniko)

La celoj de JAGE estas, laŭ gravecordo:

1. Antaŭenigi la Esperantistan movadon inter la aŭstralia gejunularo.
2. Diskonigi kune la lingvistikan intereson kaj praktikajn gajnojn alireblajn per Esperanto.
3. Kamaradeco: enurbe, eksterlande, tutmonde.
4. Varbi kandidatojn por la diversaj AEAaj junularaj stipendioj.

La organo de JAGE estas Luka Bulteno, kiu eliras ĉiumonate. Havigblas januara (formalaĵa) kaj februara numeroj.

Pozitivan laboron ni nur nun ekorganizas. Raporton pri niaj sukcesoj (aŭ mal-) vi povos legi en ĉiuj venontaj numeroj de The Australian Esperantist.

KAMELO SHJANGZI

recenzas Donald Broadribb

KAMELO SJANGZI, de Laŭ Se. Bejĵing: Ĉina Esperanto-Eldonejo 1988. 319p, bindita. \$9.00 ĉe la AEA Libroservo.

Delikata romano pri la vivo de idealisma rikiŝisto, kiu iom post iom degeneras pro serio da sortobatoj kaj pro sia propra naiveco. La aŭtoro (1899-1966) estas unu el la plej sukcesaj verkistoj en la moderna Ĉina literaturo. La romano originale aperis ĉin-lingve en 1936, kiu ankaŭ estas la scen-tempo de la enhavo de la libro.

"Kamelo" estis moknomo donita al Sjangzi de aliaj rikiŝistoj pro epizodo frua en la romano, dum kiu li mallongatempe posedas (per ŝtelo) tri kamelojn, kiujn pro sia naiveco li tre malkare vendas.

Laŭ Se, la aŭtoro, estis instruisto, kiu dum 1924-1929 lekciis en la Universitato de Londono, kaj dum 1946-1949 en Usono. Eble pro tiu familiariĝo kun okcidentstila verkado, lia romano estas facile legata de "okcidentulo", kaj la rimarkinde talenta tradukinto provizis al ni juvelon kiun, se la titolpaĝo kaj la enkonduko ne alie informus nin, oni facile povus supozi originala esperanta romano de tre alta kvalito.

La enkonduko diras malmulton pri la spertoj de Laŭ Se dum siaj jaroj antaŭ la familiariĝo kun Londono, krom ke li naskiĝis en tre malriĉa familio. Kiom li mem spertis la vivon pri kiu li verkas, ni ne povas scii. Sed ne estus troige diri ke li estas kvazaŭ dudek-jarcenta posteulo de Charles Dickens. Neniam predikante, neniam mirigante, li donas biografian portreton de la malriĉa rikiŝ-tiristo Sjangzi. Nek sensacia, nek aventuroplena, la romano konigas al ni la psikon de Sjangzi. Komence oni iomete malpacience atendas ke io "okazu" en la romano, sed baldaŭ oni estas tirita en la mens-mondon de Sjangzi, ĝis post nelonge oni malvolonte interrompas sian legadon.

Sjangzi estas naiva, idealisma, trohonesta junulo (aĝa iom malpli ol dudek jarojn), kies solaj celoj estas posedi propran rikiŝon, kaj esti la plej rapida, plej fortika rikiŝtiristo en Beiping (la tiama nomo de Bejĵing). Tiuj celoj obsedas lin tiom, ke li tute ne povas kompreni la bezonojn de aliaj personoj, nek eĉ de si mem. Ĝi estas, ni povus diri, psikologia romano kies tragedia fino estas tiel neevitebla, kiel en klasikgreka dramo.

La libro estas klare presita, preskaŭ plene mankas komposteraroj. Pluraj aŭtentike ĉinstilaj bildoj donas ekstran ĉarmon al la verko. La bindo estas fortika.

Literaturamanto ne povus elspezi \$9.00 pli boncele. 0

ANTIĴVAJ FILOZOFOJ DE ĈINIO

recenzas Donald Broadribb

ANTIĴVAJ FILOZOFOJ DE ĈINIO, de Hoŭ Ĝjŭeljang. Tr. kaj prilaborita de kvin ĉinaj esperantistoj. Beijing: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1988. 224p. broŝurita. Prezo \$4.60 de la AEA Libroservo.

Jen perlo por personoj kiuj deziras sciiĝi pri la gravaj filozofoj de Ĉinio inter proks. 500 aK (Konfuzio) kaj 1650 (Ŭang Fuĝi). Klare verkite, la libro dediĉas ĉ. 5-10 paĝojn al ĉiu el tridek filozofoj. Kelkajn nomojn vi rekonos, la plej multajn ne. Per facila stilo kaj simpla klarigado, la aŭtoro prezentas la ĉefideojn kiuj regis en la ĉina filozofio dum du mil jaroj. Krome, la aŭtoro uzas familieran, neerudician verkmanieron, ofte informante pri kiel li unuafoje sciiĝis pri tiu aŭ alia filozofoj, kian impreson li unue recevis, kc., tiel ke ŝajnas ke li parolas rekte al la leganto. Per tia stilo eĉ tre malfacilaj konceptoj kompreniĝas.

Kompreneble, en tiel malmulta spaco oni ne povas profunde konigi la tutan pensaron de eminentaj filozofoj. Sed por personoj, kia mi, kiuj dum siaj filozofiaj kursoj en la universitato neniam aŭdis pri la ĉinaj filozofoj, ĝi estas bona enkonduko al la temo. Ĉar multaj el la ĉefkonceptoj troviĝas ankaŭ ĉe eŭropaj filozofoj diversepoke, estus valore iam havi libron kiu komparus ilin kaj kunligus la tutan por fari tutmondan historion de filozofio.

Supozeble la aŭtoro estas ĉina marksisto (li neniam mencias "okcidentulojn", krom Leninon en unusola frazeto), kaj pri la marksisma fako de filozofio mi devas konfesi min tute novica. La du ĉefaj marksistaj terminoj uzataj en ĉi tiu libro estas "materiisma" kaj "dialektiko". Li uzas ilin tiel ofte, ke post kelka legado ilia signifo por li fariĝas klara: materiisma = ne metafizika, kaj dialektiko = ke ĉiu kvalito aŭ karakterizaĵo estas nur relativa. T.e. "bono" ricevas sence nur kiam oni kontrastas ĝin kontraŭ "malbono", "granda"/"malgranda" kc. La aŭto-

ro trovus bonan amikon en la greka filozofa Platono, kiu multe emfazis ĝuste tion. Sed sian animamikon inter la filozofoj li trovus ĉe la greka filozofa Heraklito, kies famaj diroj "oni neniam dufoje enpaŝas la saman riveron" kaj "la suno ĉiutage estas nova" estis esprimitaj ankaŭ de pluraj ĉinaj filozofoj, kaj estas klare ke tiu vidpunkto plej plaĉas al la aŭtoro. Temas pri la koncepto ke ĉio konstante ŝanĝiĝas. Heraklito volis diri ke rivero konstante ŝanĝas sian enhavon kaj formon, tiel ke neniam ĝi estas preciza tia, kia antaŭe; kaj same pri la suno. La saman ekzemplon pri rivero uzis kelkaj ĉinaj filozofoj, sed ŝajnas klare ke ili kaj Heraklito ne interplagiatis sed uzis memevidentan ekzemplon ĉemanan por esprimi sian penson.

Laŭ la vidpunkto de la aŭtoro, kaj la filozofoj de li plej laŭdataj, la historio konsistas el eterna ŝanĝiĝado. Sed la leganto, eble pro la koncizeco de la priskriboj, emas ekpensi pri la franca esprimo "ju pli ŝanĝiĝas, des pli restas same". La historio de la ĉina socio ŝajnas - laŭ ĉi tiu libro - eterne sama, tute sen fundamenta ŝanĝiĝo, kvankam ja okazis ĝenerala progresado en la filozofia mondo, kiu strange spegulas la historion ankaŭ de la okcidenta filozofia mondo.

La tri ĉefaj konceptoj de la ĉina filozofio, jin'o, jang'o kaj ĉi'o, konstante diskutiĝas, kaj la leganto devas iomete koni tiun pensotendon, ĉar la aŭtoro (kiu ja ne verkis por okcidentaj esperantistoj!) malmulte eksplikas ilin, supozante - sendube prave - ke ĉiu ĉina leganto jam bone konas ilin. La koncepto ĉi'o estas eble plej malklare glosita de la aŭtoro. Sed pripensinte la uziĝon de tiu vorto de la multaj ĉinaj filozofoj skizitaj, ŝajnas al mi ke "energio" kun la moderna senco donata al tio de fiziko, plej bone transdonas la ĉefideon. Se mi pravus pri tio, la teorioj ke la kvanto da materio +energio neniam varias kaj ke energio povas fariĝi materio kaj materio povas fariĝi energio jam estis proponataj kaj multe diskutataj jam jarmilon antaŭ ol Einstein proponis sian faman ekvacion $E=MC^2$. Estas ankaŭ klare, ke se la aŭtoro ĝuste prezentas la pensojn de la ĉinaj filozofoj (kaj pri tio mi tute ne dubas), la propono de iuj okcidentuloj ke ĉi'o = seksenergio estas tute erara.

Pri jin'o kaj jang'o nur necesas scii ke temas pri la parigo de sin oponantaj konceptoj, ekzemple: varmo/malvarmo, honesto/malhonesto, mola/malmola. Laŭ la ĝenerala vidpunkto dum la tuta historio de Ĉinio ĉi tiaj paroj estas la esenco de la realo, kaj la aldona koncepto ke unu el paro transformiĝas en la alian el la paro (ekzemple, varmo tran-

sformiĝas en malvarmon, movadon en senmovecon, kc.) estis emfazita ne nur de Taoismo sed ankaŭ de multaj kontraŭ-Tao-ismuloj.

La aŭtoro forte kontraŭas religiajn konceptojn (t.e. ĉinajn, ĉar li ja ne mencias aliajn), precipe Taoismon kaj Budhismon. Miaopinie li grave misprezantas budhistajn konceptojn, en la malgranda teksto kiun li dediĉas al Budhismo en la ĉina pensaro. Pri Taoismo li estas eble iomete pli simpatia, kvankam la leganto vane atendas en la libro diskuton pri la filozofia Taoismo kontraste al la "kamparana" (lia vorto) kaj superstiĉa Taoismo. Interesas, ke nur du-trifoje li mencias la vorton "dio/Dio", kio eble konfirmas mian propran opinion (diskutatan en aperonta anglalingva libro mia) ke tiu vorto ne taŭge tradukas bazajn konceptojn orientajn. La vorto "ĉielo" estas multe uzata, kaj estas onin supozi ke en tiu teksto ĉielo = Dion, sed tio estus grava miskompreno de la konceptoj prezentataj.

Kvankam la aŭtoro kelkfoje atentigas ke iu filozofo personigis la ĉielon, estas klare ke temas pri distingo inter materio kaj pretermaterio, t.e. pri Naturo kaj Metafizikaĵo. Multaj el la filozofoj diskutis la koncepton ke "neesto naskis eston", kaj la aŭtoro konfesas ke li ne komprenas tion, kion ili celas diri. Tiu sama debato aperis ankaŭ multfoje en la okcidentaj teologio kaj filozofio, kun la latina esprimo "creatio ex nihil" t.e. kreiĝo el nenio. Se oni komencas kun la koncepto ke ekzistaĵo = materiaĵon, do Dio estas "neekzistanta" ĉar nemateria - en tiu kunteksto, ne temas pri ateisma deklaro, sed pri emfazo ke Dio estas ekster la materia kosmo. En la dudeka jarcento astronomo Fred Hoyle esprimis tian koncepton per sia teorio ke energio/materio konstante estiĝas kaj malestiĝas, neante la aksiomon ke la kvanto da materio kaj energio en la universo restas konstanta. Dum la lastaj jardekoj tamen li malakceptis tiun lian pli fruan teorion. Verŝajne la leganto sen granda sperto pri filozofiaj sistemoj trovos sin tiel perpleksa kiel la ĉina aŭtoro.

En la lastaj ĉapitroj la aŭtoro donas pli multe sian propran vidpunkton, nome ke interamo, interhelpo, kaj intertolero estas la vere necesa fundamento por bone funkcianta socio. Parolante pri la filozofo Lu Ĝiŝjŭan (p.199) la aŭtoro komentas: "Tamen en la 12a jarcento la popolo ne povis vere fariĝi la fundamento de la ŝtato, la espero de Lu Ĝiŝjŭan realiĝis nur en la nuna Ĉinio". Tiel en 1988, ĉu ankoraŭ tiel post la pasintjaraj eventoj? Sed malgraŭe, al filozofiemoj mi varme rekomendas ĉi tiun libron.

MI JUNArecenzas **Donald Broadribb**

MI JUNA de Manashi Das Gupta. Roterdamo: Esperantaj Kajeroj, 1989. 102p. Speciale mendebila de la AEA Libroservo.

Kiom da nomoj de bengalaj literaturistoj vi konas? Kiom da verkoj traduikitaj el la bengala vi legis? Legante ĉi tiun aŭtobiografieton, min mirigis kiom da eŭropaj kaj bengalaj verkoj legis la aŭtoro dum sia infaneco. Evidente la tradukvojo estas unudirekta strato. Manashi Das Gupta provas al ni ke ekzistas riĉaĵoj en la literaturo de tiu lingvo.

Manashi Das Gupta naskiĝis en 1928. En ĉi tiu libro ŝi gvidas nin tra la unuaj jaroj ĝis ĉ. 1947. (Ŝi tre malofte mencias datojn nek sian aĝon kiam okazis diversaj eventoj priskribitaj.) Ĉi tiun aŭtobiografieton ŝi eldonigis en 1975, do kiam ŝi estis 46-jara.

La plejparton de sia juna vivo Manashi loĝis en Kalkato (tiel estas skribita la urbonomo ĉie en la libro). Preskaŭ unuafoje nin regalas hindua virino per rakonto pri sia infanaĝo en Hindio. Ni legas pri la vera familivivado laŭ la sperto de hindu mem, kaj ne de brita historiisto aŭ rakontisto. Sen ĝin nomi tia, Manashi ankaŭ priskribas la komencon de la feminista movado en Hindio. (Kiom da legantoj eĉ scias ke ekzistis feminista movado en Hindio dum la 1930'oj kaj 1940'oj?) Manashi estis nek de mizera, almozula familio, nek de riĉa angle inspirita familio, sed de mezklasa hindu familio, kiu devis renkonti kaj adaptiĝi al la sociaj ŝanĝoj kiuj ekkomencis sufoki la nacion.

Manashi estis (kaj kredeble plu estas) hinduo. Ni do vidas la hinduan religion de interne, per la okuloj de juna knabino. Tiurilate la tradukinto misservis nin. Kvankam inter parentezoj li ofte enmetas dankindajn eksplikojn pri vortoj aŭ kutimoj specife hindaj, li multfoje parolas pri la statuoj de la hinduaj dioj kiel "idoloj", kio klare malas la kredon kaj piecon de Manashi mem. Ĉu tradukantoj konscias pri kiom da religia imperiismo ili aplikas al siaj tradukaĵoj?

Tiel delikatanima kaj honesta estas la rakonto pri ŝia infanaĝo de Manashi mem, ke mi ne volas krude diskuti la epizodojn - ilin rakontas kiel ŝi spertis ilin la knabino mem, kaj tio devas sufiĉi. Mi nur diru ke la eldonisto kiu sendis al mi ekzempleron de ĉi tiu libro por recenzo servis min spirite kaj ne nur biblioteke. Oni ne povas legi la lib-

sen esti kortuŝita.

Rilate al la materia flanko: la libro estas bele prezentita, la preslitteroj (komputilfaritaj) estas klaraj kaj plaĉaj, malmultas kompostareroj, la traduko estas lingve neriproĉebla. Ĉiuaspekte leginda libro. Mi esperegas ke iam oni tradukos por ni unu el la romanoj de Manas-hi Das Gupta por pliriĉigi nian mankoplenan librokulturon.

BOVINO KAJ TEKSISTINO

recenzas **Donald Broadribb**

BOVINO KAJ TEKSISTINO, editoris Hã Ĝjiĉing. Beijing: Cina Esperanto-Eldonejo, 1988. 54p. \$1.90 de la AEA Libro servo.

Ĉiu amanto de folkloro plezuriĝos per ĉi tiu libreto de kvar folkloraj rakontoj. En postĉapitro la editoro informas iom pri la historio de ĉiu el la kvar rakontoj, kiuj radikas firme en la popola tradicio ĉina.

La karaktero de la rakontoj estas familiara al folkloristoj en la tuta mondo, kvankam kompreneble la detaloj varias. Estus interese kompari la ĉinajn rakontojn kun aŭstraliaborigenaj. Temoj kiaj du geamantoj kiuj fariĝis steloj, ŝtelfeino kiu fariĝis homa, blanka kaj nigra serpentoj kiuj ŝanĝas la formon, estas universale amataj.

La libron amus legi (aŭ, prefere, aŭskultus vin voĉlegi) infano, sed ankaŭ vi mem ĝuos ĝin, negrave kiomaĝa vi estas. Krom la rakontoj mem estas ĉarmaj ĉinstilaj bildoj por pligrandigi la plezuron de la leganto kaj aŭskultanto.

Kompostareroj tiel malabundas, ke mi ne certas ke ili ekzistas en ĉi tiu libreto. La traduko estas vere bona, kvankam la editoro plurfoje uzas adjektivojn kvazaŭ genitivon. Tiel "la edzino de la instruisto" fariĝis "la instruista edzino", stranga idiotismo iom germansona.

Faru al vi donaceton, akiru ĉi libreton.

ESPERANTO AND INTERNATIONAL LITERACY

Special Session at the AEA Congress, Melbourne
January 1990

The chairman, Ralph Harry, welcomed members and visitors, and opened the discussion with a definition of literacy according to UNESCO, as "in its simplest form, the ability to read and write simple letters". There are, however, many other aspects of literacy, for example cultural literacy: are we culturally literate? The final goal can only be attained through world communication. Esperanto therefore has a vital role in this progress towards world understanding.

Trevor Steele, president of the AEA, spoke of illiteracy throughout the world and supplied very depressing statistics, particularly in countries of the Third World. He dealt briefly with the large numbers of functionally illiterate in Australia, mentioning illiteracy among migrants, with special reference to difficulties related to the learning of English. He compared grammatical rules and pronunciation of English with the logical grammar and phonetic pronunciation of Esperanto.

Vera Payne, vice-president of the AEA, emphasised the difficulties migrant women experience, both from a cultural viewpoint and the lack of opportunity to attend classes. As wives and mothers and as members of the workforce, migrant women are very often extremely disadvantaged. Vera stated that millions of people remained illiterate during the last decade and again quoted statistics which showed that women from most ethnic groups are much more disadvantaged than men. Differing cultural backgrounds are factors which are responsible for lower levels of literacy, and as cultural changes are virtually impossible, the literacy problem relating to women will in most instances remain. To quote, "we see but we do not always understand".

Justice K. Enderby, co-vice-president of AEA, asked "what is the meaning of literacy?" He stated that "words" are the tools of the trade, for example of lawyers, and control of words very often gives "power" to many people. Conversely, illiterates most often suffer from this lack of means to communicate. He related this to the power which English commands in today's world, and equated language power with the prevailing military power: Early Greek supremacy, Latin of the Roman Empire, French of the Napoleonic era, English of the British Empire and of the USA in the world today. Literacy therefore relates directly to

words and often then to power in a language sense.

Nick Nicholas spoke of cultural literacy. Esperanto differs in that it does not in itself possess a national culture, however because of its acceptance through translations of varying national customs and traditions, it is in a position to accept and appreciate many of these national cultures. Is cultural literacy then able to be achieved through Esperanto?

The visitors (from the United Nations Association of Australia and of Victoria) in brief response congratulated the panel on the deep-seated analysis of many aspects of the world literacy problem. Stanley Johnston, president of the UNAA, reminded the audience about the close co-operation of UNESCO and the Universal Esperanto Association regarding this very problem.

(Report by Ray Ross)

WINDOW ON THE WORLD

CUBA

This year's International Esperanto Congress is to be held in Havana Cuba, July 14-21. It is only the fourth such congress to be held in the New World, and the first to be held in Latin America. (The earlier three were in the United States in 1910, 1915, and 1972). To commemorate the event, the Cuban government has undertaken several special initiatives including:

A contest sponsored by the Cuban Ministry of Culture, Radio Havana, and the Universal Esperanto Association. The main prize is a free airplane ticket to and from Havana, to be awarded for the best answer to the question "In your opinion, what is the significance for the Esperanto community of staging the Congress in Cuba?" The answer is to be submitted in typed form, a minimum of 2 pages (50 lines), maximum 5p., in Esperanto. Ten secondary prizes will also be awarded. Closing date: 31 April 1990. Entries are to be sent to

75a UK en Havana, Radio Havana
P.O. Box 7026
Havana, Cuba.

Cuba has issued two commemorative coins in honour of the Congress -

1. A silver coin (38mm diameter, weight 16 grams, 6000 issued with a face value of 5 pesos, price U.S.\$30)
2. A nickel-copper coin (30mm diameter, 6000 issued with a face value of 1 peso, price U.S.\$3).

Payments, in British pounds (!) to be deposited to account 402-01-909 for the Empresa Cubana de Acunaciones, at the Banco Financiero Internacional de la Habana, Cuba. 20% discount for orders of 50 coins. Add U.S.\$3 for delivery by registered mail.

A postage stamp was issued in honour of the Congress by the postal administration of Cuba, on March 7, 1990. It measures 32x72mm, designed by Miguel A. Peñata. The stamp features the white dove of peace and the Tower of Babel, along with the Congress emblem.

(Details courtesy of Nov-Zelanda Esperantisto)

JAPAN

Cultural Seminar for Esperantists
Domoto School of Japanese Traditional Arts
August 10-25, 1990

Domoto is an indigenous Japanese form of the Shinto religion which has been using Esperanto for its international outreach program for many decades and has published a semi-annual magazine in Esperanto since 1925. Its School of Japanese Traditional Arts is a non-profit cultural organisation which teaches contemporary Japanese arts such as the Tea Ceremony, calligraphy, ceramics, and meditation. The program for the two week intensive seminar, held in Kameoka (22 km. west of Kyoto), will accommodate a total of 8 students. The cost, U.S.\$500, includes board and lodging, tuition, and Japanese dress. Classes will be in Japanese with Esperanto translation.

Applications must include a photograph of yourself, and a handwritten letter including autobiographical information and a statement of what you hope to gain from the seminar. Address:

Domoto
Kameoka-si, Kyoto-hu 621
Japan

(Details courtesy of Nov-Zelanda Esperantisto)

AUSTRALIAN ESPERANTIST YOUTH GROUP

JAGE, the Australian Esperantist Youth Group, has just been founded, as an informal and non-hierarchical grouping of Esperanto speakers and sympathisers under the age of 35. The address of its secretary is 17 Renowden Street, Cheltenham Vic 3192. The joining fee is \$8, to be paid to the treasurer, P.O. Box 218, Belair SA 5052. We urge all potential JAGE members to join in and help make the Youth Movement work, in bringing a new perspective to the Australian Esperanto Community.

DOCTOR OF LAWS FOR RALPH HARRY

Ralph Lindsay Harry, retired president of the Australian Esperanto Association, has been granted the degree of Doctor of Laws by the University of Tasmania. Ralph Harry, a Rhodes Scholar, has held a number of posts for the Australian government, including Ambassador to the UN, Ambassador to Belgium, and Ambassador to the Federal Republic of Germany. A detailed report will appear in the May-June issue of TAE.

TITBITS

A facsimile edition of the world's first Esperanto journal, LA ESPERANTISTO (1889-1895) has been published in New York by American publisher Georg Olms. 802 tabloid size pages, hard bound. Price approx. A\$170. Special orders can be sent to the Australian Esperanto Association Book Service, PO Box 230, Matraville NSW 2036.

On the 1st of December last, Margarete von Waldowski celebrated her 100th birthday. An active member of the Berlin Esperanto group for many years she now lives in Bonn. Among her vivid memories, participating in the 13th International Congress of Esperanto in Prague, 1921.

Full colour stickers portraying the Earth as seen from the moon rocket Apollo 17, photographed in 1972, with Esperanto inscription are now available from Paul Hoffman, Earth Seals, PO Box 8000, Berkeley CA 94707, U.S.A. Price: six for U.S.\$1.00; in quantity, 200 for U.S.\$25. Order by code number "Apollo 17 (E-o)" and please mention the source of your information.

(Titbits courtesy of the U.E.A. journal ESPERANTO, Feb.1990)

EDIFA LIBROrecenzas **Donald Broadribb**

Sanco por Feliĉo, de Phil Bosmans. Tielt (Belgio): Lannoo, 1988. 96p., broŝurita. Tradukita el la nederlanda lingvo. Prezo: \$14 de la AEA Libroservo.

Temas pri bonaspekta, klare presita libreto kun abundaj ilustraj fotoj kaj desegnoj. Esence la libro estas kolekto da prozpoemoj, preskaŭ ĉiu kompleta sur unu paĝo, kun unu tezo: Feliĉo estas ebla nur se oni amas unuj la aliajn, kaj espero por la estonta ekzisto de nia mondo dependas de tiu sama principo. La libro estas eldonita de la Movado Sen Nomo (adreso: Poŝtfako 137, B-2600 Berchem 1, Belgio).

La poemoj estas senescepte edifaj kristanaj verketoj, kvankam la specifa kristanismo proklamitas nur du-trifoje, malfrue en la libro. Supozeble tiu kaŝo estas por ne fortimigi legantojn kiuj hezitus legi "religian" libron. Kaj efektive la poemoj ne postulas kredon aŭ fidon je iu ajn formala religio, ilin povas animprofite legi kredantoj aŭ humanistoj de ĉia kultura medio.

Ne temas pri libro kiun oni legu je unu seninterrompa fojo. Oni legu unu aŭ pli da paĝoj kiam oni sentas la emon. Kaj ne necesas legi la paĝojn laŭorde. Malfermu la libreton, rimarku bildon kiu allogas vin aŭ interesan titolon, kaj legu tiun paĝon. Vi trovos tion plezuro. Kaj la spritaj desegnoj ofte per si mem diras la mesaĝon de la poemoj.

Mi ne ĉiam plene akceptas la opiniojn de la aŭtoro - ekzemple lian milde esprimitan sed emfazan kondamnon de la kunloĝado de negeedzigitaj - sed plejparte ne eblas disputi pri la aktualeco de la sendogmita ripeto de la instruoj de la Evangelioj.

La traduko estas vere bonstila, kaj la lingvouzo neriproĝebla. Preseroj preskaŭ tute mankas. Entute: havinda libro por tiu, kiu volas rein-spiriĝi dum nia epoko de mallumo kaj minacanta katastrofo. @

DEZIRAS KORESPONDI

Piotr kaj Paweł Kupczak, knaboj en la kvara jaro de elektronika lernejo kaj Edyta Kupozak, knabino en la sesa jaro de la elementa lernejo. Adreso: PL 34-340 Jeleŝnia 628 "A", Pollando.

KURIOZAJ FLOROJ KAJ ARBOJ

Recenzas Norma Broadribb

KURIOZAJ FLOROJ KAJ ARBOJ en la provinco Yunnan, Ĉinio. De Zhang Qitai, Feng Zhizhou, kaj Yang Zenghong. Tr. Seimin. Bejĵing: Cina Esperanto-Eldonejo, 1988. 146 grandaj paĝoj. Bindita. \$32.90 ĉe la AEA Libroservo

KURIOZAJ FLOROJ KAJ ARBOJ estas bele produktita libro el Ĉinio. Ĝi montras la plantaron de la provinco Yunnan en la sudokcidento. Temas pri montoplena regiono, honorata per la titolo "Ĝardeno de la Mondo".

Min mirigis trovi la vastan nombron da familiaraj ĝardenplantoj kiuj estas indiĝenaj en la fekundegaj valoj de Yunnan. Palmoj, filikoj, prunusoj, banjanoj, orkideoj, magnolioj, lilioj kaj primuloj estas nur parto de la listo. Nun oni vidas ilin en la indiĝenaj originlokoj. Rododendroj vigle kreskas apud kaskado. Floranta kamelia arbusto estas kovrita de neĝo.

Aŭstralianoj ekkonos multajn atentindajn plantojn. La grandioz-aspekta arbo Aeskulo (*Aesculus wangii* el *Hippocastanaceae*) estas ekzemplo, kaj la blua papavaco (*Meconopsis*). Kelkaj apartaj specimenoj estas plej rimarkindaj pro sia aĝo, ekzemple 800jara kamelia arbo.

Ĉi tiun libron povas ĝui ĉiu amanto de ĝardenoj, negrave ĉu aŭ ne ili scipovas Esperanton. Kelkaj el la arboj kaj plejmulto de la floroj estas facile rekoneblaj, kaj la akompananta teksto apud ĉiu foto inkludas la latinan nomon de la planto.

Klaraj kolorplenaj fotoj plenigas plej multajn el la 146 grandaj glaceaj paĝoj. La tri ĉefsekcioj estas: La ĝenerala stato de la naturo, Raraj vegetaloj, kaj Dekoraciaj plantoj. Antaŭ ĉiu sekcio estas du aŭ tri-paĝa klariga teksto.

Varme rekomendata al ĉiu amanto de plantoj kaj de belaj libroj.

VOJAĜOJ FINIĜAS, AMANTOJ KUNIĜAS

recenzas RALPH HARRY

Vojaĝoj Finiĝas, Amantoj Kuniĝas, de Manjo Austin. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 1988. Serio Stafeto #6,

128p. \$11.95 ĉe la AEA Libroservo.

La titolpaĝo nomas ĉi tiun libron "romano", kaj supozeble ĝi estas fikcia rakonto. Sed la intrigo estas minimuma, kaj nenio estas lasata al la imago. Ĝi estas vere priskribo de la vivo de du familioj en Irlando, kiuj fandiĝas pro la edziĝo de gevidvoj. La priskribado estas tre detala kaj la personoj estas simplaj kaj iomete naivaj, kvankam ĉarmaj.

La lingvo estas plejparte klasike malkomplika, kaj troviĝas utilaj terminoj (kvankam kelkfoje laŭ angla modelo) de la ĉiutaga enhejma vivo: malpaki, fruktokuko, iri butikumi, rokokuko, supermarkto, sociaĵoj, servi la manĝon, lavi la fajencaĵon/telerojn/tasojn, televidi programon, lokuloj, ligita al ŝiaj rimenoj (apron strings). Pli diskutebla estas la uzado de transitivaj verboj absolute, kune kun prepozicio, ekzemple: "Ili informis al Mary" (p.29), "Unu du salutis al Mary" (p.35), "Mi persvadis al Maureen" (p.35), "por helpi al Nora" (p.36), "akompanis al Maureen" (p.37), "helpu al Teresa" (p.50), "gratulis al ŝi" (p.51), "surprizis al Maureen" (p.53), "informis al Rita" (p.64), "ŝi regalas al ili" (p.77), "persvadante al Nora" (p.102), "ili kuraĝigis al la junulo" (p.110). Se ne preseraro, ekstrema ekzemplo de tiu nekutima lingvaĵo estas "Li faris demandojn, kiuj forgesis al ŝi la timemon" (p.95).

La aŭtoro preskaŭ modele indikas la direkton per la akuzativo, ekzemple: "pendigis salutkarton en la fenestron" (p.77), "ŝi pendigis vestaĵojn en la ŝrankon", "pakaĵoj, kiujn ili metis sub la arbon" (p.84), "La vivo daŭris glate en la printemon" (p.110). Mi supozas, ke "Ŝi metis sian mantelon en la vestejo" estas nur preseraro.

Fakte, estas malmulte da preseraroj: "Esti matenmeze" (p.21), "Mary diris...Mary" (p.59), "en bona kumuro" (p.86), "Newbrigde" (p.93), kaj kelkaj mislokigoj de citiloj. Estas unu-du mistrancaĵoj de silaboj de linio al linio, ekzemple "dan-chalo" (p.21).

Estus bone indiki la fonton de la titolo, kiu estas citaĵo el la ŝekspira dramo "Epifanio" II, iii, 46. Eble preferinda estus la traduko de Auld: "Ne plu vagu, dolĉulino...Am' troviĝas ĉe vojfino".

Mi rekomendas la libron al Esperantistoj, ne kiel modelon de stilo, sed kiel enkondukon en la kulturon de Irlando.

KOMUNA LINGVO POR EŬROPO?

Europäische Hochsprache oder Sprachimperialismus, de Richard Schulz. Bleicher Verlag, 256p.

Recenzas Trevor Steele

En 1992 la okcidenteŭropaj landoj unuigos politike. Unu el la problemoj solvotaj estas la lingva. Ĉu oni daŭrigos la ĝisnunan stumbladon kun pluraj lingvoj aŭ ĉu la aliaj landoj sin submetos al la lingva imperiismo de unu aŭ du landoj? Aŭ ĉu oni adoptos racian solvon, nome Esperanton?

Jen la ĉefa temo de ankoraŭ alia libro de la senfine fekunda maljunulo Rikardo Sulco. Esperanta traduko de la titolo estas "Eŭropa Komuna Lingvo aŭ Lingva Imperiismo?". La subtitolo estas "Pledo por civitana iniciato por sekurigi kulturen pluralecon kaj samrajtecon". Oni memoras, ke tiutempe (1979) aperis en Germanio la multaj "civitanaĵ iniciatoj", kiuj provizis la bazon de la Verda Partio. Bedaŭrinde la lingva elemento de egaleco ankoraŭ ne ricevis vastan eŝon.

Sulco ekzamenas la aktualan situacion en Eŭropo. Ni ĉiuj scias, ke la angla kaj la franca estas la konkurencaj kandidatoj por la rolo de "imperiisma lingvo" en okcidenta Eŭropo, do estas utile sciigi el tiu ĉi libro, ke la nombre plej grandaj lingvoj tie estas unualoke la germana kaj dualoke la ...itala. La supereco de la planlingvo Esperanto kiel pontlingvo kompare kun la naciaj lingvoj estas konvinke, elokvente kaj multfacete prezentita. Ni ekstereŭropanoj mense anstataŭigu "Eŭropo" per "la mondo".

Unuavide mi trovis la libron tro heterogena. Sulco presis diversajn paroladojn, kiuj iom tro foren vagas de la titolo. Sed oni ricevas informojn pri la historio, la literaturo, la gramatiko, afiksoj, vortkonstruado kaj la vortstoko de Esperanto. Lingve talenta leganto post atenta studado jam povus pli-malpli legi Esperanton. Se tio okazus, Sulco atingus pli ol nur abstraktan pledon por nia lingvo.

Se vi povas legi germane, jen valora fonto de argumentoj el la vidpunkto de pologloto, kies fervoron por Esperanto ne estigis nekono de la "grandaj" lingvoj.

LA NOV-ZELANDA ESPERANTISTOrecenzas **Donald Broadribb**

Nov-Zelanda Esperantisto, oficiala monata organo de la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio. Redaktoro: J. Major (146 Donald St, Karori, Wellington 5 Nov-Zelando). Jarabono NZ\$25 (= £. A\$19) inkl. aerpoŝtan sendon. Mendebla ĉe la AEA Libro-Servo.

Nia sudhemisfera kolego jam aĝas preskaŭ 500 numerojn, tre estiminda aĝo por monata gazeto de alta kvalito, sendube dank' al la meritoj de ĝia redaktoro, profesia ĵurnalisto.

La gazeto, elektronike kompostata, multe similas al nia TAE, kvankam teknike ekzistas kelkaj diferencetoj. La linioj estas pli proksimaj unuj al la aliaj (4/centimetro, en TAE 3/centimetro), kio donas la iluzion de pli densa teksto, kvankam la literoj estas efektive samdimensiaj. La gazetnumeroj estas 12-paĝaj, kaj nur en Esperanto.

Kiel oni povas atendi de profesia ĵurnalisto, la gazeto estas rigore redaktata, kio signifas ke la lingvouzo estas ĉiam pura kaj klasike zamenhofeca. Tion, hontige, oni ne povas diri pri plej multaj Esperanto-gazetoj. Rilate al sia enhavo, la gazeto estas ĉefe informa. Tie oni sentas la manon de la redaktoro, kiu klare havas bonan komprenon pri tio, kion bezonas la esperantistaro loĝanta sur la antipodo de la mondo. Li ankaŭ inkludas multajn proprajn komentojn kaj artikol(et)ojn, eble iom pli kuraĝe (aŭ ĉu nur malpli inside?) ol la redaktoro de TAE. Aktuala informo pri la stato de la lingvo Esperanto mem estas speciale emfazata kaj la redaktoro maltoleras stultulojn kies neologismemo rezultas el lingva malkompetento.

La Nov-Zelanda Esperantisto indas esti pli multe legata en Aŭstralio. Nia movado - kaj niaj propagandistoj - tro ofte forgesas kvaliton cele al kvanto. Ĉu 140 fuŝamatoraj periodaĵoj vere valoras pli ol 10 bone redaktataj? Laŭ mia hereza vidpunkto, ne. Kaj mi ne troigas. Mi ankoraŭ memoras la respondon de redaktoro de certa internacia gazeto, kiam mi kritikis la enhavon de lia gazeto: "Sed ni ja devas presi ĉiujn kontribuojn de la abonantoj, ja temas pri ilia gazeto!"

En periodo kiam niaj internaciaj Esperanto-gazetoj pli kaj pli forgesas sian raison d'être, ni bezonas pli ol iam antaŭe bonajn lokajn gazetojn, kaj la NZE estas elstara ekzemplo por la esperanta mondo.

VERE AU FANTAZIE
recenzas Dennis Murphy

Vere aŭ Fantazie de Claude Piron. Brazilo: Fonto, 1989. 216pp. \$15.50 de la AEA Libroservo.

La subtitolo de Vere aŭ Fantazie estas "Rakontaro en facila Esperanto." S-ro Piron celas la komencanton kiu jam lernis elementan Esperanton kaj nun serĉas plibonigi sian scion de la lingvo.

Lia aliro estas uzi je la komenco nur la vortojn kiujn oni devus jam scii pro elementa studado. Unue, li listigas 405 vortojn kiel komunan vorthavaĵon. Tiuj vortoj troviĝas kaj en Zagreba Metodo kaj en Gerda Malaperis! La komencanto kiu povas legi la facilan parton de Kontakto ankaŭ jam sciis tiujn vortojn.

Ĉiu rakonto aldonas kelkajn novajn vortojn. Tiuj estas listigitaj je la fino de la rakonto kune kun multpartaj vortoj, ekz. "inter-rompi" "sci-vol-ema". La aŭtoro multe zorgis pri la plibonigo de la vorthavaĵo de la leganto. Li aranĝis, eĉ reverkis, la rakontojn por enkonduki la novajn vortojn kaj por ripeti la ĵuslernitajn vortojn.

La rakontoj kiujn Piron uzas venas el multaj landoj. Kelkajn li trovis en libroj, la restaĵon li aŭdis dum siaj vojaĝoj. La rakontoj estas amuzaj kaj interesas la leganton. La verkstilo estas bonega kaj plaĉa, eĉ kelkfoje arta kaj pro tio enhavas ankaŭ iom da defio por la lernanto. Ses rakontetoj pri Afanti estas enmetitaj tiel ke la leganto ne devas legi ĉiufoje longan rakonton.

Piron ofte montras la multpartajn vortojn per streketo. Kontraŭstaru" estas skribita "kontraŭ-staru" kaj "senfenestra" simile iĝis "sen-fenestra". Kvankam tio helpas la leganton, la aŭtoro ne sciigas ke oni ne kutime trovas tion en ĝenerala literaturo.

Malgraŭ kelke da preseraroj kaj manko de ilustraĵoj, mi opinias ke la libro estas tre taŭga kaj leginda por la progresanto.

PROVU VIAN VORTOSCION

1. Ĉu responsi* estas
 - (a) respondecu pri io aŭ iu
 - (b) kanti responde al deklamo de pastro
 - (c) subteni ies agadon per mondonacoj
2. Ĉu sordino* estas
 - (a) aparato por mallaŭtigi muzikilon
 - (b) malgranda fiŝo often uzata por sandviĉoj
 - (c) mezepoka trumpet-speca instrumento
3. Ĉu liva* estas
 - (a) vivanta
 - (b) oficiale malpermesita
 - (c) maldekstra
4. Ĉu fatraso* estas
 - (a) antikva, romia batalĉaro
 - (b) onia estonteco, fato
 - (c) senorda amaso da senvaloraĵoj
5. Ĉu ŝob* estas
 - (a) anglisma radiko = fiul'
 - (b) malsupren
 - (c) marista termino = levu la ankron!
6. Ĉu ĉentono* estas
 - (a) speco de poemo multaŭtora
 - (b) malgranda monero de antikva Anglio
 - (c) muzika termino = duona tono pli malalta ol kutime, kiam oni agordas instrumenton
7. Ĉu forcejo* estas
 - (a) "necesejo"
 - (b) loko, kie oni konservas pafilojn
 - (c) vitra domo, en kiu oni kreskigas plantojn
8. Ĉu nelge* estas
 - (a) senpripense, senkonsidere
 - (b) antaŭ nelonge

(c) endanĝerigante ies vivon

9. Ĉu vakcino estas

- (a) injektaĵo por protekti kontraŭ malsano
- (b) nordamerika planto kun purpuraj floretoj
- (c) vorto uzita de Zamenhof por viro kiu prizorgas brutojn en ranĉo

10. Ĉu sateno estas

- (a) propra nomo de la diablo
- (b) speco de teksaĵo
- (c) kemiaĵo kiu detruas la ozonon en la atmosfero

11. Ĉu oferti estas

- (a) proponon varon aŭ servon al kliento
- (b) bruligi substancon por adori Dion
- (c) malfermi

12. Ĉu likvo estas

- (a) alkoholaĵo tre ebriga
- (b) nuligo de konto
- (c) fluaĵo

13. Ĉu kontesti estas

- (a) provi nuligi testamenton
- (b) diskute malakcepti aserton
- (c) proponi premion por ĝusta respondo

14. Ĉu ampolo estas

- (a) floro, el kiu oni ekstraktas opion
- (b) elektra lumigilo
- (c) mezurunuo de la laŭteco de sono

15. Ĉu emerito estas

- (a) birdo sudamerika (precipe en Argentino)
- (b) gravulo araba
- (c) eksoficisto meritanta honoron

Respondoj sur paĝo 27

*neoficiala vorto

Vortoj kaj difinoj laŭ PIV kaj ties Suplemento
Kelkaj vortoj estis oficialigitaj en la Ba Oficiala Aldono

LA KONGRESO EN MELBURNO

laŭ raporto de RAY ROSS

Denove la kongreso okazis en januaro, kaj, fakte, la somervetero en Melburno estis ege agrabla. Partoprenantoj: entute 97. Kvin eksterlandanoj aldonis iom da "koloro" al la okazaĵo.

La Oficiala Inaŭguro okazis la 8an. Reprezentantoj de diversaj landoj salutis la kongreson: William Vathis (Usono), Hilda Melton (Anglio), Bruno Robineau (Francio), kaj salutparolis reprezentantoj de la regionaj grupoj en Aŭstralio.

Sekvis la ĉiam malgaja tributo al mortintaj membroj: Eva Trainer, Bill Leah, Arthur Cocking, Thea Van den Boogard, Thora Van Brederode, Annie Madeline Eden, Cliff Tronerud, Riet Bennett, Noel Gamble, Peg Ford-Lewis, M. Woolf, Edmond Errey, Phil Henderson.

Peter Ellyard malfermis la 27an kongreson de AEA. Li brile prezentis nuntempan bildon pri mondaferoj ĝenerale kaj pri la preskaŭ nekomprenblaj ŝanĝoj en Eŭropo. Li parolis pri la estonta "Eŭropa Stato". Dum la Internacia Malanalfabetiga Jaro 1990 estas esence ke Esperanto strebu antaŭenigi ĉi tiun temon.

En laborkunsidoj la protokolo pri protekto de la medio (TAE sept. 1989) estis unuanime akceptita.. Ray Ross raportis ke fine de 1989 estis 227 membroj de AEA (en 1988: 242). AEA subtenis proponon peti Uneskon publikigi la Unesko-Kurieron ankaŭ en Esperanto. AEA ankaŭ sendis peton por subvencio al "International Literacy Year Secretariat" en Kanbero, la sugestita sumo estas \$2500. AEA malakceptis proponon pri interŝanĝo de polaj kaj aŭstraliaj/novezelandaj vizitantoj dum kongresoj, pro nesufiĉa aranĝtempo kaj la alta kosto al AEA, pli ol \$5000.

La ĉefdelegito de UEA, Alan Towsey, letere raportis ke du novaj fakdelegitoj de UEA estis aprobitaj: Dennis Murphy kaj Margaret Furness. Alan skribis pri la urĝa neceso varbi novajn aktivajn membrojn por UEA.

John Moore raportis vendon de 99 korespondkursoj dum 1988/89. Tom Elliott raportis, ke dum la pasintaj du jaroj vendoj far la Libroservo kreskis je 25%. Li dankis al Eileen kaj Arthur Oliver de la iama Esperanto Publishing Co., kiuj helpis pri akirado de valora stoko kaj starigo de fonduso por certigi eldonon de gravaj lernolibroj. Tom raportis jarprofiton de la Libroservo je 11%.

La kasisto Owen Loneragan prezentis raporton pri la financa stato de AEA. La investitaj sumoj nun estas \$36 543. Max Wearing raportis sian ekziĝon kiel komisiito pri instruiloj, kaj Marj Elljard nun anstataŭas lin. Svetislav Kanaĉki raportis pri la regula radioprogramo en Melburno per Radio 3ZZZ. Ray Ross raportis ke li kaj Trevor Steele partoprenis en preparkunvenoj kaj provelsendo en Radio-Edukado FM Brisbano.

Honoraĵ Dumvivaj Membroj: La sekvantaj esperantistoj kiuj multe kontribuis al AEA dum la pasintaj jaroj nomiĝis honoraĵ dumvivaj membroj de AEA: Josimi Umeda (Japanio), Eva Matasin, Jack kaj Ivy Fallu, Dorothy Threlfall, Harry kaj Joyce Toor, Katie Schwerin.

Aliĝintaj membroj: post multe da diskutado estis akceptite ke "nova kategorio de membreco de AEA estu starigita, nome Aliĝintaj Membroj. La jarkotizo \$5 ebligas ricevon de la Adresaro de AEA, de la librokatalogo kaj de la korespondservoj.

Pri la Konferenco de Sendependaj Lernejoj en Hobarto, 19-23 aŭgusto ĉijare: \$300 estos donita kiel subtensumo; La "Veteranta Ekspozicio" de AEA situos en taŭga konferencloko. Respondeco pri detaloj Dudley Parkinson.

La kotizoj de AEA ne ŝanĝiĝos por 1990. Post longa diskutado estis decidite ke la Dumviva Kotizo por membreco en AEA estu \$625.

Kongreso de AEA 1992: la kunsido invitis la NSW-grupojn aranĝi la kongreson.

Propono estis akceptita ke "Estraro estu komisiita starigi specialan laborgrupon por efektiviĝi rilatojn kun organizaĵoj kiuj havas similajn celojn al la niaj". Gisdate akceptis Kep Enderby, Peter Keates, Harry Beechey, Max Wearing, Neville Holmes, Marj Ellyard, John MacLeod, Owen Loneragan.

Okazis fakkunsidoj de UEA kaj SAT. John kaj Hadie MacLeod starigis ekspozicion pri la baha'a movado.

La aktuala estraro de AEA ne ŝanĝiĝis. (Vidu liston sur p.2 de ĉi tiu numero.) Helpkasisto kaj P.R.O. estas nomotaj de la estraro. Help-P.R.O. estas Bill Aulsebrook.

Junulara Aŭstralia Grupo Esperantista (JAGE) estis fondita dum la kongreso, kun la jena estraro: Kunprezidantoj, Kam Lee, Astrid Riessen; kasisto Astrid Riessen, sekretario kaj bulnenredaktoro Niĉjo Nicholas. La kongreso akceptis ke AEA havu la rajton koopti TEJO-(JAGE-)reprezentanton kiel membron de la Estraro sen voĉdonrajto.

La estrarkunsido decidis ke "la interezo de Fonduso-Simpkins estu dediĉita al la Nacia Biblioteko en Kanbero".

Pri la Fonduso Tim Einihovici la Estraro decidis ke ĝi

1. denove certigas sian subtenon de la Tim Einihovici Vetur-Fonduso starigita en la fino de la AEA-Kongreso en Brisbano, septembro 1988;

2. gratulas al S-ino Idyss Einihovici pro ŝia energia kontribuo dum la starigo de la fondusa kapitalo

3. esprimas malkontenton ke, post du jaroj, neniu kandidato plenis la kondiĉojn anoncitajn dum la komenca publikigo;

4. avertas ke ĝis nun AEA nek formulis, nek publikigis kondiĉojn aŭ rekompencojn rilate al ĉi tiu fonduso;

5. volonte negocos kun iu ajn, kiu proponos taŭgan reprezentanton el Aŭstralio por ĉeesti la TEJO-Kongreson en 1990 aŭ 1991;

6. anoncas sian intencon starigi tutaŭstralian subkomitaton, la Tim Einihovici Subtenkomitato, kiu enhavos almenaŭ unu reprezentanton de ĉiu ŝtato, cele al kolektado de plia kapitalo por la fonduso, disvastigo de informo por allogi kandidatojn por la jaroj 1990-91 kaj poste, kaj provizo de instruhelpo por kandidatoj;

7. anoncas la jam aprobitajn kondiĉojn por la aljuĝo 1991-92 jene

a) kandidatoj estu inter 18 kaj 28 jaraĝaj je la 1a de julio 1991

b) kandidatoj devas sian deziron partopreni registri kun la ŝtatrepresentanto de la Aljuĝa Subtenkomitato antaŭ la 1a de marto 1991, kaj ricevos informon pri instruhelpo havebla

c) la gajninto estas elektota el la kandidatoj kiuj sukcesos kun honoro en la Elementa Ekzameno de AEA antaŭ la 1a de januaro 1992, kun speciala parolekzameno antaŭ la 1a de marto 1992.

ĉ) elekto de la gajninto estu sole far la estraro de AEA

d) la premio konsistos el

1) flugo al kaj de la 1992a Kongreso de TEJO

2) senpaga loĝado dum la TEJO-Kongreso (proks. 7 tagojn)

3) informo pri aldonaj Esperanto-eventoj kiujn la kandidato rajtos ĉeesti tuj antaŭ kaj post la TEJO-Kongreso

4) multampleksa veturasekuro dum la tuta veturperiodo

8. anoncas ke la sukcesinta kandidato devos akcepti publikan transdonon de la premio, publikan informon en la gazetaro je sia foriro el kaj reveno al Aŭstralio, kaj prezenti en la angla lingvo skribitan raporton (ĝis 2000 vortoj) pri la 1992a TEJO-Kongreso, kaj en Esperanto resumon (ĝis 500 vortoj) antaŭ la 1a de septembro 1992, kaj prezenti la raporton kaj la resumon buŝe almenaŭ unufoje en la uzita lingvo antaŭ la 1a de februaro 1993.

Pluraj distraj eventoj gajigis la kongreson, kaj ankaŭ okazis ekumema diservo. Lingvajn seminariojn gvidis Marcel Leereveld, Harry Beechey, kaj Niĉjo Nicholas. Marcel ankaŭ estris "laborejon pri poezio". Kvar ekskursoj ebligis viziti vizitindejojn proksimajn al Melburno: Williamstown, Ballarat, la Montaro Dandenong kaj la Williams Ricketts Sanctuary. Postkongresa ekskurso iris al la sudokcidenta marbordo de Viktorio, kiel ankaŭ al Monto Gambier en Sud-Aŭstralio, krome al la Kavernaj Gardenoj, Portland, Warnambool kun la famaj Ĝardenoj ĉe la fabriko Fletcher Jones, kaj Geelong.

Bankedo kaj fermo: Trevor Steele prezentis al Dudley Parkinson la Medalionon Torr, kaj sekvis prezentado de AEA-Honorinsignoj al Marj Ellyard kaj Vera Payne. Herbert Koppel prezentis la Dramotrofeon al Gaye Phillips por la Brisbana Esperanto-Societo. Tom Elliott prezentis la Kanttrofeon Fritz Müller-Soraŭ al la Brisbana kantgrupo, kaj gratulis la Brisbanan kaj Melburnan Kantgrupojn pro la tre ĝuigaj prezentaĵoj. Trevor dankis la Anne Doggett Triopon kiu muzikis dum la bankedo.

La prezidanto transdonis la Esperanto-flagon al reprezentanto el NSW, Tom Elliott, por la venonta kongreso en 1992.

Aparta raporto pri la anglalingva kunsido rilatanta al la International Literacy Year aperas en la anglalingva suplemento al ĉi tiu numero.

S. A. T. KUNVEND DUM LA KONGRESO

Jaŭdon matene kunvenis SATanoj kaj proksimume kvardek aliaj kongresanoj. La peranto, Kep Enderby, bonvenigis la ĉeestantojn. Marcel Leereveld klarigis la historion kaj filozofion de S.A.T. Hilda Melton el la brita grupo anikaŭ paroladis. 8 novaj membroj varbiĝis dum la kongreso.

(Laŭ raporto de Kep Enderby)

LA LIBROSERVO DE AEA

anoncas la sekvantan aldonon al sia librokatalogo 1990:

577. Lingvistikaj aspektoj de Esperanto, de J.C. Wells. (2a eldono).
76p., \$13.00
- 112 Pensoj kaj sentoj, de Rita Dunbar. (Poemoj). 30p., \$7.50.
- 371 NePIVaj Vortoj, de Andre Cherpillod. (6800 terminoj). \$22.20
882. Sed nur fragmento, de Trevor Steele. (Romano). 448p., \$25.00
113. Leterpapero: 10 A4 folioj kun 10 longaj kovertoj kun emblemo.
\$2.25.
420. Plasta emblemo gluhava por aŭtomobiloj. Ovala kun stelo kaj la
vorto Esperanto. 135x85mm. \$2.00.

5% rabato por membroj de AEA. Poŝtkosto por libroj kutime estas \$2.50
por ĉiu pakaĵo. Mendu de Libroservo de A.E.A., P.O.Box 230, Matraville
NSW 2036. Telefono: (02) 661 2246. □

TREVOR STEELE

prezidanto de AEA kaj ĉefa ekzamenisto atentigas pri sia adresŝanĝo al:

Trevor Steele
2/9 Main Avenue
COORPAROO QLD 4151

(tel. (07) 394 2798)

RESPONDOJ POR "PROVU VIAN VORTOSCION"

1.a; 2.b; 3.c; 4.c; 5.b; 6.a; 7.c; 8.b; 9.a; 10.b; 11.a; 12.c; 13.b;
14.b; 15.c.

AUDREY CHILDS-MEE


Provizora adreso post ŝia kanceroperacio: C/o Riseborough, 28 Romway Rd
Evington, Leics. LE 5 5SA, Anglio.

The Australian Esperantist

Numero 261

MAJO-JUNIO 1990

Registered by Australia Post
Publication no. WBG 2488



Patrino (Nevena Nedelševa) ... p.3

Pripensoj pri la ebleco de internacia lingvo (D. Poulson) ... p.6

Provu vian vortoscion (Donald Broadribb) ... p.9

Recenzo: Reviziita Laborplano (John Mills) ... p.11

Foliume de astronomia maparo (Niĉjo Nicholas) ... p.13

Kribaĝo (Ralph Harry) ... p.15

Pli da faktoj pri la australoj (B. Golden) ... p.18

Krei novajn vortojn (Marcel Leereveld) ... p.21

Diversaj esperantaĵoj ... p.24

English Supplement: Attitudes of student
teachers towards Esperanto (Dianne Lukes)

THE AUSTRALIAN ESPERANTIST

Oficiala organo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio

Redaktoro: Donald Broadribb, 46 Great Eastern Highway, Bakers Hill
WA 6562. Telefono: (09) 574 1307.

Prezidanto: Trevor Steele, 2/9 Main Avenue, Cooraroo Qld 4151.

Vicprezidantoj: Vera Payne, 36 Donegal Rd, Floreat Park WA 6014.

Justice K. Enderby, 2 Phoebe St, Balmain NSW 2041.

Sekretario: Ray Ross, 41 Agnes St, Sunnybank QLD 4109.

Vicsekretario: Herbert Koppel, GPO Box 2122T, Melbourne Vic 3001.

Kasisto: Owen Loneragan, 16 Deverell Way, South Bentley WA 6102.

Libro-Servo: Tom Elliott, PO Box 230, Matraville NSW 2036.

Korespondaj kursoj: John Moore, 7 Pelican St, Emu Park QLD 4702.

Prezidanto de la Ekzamen-Komitato: Trevor Steele (adreso supre).

P.R.O. (Oficisto pri Rilatoj kun la publiko): Dennis Murphy, 75
Binalong Rd, Old Toongabbie NSW 2146

Membreco: \$25 por individuo, klubo kc.; \$30 por familio (ĉiuj ĉe
la sama adreso); \$15 (minime) por pensiulo aŭ studento. Bonvolu
sendi vian kotizon al la kasisto aŭ al la Libro-Servo.

Bonvolu avizi la redaktoron se via adreso estas neĝuste presita
sur la adresslipeto, aŭ se vi ŝanĝas vian adreson aŭ/kaj nomon.

Sendu ĉiujn komunikaĵojn, artikolojn, librojn por recenzo kc. al la
redaktoro. Limdato por alsendo de presotaĵoj por la venonta numero:
1 julio.

SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO verku artikolon!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de THE AUSTRALIAN ESPERANTIST "ni vere bezonas artikolon pri.."? Do sendu tiun amatan eseon, ideon, rakont(et)on, esprimon de vidpunkto, ŝercbildon. Ni ĉiuj volos legi ĝin! Preparante la tekston, bonvolu atenti la ĉi-sekvajn postulojn: la teksto devas esti klare tajpita, kun duobla spaco inter la linioj kaj margenoj de almenaŭ du centimetroj. Tajpu sur nur unu flanko de ĉiu folio. Netajpitaj tekstoj estos malakceptitaj. Por konservi la lingvan nivelon de ĉi tiu gazeto la redaktoro rajtas korekti ĉiun tekston antaŭ aperigo. Laŭbezone ĝi povos esti mallongigita de la redaktoro. Ni ne povas promesi aperigon en la tuj sekvonta numero, krom se temas pri kronologie urĝa teksto.

PATRINO

novelo de Nevena Nedelčeva

"Iliana, ĉu vi dormas?" demandis Simeon, leviĝante iom el sia lito, kaj li klinis la kapon al sia edzino.

"Ne, kara mia," ŝi respondis.

"Ankaŭ mi ne povas endormiĝi, sed mi volas demandi vin, ĉu vi sentas vin bona?"

"Jes, tre bona. Mi estas feliĉa."

"Vi estas tre bonkora, Iliana!"

"Ne, mi estas nur patrino."

Li profunde spiris.

"Kial vi ekspiras tiel?"

"Tute kontraŭvole, mia kara," li respondis, kaj kuŝiĝis en sia lito.

Inter la du litoj, kiuj estis metitaj angule, estis korbeto en kiu dormis la beblo - ilia eta filineto Anni. Kaj en la lito ĉe Iliana, dormis Ivo, la 6-jara filo de Simeon, kiun ili hodiaŭ revenigis de porinfana sanatorio.

Kelkajn monatojn antaŭ la naskiĝo de Anni, Iliana, eble ne povante dormi trankvile dum la nokto pro sia iomete peza stato, ofte diris al sia edzo: "Se mi estos viva kaj sana post la nasko de la infano, ni nepre iros por repreni Ivon."

"Bone, bone," respondis Simeon, "ni havas tempon. Tie li fartas tre bone. La pejzaĝo estas belega. La sanatorio troviĝas sur malalta montodeklivo."

"Sed vi diris al mi, ke la infano ĉiam demandas vin pri la patrino."

"Jes, kaj li ĉiam atendas ŝin kun granda senpacienco."

"... Kaj finfine, la patrino devas iri al li ... kaj alvenigi lin hejmen."

Simeon silentis.

Kial vi ne respondas?" ŝi demandis. "Ĉu mi ne povas esti ankaŭ lia patrino, kiel al la infano, kiun mi atendas?"

"Sed vi estas juna ... vi studas, vi devas prepari vin por la ekzamenoj."

"Tio ne malhelpos min. Kontraŭe, mi estos trankvila. Ĉiun nokton, ne povante dormi, mi pensas multe, multe. Kaj kiam mi decidis alkonduki Ivon hejmen, mi trankviliĝis."

Karesante ŝian hararon, li promesis plenumi la deziron de sia edzino...

... ..

Kiam Simeon renkontis kaj ekamis Ilianon, komence li ne diris al ŝi, ke li havas filon, kiu loĝas ĉe sia avino en malproksima vilaĝo, trans la Balkanmontaro. Poste, vidante ŝian bonkorecon, li rakontis al ŝi pri sia unua edzino, kaj pri la infano.

"Ĉu vi ne amas ankoraŭ ŝin?" - neatendite Iliana demandis al Simeon, vidante ŝanĝon en liaj okuloj.

"De kiam mi renkontis vin, via ĉeesto trankviligis min, kaj iom post iom, mia konscio liberiĝis de ŝi. Sed iam, mi tro, tro multe amis ŝin. Ŝi estis belega, ĉarma, vivoplena, dancema, sed bedaŭrinde ŝi havis tre ŝanĝiĝeman karakteron. Ŝi rapide enamiĝis ... ŝia tuta estaĵo brulis. Ŝi estis senĉese gaja, kaj faris la viron, kiun ŝi amis, feliĉa. Sed poste, kun la sama sincereco, kun kiu ŝi estis dirinta, ke ŝi amas iun per sia tuta estaĵo, ŝi povis diri: 'Mi ne estas kulpa, mi ne povas plu ami vin. Kredu min ... mi ne povas'. Post nia eksgeedziĝo, ŝi edziniĝis denove kun fremdulo kaj forlasis nian landon."

"Kaj la infano?" ekdemandis Iliana.

.

"La infano ne estis ĉe mi. Mia patrino zorgis pri li, en la vilaĝo, de kiam li estis okmonata. Sed ĉiam, kiam li vidis ŝin, li ne povis disiĝi de ŝi. Li havis grandan deziron, neceson esti amata, karesata de ŝi, sed ŝi ne havis tempon por tio. Ŝia atento estis ĉiam okupata pri si mi. Li estis trijara kiam ŝi foriris... Lastatempe, eble pro malsato je patrino amo, aŭ pro alia kaŭzo, Ivo malsaniĝis. Lia pulmo estis malforta, kaj la kuracisto rekomendis, ke li devas esti kondukita al infansanatorio..."

Post tiu interparolo, Iliana ne plu demandis lin pri lia pasinteco.

... ..

En la korbeto, la malgranda Anni ekploris.

"Ripozu, Iliana," diris Simeon, leviĝante de la lito, mi kvietigos nian filineton."

Li prenis la infanon, kaj paŝante en la ĉambro, lulis Annin en siaj brakoj. Fine ŝi denove ekdormis. Li metis ŝin en la korbeton, kisis sian edzinton kaj kuŝiĝis en sian liton.

"Panjo," aŭdis Iliana la flustreton de Ivo, "mia kara panjo!" kaj li ĉirkaŭpremis per la du manetoj ŝian kolon. "Vi estas ĉe mi, panjo!"

"Jes, mia infano," kisis Iliana lian vangon.

"Panjo, ĉu mi restos ĉe vi?"

"Jes, infano mia."

"Kaj ĉu mia avino ne rekondukos min al la vilaĝo?"

"Ne, infano mia, vi ne plu iros vilaĝen."

"Kaj al la sanatorio?"

"Ne, mia infano!"

"Kaj mi restos por ĉiam ĉe vi?"

"Por ĉiam, infano mia." Si ĉirkaŭbrakis la knabeton.

"Panjo, mia dolĉa panjo, mi tiel longe atendis vin..."

"Sed mi atendis vian malgrandan fratineton ... kaj krome, mi lernis, mi havis ekzamenojn ... tial mi ne povis pli frue veni al vi."

"Ankaŭ paĉjo tion diris al mi ... sed mi, mi ĉiutage atendis vin."

"Mi sciis tion, infano mia, kaj mi ankaŭ suferis pro vi."

"Panjo, mia dolĉa panjo," premis per siaj manetoj Ivo la kolon de Iliana. "Vi diris, ke mi restos por ĉiam ĉe vi?! Ĉu vere?"

Ferminte denove la palpebrojn, li feliĉe aŭdis la respondon: "Vere! Por ĉiam, infano mia." □

0-0-0-0-0

KOREKTO

La informo pri la UK-oj en la Nova Mondo, en nia marta numero, estis erara. Efektive okazis ĝis nun 5 tiaj UK-oj. En Usono 1910, 1915, kaj 1972; en Brazilo, 1981; kaj en Kanado, 1984.

Via redaktoro pardonpetas pro la misinformo.

PRIPENSOJ PRI LA EBLECO DE INTERNACIA LINGVO de David Poulson

Gesamideanoj, kion vi opinias? Ĉu ni devas - eĉ rajtas - daŭre priskribi Esperanton kiel "La Internacia Lingvo"? Ĉu ne estas vere, ke, fakte, la angla lingvo fariĝis la internacia lingvo? Kaj ĉu estas plenumbla propozicio, ke iu ajn lingvo povus iam akceptiĝi sufiĉe bone por meriti la nomon "internacia"?

Lastatempe mi iom pripensis ĉi tiujn demandojn kaj por min helpi trovi taŭgajn respondojn, mi komencis kolekti unue faktojn kaj ... fantaziojn aŭ ciferojn? Nu, vi mem povas decidi ĉar mi prezentas al vi la rezulton de mia mallonga serĉado.

Unue, mi konsultis la 1987-an eldonon de Whitaker's Almanack. En Anglujo, ĉi tiu libro nomiĝas, ameme, la "Biblio de Bibliotekistoj", pro tio, ke ĝi estas konservativa, aŭtoritata, kaj fidinda fonto de informo. Kaj mi legis, en ĉi tiu libro, ke en mez-1983, la tuta loĝantaro de la mondo estis proksimume 4 684 000 000 homoj. Mi ankaŭ informiĝis, ke la loĝantaro de Britujo, Oceanio kaj Nord-Ameriko (laŭ la plej freŝdataj popolnombroj) ampleksis 5,5% de la monda loĝantaro (efektive, 356 000 000 homoj).

Plue, mi kalkulis, ke, se oni enmetas tiujn aliajn landojn (ekzemple Sud-Afriko) kie almenaŭ parto de la loĝantaro parolas angle, kiel nacian lingvon, oni konkludas, ke proksimume 6% de la monda loĝantaro estas denaskaj angla-parolantoj. Jen, do, la situacio en 1987, laŭ la plej fidindaj statistikoj, kiujn mi trovis.

Tamen, poste, en Monato mi legis ĉi tiun prudentan alineon:

...se ni kredas al la statistiko de UN, iam en ĉi tiuj tagoj naskiĝis ie en la mondo la kvinmiliarda hometo. Kompreneble, tio estas nur supozo, ĉar se ni eĉ ne scias precize, kiom da homoj vivas en tiel burokrata administra FR Germanio (ankaŭ ne post la ĵus okazinta censo) kiel oni sciu kiom da ili loĝas en afrikaj ŝtatoj, kie nun parte mortis pli da homoj ol naskiĝas? Sed tio ne perturbas la fakulojn de UN: ili simple fiksas la 11an de julio kiel la tagon kiam la homaro atingis la gigantan nombron 5 000 000.

(Stefan Maul, Monato, 7-8, 1987)

Do, Maul avertas nin pripensi tre singarde pri loĝantaraj statistikoj - kie ajn ni trovas ilin. Ne forgesinte lian averton, tamen, mi konsultis aliajn jarlibrojn, enciklopediojn ks. kaj mi esploretis fine la World Almanac and Book of Facts (1989-an eldonon) kie mi informiĝis, ke en la tuta mondo troviĝas 431 000 000 angla-lingvaj parolantoj. Estas rimarkinde, ke laŭ la sama verko, ekzistas 2 000 000 esperantistoj! Efektive, mi konstatis, ke Esperanto enhaviĝas en listo de la 209 "Principal Languages of the World". (Oni difinas "principal language" kiel "parolata - jarneze de 1988 - de almenaŭ 1 000 000 homoj".)

Kompreneble, eĉ sen la skeptikaj vortoj de Maul, mi malfidus la suprajn ciferojn kaj statistikojn. Eble vi ankaŭ demandas: "Nu, kie en la mondo ili estas?" Ĉu vere troviĝas ekster Britujo, Oceanio kaj Nord-Ameriko aliaj 74 500 000 kiuj parolas la anglan? Kaj 2 000 000 esperantistoj! Nu, iu bonvolu diri al mi, kie ajn ili kaŝiĝis!

Tamen, kaj jen la kerno! - eĉ se ni ja akceptas, ke 431 000 000 homoj vere parolas angle, do - se ankaŭ estas prave, ke la homaro nombriĝas 5 000 000 000, tiel ni konstatas, ke nur 8,63% de ĉiuj homoj en la mondo scipovas paroli angle. Plue, ĉar ni jam kalkulis, ke 6% de la monda loĝantaro denaske parolas angle, tial nur 2,62% de la tuta homaro lernis la anglan kiel duan lingvon. Male, 91,38% de vivantaj homoj NE scipovas la anglan lingvon.

Nu, mi jam diris, ke mi mem ne tute fidus ĉi tiujn statistikojn. Tamen, estas interese, ke mia konkludo ja konkordas aserton, kiun faris Prof-o Pierre Janton, kiu, en parolado al SAT-anoj en Parizo (en 1981), diris ke nur 8,8% de la monda loĝantaro scipovas paroli angle. Precizaj statistikoj tute ne gravas en tiu ĉi afero. Estas facile kredi, ke, ekster la grandaj landoj, kie la nacia lingvo estas angla, nur tre, tre malmulte da homoj - certe ne pli ol 3% de la resto, scipovas paroli ĝin. Memoru ni ankaŭ, ke, pro la relative granda kreskado de la loĝantaro en landoj de la Tria Mondo, la procento da angla-lingvo-parolantoj en la mondo eble malpliĝas ĉiujare.

Pripensinte la superaĵajn taksojn (ĉar ili ne estas faktoj) mi konstatis, ke la angla lingvo ne estas vere "internacia" lingvo. Male, estas evidente, la lingvo nur de plimalmulto ... sed de politike kaj ekonomie potenca malplimulto, ĉu ne? Verdire, la angla lingvo estas

la lingvo de elito. Laŭ Thomas A. Goldman, redaktoro de la Ekonomika Bulteno pri Usono, la angla estas ne internacia sed mondlingvo, "la plej taŭga lingvo por tutmonda disvastigado de informo".

Miaopinie, tiu priskribo eltiros nin for de cifere-jargono, for de konkura sinteno (kiun aliaj homoj povus konstati agresema), kaj, male, al la direkto de nova starpunkto baziĝinta sur homaj valoroj. Al starpunkto ankaŭ kiun oni facile povas subteni kaj pruvi per nekontestablaj aludoj al la aktualaj organizaj strukturoj de la nuna esperanta movado mem. Ni nur bezonas mencii la vastan reton de delegitoj, la fakajn grupojn en la Jarlibro de UEA, la Pasportan Servon, la UK-ojn, kaj, kompreneble, la multnombrajn leterojn per kiuj estiĝas translima amikeco inter samideanoj tra la tuta mondo. Ĉiuj tiuj aferoj prezentas nerefuteblan atestaĵon de la daŭra uzado de aparta lingvo kiu kunigas la malsamajn popolojn de la mondo. Jes, prave! Ĉu ni ankaŭ konsentas, ke la plej bona nomo por priskribi Esperanton al aliaj homoj ja estas "La Lingvo de Internacia Amikeco"? - Jen mia elekto - sed kion vi opinias? ☐

ESPERANTO EN RADIO 3ZZZ, MELBURNO

Laŭ raporto de **Svetislav Kanaĉki**

Komence de la 2a de aprilo nia Esperanto-radioprogramo plilongiĝis, tiel ke ni nun disponas pri duona horo ĉiulunde, de la 1.30 ĝis 2 ptm. Ni speciale dankas al Kep Enderby, kies helpo certigis por ni ĉi tiun sukceson.

Dum la 27a AEA Kongreso okazinta en Melburno en januaro 1990, ni aranĝis kun la radiostacio, ke ili donu al ni unu horon, kiun ni uzis por interjuro kun niaj membroj: Trevor Steele, Vera Payne, Kep Enderby, Max Wearing, kaj Harry Beechey (prezidanto de la LKK). La intervjuon gvidis Toni Lee, membro de la radio-komitato de 3ZZZ.

La intervjuo estis tre vigla, kaj niaj membroj respondis al ĉiuj demandoj, kaj kun konvinkaj respondoj impresis la aŭskultantojn, tiel ke post nelonga tempo venis interesitoj, kiuj tuj aĉetis instru-librojn kaj ankaŭ bonajn, detalajn informojn pri Esperanto. Ni ankaŭ aranĝis intervjuon en la nederlanda programo, dum la Kongreso. Ĉi-foje mi akompanis Ray Ross kaj nian junan germanan gaston Martin Burkert. La intervjuo daŭris 15 minutojn. Nederlandlingve parolis por ni nia bone konata samideano Marcel Leereveld.

PROVU VIAN VORTOSCION

1. Ĉu ŝ t i p o estas
 - (a) peco da ligno
 - (b) trunketo de fungo
 - (c) dorsapogilo
 - (ĉ) tropika floro

2. Ĉu s t i p o estas
 - (a) turo de preĝejo
 - (b) trunketo de fungo
 - (c) malfacile grimpebla deklivo
 - (ĉ) lignaĵo sur kiu oni iam bruligadis sorĉistinojn

3. Ĉu *a b a k o estas
 - (a) kalkulilo
 - (b) parto de kolono
 - (c) fumsubstanco
 - (ĉ) estro de monaĥejo

4. Ĉu b e b o estas
 - (a) svingilo
 - (b) teksaĵo farita de araneo
 - (c) infaneto
 - (ĉ) trinkaĵo

5. Ĉu *c i c o estas
 - (a) pinto de mamoo
 - (b) parto de cirklo
 - (c) maltrans
 - (ĉ) kaŭĉuka suĉilo de botelo por infaneto

6. Ĉu *ĉ i t signifas
 - (a) ĉi tien!
 - (b) silentu!
 - (c) kontraŭregule ludi
 - (ĉ) venu!

7. Ĉu *d e g n i signifas
 - (a) moŝtece konsenti fari
 - (b) perdi siajn kvalitojn

- (c) fari bildon
- (ĉ) meriti respekton

8. Ĉu *e o s t o signifas

- (a) oriento
- (b) epoko
- (c) alkohola trinkaĵo
- (ĉ) difekto de la haŭto

9. Ĉu *f a j n a signifas

- (a) punpaga
- (b) nevolonta
- (c) ekstrakvalita
- (ĉ) prezentanta malfacile distingeblajn diferencojn

10. Ĉu *g o f r i signifas

- (a) enpremi per fera ilo desegnon
- (b) fuŝludadi
- (c) glutegi
- (ĉ) liberigi el militkaptiteco

11. Ĉu *ĝ e s t o estas

- (a) franca eposa poemo
- (b) ŝerco
- (c) malfacila spirado
- (ĉ) ostoj en la piedoj

12. Ĉu *h a ĝ o estas

- (a) malbongusta kaĉo
- (b) sabla bordo de la maro
- (c) tradicia skota manĝaĵo farita el ŝafviando k.a.
- (ĉ) pilgrimo al Mekko

13. Ĉu *ĥ a t o estas

- (a) malgranda ĉapelo
- (b) vilaĝa pajlokovrita domo
- (c) malamo
- (ĉ) danco

KOMPUT-TERMINOJrecenzas **John Mills**

Revizita Laborplano de R. Eichholz. Bailieboro, Ontario (Kanado): Esperanto Press, 1989.

Oni diras, ke kamelo estas ĉevalo, kiun projektis komitato. Do, kion produktos komitato de multe da rondoj, kiuj laboros por proponi novajn vortojn, por "evoluiĝi nian lingvon"? Tio ja estas la propono de Eichholz. Li nomas ĝin "Pekoteko" (per-komputora termino-kolekto).

Laŭ mi, oni devus inventi neologismojn nur kontraŭ bezono, ne ĉar oni kredas, ke onia nova vorto estus pli bona ol la jam ekzistanta kaj tute taŭga vorto. Eichholz ne konsentas. Ekzemple, por la angla vorto "software" PIV enhavas kaj "programaro" kaj, en la Suplemento, "softvaro". Tio ne sufiĉas por Eichholz, kiu inventis alian vorton, "softa".

Kun tiaj amikoj, Esperanto ne bezonas malamikojn!

La libro estas tre senorda; ĝi enhavas nek indokson nek liston da enhavo. Ŝajnas, ke ĝi estas blindokaza kolekto da eroj, verkitaj malsamtempe. Estas malfacile konstati kiel, laŭ Eichholz, la rondoj funkcias. La libro certe ne persvados min helpi pri la projekto - eĉ se mi kredus, ke ĝi valoros.

Eichholz postulas, ke la rondanoj uzu la teksto-prilaborilan programon "Word Perfect". Nu, "Word Perfect" estas bona kaj ampleksa programo. Mi multe uzis ĝin, kaj fakte nun uzas ĝin por verki ĉi tiun recenzon. Sed ĝi estas nur unu el multaj, kaj alte kostas - ĉ. A\$700 - kaj oni devus elspezi tempon por lerni efike uzi ĝin. Estas pli malaltkostaj programoj, kiuj tute taŭgas por ĉi tiu tasko. Multe da homoj jam posedas teksto-prilaborilajn programojn, kaj spertas je ilia uzado, do estas sensecaĵo postuli, ke ili aĉetu kaj lernu alian. Se ĉiu uzus ASCII-ajn metodojn por interkomuniki, ne gravus kiun ajn prilaborilon li aŭ ŝi uzus. Kompreneble 7-bita ASCII ne enhavas literojn kun supersignoj; Tamen oni povus uzi, ekz. la simbolon ^ antaŭ litero por signifi "kun supersigno"*. Simpla programo sufiĉas por ŝanĝi inter tiu ASCII-a formo kaj iu ajn alia formo.

"Word Perfect", tamen, tiel ravas Eichholz, ke li multe skribis pri ĝi en la libro; fakte, estas pli da paĝoj pri WP ol pri la fundamento de la laborplano. Li ankaŭ elspezis paĝojn por priskribi kelkajn aliajn programojn, kiujn li uzas, sed kiuj ne necesas por rondanoj.

Laŭ Eichholz, ĉiu rondano vice ricevos diskon enhavantan parton de la proponata vortaro. Ĉiu devus kopii la diskon, aldoni siajn komentojn kaj proponojn en la kopion, kaj tiam fari kopion de la riĉigita teksto - sur la origine ricevitan diskon. Li aŭ ŝi tiam sendos la diskon al la venonta rondano, kaj fine la diskon - kelkfoje reskribitan - ricevos la Terminologia Centro.

Tio ja estas recepto por katastrofo! Kiel spertuloj pri komputado bone komprenus, preskaŭ certe iu en la rondo fuŝus la kopiadon.

Resume, mi dubas la valoron de la projekto, kaj kredas, ke la malbone pripensita laborplano fiaskos. Mia konsilo al tiuj, kiuj volas antaŭenigi nian lingvon en fakaj kampoj estas, ke ili uzu ĝin por verki artikolojn aŭ librojn. Tio pli valorus ol serĉi neologismojn por vortaro.

Pekoteko? Ĝi ja estas teko da pekoj!

(*La Akademio de Esperanto plu ripetas la originalan konsilon de la Fundamento de Esperanto, nome, ke okaze de manko de uzeblo de la supersignoj oni skribu ch, sh, simplan u, kc. Pro kaŭzo ne komprenata de la Akademio nek de mi mem, esperantistoj rezistas tiun fundamentan konsilon de nia Fundamento! - La red.)

13a KAJ 14a INTERNACIAJ SEMAJNOJ DE ESPERANTO

Pro la sukceso de nia ĉiujara evento, ni organizas tiun ĉi jaron du semajnojn.

La unua okazos en vilaĝeto de franca montaro Alpes, de la 25a de aŭgusto ĝis la 1a de septembro 1990. La dua okazos ĉe mediteranea marbordo en havenurbo Sete, en bela parko tute apude de la maro, de la 15a ĝis la 22a de septembro 1990. Ni havos trinivelajn kursojn de Esperanto kaj enkonduko en pedagogion en agrabla feria medio. Por informo: Esperanto, 5 rue du Docteur Roux, 34000 Montpellier, Francio. Plena kosto inter FF890-1330 (=ĉ. A\$205-305) por semajno.

FOLIUME DE ASTRONOMIA MAPARO
de Niĉjo Nicholas

Mi malfermas astronomian maparon
kaj mi mane tenas mondarojn;
mi saltas de kosmo serpene al kosmo,
kaj pens-enhavas dimensiojn de malpaneo.

Mi malfermas astronomian maparon,
kaj jen forestas la astrologiaĵoj
de mondkonataj artistoj.
Montriĝas, ke la planedoj (proksimume mapitaj)
estas nia najbarejo;
la galaksioj - ne pli timigaj ol metropoloj;
kaj la "konebla universo" - efektive koneblas!

Mi malfermas astronomian maparon
kaj trovas ke

Merkuro estas fajreca Lunojdo
Venuso - trovama Marso
Marso - tromalvarma Tero
Jupitero - juna preskaŭ-Suno
Saturno - juna Jupitero
Uranuso - solida Saturneto
Neptuno - bluega Uranuso
Plutono - vojerarinta asteroido

^
Ci ĉio kune kun nia "poreterne" kara Tero.
Kaj la satelitoj
Kaj la kometoj kaj la asteroidoj kaj la sputnikoj:
Ciuj anas kosmevastan klanon,
patre de Suno nia.

Mi malfermas astronomian maparon
kaj jen mi trovas por truetoj kaj streketoj surfacaj
nomojn kontentige decajn:
Einsteinoj kaj Galileoj kaj Newtonoj,
foje Beethoven, eĉ Jules Verne.

(Ni trovu do streketon por ni mem anticipe.)

Mi malfermas astronomian maparon,
kaj ekscias la stelaran sciendaĵaron:
iliaj miljaraĝaj nomoj ne plu fremdas,
iliaj trajtoj detaliĝas,
iliaj moviĝoj nesenseblaj sentiĝas.

Mi malfermas astronomian maparon,
kaj la intergalaksia reto akiras kuntekston.
La kvazaroj estas precize lokitaj lim-monumentoj,
kaj ĝise haveblas ... mondoj da mondoj da mondoj.

Kaj malĝise?

Mi fermas astronomian maparon.
Nenio evidentas pri Dio,
malpleje Lia ekzisto.
Sed foliume de astronomia maparo,
de nokta ĉielo,
de kosma polvo,
oni komencas la belon klarigi iomete malpli science.

Kaj tiam implikiĝas la afero.

AN EMPIRICAL STUDY INTO THE ATTITUDES AND INTENTIONS OF AUSTRALIAN STUDENT TEACHERS TOWARDS LEARNING ESPERANTO

by Dianne Lukes

As a part of my final year of study in Applied Psychology it was required to do a piece of empirical research into some aspect of psychology. As a three year subject, it comprised more than a third of the total year's requirement for the course. Since I could select my own topic of interest, I chose to do something relating to Esperanto. I feel strongly that if the Education Department was ever inclined to consider the introduction of Esperanto into the Australian Education System they would require scientific evidence to support it. At the same time it had to be a Psychological paper. At first I considered doing a study of human learning using Esperanto as the topic. Unfortunately such an experiment would require longer than just a year to set up, run and analyse the results.

I discussed this dilemma with several Esperantists and eventually decided to investigate attitude change. This was an acceptable area of Psychology to study and I could still use Esperanto as my topic. At the same time it could be of interest to the Education Department to know something of the attitudes held by Education Students towards Esperanto. All first and second year Education Students studying at the Darling Downs Institute of Advanced Education in Toowoomba and at the Canberra College of Advanced Education, 293 students, participated in the study.

The hypotheses were firstly that very few Education Students know anything about Esperanto but if they were given some information about it their attitude towards it would significantly change in a positive direction. Secondly that they themselves would learn Esperanto if it was offered as an accredited part of their present course. It was also explored whether there were differences in their responses according to sex, year level or location of study.

The design of the experiment required that a reliable attitude scale, which could successfully distinguish Esperanto supporters from non-supporters, be developed. Esperantists in Toowoomba brain-stormed to produce a pool of attitude statements. These were tested and the least discriminating items were eliminated. More items were added,

tested again and further eliminations were made leaving a seven-item scale. This scale was then tested on thirty-eight students who were not Education Students and it showed a reliability rating of $\alpha=0.8083$ which was acceptable for only seven items. In the major experiment the attitude scale remained highly reliable with $\alpha=0.7958$ for 290 subjects.

The experiment was in the form of a questionnaire which was presented to the students at the beginning of an early morning lecture, by their usual lecturer in their normal lecture hall. In this way extraneous environmental variables were controlled.

The questionnaire was in two parts. The first part asked three questions about the subjects' prior knowledge about Esperanto. (If a subject answered two of these three questions correctly they were eliminated from the sample as their attitude towards Esperanto could be considered to have formed already. Only three subjects were eliminated this way.) The seven-item attitude scale followed and then the questions which asked "Would you study Esperanto if it was offered as a part of your present course as an accredited option?" They could choose from five possible answers to this question: "Definitely yes, Probably yes, Undecided, Probably no or Definitely no". Finally they were asked what someone who was important to them would think about their answer to the previous question.

After completing the first part of the questionnaire, the subjects heard a three minute tape recorded message about Esperanto. This was in the form of eight items of information which had been prepared by Mr Ralph Harry. This tape was prepared in a professional recording studio and read by an ABC newsreader so that the presentation was clear and had no distracting features.

After hearing the taped message the subjects completed the second half of the questionnaire. This repeated the attitude scale and asked the same questions about their intentions towards learning Esperanto and what others who are important to them thought about these intentions. It sought demographic information and provided three blank lines for comments. The results found that there was a significant, positive change in responses. It also found that 52.6 of the respondents said they would learn Esperanto if offered as an accredited option.

Although these results looked positive there was the need to test whether the subjects necessarily would carry out their intended behaviour. Ajzen and Fishbein* have spent many years developing a statistical model which can make such predictions. When this model was applied to the study above, all values were highly significant.

In the Ajzen and Fishbein model the next step is the relationship between the behavioural intention and the actual behaviour. Since various experiments (See Ajzen and Fishbein) have indicated a direct correlation between the two, it may be predicted that if the multiple R obtained for the behavioural intention is high, and no extraneous variables intervene, the behaviour would also be high. This study showed a high multiple R for the behavioural intention so a high correlation between it and the actual behaviour could be predicted.

Neither sex nor location of study showed significant influences on responses. The year level of study showed some interaction between responses to some items within the attitude scale but no significant difference for the whole scale. These results would appear to indicate that in spite of one sample coming from the conservative, rural, free enterprise background of Toowoomba and the other from the more cosmopolitan, public-service oriented city of Canberra they show no significant difference in their attitude towards Esperanto.

From comments that were made it appeared that the students were genuinely interested in the topic and could therefore be expected to have responded truthfully. Some comments made were:

1. I had never heard of Esperanto before and would be interested in hearing more about it.
2. I feel it would be better taught in Primary Schools.
3. Esperanto can prove a useful second language. My father is fluent in it and has travelled extensively.
4. Esperanto sounds interesting.
5. It would be fun and better for the world, especially world peace.

To speculate if these results could predict the attitude and behavioural intentions of the total population of first and second year

*Ajzen, I. & Fishbein, M. (1980): Understanding Attitudes and Predicting Social Behaviour. New Jersey: Prentice Hall.

Education students in Australia would depend on how representative the sample was. Since there was no significant difference between the students' attitude depending on their location, although the two places surveyed vary considerably, location does not affect this attitude. As other variables such as age, sex, race, club affiliations and education are likely to be similar in Teacher Training Colleges throughout Australia, and whole classes were used, it could be considered that this was a stratified sample.* They would therefore be highly representative of the total population.

It was hypothesised that few people in Australia know about Esperanto. This was borne out by the fact that only 3 out of 293 participants were eliminated due to past knowledge of the subject. Many subjects claimed that they had never heard the word Esperanto and some sceptics even still doubted its existence. It is of interest to note that 56% of the student teachers surveyed said that they probably or definitely would learn Esperanto if it was offered. The fact that 60% were in agreement with Esperanto being taught in all Australian high schools and another 27% were undecided would appear to indicate that a majority of education students support the idea.

S U M M A R Y

1. Subjects showed a significant positive change of attitude towards Esperanto after hearing only a three minute talk on the subject.
2. The amount of change in attitude did not vary due to sex, location of study or the year level of study.
3. The Ajzen and Fishbein model supported the prediction that there is a high probability that a majority of Australian Education Students would study Esperanto if it was offered as an accredited optional part of their present course.

*Craig, J.R. & Metze, L.P.: Methods of Psychological Research. Philadelphia: W.B. Saunders.

KRIBAĜO

de **Ralph Harry**

Post legado de Aŭstralia Antologio sendube multaj esperantistoj penis legi la premiitan en 1989 romanon de Peter Carey: *Oscar and Lucinda*. Kaj eble ili ne komprenis la aludojn al "cribbage", la kartludo, kiun tiel bone kaj profite ludis en frua Sidnejo la heroino Lucinda.

Fulcher kaj Long proponis la esperantan nomon "kribaĝo", kiun ili difinis "spaco de kartludo". La PIV ne inkludis la radikon (troveblan ankaŭ en *Butler Esperanto - English Dictionary* 1967), kvankam laŭ la Enciklopedio Britannica, eldonata en Usono, kribaĝo restas "unu el la plej popularaj de ĉiuj kartludoj" kaj ĝi estas ludata de pli ol 10 000 000 personoj en Usono, ĉefe en la nord-orientaj ŝtatoj. La ludo estas populara ankaŭ en Kanado, Britio, Aŭstralio kaj Nov-Zelando.

Kribaĝo estas ludata per normala kartaro de 52 kartoj. Kutime estas du ludantoj, sed tri aŭ kvar povas ludi. Ambaŭ ludantoj ricevas po 6 kartojn kaj elĵetas 2, por formi kombinaĵojn de kartoj en mano de kvar kartoj. La disdonanto ricevas poentojn el aldonita mano de kvar kartoj, farita el la du kartoj elĵetitaj de la du ludantoj (la "kribo"). Oni registras kutime la poentojn per keĵletoj metitaj en specialan tabuleton kribaĝan:

.....
.....
....				
.....
.....

Kribaĝa tabuleto

Kribaĝon inventis la angla poeto kaj vetludisto Kavaliro Johano Suckling, kiu naskiĝis en Anglio en 1609. En 1609 kiam studento en Trinitata Kolegio de la Universitato de Kembriĝo, li heredis grandan riĉaĵon de sia patro kaj pasigis kelkajn jarojn en Francio kaj Italio. En 1630 li reiris al Anglio kaj estis kavalirigita de la reĝo Karolo la Unua. Li estis ankaŭ soldato kaj servis sub la sveda reĝo Gustavo Adolfo en la Batalo de Brietenfeld. En 1639 li organizis kaj pagis trupon de 100 rajdsoldatoj por akompani la reĝon al

Skotlando en la Milito de la Episkopoj. Li estis ne nur riĉa sed bela, malavara kaj populara. Li bonege ludis kartojn kaj bulludon, kaj havis multajn amikojn. Du el tiuj, John Hales kaj Kavaliro Vilhelmo Davenant priskribis al la historiisto John Aubrey la novan kartludon, kiun Suckling inventis, kaj kiu fariĝis populara. eĉ furoris ĉe la ludtabloj en Londono. Suckling bedaŭrinde komplotis en 1641 por eltiri amikon el la Turo de Londono kaj kiam la komploto estis eltrovita li devis fuĝi al Francio kie li malriĉiĝis kaj sin mortigis per veneno. Sed lia ludo "Cribbage" daŭris.

Ludanto elektas el la 6 kartoj disdonitaj al li/ŝi la kvar, kiuj donas plej multajn kombinaĵpoentojn. Ekzemple, oni ricevas 2 poentojn pro paro de kia ajn valoro; 3 poentojn pro sekvenco de 3; 4 poentojn pro sekvenco de 4; 2 poentojn pro kombinaĵo de 2, 3, aŭ 4 kiuj sumiĝas al 15; 6 poentojn pro 3 kartoj de la sama valoro (t.e.3 paroj!). Fanto (bubo) de la sama emblemo kiel la "komenca karto" poentas 1.

La "komenca karto" troviĝas per tranĉo de la kartaro fare de la kontraŭulo de la disdonanto. Ĝi servas kiel kvina karto por ĉiu el la kvar-kartaj manoj, inkluzive por la kvar-karta "kribo", la ekstra mano formita per la 4 elĵetitaj kartoj de la du ludantoj. Se la komencanta karto estas la fanto la disdonanto ricevas 2 poentojn.

Antaŭ ol kalkuli la poentojn tamen estas alia etapo en la ludo - la "kejletado" (pegging). Komencante de la nedisdoninto, la du ludantoj metas po unu karton laŭvice sur la tablon, antaŭ si. Oni ricevas kaj "kejletadas" poentojn sur la tabuleton laŭ la sama skalo kiel rilate la manojn. Ekzemple, se unu ludanto komencas per damo (ĉiu kortega karto kaj la deko valoras 10) kaj la alia ludas kvinon, la dua ludanto rajtas kejletadi 2 poentojn. Se ludanto faras sumon de 31 en la kejletado, li ricevas 2 poentojn. Se li ludas karton, kaj la alia ne povas ludi sen sumigi pli ol 31, ĉi tiu devas diri "Iru!" kaj la unua ludanto ricevas 1 poenton.

Oni ricevas 4 poentojn en la manoj, kiujn oni kalkulas post la fino de la "kejletado", pro posedo de 4 kartoj de la sama emblemo (=fluŝo. Angle: flush; france, floche; germane Flüte) aŭ 5 poentojn se la komenca karto estas de la sama emblemo. Sed oni ne ricevas poentojn pro samemblemaĵo dum la kejletado. En la kribo oni ricevas poentojn pro samemblemaĵo nur se la komencanto estas de la sama

emblemo.

Ĉar oni vetis multe da mono pri la nova ludo* Suckling preskribis detalajn regulojn, kiuj restas preskaŭ neŝanĝitaj ĝis hodiaŭ. La unua ludanto kiu atingas la finon de 4 "stratoj" de 30 sur la tabuleto kaj povas tiam atingi la komencan/finan truon gajnas la partion. Se ludanto atingas la finon antaŭ ol la kontraŭulo atingis la finon de nur 3 stratoj li gajnas "ŝanceligan baton" (lurch) kaj gajnas duoblan partion.

Mi lernis la regulojn kaj iom de la lingvo de kribaĝo dum knabo, instruate de mia patro, sed mi akiris pli grandan esprimaron dum studento en la Universitato kiam mi loĝis en pensiono en Hobarto kie loĝis ankaŭ kelkaj ŝaftondistoj, kiuj laboris dum la vintro sur la doko. Ili uzis interesajn kliŝojn dum la kalkulado de la manoj, ekzemple: Dekkvin du kaj nenio plu; Dekkvin du, dekkvin kvar, por la restaĵ' neniuj poentar'; du piroj (paroj) neniuj pomoj - ĝardeno de Morgan; unu por liaj kalkanoj (kiam estas fanto samemblema kiel la komercanta karto); unu por lia bulo (nob) kiam oni trovas, ke la komercanta karto estas fanto. Do Suckling donis al ni ne nur bonegan ludon, sed kontribuon al la angla lingvo. Mi ŝatus konatiĝi kun esperantistoj, kiuj ludas kribaĝon, por fiksi en Esperanto la terminaron kaj regulojn. Mi pretas sendi ekzempleron de mia traduko de la regularo kontraŭ unu IRK.

*Goldsmith 1761, The Good-natured Man: "Men that would go 40 guineas on a game of cribbage". Dickens 1840, The Old Curiosity Shop: "3 game of four-handed cribbage".

KIEN NI IRAS? de Maria Angelova

Dum tiuj tagoj
streĉaj, nebulaj
kien ni iras?
Ĉu emocioj
verkos la pensojn
kaj ni ne povos
sobre pripensi
la ĝustajn paŝojn
al la estonto?

Bolas animoj ...
kvazaŭ el kaĝoj
ekflugis ĉiuj.
Kien ni iras?
Ni kredu firme
ke baldaŭ regos
nur saĝo vera,
profundaj scioj.

PLI DA FAKTOJ PRI LA AŬSTRALOJ KAJ ALIAJ PSEŬDOGENTOJ

de Bernard Golden

Ekskurso en la etimologion

En artikolo de Ralph Harry (TAE nov. 1986), kiu estas plenplena de erudicio pri la historio de la landnomo Aŭstralio, la leganto estas detale informita pri la deveno de tiu propra nomo. La fonto estas la latina esprimo *continentis australis*, t.e. suda kontinento. La latina vorto *australis* estas adjektivo, kiu poste estis substantivigita kiel *Australia* analogie kun la nomoj de aliaj landoj kaj kontinentoj en la latina lingvo finiĝantaj per *-ia*. Sed S-ro Harry ne klarigis la bazan signifon de la radikoj *austr-*, kaj li pretervidis la parencecon inter ĝi kaj la nomo de alia lando, Aŭstrio.

Ni faru mallongan ekskurson en la etimologion de Aŭstralio kaj Aŭstrio. En la latina adjektivo *australis*, la sufikso *-alis* estis aldonita al la propra nomo *Auster*, la suda vento aŭ la dio de la suda vento. Estas ja strange, ke PIV registras la nomon Boreo, "helena dio de la norda vento", sed silentas pri la suda vento. (Kiu kulpas pri tiu diskriminacio?) Rimarku, ke jam en 1908 Joseph Rhodes en sia *THE ENGLISH-ESPERANTO DICTIONARY* esperantigis la nomon de la suda vento kaj ties dio kiel Aŭstero. *Austr-* estas parenca al alia latina vorto, *aurora* (aŭroro, tagiĝo). Rezulte de la fonetika fenomeno de rotaismo (interŝanĝo de *s* kaj *r*), la hindeŭropa "s" estis transformita en "r". *aurora* estis ankaŭ la romia diino de la tagiĝo, kiu estas nomata *Eos* (atentu la "s") en la helena panteono. Pli malproksimaj parencaj vortoj estas la Esperantaj neologismoj "easto" aŭ "eosto" (oriento). Komparu *east* en la angla kaj *Ost* en la germana lingvo. La rilato inter tagiĝo kaj oriento estas memevidenta.

Nun ni saltu aŭ flugu de Aŭstralio en la suda hemisfero al Aŭstrio en la norda, por malkovri, ke la aŭstralianoj estas parencoj de la aŭstrianoj. La landnomo Aŭstrio devenas de la latina *Austris*, sed germanlingve la nomo estas *Osterrreich*, signifanta la orientan regionon. *Ost* devenas de la old-altgermana vorto *ōst* (al la easto/eosto/oriento). La ligo de parenceco en resuma formo estas jena: *L. Austris* (sida vento) estas samdevena kiel *L. aurora* (tagiĝo), kiu rilatas al hindeŭropaj radikoj signif-

antaj orienton. La praradiko en la prahindeŭropaj lingvoj estas la konjektita formo *a u s.

Sajnas, ke iam en la antikveco okazis konfuzo inter oriento kaj sudo, sed nuntempe kun la helpo de kompasoj, ni povas pli facile orientiĝi. Tamen, aliaj konfuzoj ankoraŭ restas.

K i u j e s t a s l a a ŭ s t r a l o j ?

Laŭ Ralph Harry estis uzata en Esperanto de tempo al tempo la nomformo "aŭstralo" - "supozeble pro kredo, ke Aŭstralio estas eŭropa aŭ malnova lando, aŭ ke ekzistas iu pragento de 'aŭstraloj'..." Uzis la nomon "aŭstralo" ankaŭ esperantistoj, kiuj kredis ke la formo "Aŭstralio" apartenas al la sistemo de gent- kaj landnomoj proponita de SAT (ekzemple: kanado, Kanadio!) Harry mencias ankaŭ la deziron de kelkaj esperantistoj normigi la formadon de landnomoj per aldono de sufikso al la nomo de iu gento, reala aŭ imagita.

La litova skolo de verda etnografio

Guste tiu tendenco lastatempe manifestiĝis en publikigaĵo de membroj de la redakcio de la revuo HORIZONTO DE SOVETA LITOVIO (en AKADEMAJAJ STUDOJ 1985). Manke de alia titolo, mi nomas tiun grupon la litova skolo de verda etnografio. Ilia vidpunkto parte similas al tiu de Ralph Harry, parte distancas de ĝi. Laŭ la principoj starigitaj de la litova skolo, la solaj finaĵoj de landnomoj devas esti "-io" kaj "-lando"; "-ujo" arkaikiĝu. Harry akceptas la finaĵojn "-o", "-io", kaj "-lando", kaj lasas "-ujo" por funkcii nur en neformala lingvouzo. La granda diferenco inter la du "sistemoj" estas, ke Harry rekomendas la uzon de la sufikso "-an" por formi la nomon de loĝantoj aŭ ŝtatanoj, dum la litovaj etnografi-skolanoj kategorie rifuzas la sufikson "-an". Ili insistas pri la uzo de s e n s u f i k s a j E s p e r a n t a j n o m o j d e g e n t o j. Sekve de tio, ili facilanime kreas plurajn novajn nomojn de popoloj, inter kiuj svarmas braziloj, zairoj, kolumboj (rimarku la ŝanĝon de "o" al "u"!) kaj ankaŭ aŭstraloj.

D i s v a s t i ĝ o d e l a g e n t k r e a m a n i o

Por ekscii, kiel rapide disvastiĝas tiu ĉi manio por krei novajn gentojn, ni rigardu kio okazis en alia kontinento, Afriko. Tie, por iu neklarigebla kialo, la sufikso "-uj" estas substituata al "-io"

en nomoj de landoj, kiuj ne devenas de gentnomo. En publikigaĵo el la plumo de afrika propagandisto Hans Bakker ("GEMELOJ' kun Afriko", sen-data) troviĝas jenaj landnomaj formoj: Kenjujo, Tanzanujo, Zairujo. El tiuj formoj estas eble tiri la malĝustan konkludon, ke ekzistas kenjoj, tanzanoj kaj zairoj! La formo "tanzano" estas duoble konfuza, ĉar estiĝis risko interpreti ĝin kiel "ano de la lando Tanzo". La kaoso estas pligrandigita pro la nekonsekvenca uzo en la sama publikigaĵo de nomformoj kun la finaĵo "-io": Kamerunio, Voltio, Malavio, Burundio, Niĝerio. Bonŝance ni ankoraŭ ne havas aferon kun kamerunoj, voltoj, malavoj, burundoj, niĝeroj kaj aliaj pseŭdogenitoj. ☐

(Ci tiu artikolo estis verkita en februaro 1987, sed pro malapero de la manuskripto estis presebla nur meze de 1989. Intertempe, la Akademio de Esperanto publikigis oficialan liston de landnomoj, kiu aperis en TAE marto 1989. - La red.)

o-o-o

RETROKOMENTE RETROETNEMOK ETNEMOKORTER

La marta TAE neniel plaĉis al mi. La Svarceskaĵo estis infaneca kaj la kalemburoj tro streĉitaj - mi ĉiakaze multe pli preferas Rossetti al Schwartz. La superpezo de recenzoj same agacis kiel la superpezo de Ralph Harry-aĵoj pasintjare. Enhava malekvilibro tre malkonsilindas. Mi mem preferus multe pli da artikoloj pri la Kongreso - mia opinie ĝi meritas pli tian atenton.

Niĉjo Nicholas

LA AMIKECA RETO **de Max Wearing**

Mi trovis ke krom la Pasporta Servo ekzistas alia ebleco de senpaga loĝado ĉe esperantistoj. Tiu servo nomiĝas la Amikeca Reto. Starigita de SAT, ĝi tamen estas malfermita al ĉiuj, kiuj deziras uzi ĝin.

Gi ofertas libron de adresoj - 268 en 33 landoj. La membroj interesiĝas ne nur pri gastigado, sed plejparte estas maldekstremuloj, kiuj volonte diskutas politikon, kaj gvidas siajn gastojn al lokaj lernejoj, kooperativoj, fabrikoj, kc. Por detaloj skribu al: Amikeca Reto, 63 rue de la République, Charge F-37530 Amboise, Francio. Ank-aŭ mi volonte sendos informojn. Adreso: Max Wearing, 30 Westbury St, Hackney SA 5069.

KREI NOVAJN VORTOJN (LAŬ-FUNDAMENT-ajn)
 de **Marcel Leereveld**
 (parto 2)

Erkondukante la daŭrigon de tiu serio mi deziras ripeti ke mi sekvas certajn senesceptajn regulojn por la kreo aŭ rekreo de kunmetitaj vortoj: 1e. La precipa senco, la "determinato", staras (tuj) post la aldonita senco, la "determinanto"; 2e. inter du elementoj ne troviĝas streketo, nek finaĵo (kiaj "a" aŭ "n") nek alia litero krom la nion signifanta kaj nur sondona "o", nek grandliteroj; 3e. la nova vorto havu unuecan signifon plian ol la simplan adicon de la nocioj de la elementoj (ekz. "vagonaro" estas pli ol "aro de vagonoj"; 4e. valoras plejble apliki la "leĝon de neceso kaj sufiĉo". Mi sekvas tiujn regulojn ĉar mi ne deziras fuŝi Esperanton per ŝanĝoj. La reguloj de la esperanta vortfarado estas simplaj kaj klaraj: la esprimriĉeco per la esperanta vortfarado estas grandega kaj komprenklara.

La laŭregula metodo por dialektike trovi la ĝustan vorton same aplikiĝas kiam ni renkontas kunmetitan vorton kaj bezonas trovi la ekzaktan signifon. Ekzemple, se ni legas "Kun korvarmaj salutvortoj" ni devas analizi pri kio temas, kaj eĉ ĉu la vorto ĝustas (ofte ne eblas ekscii la ĝustecon pro neeblo komuniki kun la uzinto). Se la celita signifo estas ke la vortoj varmigas niajn korojn, la vorto kompreneble malĝustas, ĉar devas esti "korvarmigaj" (kie "kor" estas la rekta komplemento de "varmigi", ĉar oni ja ne povas "varmi" koron). En la citaĵo la vortoj mem estas "varmaj", ili havas specialan varmon, nome "varmecon (kiel) de la koro", "koran varmecon", ili estas "korvarmaj". Tio signifas ankaŭ, ke oni ne akceptas ke la koro estas ĉiam varma = afabla, afablega. Se, kontraŭe, oni uzas "varmkoraj vortoj", la signifo estas ke la vortoj venas el la koro de la diranto kaj ke lia/ŝia koro estas, hazarde, "varma". Do ke la vortoj venas el ies koro, ke ke ties (ne ĉies!) koro estas samtempe "varma", afabla, ameta. La nuanca diferenco do estas, ke ĉe "korvarma" oni akceptas ke ĉies koro estas afabla kaj ĉe "varmkora" ke la vortoj venas el speciala koro, nome el afabla koro. La lingvistika kaŭzo de la diferenco estas, nature, ke la unua parto de la kombinaĵo determinas, difinas, la tiel plilarĝiĝantan signifon de la dua parto, kiu en sia vico, estante adjektiva, pliampleksigas la signifon de "salutvortoj".

Ni nun alfrontu niajn novajn kvin problemetojn:

A. Tradukendas "day-light saving"

Ĉu temas pri ŝparado? Ne pri ŝparado de la taglumo ĉar la longeco de ĉilasto ne ŝanĝiĝas per la ŝanĝo de la horo; oni ŝparas nur elektron, pro la pli longa vespero, sed "elektroŝparado" ne taŭgas ĉar ĝi povus havi plurajn aliajn kaŭzojn krom ŝanĝo de la horo. Sed aliflanke la celo estas la plilongigo de la luma parto de la vespero do "vesperlumplilongigo". Ĝi estas ekzaktsignifa esprimo, sed longece malbela (kvankam beleco estas relativa nocio). Se ni akceptus (apenaŭ iu faras tion kaj intertropikuloj eĉ ne kapablas) la difinon de "vespero" en PIV, la solvo estus pli kontentiga: vesperlilongigo" sufiĉus kaj klarus. Kien do serĉi? "Somertempo" ne taŭgas, ĉar tio estas iu ajn tempo en la somero. "Horo" estas la maniero de dividado de la tago kaj la nomo de ĉiu parto de la tago, kaj estas ĝuste tio kion oni ŝanĝas ŝanĝante de normala (vintra) al somera horindiko. Do taŭgus "somerhoro". Miskompreno ne povus ekzisti, ĉar ĉiu horo en la jaro estas longecegala; do povus temi nur pri alia tagdivido. Mi do akceptas fine "somerhoro", des pli ĉar miaj vortaroj (inkl. PIV) tute ne mencias iun esprimon de la signifo.

B. Mi bezonas vorton por "label"

En "Big changes to classical music label" kaj en "G.B. has the label's top job". Evidentas ke ne temas ĉi tie pri "etiketo" (indikslipo). La angla vorto estas dufoja metaforaĵo. Unue, ĝi uziĝas por la nomo de la firmao kiun la etiketo anoncis, kaj due por la firmao mem anstataŭ ĝia nomo. Do mia traduko devas esti "firmao" aŭ "kompanio", se necese kun aldono kia "eldona" aŭ "publikiga" aŭ "registra".

C. Mi bezonas esperantan tradukon por "T-shirt"

Se mi estus senpacienca neologismemulo, mi kreus "tiŝirto". Se mi estus malregulema, esceptema, mi kreus "T-ĉemizo", kiu estas esperante malregula pro du kialoj: unue, ĝi havas streketon, kiun esperantaj vortkombinaĵoj ĝenerale ne havas (jese se temas pri samfunkciaj elementoj), kie unu ne difinas la alian: lordo-kanceliero, ktp.); due, ĝi konsistas aŭ el figuro (T) kaj vorto aŭ el literego (grandlitero) kaj vorto: ambaŭ kombinaĵoj ne formas "vorton" en Esperanto. Nu, mi unue difinu en kiu "T-shirt" diferencas de ordinara ĉemizo, kaj kiuj estas ĝiaj karakteroj. Ĝi similas al ĉemizo en gravaj rilatoj. Sed ĝi ofte, ne ĉiam, havas nur mallongajn manik-

ojn. Ĝi oftete estas el kotono. Ĝi ĝenerale funkcias kiel ĉemizo kaj subĉemizo kune. Ĝi ne havas butonojn (ĉar ne ekzistas butonumenda tranĉo tra la centro), nek kolumon. Ĝustas do la esprimo "senbutona senkoloma ĉemizo" aŭ, pli bone, "senkoloma ĉemizo". Dezirante trovi, se eblas, unuopan vorton, mi rigardas la originon de la anglaĵo: ĝi laŭvorte signifas ĉemizon kiu havas, pro la du mallongaj kaj ortaj manikoj kaj pro la manko de kolumo, la formon de la literego T. Normale araboj, ĉinoj, ktp. ne konas tiuforman literon, sed jese se ili lernis Esperanton; do eble mi rajtus uzi la saman metaformon. Do "literego to" aŭ "grandto", kiuj estus nekompreneblaj se kunmetitaj kun "ĉemizo". Konsekvence mi devas forlasi la esprimon ke la litero estas en la formo de grandlitero. Do mi simple diras "toĉemizo", kio estas sufiĉe mallonga vorto, kaj mi esperas ke ĉiuj komprenos ke la litero to signifas ĉi tie la literegon To. Almenaŭ la esprimo estas pure esperanta.

C. Tradukendas "the rear seats of the bus concertinaed forward, then flew back, killing 14 people."

Fakte la du anglaj metaforoj estas tre trafaj, kaj verŝajne tuj komprenataj ĉe aliaj popoloj. Ĉar la elstara ago de akordiono estas ke ĝiaj du malmolaj partoj alterne interproksimiĝas kvazaŭ parte penetrigante ĉiun el la multaj interaj ripoj en la proksiman. La saman metaforon oni povus uzi parolante pri "pile-up", nome ke "vico de aŭtomobiloj akordionumis"; oni eĉ ne bezonas menciigi ke temas pri kolizio (la ripoj nature faras tion), sed oni devas lasi "vice" por klarigi ke ne temas pri kolizio (ambaŭ)fronta ("head-on"). Ankaŭ por "flew back" mi uzus la saman metaforon, ĉar fakte la du benkoj ambaŭflankaj iras nefiksitaj tra la aero, do "flugis". Jen do mia traduko: "La malantaŭaj benkoj akordion(um)is antaŭen kaj tuj retroflugis, mortigante 14 homojn".

D. Tradukendas "The correspondent was killed by pro-government vigilante squads".

Korespondanto" Sajnis la ĝusta traduko, ĝis mi pripensis ke "correspondent" havas du signifojn: 1e. "korespondi" (=interrilati per leteroj) kaj due "rilati" (la alven- kaj forirhoroj kaj -lokoj de du moviĝantaĵoj (ekz. vagonaro kaj ŝipo estas uze ligitaj). Mia pritemita "correspondent" ne havas rilaton al iu el la du signifoj. Kio do li estas? Li simple estas raportisto por novaĵfirmao, do

"(novaĵ)raportisto". Por "vigilante" malfacilas trovi ion: ĝi nur iomete rilatas al "atentemo", al "vigilant". La vorto signifas membron de neoficiala grupo de policanoj aŭ policistoj kiuj kontraŭbatalas kaj ekzekutas siajn kontraŭulojn en la sama lando. Zamenhof jam uzis "milicio" por tio, sed mi preferas la "milico" de John Wells. Tamen, pro lojaleco al Zamenhof kaj al Esperanto, mi elektas "milicio". Sed milicio povas ankaŭ esti oficiala, do mi aldonas "privat" kiel faras ankaŭ Wells. Fine la traduko legiĝas: "la novaĵraportisto mortigitis de registarfavoraj privatmilicianoj".

Estas grave, ke ĉiu lernanto kaj ĉiu uzanto de Esperanto konsciuj ke Esperanto ne estas, kaj devas ne esti, lingvo kia la etnaj en kiuj la signifoj daŭre ŝanĝiĝas, en kiuj la gramatikreguloj aŭ ŝanĝiĝadas aŭ akceptadas esceptojn, en kiuj novaj, precipe fremdaj, vortoj kreas aŭ nenecese aŭ nelogike aŭ miskomprenige, kaj en kiuj la amasoj blinde imitas la lingvaĉuzon de la ĵurnalistoj, de la burokratoj, kaj de la reklamistoj. Se Esperanto imitus la intan, antan kaj ontan kreskadon de la etnaj lingvoj, ĝi baldaŭ fariĝus same neutila por internacia komunikado kaj por universala lernatado. Esperanto estas lingvo kiun la uzantoj devas konstante nove krei, mem rekrei, por ke ĝi uzatu kun akraj signifoj. La uzantoj devas daŭre konscii pri la ekzakta signifo (tiom necesa en internacia komunikado) de tio kion ili diras. Tiu rekreado konsistas ne nur en daŭra enmensigo de la origina, necese limigita, signifo eĉ de la plej ofte uzataj vortoj (kaj iliaj metaforoj), sed ankaŭ de la pluformiĝoj (inkl. kunmetaĵojn). ■

28a AEA KONGRESO EN SIDNEJO
11-19 JANUARO 1992
 raportas Tom Elliott

La kongreso okazos en la Universitato de Okcidenta Sidnejo, Richmond, historia parto de Sidnejo, 15 kilometrojn for de la urbo-centro, apud la Nepean/Hawkesbury Rivero, duonvoje inter la urbo kaj la montaro. Ĉi loko ebligas plurajn ekskursojn al montoj, rivero, vinejoj. Nia kongresejo troviĝas en historia ĉirkaŭaĵo kun ampleksa spaco kaj modernaj ekipaĵoj, olimpika naĝejo, tenisejoj ktp.

La LKK konsistas el: Kep Enderby, prezidanto; Tom Elliott, vicprezidanto; Les Scott, Sekretario-kasisto. Por programaranĝoj, Sylvia Burkitt; ekskursaranĝoj, M. Chaldecott; ceremoniestro, Irena Timonin. Aliaj estos elektitaj laŭbezono.

TENDUMADO POR INSTRUISTOJ
laŭ informo de **Maksimova Jelena**

De la 23a de aŭgusto ĝis la 6a de septembro en la urbo Urjurinsk, USSR, en la Volgograda regiono, apud mallarĝa, pura rivero okazos tendumado por instruistoj de Esperanto kiuj volas plibonigi sian instruadon, kaj ankaŭ por Esperantistoj kiuj deziras konatiĝi kun instrumentadoj.

Se iu partoprenonto deziras prelegi dum la tendumado, bonvolu antaŭsciigi la titolon de la prelego kaj ĝian daŭron. Ankaŭ, se eble antaŭsendu la tekston de la prelego por diskonigo.

La kosto de la tendaro estas US\$150. Bonvolu aranĝi kun la kaskisto de AEA la pagon de la mono.

Por detaloj, skribu al

SU 400066 VOLGOGRADO
Av. de Lenino 64-43
Kuznecova Tatjana T-34 50 07
(Por Asocio - Maksimova)
USSR

ESPERANTISTAJ VIZITANTOJ EL FRANCI
laŭ informo de **S. Kanaĉki**

Multaj partoprenintoj en la AEA Kongreso memoras Ges-ojn Maryvonne kaj Bruno Robineau. Ili faris jam kvarjaran vojaĝon kaj vizitis multajn landojn. Por ni en Melburno estis oportuno intervjui ilin por Radio 3ZZZ FM.

Ges-roj Robineau komencis sian vojaĝon en Eŭropo. Atinginte Bulgarijon ili eklernis Esperanton, kaj per kelkaj monatoj da intensa studado ili sukcesis bonege regi Esperanton. Tio multe faciligis ilian vojaĝadon, precipe en Japanio, Tajvano, Ĉinio, Koreo, Vjet-Namo, kaj aliaj landoj kiujn eblis viziti malgraŭ la lingvo-problemo, pere de Esperanto. Maryvonne estas sekretario, kaj Bruno estas sciencisto pri laktaĵoj. Espereble multaj membroj niaj aŭskultis aŭ aŭskultos iliajn prelegojn kun lumbildoj pri la vizititaj landoj, dum ili vojaĝas tra Aŭstralio.

5a PACIFIKA KONGRESO EN ĈINIO, 1992

informas Dai Songen

Komence de marto ĉijara okazis kunveno de ĝeneralaj sekretarioj de lokaj Esperanto-asocioj de Ĉinio. Dum la kunveno, kiun gastigis Qingdao, oni varme diskutis, kiel bone fari preparlaborojn por la 5a Pacifika Kongreso. Poste oficistoj de Ĉina Esperanto-Ligo detale parolis kun estraranoj de la Esperanto-Asocio de Qingdao. Ni planas tre baldaŭ fondi LKK kaj diskonigi la 5a Pacifikan Kongreson pere de landaj asocioj kaj ties organoj kaj ankaŭ dum la 75a UK en Havajo.

Mi deziras peti de vi opiniojn pri la jenaj demandoj:

1. Ni planas okazigi la kongreson en majo aŭ aŭgusto, 1992 en la marborda urbo Qingdao. Do, kiu monato estas pli oportuna por aŭstraliaj samideanoj?
2. Kiun temon vi proponas por la Kongreso?
3. Kiujn programerojn vi rekomendas?
4. Ĉu vi konsentas enkonduki en la programon Kongresan Universitaton similan al tiu dum la UK-oj?
5. Kiom da tagoj daŭru la Kongreso?
6. Kiujn urbojn kaj lokojn de Ĉinio viaj samlandanoj ŝatus viziti antaŭ kaj post la kongreso?
7. Se vi havas aliajn proponojn kaj konsilojn, bv. skribi al mi kiel eble plej frue. Adreso:

Dai Songen
Ĉina Esperanto-Ligo
P.O. Kesto 825
Beijing Ĉinio

KORESPONDPETO

Mi volas koni vian landon, do mi skribis al aŭstralianoj, sed sensukcese. Mi estas 36-jaraĝa riparisto de aŭtomobiloj kaj ankaŭ fervojisto. Krom miaj teknikaj problemoj, mi interesiĝas pri vivo de popoloj, politiko, sociaj problemoj, Esperanto-movado. Mi legas kaj volonte interŝanĝas esperantajn librojn.

Mi havas du filinojn. Ili lernas Esperanton. Mia 10-jara filineto volas korespondi kun infanoj pri vivo kaj infanaj problemoj. Adreso:

Staszewski Stanislav kaj Staszewska Magdalena
ul. Moniuszki 1

95-070 Aleksandrów, Pollando

OFICISTO PRI RILATOJ KUN LA PUBLIKO oficiala informo, de Trevor Steele

Dennis Murphy transprenis la rolon de respondeculo pri rilatoj kun la publiko (P.R.O.). Unu el liaj taskoj estas kunordigi agadon de la nova "taskgrupo", kiu serĉas kontakton kun similcelaj organizaĵoj, kaj sciigi tiun agadon al la tuta movado pere de THE AUSTRALIAN ESPERANTIST. Mi petas ĉiujn membrojn de la taskgrupo (kaj aliajn lokajn aktivulojn) kontakti Dennis kaj informi lin pri siaj planoj, sukcesoj ktp. Lia adreso: 79 Binalong Rd, Old Toongabbi NSW 2146.

RESPONDOJ POR "PROVU VIAN VORTOSCION"

1.a; 2.b; 3.a & b; 4.a; 5.a&ĉ; 6.b; 7.a; 8.a; 9.c & ĉu; 10.a; 11.a; 12.ĉ; 13.b

VERKOJ DE BILL LEAH

Leganto demandis pri la du verkoj de Bill Leah menciitaj en la nekrologo en nia marta numero. Lia vidvino informas ke "The Sultan's Curtain" kaj "The Road to Anywhere" ekzistas nur en manuskripto, Bill ĉiam rifuzis provi eldonigi ilin. Alia verko "The Glenfield Story" eldoniĝis en mallongigita formo, far The Glenfield Co-operative. Ekzempleroj de tiu verko estas haveblaj de Glenfield Farm, Leacock's Lane, Casula NSW 2170.

KONKURSO NUMERO 6

N e n i u leganto alsendis provon solvi tiun konkurson, do la redaktoro konkludas ke en AEA ekzistas neniu literaturamanto. Domaĝe.

JAGE-INFORMILO de Niĉjo Nicholas


La junulara organizaĵo iom malrapide organiziĝas en agadon. Ni havas ok pagintajn membrojn kaj sume dudek adresojn. Tio estas multe pli bona ol nenio, sed restas multo farendi. Oni eknegocas kun AEA kaj TEJO por asocia membriĝo de JAGE. Izolate disde la preternacia perspektivo de tutmonda Esperantio, JAGE kompreneble ne povas atingi multe. Ĝi dependas de la ekstera mondo. Ĝi same dependas de la subteno de ĉiuj AEAanoj. Ĝi provizas por gejunuloj ne nur la **L u k a B u l t e n o** sed ankaŭ substrukturon por kresko en la junulara medio. Helpu, ke tiu iniciato malfiasku. Adreso: 17 Renowden Street, Cheltenham Vic 3192.

The Australian Esperantist

Numero 262

JULIO-AUGUSTO 1990

Registered by Australia Post
Publication no. WBG 2488



- Nia membraro, nia krizo (Donald Broadribb) ... p.3
Kial Esperanto mortadas en Aŭstralio? (Brian Currie) ... p. 4
Pri "Retrokomento"; Pri nia gazeto... p.7
"La bofilo", afrika popolrakonto (tr. Bernard Golden) ... p.8
Provu vian vortoscion (Donald Broadribb) ... p.11
Koincido pripensinda? (Miĥaelo Hajlero) ... p.13
Recenzo: Bulgaraj poezilibroj (N. Nicholas) ... p.18
dudekmonata jarraporto de odlo bokserp ... p.87
Diversaj esperantaĵoj ... p.21
English Supplement: Ralph Lindsay Harry LLD
Summer school in Adelaide, January, 1991

THE AUSTRALIAN ESPERANTIST

Oficiala organo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio

Redaktoro: Donald Broadribb, 46 Great Eastern Highway, Bakers Hill WA 6562. Telefono: (09) 574 1307.

Prezidanto: Trevor Steele, 2/9 Main Avenue, Cooparoo Qld 4151.

Vicprezidantoj: Vera Payne, 36 Donegal Rd, Floreat Park WA 6014.

Justice K. Enderby, 2 Phoebe St, Balmain NSW 2041.

Sekretario: Ray Ross, 41 Agnes St, Sunnybank QLD 4109.

Vicsekretario: Herbert Koppel, GPO Box 2122T, Melbourne Vic 3001.

Kasisto: Dwen Loneragan, 16 Deverell Way, South Bentley WA 6102.

Libro-Servo: Tom Elliott, PO Box 230, Matraville NSW 2036.

Korespondaj kursoj: John Moore, 7 Pelican St, Emu Park QLD 4702.

Prezidanto de la Ekzamen-Komitato: Trevor Steele (adreso supre).

P.R.O. (Oficisto pri Rilatoj kun la Publiko): Dennis Murphy, 75 Binalong Rd, Old Toongabbie NSW 2146

Membreco: \$25 por individuo, klubo kc.; \$30 por familio (ĉiuj ĉe la sama adreso); \$15 (minimуме) por pensiulo aŭ studento. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto aŭ al la Libro-Servo.

Bonvolu avizi la redaktoron se via adreso estas neĝuste presita sur la adreslipeto, aŭ se vi ŝanĝas vian adreson aŭ/kaj nomon.

Sendu ĉiujn komunikaĵojn, artikolojn, librojn por recenzo kc. al la redaktoro. Limdato por alsendo de presotaĵoj por la venonta numero: 1 septembro.

SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO verku - artikolon!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de THE AUSTRALIAN ESPERANTIST "ni vere bezonas artikolon pri.."? Do sendu tiun amatan eseon, ideon, rakont(et)on, esprimon de vidpunkto, ŝercbildon. Ni ĉiuj volos legi ĝin! Preparante la tekston, bonvolu atenti la ĉi-sekvajn postulojn: la teksto devas esti klare tajpita, per nova rubando kaj kun duobla spaco inter la linioj kaj marĝenoj de almenaŭ du centimetroj. Tajpu sur nur unu flanko de ĉiu folio. Netajp-itaj tekstoj estos malakceptitaj. Por konservi la lingvan nivelon de ĉi tiu gazeto la redaktoro rajtas korekti ĉiun tekston antaŭ aperigo. Laŭbezone ĝi povos esti mallongigita de la redaktoro. Ni ne povas promesi aperigon en la tuj sekvonta numero, krom se temos pri kronologie urĝa teksto.

NIA MEMBRARO - NIA KRIZOde **Donald Broadribb**

Je 1 Junio 1990 nia paginta membraro estis:

NT	02	
NSW	53	plus 8 \$5-familiaj membroj (la sumo inkl. ACT)
Vic	46	plus 7 \$5-familiaj membroj
QLD	34	plus 6 \$5-familiaj membroj
SA	08	plus 2 \$5-familiaj membroj
WA	25	plus 5 \$5-familiaj membroj
Tas	07	plus 2 \$5-familiaj membroj
	+ 03	alilandaj membroj

 sume 178 plus 30 \$5-familiaj membroj

krome, 8 honoraj membroj ne pagintaj. (Pluraj honoraj membroj pagas la jarkotizon kaj estas kalkulitaj en la listo de pagintoj.) Dumvivaj membroj estas simile kalkulitaj inter pagintoj.

La ĉi-supraj nombroj inkluzivas ĉ.10 kiuj pagis nur ĝis la fino de junio 1990.

En la januara numero de 1989 mi skribis ke se la malkresko de AEA daŭros senŝanĝe, en la jaro 2000 ekzistos eĉ ne unu membro en AEA.

Ŝajne la aŭstralia esperantistaro intencas plenumi tiun averton, eble jam antaŭ la jaro 2000.

Kiom de la malkresko estas kaŭzita de la morto de membroj?

Kiom de la malkresko ŝuldiĝas al la manko de novaj, junaj membroj?

En nia maja numero 1990 nia nove establita junulara sekcio JAGE raportis ke ĝi havas ok membrojn.

Ĝis 1 junio 1990 la redaktoro informiĝis pri nur unu "ebla" estonta kandidato por la premio Einihovici. Ĝv. noti ke la premio ne estis aljuĝebla en 1989-1990 pro plena manko de kandidatoj!

KIAL ESPERANTO MORTADAS EN AŬSTRALIO?de **Brian Currie**

Mi ne metas ĉi tiun titolon en la formo "Ĉu Esperanto...?". Malfeliĉe la pruvo pri tiu mortado estas tre forta. La membro-nombroj de preskaŭ ĉiuj niaj organizaĵoj montras tion. Sed la plej konkreta, malĝojiga pruvo estas la konstanta malaperado, unu post alia, de niaj plej amataj kaj fidindaj gvidantoj.

Kaj kiam ili mortas, post longa kaj sindona servo al la lingvo kaj la movado, kiu anstataŭas ilin? Bedaŭrinde la respondo tro ofte estas: "neniu". Kluboĵoj malfortiĝas sen kuraĝaj kaj klarvidaj gvidantoj, perdas esperon kaj malaperas preskaŭ sen spuro. Kaj ĉiu kiu malaperas donas kredindecon al la ĝenerala komunuma opinio, ke Esperanto estas "bona ideo kiu malsukcesis".

Kie do estas la novaj homoj? Kial ni ne sukcesas allogi novan talenton al niaj idearo kaj movado? Ĉu nia idealo estas vere utopia, ne nur eksmoda sed en si mem nerealignebla? Tion mi ne volas kredi.

Mi menciuj malplaĉan biologian fakton. Ne, ne temas pri sekso, kvankam tio nerekte rilatas al mia temo! Mi aludas morton. La homo ne eterne vivas, nur dum relative mallonga tempo. Ĉiu daŭra trajto de la homa kulturo do dependas de tio, ĉu la kredantoj pri la valoro kaj neceso de tiu trajto sukcesadas allogi aliajn, kiuj transprenos la penon necesan por konservi, plibonigi kaj mem transdoni ĝin, post la morto de la antaŭuloj.

La tempo longe forpasis, kiam oni esperis ke Esperanto sturmos la mondon. La lukto por la ĝenerala enkonduko de Esperanto kiel universala dua lingvo estos longa kaj malfacile, historia en pli ol unu senco. Por tio ni bezonas ne nur kultivi nian tradicion, sed la prizorgantoj de tiu tradicio devas konkrete reprodukti sin, en la formo de novaj varbintoj.

Mi volas skribi pli detale pri kelkaj daŭraj ecoj de la aŭstralia Esperanto-movado, kiujn mi opinias koncernaj al mia temo.

E m e r i t i s m o

Naturo ŝajne ne intencis, ke junaj kaj maljunaj homoj multe ĝuos kaj

elserĉos la kompanecon unuj de la aliaj. Se maljunuloj ne multe ŝatas la ĉeeston de gejunuloj, tiuj bruaj, malrespektemaj, seks-obsedataj estaĵoj, la sento en la inversa direkto estas eĉ pli forta. La maljunaj reprezentas por tiuj ne nur fremdan kulturon, sed aŭtoritaton al kiu estas necese defii, por ne perfidi la propran memrespekton. La malnova generacio ankaŭ devas certagrade porti la kulpon pro la (ni konfesu) ne tre plaĉa stato de la mondo, kiun la junaj heredas.

Evoluis en Aŭstralio tiu stato, ke la movado pli kaj pli orientiĝis al la maljunaj. Oni provas pravigi tion, dirante ke la emeritoj havas monon, havas liberon, povas vojaĝi eksterlanden do havas entuziasmon, havas energion, havas sanon. Ĉu tiuj ne estas egale valoraj faktoroj?

Instruado ofte okazas nur en institucioj, kies celo estas instrui diversajn malgravajn sciojn al emeritoj, kiuj sentas mankon de okupo post longa vivo da laboro. Ankaŭ tiuj kiuj instruas mem ofte sentas sin pli ĉeĥejme en tiaj lokoj, ol en aliaj.

Mi devas esti iom brutala. Homo kiu lernis lingvon povas praktiki ĝin ĝis sia morto. Sed kaze de emerito, kiu lernas en maljunaĝo, tiu tempo estas relative ne longa. Male, junulo havas la tutan vivon por aktive praktiki, por fakte fari ion per la lingvo. Certe ne ĉiuj faras tion daŭre, multaj perdas intereson aŭ malhavas oportunojn, sed statistike la efiko devas esti reala kaj grava.

L e r n i s m o

Ĉu Esperanto estas tiel malfacila lingvo, ke oni bezonas lerni ĝin dum dek, dudek, tridek jaroj? Ni propagandas ke ĝi estas facila lingvo. Kial do ni aranĝas tiom da kunvenoj, kies celo estas nur lerni, lerni, eterne lerni? Ĉu ne eblas finlerni la aferon? Oni povas cinike diri, ke tio rilatas al la supra punkto. Kun granda aĝo ofte alvenas forgesemo. Do oni daŭre lernadas, sed ankaŭ (aŭ egale rapide) forgesadas.

Kaj kiam oni estas finlerninta la lingvon, kion oni faros per ĝi? Ĉu la celo de Esperanto estas nur tio, ke ni parolu ĝin dum klubvesperoj? Devas esti iu reala, praktika uzo por lingvo, alie ĝi restas nur teoria, abstrakta, intelekta afero, kaj ne vere vivanta

lingvo.

K r o k o d i l i s m o

Se Esperanto estas tiel facila, bela kaj logika lingvo, kial ni ne uzas ĝin inter ni? Bone, iam ni bezonas preparoli fakajn temojn, por kiuj la terminaro kaj esprimaro ne estas tre bone sciataj de ni, aŭ estas fakte subevoluintaj en la lingvo. Eĉ povas esti laŭleĝa postulo, ke foje oni parolu la nacian lingvon. Sed ni certe ne bezonas nian gepatran lingvon por babiladi pri simplaj, komunaj aferoj, kiaj la vetero kaj la laboro.

Oni respondos, ke ni ne povas paroli esperante, ĉar "la komencantoj ne komprenos". Sed se ni parolos angle inter ni, kion ili fakte komprenos? Ili pensos, ke ni ne estas sinceraj; ke fakte ne eblas interkompreniĝi per ĉi tiu lingvo; ke ni estas mallaboremaj. Ili volas kaj bezonas aŭdi la lingvon uzatan, por decidi ĉu ĝi plaĉas al ili sufiĉe, por ke ili faru la laboron necesan por akiri ĝin.

Varianto de ĉi tio estas la "vort-faligado". Oni parolas esperante ĝis la punkto, kie alvenas en la kapon angla vorto, por kiu oni momente forgesis la esperantan ekvivalenton. Anstataŭ cerbumi kaj trovi alian, konatan kaj eble simile bonan vorton, oni simple diras la anglan vorton kaj atendas, ke iu alia provizos ĝustan tradukon. La efiko estas, ke la sinsekvo de pensoj de la aŭskultantoj rompiĝas, pro la trudita angla vorto. Kaj kio okazas kiam oni vere devas paroli al homo, kiu ne scias la anglan lingvon kaj sekve ne povas traduki ĝin?

Eĉ en kursoj por progresintoj oni kutimas diskuti angle. Ĉu tio estas vere necesa? Ĉu mankas la esperantaj vortoj por esprimi lingvajn faktojn? Mi scias ke ne. La plej grava bezono por akiri lingvon estas la praktikado de tiu lingvo, kaj ofte la kurso estas la nura loko kie la lernanto povas praktiki ĝin. Mi ne opinias ke ĉia instruado devas esti per la rekta metodo; tio eĉ ne taŭgas por ĉiu lernanto. Sed en kursoj por progresintoj, instruado en Esperanto devas esti la normo.

R e s u m o

Por varbi novajn junajn membrojn, estas necese atenti pri la etoso kiun ni elmontras. Se gejunuloj ne sentas sin bone en esperanta medio, ili ĉesos alvenadi kaj la laboron kiun ni faris por unue allogi ilin

estos malŝparita. Tro da emfazo pri lernado, sen sciigo pri praktikaj uzeblecoj por la lingvo akirata, ankaŭ estas detrua. Kaj se tiuj kiuj kapablas interkompreniĝi esperante fakte ne faradas tion, sed preferas babili nacilingve, tio faras impreson hipokritan kaj malhonestan. ☹

PRI RETROKOMENTE

Komencante la ĉisupran rubrikon mi celis rubrikon similan al "Back-chat" de la A.B.C., en kiu povos aperi necenzurite mallaŭdoj kaj plendoj same kiel laŭdoj por kuraĝigi la aŭstralian esperantistaron ekzameni sin.

Sub tiu rubriko en la maja numero, p20, aperis komentoj kiuj senintence estis ofendaj. Mi deziras pardonon peti de la kritikito pro la ofendo, nome de The Australian Esperantist. Ankaŭ menciendas ke la kritikitaj Ŝvarcecaj Analoj kaj la diversaj artikoloj de Ralph Harry estas de multaj legantoj laŭditaj. - La Redaktoro. ☹

PRI NIA GAZETO

Oni petis min mallonge klarigi kiel mi pretigas The Australian Esperantist, kaj ĉu eblas alsendi tekstojn sur komputildiskoj por faciligi la kompostadon.

Mi mem kompostas la tekstojn de la gazeto, uzante por tio "vortkomputilon" (angle: dedicated word processor) = komputilo tiel konstruita ke ĝi aŭtomate funkcias por pretigi tekstojn sen neceso uzi apartan programon. La valoro de tia maŝino estas ke oni povas per ĝi simple kaj rapide manipuli la tekstojn, kaj kelkrilate fari manipulojn kiujn kutime kapablas fari nur tre multekosta komputil-programo.

Kompostinte la tekstojn, mi printas ilin, kaj fotoofset-firmo SNAP presas la bezonatan kvanton da ekzempleroj.

La komputilo uzata de mi estas Brother CE-1050, kies printilo uzas "lekantet-radon". La literstilo uzata por ĉi tiu gazeto estas kutime Quadro 15, kun literstilo Prestiĝ-kursiva 10 por titoloj de artikoloj. La diskoj uzataj ne estas kompatibilaj kun diskoj preparitaj per alitipaj maŝinoj (IBM, Apple, kc.) - La Redaktoro.

LA BOFILO

afrika popolrakonto

tr. **Bernard Golden**

Maljunulo havis nur unu filinon, Sangba, kiu estis tre bela kaj tre dezirata de ĉiuj viroj. Sed, kiam ĉiu amindumanto venis peti ŝin, la patro postulis, ke tiu, kiu volas havi Sangba kiel edzinon devas unue porti al li vivantan cervon. Kelkaj el la junaj viroj tuj senkuraĝiĝis kaj forkuris. Aliaj, kvankam ili estis bonaj ĉasistoj kaj rapidaj kurantoj, provis kapti vivantan cervon sed malsukcesis. Do ankaŭ ili ĉesigis sian amindumon kaj foriris.

Iun tagon du junaj viroj venis de malproksima vilaĝo. Ili estis amikoj. Ili diris: "Ni venis al la maljunulo, kiu havas la filinon Sangba".

La maljunulo elvenis el la domo kaj salutis la du vizitantojn. "Mi estas la patro de Sangba. Kion vi deziras?" Njila, unu el la junuloj, parolis: "Mi venis peti de vi vian filinon, kiun mi deziras edzinigi." Kaj la alia juna viro, Sefu, diris, ke ankaŭ li venis por Sangba.

Tiam ŝia patro diris: "Estas nur unu Sangba. Vi estas du, kiuj petas ŝin. Mi havas nur unu filinon, kaj vi estas du. Al tiu el vi, kiu portos al mi vivantan cervon, mi donos mian filinon."

La du junaj viroj tiam preparis sin por kapti vivantan cervon. Ili eniris la arbaron kaj silente, silente ĉirkaŭrigardis por trovi spurojn kaj finfine ili trafis cervon. Ili tuj iris ĉasi ĝin, kurante rapide por sekvi la beston.

Sefu, ne tiel rapida kiel Njila, baldaŭ postrestis kaj, subigite de laceco, sidiĝis sub arbo, dirante: "Mi finis. Mi jam ne kuros por kapti vivantan cervon por iu virino. Kial mi suferu tian elĉerpiĝon kaj detruu min por Sangba? Estas aliaj virinoj, kiujn oni povas edzinigi pli facile. Ĉiuokaze, kiaspeca amindumo estas tiu ĉi por vivanta cervo? Mi neniam aŭdis pri tiaĵo antaŭe. Tie ĉi mi sidos kaj atendos Njila, por ke ni reiru kune." Tiam li dormis.

Kiam Sefu vekiĝis, li vidis sian amikon alproksimiĝanta, portanta ligitan vivantan cervon sur sia dorso. Njila jubilis: "Jen la viv-

anta cervo por la maljunulo. Mi kaptis ĝin, ĉar Sangba multege plaĉas al mi. Prefere ol perdi ŝin, mi dormus en la arbaro kaj provus refoje morgaŭ, ĝis la cervo estos kaptita."

Tiam ili iris kune al la vilaĝo de la junulino kaj prezentis la cervon al ŝia patro. Tiu ĉi ordonis, ke oni mortigu la cervon kaj kuiru ĝin, por ke la junuloj manĝu ĝin, dirante "Gardu la cervon, amikoj. Bonvolu manĝi ĝin. Poste ni pritraktos la aferon de la edzinigo de mia filino."

Kiam ili firmanĝis, la maljunulo kunvokis la Konsilantaron de Oldul-Li alparolis ilin jene: "Vi ĉiuj scias, ke mi havas nur unu idon, Sangba, mian filinon, kiu estas pli kara al mi ol mi mem, kaj pro tio mi bezonas bofilon, kiu estas bona viro kun milda koro. Tiuj ĉi junuloj venis al mi kaj petis de mi mian filinon, kaj mi diris, ke kiu deziras ŝin, devas porti al mi vivantan cervon. Nu, ili faris tion, kaj denove kune, ili portis la cervon. Sed el la du, nur unu kaptis cervon. Kial ne revenis la alia kun cervo? Olduloj de mia vilaĝo, mi lasas la la aferon kun vi. Devas esti kvazaŭ mia filino estus via. Elektu, do, bofilon inter tiuj ĉi du viroj."

La olduloj pridemandis la junulojn: "Vi venis kune, kaj ambaŭ petis Sangba. Nur unu el vi portis cervon. Kial ne la alia?"

Njila parolis la unua, dirante: "Ni iris en la arbaron kaj sekvis la cervon, kien ĝi fuĝis. Sefu, mia kunulo, rezignis la ĉasadon, sed mi estis tiel sorĉita de la beleco de Sangba, ke mi sekvis la cervon ĝis mi kaptis ĝin. Mi ligis ĝin kaj portis ĝin reen, renkontiĝante kun mia amiko en la loko, kie li laciĝis. Li venis kun mi nur por akompani min."

Poste Sefu parolis: "Mi neniam aŭdis pri amindumo al junulino per vivanta cervo. Tamen, mi iris kun mia amiko por serĉi cervon kaj eble kapti ĝin. Sed estis tiom da kurado tra la arbaro, ke mi komencis laciĝi kaj pensis, ke ne estas tiel granda bezono kuri por riski mian vivon. Virinoj estas abundaj, kaj la plejmulto estas pli facile akirebla ol Sangba. Do mi sidiĝis por atendi Njila por reiri. Mi vidis lin reveni kun la cervo, kaj mi venis tien ĉi nur por akompani lin. Mi ne venis por refoje peti vian filinon."

La Konsilantaro de Olduloj interkonsiliĝis kaj fine diris: "Vi,

Sefu, kiu rezignis la ĉasadon de la cervo, vi estos nia bofilo. Njila kaptis la cervon kaj estis tre kuraĝa viro. Se li dezirus mortigi, li haltus antaŭ nenio, ĝis li plenumos sian deziron. Li ne atentus iun, kiu riproĉus aŭ donus konsilon. Se ni donus al li nian filinon, kaj ŝi farus malbonon, li batus ŝin kaj ne aŭskultus iun, kiu pledos por ŝi. Ni ne deziras lin kiel bofilon. Sed Sefu estos nia bofilo, ĉar li aŭskultus nin. Se li estus punonta nian filinon pro iu misago, li atentus nin, kiam ni venos paciĝi lin. Kvankam lia kolero estus granda, ĝi ĉesus. Li estos nia bona kaj milda bofilo." ☐

o-o-o

KORESPONDI DEZIRAS

Werner Heidler
Am Seeufer 3
3034 Magdeburg
Orienta Germanio

"Mi interesiĝas tre forte pri Aŭstralio kaj la aŭstraliaj homoj kaj via vivo. Mi laboras en fabrikakademio kiel vicdirektoro, do kiel instruisto, havas 42 jarojn, estas edziĝinta kaj havas filon 15-jaraĝan. Mi interesiĝas pri politikoj, filozofio, turismo, muziko, libroj kaj kompreneble Esperanto.

R.S.S. de Lettonie
229700 Liepajd-1
Brivibas 75-18
USSR

Samideano Andris Gurtijs ĉe la ĉi-supra adreso estas 38-jara invalido, kies fako estas la germana lingvo kaj kiu amas literaturon.

Se vi volas scii tuje kaj rekte el orienta Eŭropo pri kio okazas tie, kiel pli bone ol per korespondado? - La Red.

PROVU VIAN VORTOSCION

1. Ĉu o f e r i estas
 - (a) proponi ion
 - (b) mortigi beston, kiel donacon al Dio
 - (c) transirigi personon per negranda boato
 - (ĉ) nomo de klasika opero de Verdi

2. kiu vorto mankas en la sekvanta frazo: "mi ... alvenintis, kiam li komencis prelegi"?
 - (a) ĝuste
 - (b) plu
 - (c) ĵus

3. kiu vorto mankas? "Vi estas ... "
 - (a) korekta
 - (b) prava
 - (c) ĝusta
 - (ĉ) vera

4. Ĉu j u s t a signifas
 - (a) respektanta ies rajtojn
 - (b) senerara
 - (c) lastatempe
 - (ĉ) havanta la rangon de ĉefjuĝisto

5. Ĉu *k o o p e r i estas
 - (a) kunlabori
 - (b) partopreni en kooperativo
 - (c) enkaŝigi gekokojn
 - (ĉ) konfesi al policisto krimon

6. Ĉu l a p i s o signifas
 - (a) arĝenta nitrato uzata por kaŭterizi
 - (b) bela blua juvelŝtono
 - (c) parto de la korpo de sidanto, sur kiu sidas bebo aŭ infano
 - (ĉ) ŝtofo kovranta plankon en domo

7. Ĉu a t e n d i signifas
 - (a) resti ĝis iu venos
 - (b) partopreni

(c) helpi prizorgi malsanulon

(ĉ) anticipi senespere

8. Ĉu a k o r d o signifas

(a) kombino de muziknotoj

(b) ligilo

(c) ĝustigo de muzikinstrumento

(ĉ) fadeno kies vibrado sonigas noton, ĉe violono

9. Ĉu p i p e q o signifas

(a) tre granda fumilo

(b) granda tubo, tra kiu fluas akvo

(c) laŭta birdbleko

(ĉ) muziksonanta tubo, parto de orgeno.

10. Ĉu f a b r i k o signifas

(a) ŝtofo, el kiu oni faras vestaĵon

(b) konstruado de vendotaĵoj

(c) konstruejo de uzotaĵoj

(ĉ) antikva romia ofico, poste titolo

11. Ĉu a k c e n t o estas

(a) la parolmaniero de iu popolo

(b) signo super litero

(c) plifortigo de la voĉo kiam oni prononcas silabon

(ĉ) granda birdo trovebla en Sudameriko

12. Ĉu *f a t r a s o estas

(a) aro da senvaloraĵoj

(b) tre grasa homo

(c) matraco el ŝaŭmkaŭĉuko

(ĉ) araba dancistino

13. Ĉu *g l a c o estas

(a) mola, malvarmega manĝaĵo, kiun infanoj avide manĝas

(b) glaciomaso kovranta la sudan poluson

(c) vitro formanta fenestron por rigardi vendaĵon

(ĉ) aparato por per varmego glatigi vestaĵon

*neoficiala vorto

respondoj sur paĝo 27

kompilita de Donald Broadribb

KOINCIDO PRIPENSINDA?

de Miĥaelo Hajlero

La vesperon de vendredo, la 22a de oktobro 1976, mia amiko Robert Holdsworth kaj mi marŝis en la Centran Stacidomon de Sidnejo por aĉeti bileton por la trajno Cocma Mail de tiu nokto. Ni estis survoje al Bombala por observi la totalan eklipson de la suno.

Ial totalaj sunaj eklipsoj ŝajnas maloftaj en Aŭstralio. Tia eklipso okazis du jarojn pli frue, en junio 1974, sed tio estis videbla nur en la plej suda pinto de Okcidenta Aŭstralio kaj, kvankam mi planis iri vidi ĝin, mi malsukcesis fari tion. Antaŭ 1974 la lasta totala eklipso estis en 1922, longe antaŭ ol la plejparto de ni naskiĝis. La venonta ne okazos ĝis 2002.

La eklipso en 1976 estis bona pro paro da kialoj. Ne nur ke ĝi estis oportuna por homoj en sudorienta Aŭstralio, sed la ombrokonuso de la luno estis sufiĉe larĝa (103 mejloj), kio rezultigis totalan daŭron dum preskaŭ tri minutoj, kio estas nekutime longa por eklipso en la mezaj latitudoj. Ĝi estis speciale bona en Melburno, kiu situis ĝuste en la vojo de la totalo. Ho ve! Mi loĝis en Sidnejo, do mi devis vojaĝi kvincent kilometrojn al Bombala, rekomendita kiel la plej bona loko. Sopirinte mian tutan vivon vidi totalan eklipson de la suno, mi estis kompreneble iom maltrankvila, timante ke io malhelpos min atingi Bombalan akurate por la eklipso, kiu okazos malfrue en la posttagmezo de sabato, la 23a de oktobro. Ja tiun vesperon, dum ni piediris en la stacidomon, mi estis frapita de severa atako de "ufifobio"* (malsano ĝis nun ne rekonita de psikiatroj, havanta kiel simptomon la malracian timon ke onia plano renkontos nesupereblan obstrukcon).

Ĉu tiu ufifobio estis efektive antaŭsento je io okazonta al ni tiun nokton? Aŭ ĉu, pli ĝuste, ĝi estis nur atako fare de mia normala paranojo? Mi ne povas decidi. Mi nur povas rakonti tion, kio okazis. La unua frapo batis dum Robert kaj mi staris en vico por aĉeti niajn biletojn, kiam la biletvendisto diris al la viro ĝuste antaŭ ni: "La lokomotivo detrakiĝis".

*"Ufifobio" venas el la grekaj terminoj ufi = ne plus -fobio. (Efektive temas pri ne malkutima formo de angoro, familiara en la psikopatologio. Tamen la aŭtoro pravas ke ĝis nun ne ekzistas - laŭ mia scio - nomo por ĝi. La proponita termino ŝajnas akceptinda. - La Red.)

"Bele," mi pensis, "ĝuste figlore! Do estas dereliĝo ie laŭ la linio." Nun mi havis gravajn dubojn pri nia akurata atingo al Bombala. Mia koro sinkis kiel ŝtono.

Kiam la viro estis aĉetinta sian biletan, Robert demandis lin, kien li iras. "Goulburn" estis la respondo.

Mia koro sinkis pli. Mi timis demandi lin aŭ la biletvendiston pri la afero, sed Robert kaj mi aĉetis biletojn al Cooma, kaj nenio pli estis dirita pri iu ajn dereliĝo. Poste, ni entrajniĝis.

Ĉe la alia flanko de la kajo staris la melburn-rapidtrajno, la Spirit of Progress. Ni rigardis ĝin elirantan je 8:45. Ni ekiris je 8:50, kvin minutojn malfrue. Kvankam mi ne sciis tiam, la Spirit estis duonhoron malfrua.

Estis malrapida veturo el Sidnejo, pli malrapida ol kutime. Ni haltis dum tre longa tempo ĉe Regents Park kaj Campbelltown. La dereliĝo estis en mia menso konstante. Ĉe Campbelltown la pasaĝeroj en la apuda kupeo aŭdis stacidoman oficiston diri al la istaro de nia trajno ke oni atentu lumojn (aŭ ion) laŭ la trako. Mi sciigis pri tio nur poste, kiam ni komparis niajn notojn.

Kiam ni jam estis preter Picton, ĉio ŝajnis bona. La trajno kuregis antaŭen kun granda rapido, kaj, ĉar Robert kaj mi bonŝance havis la kupeon solaj, ni malŝaltis la lumojn kaj streĉiĝis sur la seĝoj. Mia maltrankviliĝo ĝis nun pri dereliĝo velkis en mia menso, kvankam Robert samtempe opiniis, ke, se ni estos obstrukcitaj de dereliĝo, ĉi tiu regiono inter Picton kaj Mittagong estas bona loko por tio, ĉar estis deflankiĝa trako iranta tra Thirlmere. Tiu deflankiĝa trako estis lastatempe fermita de la Komisiono por Publika Transportado, kaj estis nun uzata de la Muzeo pri Perrela Transporto por kurigi siajn malnovajn vaportrajnojn.

Poste, ĝuste kiam ni estis lulitaj en dormon, la bremsa ekfunkciis kaj la trajno haltis. Kvankam ni ne efektive glitis halten pro ŝlositaj radoj, estis tute klare, ke ni haltis malkutime rapide. Mi elmetis la kapon tra la fenestroaperturon. Preskaŭ tuj la trajno reekiris, sed tre malrapide. Kaj estis laŭta eksplodo, kiam la lokomotivo kuris trans la unuan de serio da kraksignaloj. Malrapide ni sekvis S-kurbon kaj ekvidis alian trajnon antaŭ ni. Unue mi supozis, ke ĝi devas esti la mal-

RALPH LINDSAY HARRY, LLD

Citation read by Professor David Green
University of Tasmania, 12 February 1990

In that part of his will establishing the Rhodes Scholarships, Cecil Rhodes expressed the hope that a Rhodes Scholar would come to "esteem the performance of public duties as his highest aim".

Mr Rhodes' prescriptions have not been lost on Rhodes Scholar Ralph Harry, whose whole career has been a dedication to public duty culminating in his holding a number of senior posts in the Department of External Affairs.

Mr Harry's early education was at Launceston Church of England Grammar School. He then moved to the University of Tasmania, where he graduated Bachelor of Laws in 1938, and was selected as the Tasmanian Rhodes Scholar for that year. Proceeding to Lincoln College, Oxford, he graduated BA in Jurisprudence in 1940. He then joined the Australian Department of External Affairs, where, apart from a break during the Second World War, when he served as a lieutenant in the AIF, he was to serve the Australian government continuously until his retirement in 1978. During that long period he held a number of senior and sensitive posts, including Ambassador and Permanent Representative to the United Nations, Ambassador to Belgium and the European Economic Community, First Assistant Secretary of the Department of External Affairs, Ambassador to the Republic of South Vietnam, and Ambassador to the Federal Republic of Germany. He was on temporary secondment to the Department of Defence between 1957 and 1959, and served for a period as First Assistant Secretary of that Department. Just prior to his retirement he served as President of the Preparatory Committee for the eighth special session of the United Nations. During all that time he has displayed an unusual insight into the way close links between academia and government can help both - and, in the process, enliven many a dinner table.

In Who's Who, Mr Harry lists as his recreations golf and Esperanto. If his dedication to golf equals his support for Esperanto, then he must be a very good player indeed as he has been a keen and expert proponent of Esperanto for much of his life, having seen the advantage of an international language very early in his diplomatic career; he has served as president of the Esperanto Association of Aus-

tralia. None of which has prevented him from gaining a most eloquent command of that other international language - English!

During his extensive and busy career, Mr Harry has found time to write a long list of articles, reviews and chapters of books. Indeed his extensive list of publications reads more like an academic's than a working public servant's. His publications have covered topics as diverse as the life of Ghandi, International Law in Australia, The Law of the Sea and Antarctica, R.G. Menzies as Foreign Minister and even a book on bridge terminology in five languages. His publications include articles in English, French, Japanese and Esperanto.

Mr Harry's retirement from the Department of External Affairs in 1978 did not mean he stopped work. If anything he seems to have been even more active in his retirement, serving as Director of the Australian Institute of International Affairs, a member of the National Australia Day Committee and Visiting Fellow in the University of Tasmania in 1979. The latter appointment was a gracious gesture to his alma mater, returning to our University some of the knowledge and expertise he had gained over a lifetime of experience at the senior levels of the public service.

Mr Harry became an Officer of the Order of the British Empire in 1960, a Commander in the same order in 1963 and a Companion of the Order of Australia in 1980.

It would be appropriate, Mr Chancellor, to add to these accolades a special tribute from the University of Tasmania, of which Mr Harry is one of the most illustrious graduates, in recognition of his outstanding service to Australia, the world diplomatic community, and to international understanding.

Mr Chancellor, I present to you Ralph Lindsay Harry for admission to the degree of Doctor of Laws honoris causa.

O-O-O

CORRECTION

In our March issue we incorrectly stated that this year's International Esperanto Congress in Cuba is the fourth to be held in the New World. It will in fact be the sixth: U.S.A. 1910, 1915, 1972; Brazil 1981; and Canada, 1984 were the previous New World venues.

SUMMER SCHOOL IN ADELAIDE 7-19 JANUARY 1991report by **Max Wearing**

Arrangements are under way for another Australian Esperanto Summer School in Adelaide from Monday 7th to Saturday 19th January, 1991, with core tutors working at three different levels for three hours each weekday. In addition, there will be a number of 1-hour or 2-hour electives for four afternoons per week and a program of entertaining evening and weekend activities.

For the 1989 Summer School the beginners' class (mostly from Adelaide) was organised a little apart from the general school, with students paying tuition fees through the Adelaide College of TAFE, which in turn paid the tutor, Vera Payne, at its usual award rate. (Vera also gave another course free of charge within the school proper). These were the same conditions that had been set up for two earlier Adelaide TAFE courses taught by Trevor Steele: the tutor was billeted free of charge by an Adelaide Esperantist, and the fee paid by TAFE to the tutor was sufficient to cover the return air fare (from Brisbane or Perth).

Because of the success of the 1989 arrangement, the SA Esperanto Society's Executive Committee decided to try and do the same for all three core tutors in the 1991 summer school. They will be paid through the Adelaide University's Office of Continuing Education, which will also handle enrolments and collect fees.

The SAES Committee felt that it was expecting too much of tutors to hope that they would travel the long distances, work long hours, and also pay for their own travel and accommodation. Ideally, of course, summer schools should pay a fee to all tutors in addition to full board and travel costs; but the Esperanto studying population in Australia is not yet large enough to support that ideal. Meanwhile, we hope there will be sufficient support for this "half-way" arrangement for 1991.

The organisers feel that the core tutors they have engaged under these conditions for 1991 (viz., Vera Payne, Marcel Leereveld and Donald Broadribb) are of a standard that would be acceptable for Esperanto schools anywhere in the world. All three will be teaching at more than one level - either in the core or in one or more electives, which (like other volunteers) they will offer free of charge.

The precise details of electives have not yet been finalised, but some are quite novel; e.g. Dr Broadribb is offering an elective (in Esperanto) of dream analysis. The full program should be available before the next number of The Australian Esperantist.

The 1989 Summer School indicated that quite a large proportion of Australian Esperantists are at an advanced level that calls for tutors with a high level of Esperanto scholarship and teaching skill. If the response to 1991's school is good, perhaps we may arrange at some time in the future for the inclusion of at least one highly qualified tutor from overseas. Meanwhile we feel that the 1991 standard might well attract at least some overseas students, and have therefore announced the school in Esperanto, Heroldo and the brochures of Monda Turismo, and will send enrolment forms to a selection of overseas Esperanto organisations.

Excursions: At least one out-of-town excursion will be offered for the weekend of 12-13 January, and a post-school excursion for two or three days to Kangaroo Island.

Meetings of national organisations: As in 1989 no classes are proposed for Wednesday afternoons. Perhaps national organisations will take advantage of this gap in the timetable for calling meetings. JAGE, the recently formed Australian Esperanto youth group, has already indicated that it will hold an AGM during the school. It is also quite customary for oral examination candidates to present themselves to examiners during the summer school.

Accommodation: University college accommodation has been booked as in previous years. A minimum of 25 bookings will ensure a price between \$40 and \$45 per day for single rooms and all meals, morning and afternoon teas and teaching accommodation. An Adelaide member of JAGE has offered to seek even cheaper accommodation (e.g., in not-too-distant hostels) for full-time interstate students who could simply not afford accommodation in the college.

More precise and detailed information will be circulated with enrolment forms. □

.....

The Ray Martin Middy show on July 2 included an interview with AEA vice-president Justice Kep Enderby. The presentation was excellent.

antaŭo de la Spirit of Progress, sed, kiam ni alproksimiĝis, mi konstatis, ke mi rigardas la lokomotivon de vartrajno sur la nordcelanta trako.

"Do!" mi pensis. "Ĉi tiu estas la atendita dereliĝo." Sed kiel la Spirit of Progress preteriris? Ĉu ĝin oni revoĝigis tra Thirlmere? Se jes, kial ne nian? Mi memoris la vortojn de la biletisto: "La lokomotivo detrakiĝis". Mi zorgatente rigardis la lokomotivon, sed mi baldaŭ trovis, ke ĝi ne estis detrakiĝinta. Iomete pli antaŭe ni haltis, kaj nun mi vidis tri detrakiĝintajn ŝarĝvagonojn - unu kuŝis sur sia flanko obstrukcon farante ĉe ambaŭ trakoj.

Mia koro plonĝegis pli. Certe, mi atendis, ke ni tial devos halti, sed la efektiviĝo de tio estis tamen plia frapo. Kelkaj fervojdungitoj venis laŭ la trako proklamante tion, kio estis jam evidenta: tri vagonoj dereliĝis kaj nia situacio estis fiksita.

Ni elvagiĝis kaj vagis antaŭen por pli proksima rigardo. Ni estis nur kelkcent metrojn for de la stacidomo de Yerrinbool. Konstante enigmis: kial la Spirit of Progress ne bezonis atendi same kiel ni?

La mistero estis solvita kiam mi parolis kun nia lokomotivisto. La Spirit of Progress ne estis blokita pro la simpla kialo, ke kiam ĝi veturis ĉi tie, la akcidento ankoraŭ ne okazis! La vagonoj delasis la traikon nur d e k ĝ i s d e k k v i n minutojn antaŭ ol ni alvenis. La ŝarĝtrajnanaro havis nur sufiĉe da tempo por kuŝigi kraksignalojn laŭlonge de la trako ĉirkaŭ la kurbon. Sed ĉar estis longa rekta etendaĵo antaŭ tiu kurbo, nia veturigisto haltigis la trajnon jam vidante la signallampon de la alia.

Sed kio pri la dereliĝo, pri kiu ni aŭdis jam antaŭe en Sidnejo, horojn antaŭ ol ĉi tio okazis? Oni informis, ke temis pri la lokomotivo de la Spirit of Progress, kiu dereliĝis dum manovro inter la kajoj ĉe la Centra Stacidomo. Oni devis venigi alian lokomotivon, tial la foriro de la Spirit of Progress estis prokrastita duonhoron.

Tiu klarigo lasis min kun eĉ pli profunda mistero. Ni estis antaŭavertitaj, ke ni estos haltigitaj de dereliĝo kelkajn horojn antaŭ ol la akcidento okazis. Kompreneble, se mi havis nur tian antaŭsenton, aŭ profetan sonĝon pri ĝi, aŭ ion tian, ne estus mistero. Sed ne estis tiel, ĉar okazis nenio supernatura nek parapsikologia. Nia avertiĝo estis

bazita sur pure fizika okazo: miskompreno de kelkaj klare parolitaj vortoj. Ni atingis veron per malĝusta kialo; ni pravis pro malpraveco.

Nu, efektive Robert pravis kredante, ke ni estas sur la plej bona sekcio por esti haltigita de dereliĝo. Ni devis nur atendi ĝis lokomotivo venis de Campbelltown kaj trenis nin malantaŭen al Picton, de kie ni sekvis la deflankiĝantan trakon al Mittagong. La deflankiĝinta trako estis tre malglata plurloke, do ni devis iri malrapide. Ni atingis Cooman je la deka, la sekvintan matenon, ĝuste kvar horon malfrue sed ankoraŭ sufiĉatempe por atingi Bombalan kaj vidi la eklipson, kiu tamen estis difektita de nuboj. Sed tio ne rilatas al ĉi tiu rakonto.

Supozu, ke la lokomotivo de la Spirit of Progress ne estus detrakiĝinta kaj ni akurate ekveturis. Memoru: ni malfruis je kvin minutoj, kiam ni eliris el Sidnejo, kaj ni estis dek minutojn malfruaj ĉe Bargo, la lasta stacidomo ĉe kiu ni haltis antaŭ ol atingi la akcidentlokon dek ĝis dek kvin minutojn post kiam la vagonoj saltis de la trako. Eblus ke ni kolizius kun la akcidentinta trajno je tre granda rapido. Kunpasaĝero kalkulis, ke ni povus esti haltintaj sufiĉatempe eĉ sen avertaj lumoj aŭ kraksignaloj, sed mi ne estas tiel certa. Supozu, ke la du trajnoj estis preterpasantaj unu la alian ĝuste kiam la vagonoj dereliĝis. Neverŝajne? Jes, sed ne tiel malverŝajne, kiel nia efektiva stranga travivaĵo.

Jarojn poste mi trafis nomon por ĉi tiu vere stranga fenomeno: sinkroneco.* Atentigis min pri tio artikolo de Rudy Rucker en la februara 1985 numero de Science. Ŝajnas, ke kontraŭe al la statistikaj leĝoj pri ŝancaj eventoj tamen okazas signifoplenaj hazardaj koincid-oj. Jung sugestis la koncepton de sinkroneco en 1930. Serĉante sciencan fundamenton, li laboris kun la fizikisto Wolfgang Pauli, fama pro sia ekskluzivada principo en kvantummeĥaniko. En 1952 Jung skribis: "Sinkroneco estas ne pli enigma aŭ mistera ol la diskontinuecoj en fiziko. Nur malcedema konvinkiteco pri la tutpotenca principo de kaŭz-ado respondecas por la malfacilo kompreni, kaj ke ŝajnu nepenseble, ke senkaŭzaj eventoj okazas aŭ povus okazi."** T.e. sinkronaĵoj ne

(*Germane, "Synchronizität", angle "Synchronicity". **El "Synchronizität als Princip akausalzer Zusammenhänge", alineo 957 en vol. 8 de Gesammelte Werke de C.G. Jung, volumo titolita Die Dynamik des Unbewussten. = Alineo 967 de la angla eldono. -La Red.)

estas pli absurdaj ol la senkaŭzaj kaj ne prognozeblaj transiroj de materio de unu kvantuma stato al alia.

Sinkroneco en fikcia verko aŭ filmo, ekz. ke juna Elliott kisas knabinon en klaso samtempe kiam E.T. rigardas amscenon per televido, estas facile klarigita kiel elpenaĵo de la direktoro de la filmo, Steven Spielberg. Tio sugestas, ke tiaj cirkonstancoj en la vera mondo povas simile esti klarigitaj nur per fortoj aŭ ordo ekster niaj spaco kaj tempo.

En la mondo de kvantuma fiziko vere enigma ekzemplo de sinkroneco estas ke du fotonoj rapidantaj disdirekten tamen tuje influas unu la alian. Ŝajne temas pri nevalideco de relativeco, kiu malpermesas, ke signaloj moviĝu pli rapide ol lumo. (Vidu Other Worlds de Paul Davies, ĉapitron 6, "la naturo de realo".)

Do. Ĉu Dio (aŭ Iu aŭ Io) ekster nia spac-tempa mondo manipulas la ŝnurojn, fojfoje okazigante tiajn eksterordinarajn koincidojn, kiajn Robert kaj mi travivis tiun printempan nokton en 1976? Multaj homoj, ne nepre profunde religiaj, emas kredi je zorganta Dio, aŭ - malpli personigante - Providenco prizorganta nin, certiganta ke nin trafu neniu damaĝo ktp. Eble tio okazis tiun nokton. La dereliĝo ĉe la Centra Stacidomo malebligis, ke ni koliziu pro la dereliĝo ĉe Yerrinbool.

Domaĝe, tiaj rozaj klarigoj ne konformas kun la faktoj. Tiutempe la fervojoj de N.S.K. havis malbonegan historion de akcidentoj. Trajnroj ŝajnis veni sur la trakoj dekstre, maldekstre kaj centre. La dereliĝoj je la vespero de la 22a de oktobro 1976 estis nur du inter multaj en tiu epoko, kaj forte eklipsitaj de la plej malbona nur tri monatojn poste. Kie ja estis Dio aŭ Providenco matene de mardo, la 18a de januaro 1977 ĉe Granville? ☐

|Komento de la redaktoro: la ĉisupra temo estas multe priargumentata de filozofoj de la scienco. Jung-specialistoj atentigas ke laŭ Jung sinkroneco estas nomo por nekaŭzita koincido kiu tamen al ni ŝajnas signifo-plena. Se oni deklarus ke temas pri ago de Dio aŭ Providenco, la evento ja ne estus senkaŭza. Ĉu aŭ ne la priskribita evento en ĉi tiu artikolo estas valida ekzemplo de sinkroneco estas pridisputebla sed alloga penstemo. La nuntempe populara Ĥaos-teorio estas ankaŭ konsiderinda, apud kvantummeĥaniko kiel paralela koncepto komparebla kun sinkroneco. Komentojn kaj opiniojn de la legantoj ni volonte presigos. |

BULGARAJ POEZI-LIBROJrecenzas **Niĉjo Nicholas**Elektita Verkaro de Hristo Botev, 1986Tra la Ventego de Hristo Smirenski, 1986Kantoj de Motoroj de Nikola Vapcarov, 1987Milda Fifro Jam Eksonis, bulgara popola ampoezio, 1986.Gardu la Pacon! de Asen Grigorov, 1980.

La verkoj de Botev, Smirenski, kaj Vapcarov eld. Pres-Esperanta Asocio, Sofia; la "Milda Fifro" eld. Bulgara Esperanto-Asocio, Sofia. "Gardu la Pacon!" eld. la Hungara Esperanto Asocio, Budapeŝto. La libroj estas speciale mendendaj pere de la AEA-Libroservo.

Ni ofte fieras, ke per Esperanto eblas aliri la kulturojn de malpli-grandaj etnoj, kiujn oni malofte trovos tradukitaj en sian propran etnolingvon. Tio certe validas pri bulgara poezio. Do tiuj kvar poemaroj reprezentus unikan oportunun por ni sperti alilandan kulturon "de la fonto". Malfeliĉe, plena tia aprezo ne montriĝis ebla ĉi tie - almenaŭ ne ĉiukaze.

Malhazarde la tri poetoj reprezentataj per la ĉi-supraj libroj estas la solaj tri kompetentaj komunistaj tiulandaj poetoj, mortintaj antaŭ la komunismiĝo en 1945. Botev (1848-1876) batalis kaj ĵurnalistis kontraŭ la turka okupado. Lia arto plene dediĉiĝas al tiu lukto, kostanta al li la vivon. La lingvaĵo de ĉi tiu traduko estas relative glata kaj la verstekniko ne tre fuŝiĝinta, tial oni povas apreci de distanco lian obsediĝon pri martiriĝo kaj pri la libera sed senkompata vivo de la gerilo. La etoso tre proksimas al tiu de popolkanto, kaj dividas ĝian senormanman majeston. Oni aldonis ankaŭ plurajn artikolojn verkitajn de Botev por ĵurnaloj: li kritikis kaj vipas ĉiun ajn, ĉu turkan, bulgaran, grekan aŭ francan; tamen la okazaĵoj tro malaktualas, por ke estu pli ol historia valoro.

Tre sukcesa estas ankaŭ la popolkantaro: kiel ĉiuj balkanaj, ili bele litotas kaj teneras, per ĉastemo kaj nerekteco al ni jam nekonataj. Oni elektis lasi la kantojn senrimaj, kio ne agordas kun la precedenco en la Esperanto-tradukarto fare de Grabowski kaj Kalocsay. Tamen, tion pli ol kompensas la freŝo lingvaĵa kaj senta.

Se nur oni rezignus pri rimado ĉe la tradukoj el malfeliĉaj Smirenski kaj Vapcarov, oni povus la aferon eĉ legi! Ĉe la pli liberaj versoj de Vapcarov la teknikaj mankoj de la tradukantoj ne evidentiĝas tiel ofte, sed ĉe Smirenski la esperantigitaj versoj tiom mallertas, ke estas preskaŭ amuze! Konfesende, oni ŝparis al ni adasismon, sed preskaŭ ĉiun alian konatan fuŝon pri prozodio, rimado, vortordo kaj semantiko oni kulpis - kvazaŭ nia poetiko ĉesis ĉe Grabowski aŭ Hankel! Mi sentas min malbele trompita, kiam eldonejo evidente ŝtata subvencias kaj subtenas tiajn abortaĵojn.

La du poetoj meritis pli bonan traktadon. Smirenski (1898-1923) verkas pri la nejustado kaj premado al la proletaro en socio kapitalisma, kaj vidas antaŭen al la savonta revolucio. Ni ne scias, kiel impresus al li la nuna stato de tiu revata ŝtato, sed lia poezio ne malaktualigis: lia indigniĝo, aparte en liaj poemoj pri la diversaj urbanaj tipoj, forte imponas. Malpli sukcesas liaj historiaj verkoj, en kiuj li serĉas samcelanojn ĉe la Spartakanoj, aŭ ĉe la erupcio de Vezuvio, kaj kelkaj bildoj uziĝas tro ofte - fajro, lumo, ŝtormo litaniigis. Mi tamen forte rekomendus - se la traduko ne igus, ke li sonu same kiel nobbakita esperantisto en 1910. Liaj prozaĵoj feliĉe ne suferis tiom: kelkaj satiraĵoj pri la burĝaro kaj aristokrataro vere elstaras, kvankam aliaj estas tro dogmemaj aŭ tro ligitaj al siatempaj cirkonstancoj, same kiel ĉe Botev.

Smirenski mortis pro tuberkulozo, do ne havis oportunon martiri pro la Kaŭzo; male, Vapcarov-on pafis la germanoj en 1942. La verkado de Vapcarov okazis jardekon post tiu de Smirenski, kaj Vapcarov sekvis la Partion multe pli proksime, do oni ne miru, trovi (eĉ en la titolo) elementojn de socialisma realismo: li ofte rememorigas pri Majakovskij, kiam li insistas liriki pri uzinanoj kaj teknologia progreso. Li poezias pli sukcese ol liaj posteuloj, sed estas ĉagrena naiveco en lia ideologio laŭ nia aktuala sinteno, kiu igas, ke lian poezion ni probable respektus pli ol aprecus, male ol ĉe Smirenski. Liaj patriotaĵoj pli plaĉas, sed lia poemciklo pri la hispana civila milito, eĉ se ne tiom ideologiema, kiom la analogiaj berlinaĵoj de Smirenski, evidentiĝas lian ne-partoprenon. Oni foje sentas, ke li verkas laŭ mendo de la Partio. Ofte tamen li produktas poeziaĵojn kompetentajn. Vapcarov lernis Esperanton, se li estus travivinta la milton, eble li farus iom pri la poetika nivelo de la bulgara tradukantaro.

Grigorov verkis en la tridekaj jaroj sub pseŭdonimo Marin Ljubin.

la redaktoro pardonon petas pro la entrudiĝo de la sekvanta teksto

JARRAPORTO DE ODLO BOKSERP

Januaro 1989-Julio 1990

(laŭ la nova kalendaro)

Nia amema, glorinda, prestiĝoplena, ĉiamkompatoplena, simpatianta, sindona redaktoro informis min ke li ĉesos pagi al mi miajn kvar tasojn da presinko por mia noktomeza manĝo, se mi ne tuj preparos mian jarraporton. Ĉiu scias ke prepari raporton por tiel longa (20monata) jaro preskaŭ superas eĉ la kapablon de koboldo plej eksperta. Sed Lia Moŝto minacis dungi Macintoshkomputilon kun Esperantonkorektanta vorto-kaj gramatik-programo kaj ĵeti min al la rondo de Eternaj Komencantoj (ve!) se mi ne obeos. Nu, mi jam sekrete scias ke 99% da nia abonantaro konsistas el Eternaj Komencantoj, kaj la 100a persono strebas forgesi laŭeble ĉion lernitan, do lia minaco signifas precize nulon. Sed ni lasu lin al lia fantazio...

Raporto: Mia p-lej glora sukceso estis nia junia numero, en kiu, se mi ne eraras - kaj mi neniam faras eraron - mi sukcesis ŝovi en ĉiun paĝon almenaŭ unu elstaran kompostfuŝon. Tio ne estis facila, kreu mi- n - kaj (duoble ve!) Li kolere diris ke Li tute maldungos min, se mi ne korektos mian korektadon! Nu, kion povas fari kompatinda preskoboldo kiam la amata redaktoro diras tion?

Kronme, mian majstratingon, kaŝi la supersignojn super majuskloj tiel ke ili fariĝas preskaj nevideblaj li ekmalpermesis. Ĉu vi vidas la rezulton? Ĝi parolas por si mem. Neniun sinrespektanta koboldo povus toleri tia insulto. Sed mi estas senpovan. Tamen mi avertas nia redaktoro ke de nun mi rifuzos presi akuzativon ĝustaloke li grincu siajn dentojn laŭplezure mi tutsimple rifuzos Fino Punkto Krome preskaŭ neniun el niaj legantoj uzas akuzativon do kial mi estu escepto? (escepton? mi ne scias Konsultu vian Plenan Analizan Gramatikon Se vi ne posedas ĝin do konsultu vian bopatrinon ŝi ja scias ĉion jes ja)

nía ĉielofavoráta redaktóro ĵus díris ke réstas al mi nur kvar liníoj por mía rapórto kaj mi eĉ ne koméncis ĝin trioble ve! la vívo de fuŝkompostísto ne éstas féliĉa, kíel díras antíkvaĉínapróverboha!tróvu!aeráronentiúlinío!konkúrsonuméro?premioalĉíu hpapanto kai senwy ga pesjflnwon ag ga pewaktopo antay

LA LETERO DE L'AKADEMIO DE ESPERANTO

Ĝus eldonis sian 11an numeron (aprilo-junio 1990). Kiu volas scii pri la aktuala stato de la lingvo kaj la opinioj de l'Akademio, tiu trovos La Leteron orminejo. Abono kostas 120Ff jare = proks. A\$24. Mendu rekte de La Amikoj de l'Akademio de Esperanto, 5 rue Léon Cogniet, F-75017 Paris, Francio. ☐

NOVA REKLAM-GAZETO

Ekaperis nova reklam-gazeto nomita Monda Merkato, eldonata trionjare en okcidenta Germanio. Ĉiaj reklamoj, por varoj, servoj, informoj, kc. aperas en ĝi. La kosto de reklamo estas 2 germanaj markoj (=proks. 76 aŭstraliaj cendoj) por ĉiu tekstlinio de 32 literoj/karaktoj. La gazeton oni povas aboni per nur 5 germanaj markoj (=proks. \$A3.80). La principo estas ke tio porpagas la poŝtsendon, kaj la reklampagoj porpagas la eldonkostojn. Sendu pagojn per internacia ĉeko aŭ internacia poŝtmandato al Monda Merkato, Linguistisches Bureau Alfred Schubert, Schluderstr. 17, D-8000 München, Okcidenta Germanio.

(Atentigo de la redaktoro de The Australian Esperantist: bonvolu atenti ke nia libroservo peras abonojn por gazetoj nur dum oktobro-majo, sekve vi mem devos rekte mendi de la eldonisto. Kroma atentigo: la lingva nivelo de Monda Merkato estas tre malalta, plenplena de gramatikaj eraroj. Tamen ŝajnas al mi ke malgraŭ tio la principo de la gazeto estas bona, se misuzado de la akuzativo, verbformoj, vortelektado, kc. ne tro grincigas la dentojn ... aŭ se vi amas vian dentiston.) ☐

ESPERANTO-HOTELO HERZBERG/HARZ

La Esperanto-Societo-Südharz, Grubenhagenstraße 8, D-3420 Herzberg/Harz, Okcidenta Germanio, establos Esperanto-hotelon en 1991. Situantaj ĉe la bordo inter Okcidenta kaj Orienta Germanioj, Herzberg estas facile atingebla de esperantistoj el ambaŭ Germanioj. Krome, ĝi estas turisma vizitindaĵo. Oni kolektas nun monon por establi la hotelon kaj por kultura agado, ekz. biblioteko, videteko (sic!). Tiucele oni vendas "certifikatojn," (sic!) nomitajn "briketojn", po 12 DM = proks. A\$10. Por detaloj, vin turnu al la supre donita adreso. ☐

Ni Atentigas Ke La Aŭtentikecon Kaj Fidinecon De Tiaj Entreprenejoj Ne Povas Garantii The Australian Esperantist Nek La A.E.A. - La Red.

RAPORTO PRI RADIO 3ZZZ EN MELBURNO
 kompilita laŭ informo de **Svetislav Kanaĉki**

Baldaŭ finiĝos unu jaro post la komenco de Esperanto-radio-programoj en Melburno. La komenco neniam estas facila. Persistado kaj forta volo sukcesi devas esti akompanataj de vigla intertraktado kun la estraro de la radiostacio. Nian komencon plifeliĉigis ke oni estis tiam klopodanta akiri permeson de la registaro por nova radiostacio de etnaj grupoj. La finacado por la stacio devis esti kontribuata de la membroj de la etnaj grupoj. Mi jam tiam komencis klopodi ke ni havu Esperanto-programojn. Feliĉige ni estis akceptitaj, sed ne facile kaj ne sen problemoj. La rezulto estas ke dum nia unua jaro ni dissendis 51 Esperanto-radio-programojn.

En la lasta Ĝenerala kunveno de la Ethnic Broadcasting Association of Victoria, Ltd. mi eksciis ke en ĉiu ĉefurbo ekzistas similaj radiostacioj de etnaj grupoj. Tio donas esperon ke ni esperantistoj povos ĉie akiri radio-disaŭdigojn. La disaŭdigo kostas al ni en Melburno nenion. Ni nur devas havi sufiĉe da membroj por akiri tiun rajton. Por ni en Melburno la radiostacio postulas ke ni havu 25 financajn membrojn de la radiostacio. Mi kredas ke ne estus problemo kolekti tiom da membroj en iu ajn ĉefurbo, ĉu ne? Mi sugestas al niaj membroj ke ili atentu SBS televidon por vidi kiel etnaj grupoj klopodas kaj batalas por esti aŭdataj.

Por eviti problemon kiun ni renkontis, necesas elpensi nomon kiu ne sonas etna. Trovu de la radiostacio kion vi vere bezonas. Vere ne estos problemo, ĉar tiuj radiostacioj bezonas pli da membroj - ju pli da membroj ili havas, des pli fortaj finance estas la radiostacioj. La vera problemo ĉe tiuj radiostacioj estas ke ĉiu horo havas sian aŭskultantaron, do Esperanto devas akiri aŭskultantojn. En Melburno ni renkontas la malavantaĝon ke ni estas parto de la programo nomita Loĝas en Aŭstralio, do la nomo Esperanto ne aperas en la presitaj program-listoj. Pro tio pri Esperanto scias nur tiuj kiuj hazarde aŭskultas 3ZZZ ĝustahore kaj personoj informitaj de la esperantistaro.

Ĉiu programo estas varitema, inkludanta profesinivelan kantadon en Esperanto (de diskoj kaj kasedoj), mallongajn anglalingvajn raportojn pri Esperanto-eventoj, Esperantolingvajn raportojn, amuzaĵojn, nelongajn prelegetojn kc. Ni bonvenigos helpojn per provizo de materialo.

NOVA "ESPERANTO-DOMO" EN PERTO

de Vera Payne

(el **La Nigra Cigno**, junio 1990)

Januaro 1990: "Ĝis revido, ĝis revido!" Lastaj mansvingoj, kisbluvoj, kaj la aŭtobuso ekiris de la kongresejo en Melburno. Tristete mi pensis: kiom el ni ja kongresos post du jaroj? Kiuj el tiuj vizaĝoj ti- am ne plu ridetos al mi? Miaj pensoj tielis pri la forpaso aŭ neĉeesto de malsanaj aŭ maljunaj samideanoj. Ĉu eble mi mem ĉeestis mian last- an? Povas esti.

Februaro: Ĉu mi estas preta por translokiĝi al nia Esperantujo ĉie- la? Nu, ankoraŭ mia librara ĉambro restas maldece malneta. Se nur Espe- ranto-Domo haveblus al ni kaj mi povus translokiĝi duonon de ĉi tiu amaso! Se mi ne ordigus ĝin antaŭ mia forpaso, miaj posteuloj probable forĵetus ĉion. Do ankoraŭ ne estu mia vico...

Marto: Artikolo verkita de Dorothy Threlfall por LA NIGRA CIGNO instigas min rekomenci serĉi "domon". Por vera domo ni ne havas sufiĉe da mono. (Krom tio, kiu prizorgus ĝin?)

Aprilo: Ĉu eble apartamento taŭgus? Ne, la loka magistrato ne per- mesas. Eble ni povus lui ĉambron? Ho miaj dioj! La kosto! Kion fari? Kie estas volo, tie estas vojo. Serĉu plu! Kaj jen! Bela oficejeto en luksa oficejaro, proponita por \$41 000. La spaco iom malgranda, sed kun rajto uzi ankaŭ la eksteran koridoron kaj la tre allogan enirhalon. (Krom tio, kvar necesejoj kaj du kuirejetoj disponiĝus al ni. Vespere preskaŭ neniu uzos la konstruaĵon).

La originala prezo estis \$49 000, sed la posedantoj volas rapide vendi. (Krom tio, en ĉi tiu ekonomi-krizeto, la aĉetanto regas.) La prezo malaltiĝis, kaj fakte, post speciala kunveno (okazigita en la nova ejo), al kiu ĉiu ligano estis invitita, ni ofertis \$39 000, kaj - sukcesis! Post la pago de ĉiuj kromaj kostoj, restos al ni sufiĉe por pagi la jarajn elspezojn. Kompreneble ni daŭrigos nian enspezadon; tam- en ne plu necesas tiom forte tion fari kiom en la pasintaj kelkaj jar- oj.

Do! La revo realiĝis! Ni faris la unuan paŝon en nia "renaskiĝo". Estas iomete timige ampleksi ŝanĝojn en la vivo, sed sen ŝanĝoj restas nur stagno. Ni memfidu en niaj kapabloj, kaj montru novan aspekton. Ĉe 25/238 Albany Highway ni ĝoju, ni laboru, kaj ni esperu.

rubriko de odlo bokserp

Demando: en la maja numero p18 dua linio de malsupre, estas presita sida vento anstataŭ suda vento. Ĉu temas pri komposteraro?

Respondo: La aŭtoro diras ke jes, sed mi havas alian opinion. Temas pri vento kiu blovis tiel fortege, ke ĝi laciĝis kaj devis ripozi.

-Odlo Bokserp ☐

NOVA ESPERANTA ROK-GAZETO

Tute nova trimonata gazeto eldonis sian unuan provnumeron por amantoj de rok-muziko. Ĝia simpla titolo, Rok-Gazet', eldonata de Eurokko - grupo pri kiu ni jam parolis en T.A.E. La gazeto celas precipe junulojn, estas neformale redaktata, abunde ilustrata. La abono kostas 100Ff = proksimume A\$25. Adreso: Eurokka-Rok-Gazet', Esperanto Rok-Asocio, F-31450 Donneville, Francio.

a n k a ŭ

Eurokka ĵus eldonis novan disketon kun entute 4 pecoj da rokmuziko de la grupoj Amplifiki kaj Rozmariaj Beboj. Titolita "Vinilkosmo", la prezo estas 40Fr = proksimume A\$10 inkl. poŝtkostojn. Mendu rekte de Eurokka, ĉe la supre donita adreso. ☐

ESPERANTO EN ELEMENTA LERNEJO EN PERTO

31 tria-jaruloj en la Darlington Primary School nun ricevas de sia instruisto, Don Hughes, ĉiusemajne Esperantolecionojn. La Darlington Post, en sia numero de 5-junio-1990, eldonis grandan bildon kun la nomoj de la infanoj kaj artikoleto. Ni gratulas. ☐

REGISTRO DE "MONATO"

Dum la pasinta jaro oni preparis registron de la artikoloj en Monato la sendependa internacia gazeto kiu respegulas la novaĵojn kaj vivon de la mondo ekde 1980. La registro enhavas ĉiujn artikolojn de ĉiu jarkollekto, escepte de leteroj, noticoj, enigmoj, recenzoj kaj tre malgrandaj eroj (ekz. ŝercoj kaj distraĵetoj), ordigitaj laŭ rubrikoj kaj temoj.

La Biblioteko de AEA ebligas kopiojn de artikoloj aŭ registroj por membroj kaj organizoj de AEA. Por detaloj, kontaktu Ralph Harry, 8 Tennyson Crescent, Forrest ACT 2603. ☐

JAGE

Junulara Aŭstralia Grupo Esperantista
de Niĉjo Nicholas

La tasko de JAGE estas grava, eĉ kvankam tio ne tuj evidentas per ĝia aktuala stato. Ĝi provizas por gejunuloj ne nur bultenon humore plenan sed ankaŭ interligon, substrukturen por kresko en la junulara medio. Oni konceptas JAGE-n kiel alternativon kaj komplementon rilate la jam ekzistantajn esperantistajn organizostrukturojn. La afero devas kreski en ĉiuj sociaj grupoj kaj medioj, se ĝi pluvivu sane kaj proponu kontribuojn konkretajn al la socio, en kiu ĝi agas. Kaj la metodologion de la enradikiĝinta esperantistaro, kiu konsistigas AEA-n, oni ne apliku sendistinge al alispecaj grupoj. Tial ekzistas JAGE, kaj tial JAGE estas io esenca por la ĉi-landa movado. ☐

ESPERANTO-FEDERACIO DE KVINSLANDO

de Ray Ross

La 21-22an de aprilo la unua konferenco dum 1990 okazis en Toowoomba kiam 34 anoj kaj vizitantoj partoprenis la semajnfinojn. Inter la gastoj estis la Urbestro de Toowoomba S-ro Berghoffer kaj D-ro Michael Millick estro de la fako pri komunikado en la Universitato de Suda Kvinlando. Dum la distra programo nia gastparolanto, D-ro Mellick, parolis pri la manko de "funkcia alfabeteco"* inter novaj studentoj en la fako, kaj la urĝa neceso certigi ke tiuj studentoj ellernu la anglan gramatikon. Pri la temo "Esperanto kaj Alfabeteco" Ray Ross konfirmis la 28an kongreskonkludon ke oni ne povas instrui Esperanton al la analfabetoj de la mondo, sed substreki la avantaĝojn de Esperanto rilate al "kultura alfabeteco" haveblajn per tradukoj el multaj landoj. Sekvis viglaj por-kaj kontraŭ-vidpunktoj responde al lerte proponitaj deklaroj elektitaj de Dianne Lukas. La Brisbana Kantgrupo dufoje prezentis erojn, kaj Ross Robbins mirigis la ĉeestantojn per duonhoro da magiado. Dimanĉe anoj ĝuis vidindaĵojn en la belega urbo Toowoomba - la sunbrilo revenis post multaj pluvoplenaj semajnoj!

La dua konferenco okazos ĉe Redland Bay en oktobro. ☐

(*Ĉi tiu vorto estas retrokonstruita el analfabeteco per forpreno de la grekdevena pseŭdoprefikso an = sen. Pli laŭgramatika formo estus la peza vorto malanalfabeteco. "Alfabeteco" estas preciza traduko de la angla vorto "literacy". Pro populariĝo de tiu idiotismo en Esperanto mi lasis ĝin, iom kontraŭvole, en la teksto. - La Red.)

MEDICIN-PROGRAMOJ POR KOMPUTILOJ

laŭ informo de V. Prjaŝin

Ni ricevis komunikon de la Kooperativa Esperanta Sekcio de Belorusia Esperantista Unuiĝo:

Ŝljaŝi, scienc-teknika kooperativa centro, ellaboras medicinprogramojn por komputilaj sistemoj, kaj proponas krei komunan firmon kun similaj entreprenoj en aliaj landoj. La proponoj de la Belorusia Kooperativa Unuiĝo pri kunlaboro estas diversaj, kaj ni pretas sciigi pri ili al ĉiu interesato. Adreso -

SU-220028 MINSK

av. Rokossovskogo 143-31

Kooperativa Esperanta Unuiĝo de Belorusia Esperantista Unuiĝo
USSR

RELIGIA GAZETO EKUMENISMO

Jam de kvin jaroj eldoniĝas trimonata internacia gazeto Ekumenismo. Ĝia celo: diskuti kaj diskonigi religiajn opiniojn kaj faktojn ne nur de la katolika kristanismo sed de la monda religia kulturaro ĝenerale. Malgranda (16paĝa), bone presita, kvankam lingve eraroplana, ĉi tiu gazeto meritas legadon. Jarabono kostas A\$14, mendebla de Libr. Antonio Gambuti, Piazza Duono 4, 48100 Ravenna, Italio.

HUNGARIO INVITAS VIN!

La nova orienteŭropo estas nuntempe unu el la plej ekscitaj turist-celoj, kaj por esperantistoj ekŝoras abundaj altkvalitaj oportunoj por praktike utiligi Esperanton.

La Hungara Vojaĝoficejo "Express" havas Esperanto-Sekcion, kiu volonte kaj eksperte aranĝas veturplanojn laŭ via deziro kaj Esperanto-eventojn somere kaj vintre. Tre bone preparita porturista informbroŝuro simple nomita "Hungario" koncize informas pri ĉio praktika, kion turisto bezonas scii. Alia broŝuro "Gastama Hungario '90" informas pri poresperantistaj aranĝoj dum ĉi tiu jaro. Domaĝe, pluraj el la plej allogaj aranĝoj okazas dum la hungara somero = jam nun en julio. Sed la vintra programo ankaŭ estas alloga. Petu detalojn de Elizabeta Gombkötő, Esperanto-sekcio de Vojaĝoficejo "Express", Budapest V, Szabadság tér 16, H-1054, Hungario.

RESPONDOJ POR "PROVU VIAN VORTOSCION"

1.b; 2.c; 3.b; 4.a; 5.b; 6.a; 7.a; 8.a; 9.a; 10.c; 11.c; 12.a; 13.c.

KOREKTO

de Ralph Harry

Kelkaj eraroj sin trudis en la manuskripto laŭ kiu la artikolo pri Kribaĝo en nia maja numero estis presita. Bonvolu korekti ĉi tiel:

.....
.....
....(=truoj de komenco/fino)				
.....
.....

Kribaĝa tabuleto

Kavaliro Johano Suckling heredis en 1627, ne 1609.

La citaĵo el The Old Curiosity Shop devas esti "A game of four-handed cribbage".

Membro de AEA ne devas sendi IRK por ricevi la regularon. Simpla peto sufiĉos. ©

KORESPONDPETOJ

La AEA daŭre ricevas korespondpetojn el Pollando, Ruslando, kaj aliaj landoj - efektive, pli da korespondpetoj ol da esperantistoj en Aŭstralio! Se vi aŭ amiko via deziras skribamikon, bonvolu informi nian sekretariojn Ray Ross, 41 Agnes St, Sunnybank Qld 4109, kaj li transsendos al vi leterojn de eksterlandaj interesatoj.

NIA PREZIDANTO EN RUSIO


La prezidanto de AEA, Trevor Steele, ekflugos meze de septembro por ses monatoj en Kiev, kie li instruados, plu lernos la rusan lingvon, kaj konatiĝos kun la rusoj. Ni ĉiuj envie deziras al li feliĉan duonjaron en tiu neĝoplana lando.

The Australian Esperantist

Numero 263

SEPTEMBRO-OKTOBRO 1990

Registered by Australia Post
Publication no. WBG 2488



- Koincido kaj Haoso (Alan Towsey) ... p.3
Provu vian vortoscion (Donald Broadribb) ... p.5
75a Universala Kongreso en Havano (Idyss Einihovici) ... p.7
"Kaj la Miserere. Lasta Graco" (Donald Broadribb) ... p.8
Recenzo: Akademiaj Studoj 1988-1990 (D. Broadribb) ... p.18
Korekto; Nova muzika gazeto ... p.20
Krei novajn vortojn (Marcel Leereveld) ... p.21
Nekrologo: Audrey Childs-Mee ... p.24
Diversaj esperantaĵoj ... p.24
English Supplement

THE AUSTRALIAN ESPERANTIST

Oficiala organo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio

Redaktoro: Donald Broadribb, 46 Great Eastern Highway, Bakers Hill

WA 6562. Telefono: (09) 574 1307. Fax: (09) 574 1298.

Prov. Prezidanto: Justice K. Enderby, 2 Phoebe St, Balmain NSW 2041.

Vicprezidanto: Vera Payne, 36 Donegal Rd, Floreat Park WA 6014.

Sekretario: Ray Ross, 41 Agnes St, Sunnybank QLD 4109.

Vicsekretario: Herbert Koppel, GPO Box 2122T, Melbourne Vic 3001.

Kasisto: Owen Lonergan, 16 Deverell Way, South Bentley WA 6102.

Libro-Servo: Tom Elliott, PO Box 230, Matraville NSW 2036.

Korespondaj kursoj: John Moore, 7 Pelican St, Emu Park QLD 4702.

Prov. Prezidanto de la Ekzamen-Komitato: Donald Broadribb (adreso sup-
re).

P.R.O. (Oficisto pri Rilatoj kun la Publika): Dennis Murphy, 79 Binnal-
long Rd, Old Toongabbie NSW 2146

Membreco: \$25 por individuo, klubo kc.; \$30 por familio (ĉiuj ĉe la sa-
ma adreso); \$15 (minimumo) por pensiulo aŭ studento. Bonvolu sendi vian
kotizon al la kasisto aŭ al la Libro-Servo.

Bonvolu avizi la redaktoron se via adreso estas neĝuste presita sur la
adreslipeto, aŭ se vi ŝanĝas vian adreson aŭ/kaj nomon.

Sendu ĉiujn komunikaĵojn, artikolojn, librojn por recenzo kc. al la re-
daktoro. Limdato por alsendo de presotaĵoj por la venonta numero: 1 no-
vembro.

SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO verku artikolon!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron
de THE AUSTRALIAN ESPERANTIST "ni vere bezonas artikolon pri..."? Do
sendu tiun amatan eseon, ideon, rakont(et)on, esprimon de vidpunkto,
ŝercbildon. Ni ĉiuj volos legi ĝin! Preparante la tekston, bonvolu
atenti la ĉi-sekvajn postulojn: la teksto devas esti klare tajpita, per
nova rubando kaj kun duobla spaco inter la linioj kaj marĝenoj de
almenaŭ du centimetroj. Tajpu sur nur unu flanko de ĉiu folio. Netaj-
pitaj tekstoj estos malakceptitaj. Por konservi la lingvan nivelon de ĉi
tiu gazeto la redaktoro rajtas korekti ĉiun tekston antaŭ aperigo. Laŭ-
bezone ĝi povos esti mallongigita de la redaktoro. Ni ne povas promesi
aperigon en la tuj sekvonta numero, krom se temos pri kronologie urĝa
teksto.

KOINCIDO KAJ ĤAOSO

de Alan Towsey

Mi utiligas la inviton sur p17 de la juli-aŭgusta numero de TAE por esprimi miajn opiniojn pri koincido kaj ĥaoso.

Por mi, ne estas ia mistero rilate al koincidoj, kaj mi miras, ke oni tiom diskutas pri ili kaj proponas tiom da filozofiaj teorioj.

Ĉie kaj ĉiam en la universo sennombraj eventoj konstante okazas samtempe, plej ofte sen ia senpera ligo inter si. Kiam du (aŭ pli) similaj eventoj okazas samtempe, aŭ preskaŭ samtempe - kio laŭ la leĝoj de probableco devas ofte okazi - ni nomas tion "koincido". Ĝi estas do nur nomo, de cirkonstanco tute ne signifoplena. La vorto mem devenas de du latinaj vortoj kiuj signifas "fali kunen, okupi la saman spacon" (origine termino el la mezepoka astrologio), do ne estas ia demando pri kaŭzeco aŭ nekaŭzeco!

Mi firme kredas je la principo de kaŭzeco de ĉio, ĉie. Kun Einstein, mi kredas, ke "God does not play dice!" (Dio ne ludas je ĵetkuboj.) Laŭ mia ĝis nun nur iometa kompreno de la "nova" Ĥaos-teorio, tiu ĉi baze asertas, ke en ĉiu kompleksa sistemo, ne estas eble fari precizajn prognozojn. Sed tion ni jam de jaroj scias - oni nur devas pensi pri la veterprognozoj! Tamen, tio ne signifas, ke ekzistas ie ia nekaŭzeco.

Se ekzemple ni suprenĵetas moneron dek mil fojojn, ni povas certe atendi, ke ĝi refalos tre proksimume kvin mil fojojn aversen kaj kvin mil fojojn reversen. Estas vere, ke ni ne povas prognozi la rezulton de iu ajn aparta ĵeto - ĉar ni ne povas scii ĉiujn koncernajn faktorojn, kiaj ekzemple la pezo kaj formo de la monero, la forto de la ĵeto, ĉu blovas venteto, ktp. Sed ni ja povas diri, ke estas definitiva kvindekprocenta ŝanco, ke ĝi refalos aversen. Se ne estus ia determineco, estus neeble kalkuli la probablecojn, ĉar el dek mil ĵetoj la monero egale verŝajne refalus aversen 5 aŭ 50 aŭ 500 aŭ 5 000 aŭ eĉ 10 000 fojojn!

Mi ofte jam diris, ke, se ni povus enigi en specialan komputilon ĉiujn koncernajn informojn pri iu ajn individuo kaj ties vivo, la komputilo povus prognozi precize tion, kion tiu individuo diros aŭ faros. Sed, kompreneble, tian scion ni ne posedas, nek povas posedi. Tamen ... kiom da fojoj ni aŭdis iun diri: "Mi ja sciis, ke vi diros tion!"*

Ŝajnas al mi, ke multaj teorioj en la moderna scienco alproksimiĝas al filozofio - kaj tie ni troviĝas sur tre danĝera tereno. Antaŭ multaj jaroj, Ogden kaj Richards, en sia epokfara libro "The Meaning of Meaning" ("La Signifo de Signifo"), atentigis, ke multo en la filozofio kaj religio estas tute sensignifa, pro tio, ke multaj vortoj tie uzataj ne havas efektive aludaĵojn (angle "referents") en la reala mondo.

Mi klarigu tion: vortoj estas simboloj, kiuj reprezentas realajn aĵojn, personojn, ecojn kaj tiel plu. Ni povas pli facile manipuli la simbolojn en nia menso ol fizike la konkretaĵojn mem. Sed multaj vortoj en filozofio aŭ religio simbolas aĵojn, personojn, ecojn ktp., kies efektiva ekzisto ne estas, kaj verŝajne neniam estos, definitive pruvita; tio estas, ili estas nur imagitaj! Finfine (per la vortoj de Ogden kaj Richards) "la vorto anstataŭas la person", kaj "oni provas konvinki la homan racion, ke ne estas ia logika nekonsekvenco eĉ en la plej granda absurdeco"!

Mi povus citi trafikajn ekzemplojn, sed mi ne volas ofendi iun ajn - ni ĉiuj havas firme tenatajn kredojn, kiujn ni pasie defendas, sed kiuj, malfeliĉe, ofte staras sur absolute nenia logika aŭ scienca bazo.

*Tiu vidpunkto memorigas min pri poemeto, kiun mi aŭdis dum miaj universitataj tagoj:

To think that I am what I am:	Kia hororiga penso, ke mi estas, kio
A creature that moves	mi estas:
In predestinate grooves -	Estajo, kiu moviĝas
Not even a bus, but a tram!	Laŭ antaŭdestinitaj kaneloj -
	Eĉ ne buso, sed tramo! ☹

- - -

|Komento de la Red.: La homo decidas ke io estas signifoplena ("la homo estas la mezuro de ĉio"). La psikologia koncepto de sinkroneco interesiĝas pri kial oni faras tian decidon pri iuj koincidoj.

Min dubigas la (eble nekonscia) religi-filozofia supozo en la deklaro "Se ne estus ia determinaco, estus neeble kalkuli la probablecojn..." Al mi ŝajnas ke tio neeviteble devigas nin kredi ke ia kaŭzanta principo ekzistas eĉ inter neinterrelatantaj eventoj = la kaos-teorio, aŭ religia supozo. Kial monero laŭsupoze falus egale ofte aversen/reversen? Ĉu eble ni supozas tion nur ĉar nia teorio de probableco originis kun kaŝita deisma supozo ke ekzistas ia Kaŭzo de la "naturaj leĝoj"?|

PROVU VIAN VORTOSCION

1. Trovu la malĝustan frazon:
 - (a) Ni brulas karbon por varmigi la domon.
 - (b) Mi jam korektis vian tekston.
 - (c) Kiu ruinigis mian kraĵonon?
 - (ĉ) Ĉu vi permesas, ke mi pentru vian portreton?
2. Trovu la malĝustan frazon:
 - (a) "Kiel Plaĉas al Vi" estis verkita de Shakespeare.
 - (b) Gloru nur Dion, ne homon.
 - (c) Nur unu fabrikejo fabrikas tiajn maŝinojn.
 - (ĉ) Skribu vian nomon pli klare.
3. Trovu la malĝustan frazon:
 - (a) Li estis ĵus foririnta, kiam mi alvenis.
 - (b) Gustumu ĉi tiun lakton, mi kredas, ke ĝi estas jam malfreŝa.
 - (c) Komencu labori nun.
 - (ĉ) Via vortuzo estas korekta.
4. Trovu la ĝustan frazon:
 - (a) Lia nomo estis malĵuste skribita.
 - (b) Lia nomo estis malĵuste literumita.
 - (c) Tiu vorto estis malĵuste uzita.
 - (ĉ) Esperanto aperis ĵus en la mezo de 1887.
5. Trovu la ĝustan frazon:
 - (a) Jen \$5 kiel kompenso por via laboro.
 - (b) Jen \$5 kiel rekompenco por via laboro.
 - (c) Mi pagas lin po \$5.
 - (ĉ) Ses estas dufoje tri.
6. Trovu la ĝustan frazon:
 - (a) Koloru la muron flaveta.
 - (b) "Krokodila larmo" estas falsa larmo.
 - (c) La konkludo de demando devas esti la signo "?"
 - (ĉ) La dramo finis iom frue.
7. Trovu la malĝustan frazon:
 - (a) Nur nun mi lernis, ke vi estas ĉehejma.
 - (b) Ĉu vi lernis la lecionon?

(c) Mi lernis tiun lingvon en Francio.

(ĉ) Lernigu al mi vian nomon.

8. Trovu la ĝustan frazon:

(a) La venkintoj ricevos po \$60.

(b) Oni pagos \$60 po ĉiu venkinto.

(c) Po kiom da mono vi pagis por via portreto?

(ĉ) La plej bona verkinto ricevos \$600 po ĉiu novelo.

9. Trovu la malĝustan frazon:

(a) La prezidanto de Usono estas George Bush.

(b) La prezidento de Usono estas George Bush.

(c) Kiu estos la prezidento de la kunveno?

(ĉ) La prezidanto de nia asocio devos aprobi tian elspezon.

10. Trovu la malĝustan frazon:

(a) Mi ĉiam manĝas je la tagmezo.

(b) Hieraŭ, je la meznokto, mi subite vekigis.

(c) La meznumero inter 4 kaj 8 estas 6.

(ĉ) La meza distanco estas 7 kilometroj.

11. Trovu la ĝustan frazon:

(a) Mi loĝas en malmultekosta pensiono.

(b) Pezu la karotojn, mi petas.

(c) Por skribi romanon oni bezonas bonan intrigon.

(ĉ) Mi scias, ke mi ne prononcis lian nomon akurate.

12. Trovu la ĝustan frazon:

(a) Vi devos demandi antaŭpagon por tia laboro.

(b) Mi volonte faros tion senpage.

(c) Kiu volos, parolas al la estro por ni?

(ĉ) La tria akto komencas je la oka horo.

13. Trovu la ĝustan frazon:

(a) Jen listo de la kotizoj ricevitaĵ dum julio de niaj membroj.

(b) Kiom da faruno vi aĉetis?

(c) Bonvolu doni al mi duonan kilogramon de pomoj.

(ĉ) Lia libro estas plena da poemoj.

75a UNIVERSALA KONGRESO EN HAVANO

raportas Idyss Einihovi

La 75a Universala Esperanto Kongreso okazinta en Havano, Kubo, 14-21 julio 1990 en la "Palaco de kongresoj" estis granda sukceso. La temo de la kongreso estis "Esperanto: evoluo, kultura diverseco." En tre eleganta, eksterordinara konstruaĵo for de la urbo brile malfermiĝis la universala kongreso kun ĉeesto de 1 614 personoj el 54 landoj. La kongresejo en tre pitoreska regiono estas ĉirkaŭata de tropikaj plantoj kaj akvofaloj. Abundis salonoj kun komfortaj brakseĝoj, alte taksindaj dum varmega vetero. La salonoj portis la nomojn de forpasintaj elstaraj esperantistoj. Restoracioj estis bone aranĝitaj.

Ĉiutaga "Kongresa Kuriero" pri okazaĵoj informis la kongresanojn pri detaloj. La sesioj estis ĉiam akurataj kaj bone frekventataj de la kongresanoj. La plej granda nombro da kongresanoj venis el Japanio (200). Nia AEA vicprezidanto, Juĝisto Kep Enderby el Sidnejo, estis la unua persono kiun mi ĝoje salutis en la kongresejo. Nia renkontiĝo estis surprizo por ni ambaŭ. Mi estis ravita de la entuziasmo de gesamideanoj Enderby por Esperanto.

La prelegoj de la kongreso estis stimulaĵoj kaj tre interesaj. Impresis min D-ro Jane Edwards, eksperto pri angla literaturo kaj ankaŭ instruisto pri antropologio en usona universitato. Ŝi nun estas la edzino de D-ro Humphrey Tonkin. Mi ĉiam sekvis ŝiajn prelegojn. La nova prezidanto de UEA, elektita en Braĵtono, Prof-o John Wells, kiu malfermis la 75an kongreson, estis tre sukcesa. Lia voĉsono estis impresa kaj lia personeco amikema.

La kubanoj tre gastame bonvenigis nin kaj dum la tuta periodo prizorgis kaj gardis nin. Oni regalas nin per distraj vesperoj en diversaj teatroj per profesiaj aktoroj. Dum internacia vespero aktoris multaj samideanoj el diversaj landoj. El Bulgario partoprenis la plej granda nombro da aktoroj. Tre plaĉa estis publikika dancado laŭ la kuba stilo, sed ĝi estis bruega!

La porinfana "kongreseto" kun tre ĉarmaj infanoj kaj brila instruistino Maria prezentis kantojn, dancojn, aktoradon, kaj ĝojigis nin per sia entuziasmo por Esperanto. Mi esperas ke niaj infanoj en Aŭstralio baldaŭ imitos la infanojn en Havano. Entute la oktaga kongreso en Havano estis neforgesebla travivaĵo.

KAJ LA MISERERE. LASTA GRACO.

rakonto de Donald Broadribb

Marianne estis tre malkvieta dum sia dormado. Ŝvito kovris ŝin. La aviadilo flugadis dum feroca ŝtormo. Ĝin ĵetegadis la ventego, kaj la voĉo de la piloto estis tre nervoza dum li avertis ke la pasaĝeroj certigu ke ili uzas siajn sekurrimenojn, kaj ke oni nepre ne fumu. La steverdinoj ne plu klopodis marŝi laŭlonge de la interseĝa koridoro kun trinkaĵoj kaj gazetoj, sed staris en grupo ĉe la malantaŭo de la veturilo. Fulmis. Subite eksplodis. La aviadilo disfalis. La aero estis malplena. Silenta.

Marianne vekigis kriante. Peter, apud ŝi en la lito, alarmite elsaltis, poste komprenis ke Marianne spertis koŝmaron.

"Katastrofo okazis!" La voĉo de Marianne estis tiom plena de teruro ke ŝi preskaŭ panikigis ankaŭ lin. "Aviadilo pereis, nekredible pereis, kaj...iel...temas pri mi." Ŝia vizaĝo estis tre blanka.

"Vi suferis koŝmaron," Peter diris trankviligcele. "Nur koŝmaro. Nenio katastrofa okazis. Koŝmaroj parolas per simboloj, kaj tio timigas."

"Ne estis koŝmaro!" kriis Marianne. "Estis vera katastrofo!"

"Nu, ni facile kontrolos tion," Peter respondis. "Ni aŭskultu la novaĵraporton de iu tutnokta radiostacio. Vidu, estas nun nur unu minuto post la noktomezo. Ni ankoraŭ povos aŭdi la informojn." Li ŝaltis la radioaparaton apud la lito kaj ili aŭdis la voĉon de anoncisto -

"...en la Atlantiko. Ŝajnas ke neniu postvivis. La British Airways flugo 735 estis fluganta al San Francisko. Proksimume unu horon post la forflugo el Sidnejo la piloto raportis fortan ŝtormon kaj ke fulmo trafis la aviadilon. Sed ankaŭ estis la sono de eksplodo tuj antaŭ ol radiokontakto ĉesis. Nun aliaj temoj: La Prezidento de..."

0-0-0

Ĉe la flughaveno de Sidnejo, Gloria kaj Roland atendis tre nervoze la flugon al San Francisko. "Ni devus aĉeti por ili ion aŭstralian," diris Gloria, dum ili rigardadis la varojn en butiketo apud la pasaĝersalono. "Kion vi opinias? Ĉu fotolibron? Aŭ ĉerman koalapupon?"

"Mi ne scias." Roland cerbumadis dum li rigardis la bretojn da don-
acaĵoj. "Ĉu viaj gepatroj amas legi?"

"Fanatike," ŝi respondis. "Precipe poezion. Mi neniam vidis tiel
fervorajn poezilegantojn."

"Eble do ĉi tion," sugestis Roland. Li prenis ekzempleron de la Kol-
ektita Poemaro de Francis Webb.

"Kiu estas Francis Webb? Mi neniam aŭdis pri ŝi," Gloria demandis.

"Li'. Verŝajne la plej grava aŭstralia poeto de nia jarcento. Aŭs-
kultu nur:

La sesa horo. Eble ĉi-nokte estos luno.
Tikas komata stelo ĉe morta Ferriere.
La fruan moskitmordon konas kampa maljuno
kvazaŭ ponardon, agacan orele.

La jupon super marĉo trenas luno,
miele senpersoneca: neniuj funebras ĉi-tere,
kaj funebras Nenio en Nettuno: sentu brakumon
de Nenio, elakviĝanta sur ĉi-infanvizaĝon.

La sesa horo. "Korfavoru min, ho Dio." Lasta graco.
Morto kaj Ino strange montras saman juĝon,
kaj metas dubcelajn fingrojn sur ĉi tutan infanvizaĝon.*

Estas strofoj el 'Lamento pro Sankta Maria Goretti'. Belega. Ĉu vi ne
akordas?"

"Mi vere ne komprenas ĝin," diris Gloria. "Sed ili ja amas tian poe-
zion de modernaj poetoj. Ĝi iel timigas min."

"Nu, ja temas pri ŝia morto, do neeviteble ĝi iom timigas," koment-
is Roland. "Sed tio estas nur malgranda parto de la poemo. Vi povos
legi la tuton en la aviadilo. Jes, mi aĉetos la libron por ili." Li
pagis al la kasisto. "Kian dediĉon mi skribu pri ĝi? 'Por Marianne kaj
Peter, kun nia amo?'"

"Sonas strange, nomi la gepatrojn tiel," diris Gloria. "Kiel bofilo

* Laŭ tr. de Niĉjo Nicholas. La originalon trovi ĉe la piedo de p17.

ja kutime nomas la gepatrojn de la edzino? Nu, ni decidu pri tio en la aviadilo." Ŝi rapide parolis, ĉar laŭta voĉo anoncis ke British Airways flugo 735 nun pretas ĉe pordo 17. Ŝi prenis fotolibron, Aŭstraliaj Sovaĝaj Floroj. Ĵetis la monon al la kasisto, kaj ili kuris al la aviadilo.

Ambaŭ jam ofte flugis, kaj post eble duonhora ili komencis dormeti. Ilin vekis la skuiĝo de la aviadilo, dum ŝi estis forte ĵetata de la ventego. "Ŝtormo!" kriis Gloria, kaj samtempe ili aŭdis anoncon: "Ni spertas iom da fulmotondro nunmomente kaj eble ni bezonos ĉirkaŭ dek minutojn por liberiĝi de ĝi. La pasaĝeroj bonvolu certigi ke iliaj sekurrimenoj estas uzataj, kaj oni nepre ne fumu.." Malpli rutinsone daŭrigis la voĉo: "Pro la neprobabla ebleco ke ni devos surmariĝi, la pasaĝeroj bonvolu..."

Fulmo trafis la maldekstran alon, apud kiu sidis Roland kaj Gloria, kaj la voĉo eksilentis. Gloria komencis krei "Roland!" sed ŝian voĉon kovris la sono de eksplodo en la malantaŭo de la aviadilo. Sekvis silento. Kaj nigro.

O-O-O

Peter fine sukcesis trankviligi Mariannen iomete. Li tenere rekondukis ŝin al la lito kaj donis glason da brando. Kaj li elverŝis iom ankaŭ por si. "Ni facile trovos kio okazis. Vi kredas ke Gloria kaj Roland estis en tiu aviadilo, ĉu ne?" Marianne kapjesis, nekapabla paroli. "Nu, ni povas nuligi tiun timon." Li strebis paroli trankvile, sed ne tre sukcese. Li prenis la apudlitan telefonon kaj kontaktis la internacian servon. "Parolas Doktoro Peter Möri. Estas urĝe telefoni al Aŭstralio. Ĉu vi bonvolos kontaktigi min kun la internacia flughaveno en Sidnejo, Aŭstralio?"

Voĉo respondis ke li devos longe atendi, jam centoj da personoj volas telefoni Aŭstralien. "Vi diras ke urĝas, ĉu?" demandis la voĉo duboplene. "Doktoro Peter Möri? Kia doktoro?"

"Korspecialisto, damne! Kontrolu pri mi per via komputilo se vi volas. Jes, ja urĝas!"

"Mi kontaktigos vin tuj kiam eblos," diris la voĉo. "Dankon." La telefono eksilentis.

Marianne senespere demandis: "Ĉu oni rifuzis kontaktigi vin?"

"Oni kontaktigos min kiam eblos," Peter ripetis. "Kaj sendube ili intertempe kontrolas por trovi ĉu mi rajtas postuli prioritaton. Kaj oni certigos ke mi ja estas mi, ĉar ili uzos mian sekretan telefonnumeron."

Tiomomente sonoris la telefono kaj Peter reprenis ĝin.

"Parolas la internacia informservo," diris la voĉo. "Mi bedaŭras informi vin ke la flughaveno en Sidnejo ne akceptas telefonkontaktojn. Okazis grava aviadakcidento kaj ili akceptas kontakton nur kun sia serĉistaro."

"Kiun telefonnumeron havas la gepatroj de Roland?" Peter flustris al Marianne. Ŝi transdonis al li libreton en kiu ŝi jam ĵus metis cirklon ĉirkaŭ la numeron de la familio Schreiner en Melburno. Kaj ĉi-foje ŝi premis sian oreilon apud lian por aŭdi la tutan konversacion.

Peter voĉlegis la numeron kaj post kelkaj sekundoj telefonkontakto establiĝis. Respondis Nancy Schreiner. Li transdonis la telefonon al Marianne.

"Parolas Marianne," ŝi komencis diri, sed ŝin interrompis la voĉo de Nancy, kiun ŝi preskaŭ ne rekonis pro la plorado.

"Ilia aviadilo - flugnumero 735 - ni provis telefoni al la flughaveno por trovi ĉu ili estis en la aviadilo, sed oni ne akceptas telefonantojn. Ni nur esperegas ke ili ne eniris la aviadilon. La melburna flughaveno nur diras ke laŭ la komputiloj ili atingis Sidnejon kaj enskribis sin por la flugo al San Francisko."

"Neniu espero eblas," diris Marianne per lacega voĉo. "Ili estis en la aviadilo. Ili mortis. Mi vidis. Estas vero."

"Kion vi diras, 'vi vidis'?" vekriis Nancy.

"Dum mi dormis mi vidis ĉion: la aviadilon, la ŝtormon, la fulmon, mi eĉ aŭdis la eksplodon. Kaj restis nenio. Eĉ ne peceteto. Timego min vekis. Peter ŝaltis la radion kaj oni rakontis precize kion mi vidis, do mi scias ke estas vero. Ho, ni devas preĝi por iliaj animoj, Nancy!"

0-0-0

Glorian kaj Rolandon puŝbatis la vento, dum io tiris ilin ĉiam pli alten inter la nubojn.

Ili ekhaltis, kvazaŭ nun starante sur solidaĵo. Nubero apartigis ilin, tiel ke Gloria ne plu povis vidi Rolandon. Kiam ŝi vokis lin, aŭdiĝis neniun responde. Abrupte giganta fingro direktiĝis al ŝi, kaj ŝi vidis furiozan vizaĝon kun longaj haroj blovataj de la vento. La figuron ŝi rekonis. Ŝi antaŭe vidis ĝin en bildo sur la kovrilo de libro pri Blake en la hejmo de la gepatroj.

"Deklaru viajn pekojn!" tondre sonis la voĉo.

"Gloria balbutis kaj dum kelkaj momentoj ne povis voĉi, sed poste sukcesis krei "Adultado! Amorado! Mensogado! Ŝtelado!

"Plii!" postulis la voĉo.

"Mi pekis, mi pekis...mea culpa...mea culpa..." elploris Gloria dum ŝi strebis memori la riton uzatan en la konfeso. "Mi pekis en la koro, en la pensoj, en agado. Mi pekis... Ne! Mi tute ne pekis!" ŝi kriis, subite konsciante ke en la koro ŝi plu aprobas sian ĝisnunan vivon. Ŝi klopodis forturni sin de la fingro, sed ĝi sekvis ŝin negrave kien ŝi rigardis. "Kion mi faris, mi faris pro amo" ŝi kriis. "Miaj aĝetoj dum mi estis bebo ne estis pekoj. Oni ne rajtas diri ke infaneto pekis ĉar ŝi prenis monerojn el la monsako de la patrino!"

"Vi koncipiĝis kaj naskiĝis peke," la voĉo tondris. "Vin plenigas pekaro en ĉiu ĉelo de via korpo! Vi ekzistis sekve vi pekis. Kiel tio estas punenda?"

"Per eternaj fajroj de l' infero kaj damnado!" ploris Gloria. Kaj abrupte ŝi komencis reciti: "Sankta Maria, Patrino de Dio, preĝu por ni la pekuloj nun jam je la tempo de nia morto..."

"Gloria! Ne trompiĝu! Estas nur iluzio!" Ŝajnis al ŝi ke ŝi aŭdas la voĉon de Marianne, sed tre malklare, kvazaŭ trans centmiloj da kilometroj.

"Eternaj fajroj de l' infero kaj damnado!" muĝegis la voĉo. "Fortre-

nu ŝin!"

Du demonaĉoj aperis, po unu ambaŭflanke de Gloria. Ili katenis ŝiajn brakojn kaj korpon. Ili portis tripikilajn lancojn kaj ruĝe flamis iliaj korpoj. Ili komencis tiri la katenojn.

"Gloria! Ne trompiĝu! Estas nur iluzio!" Denove vokis la voĉo de Marianne, sed nun preskaŭ ne aŭdebla.

Gloria baraktadis, sed la katenoj tranĉis ŝin kvazaŭ havante klingojn. Subite intuicio fulmis en ŝia kapo. "Vi ne estas realaj, vi ĉiuj!" Ŝi kriegis, "nek demonoj, nek pseŭdodio, nek nuboj, nenio!" Dum ŝi parolis, la demonoj, la voĉo, la nuboj, kaj ŝi mem malaperis.

o-o-o

Gloria strebis atingi la surfacon de la oceano. La ondoj verŝiĝantaj sur ŝin ŝajne trairis ŝian korpon, ŝi ne povis senti ilin. Ĉu ŝi povas naĝi? Neniam antaŭe ŝi naĝis en oceano. Ŝi trovis sin kapabla naĝi tute senĝene. Sed estis tede, naĝadi en la oceano, vidante neniun celon, nur senfinajn ondojn. Ŝi decidis stariĝi kaj trovis ke estas facile marŝi sur la akvo. "Do tiel Li faris tion! Estas efektive tre simple. Sankta Petro sciis tion, sed poste li forgesis." Eksperimente ŝi provis forgesi, sed tio estis neebla. "Nu, mi do marŝu al la seka tero. Kioma distanco? Ni jam flugis eble unu horon for de Sidnejo antaŭ la eksplodo - kiom rapide ni flugadis?" Ŝi volis kalkuli, sed efektive ŝi tute ne sciis kiom rapide flugas jeto. "Longega distanco, certe," ŝi voĉigis. Surprizis ŝin aŭdi la propran voĉon. "Mi devus marŝi eterne por reiri. Kiel mi do ne flugu?"

Ŝi etendis la brakojn kaj konforme al sia anticipo ŝi eksperte soris tra la aero pli rapide ol kolibro. Sed nun ŝi ekkonsciis ke ŝi ne scias kiudirekten flugi. "Se mi flugos erardirekten mi atingos sekan teron nur post miloj da kilometroj. Estas tute senutile." Ŝi haltis en la aero kaj pensis. "Ĉu eble mi povus teleporti min?" Ŝi demandis sin. "Kiel fari tion? Nur faru mensan bildon pri Panjo kaj Paĉjo, mi supozas." Tion ŝi faris kaj tuj trovis sin ŝvebanta super ilia lito.

Marianne kaj Peter dormadis, sed Marianne estis tre malkvieta, kvazaŭ spertante timigan koŝmaron. Ŝi kriis senĉese tiel senespere ke Gloria komencis plori.

Gloria decidis ke estas stulte ŝvebi en la aero. Do ŝi paŝis sur la plankon, iris al la lito, kaj ĉirkaŭbrakumis Mariannen por trankviligi ŝin. Sed Marianne ŝajne ne estis solida, la brakoj de Gloria tuŝis nenion.

"Ankaŭ ĉi tio ne estas reala!" Gloria subite komprenis. "Estas nur iluzio, same kiel la demonoj kaj tiu dio de infera fajro kaj damnado."

Malaperis Marianne, kaj ankaŭ Gloria.

o-o-o

Blindiga lumo trafis Glorian. Jam mankis la ŝtormo, la oceano, plankoj, muroj. Ŝi trovis sin staranta sur kampo. Super ŝi, la blua ĉielo. Ĉirkaŭ ŝi, arboj. La blindiga lumo rapide malaperis kaj ŝi ekkomprenis ke temis pri la lumo el la eksplodiĝo de la aviadilo. Ŝi demandis al si ĉu ŝi estas sola kaj ĉirkaŭrigardis. Ne tre for estis granda amaso da homoj. Ŝi komencis marŝi ilidirekten kaj sentis ion strangan. Surprizite ŝi rigardis sian korpon. Ŝi ne plu estis graveda. Mankis ŝiaj mamoj, kaj la tuta seksa parto. Ŝi ekkonsciis ke ŝi estas nuda, kaj ankaŭ tiaj estis la aliaj personoj. Sed plej surprizis ŝin trovi ke ŝi ne plu havas sekson.

La morto estas stranga afero, ŝi pensis dum ŝi plumerŝis cele la homamason. Atinginte ilin ŝi konstatis ke ili aŭskultadas homon sur podio antaŭ ili. La voĉo de tiu homo estis rimarkinde klara, ŝi pensis, ĉar ja mankis laŭtparolilo. Ŝi komencis aŭskulti la vortojn. Kvankam ŝi ne rekonis la lingvon, iel ŝi sciis ke ŝi povas kompreni kian ajn lingvon laŭvole. Ŝi agordis sian menson al la voĉo kaj la vortoj tuj kompreniĝis.

"...laŭorde, komencante je la unua vico," estis diranta la voĉo. "Ĉiu siavice iru al la tablo kaj tre zorge elektu sian folion. Tempo ne mankas, vi tute ne bezonas rapidi. Elektinte vian folion, portu ĝin al la registristo, maldekstre de mi, kaj tiu informos vin pri kion fari."

La atendado estos eterna, pensis Gloria. Sed efektive oni moviĝis tre rapide. Aŭ ĉu ekzistis stranga spaco de tempo ĉi tie, tiel ke kio por unu persono estis horoj por la aliaj estis nur sekundoj? Verŝajne tiel, ĉar ŝajnis ke apenaŭ pasis kvin minutoj antaŭ ol ŝi trovis sin ĉe

LES SCOTT
RECIPIENT OF THE PAUL HARRIS FELLOWSHIP

Citation read at the Rotary Club in Manly NSW

Shortly after the Second World War, on 11th December 1946, a meeting was held at the Library Institute, West Wyalong. The purpose was to form a Rotary Club in the town.

One of those who attended was a youngish man named Les Scott. Subsequently, at the Post Office Hotel on 4th February 1947, a further gathering constituted the very first meeting of the Rotary Club of West Wyalong and Les Scott was there as a charter member with the classification "Radio and Electrical Retailing". The club was up and functioning although the charter from R.I. did not arrive until the following September.

Les was president of his club away back in 1957 - 58 and one of the club's projects that year was a feasibility study on the formation of the Rotary Club of Lake Cargelligo. Les was heavily involved.

In the following year Les was appointed District Governor's representative for the formation of the club at Lake Cargelligo. The West Wyalong Club acted as the sponsor with the assistance of the Condobolin Club. Many times Les voluntarily drove long distances at night on rough roads to fulfil his duties and the club was successfully chartered with 23 members in May 1959. According to the West Wyalong club the job proved "a most formidable task" but Les proved himself to be thoroughly capable.

Les Scott served his club continuously until 1967 when he resigned and shifted to the city. He immediately became a member of the Rotary Club of Manly and has remained so ever since. Until his resignation from West Wyalong his attendance record had been 100%

In effect Les Scott has been a Rotarian continuously for 43½ years. During the period he has been in the Manly club he has carried out various duties, been an excellent attender and made a significant contribution towards this club's activities. He still does his share despite his age of 78 years. Les also has the distinction of being the Manly member with the longest record of service in Rotary.

>

Les was an active sportsman in the realm of tennis for many years. For instance the tennis players of the Rotary Club of Balgowlah once asked who was the somewhat mature member of the Manly club who was very good at standing at one end of the court and making all the Balgowlah players run all over the other end.

Apart from Rotary, Les has made another big contribution to international understanding. He has been one of the leaders in Australia in the Esperanto movement, held high office in it and represented Australia on many occasions.

In effect Les Scott could be classed as an outstanding person during his long career, supported throughout by his good wife Bess. There is no doubt that the achievements of Les would have been less had he not had the full support of an understanding partner.

Thus it is with great pleasure that I have the honour of awarding a Paul Harris Fellowship to Les Scott on behalf of the Rotary Club of Manly. □

O-O-O

75th INTERNATIONAL ESPERANTO CONGRESS HAVANA, CUBA, JULY 1990

For the first time the yearly International Esperanto Congress was held in Havana, Cuba, under the patronage of Fidel Castro who addressed the 1614 participants at the opening session and a special selection of 150 participants for the closing session. In his closing address he commented, "At the first, Christians were even fewer in number. But they prevailed. Christians were crucified, thrown to the lions, but they prevailed. You too will prevail. I don't wish you to be crucified or thrown to the lions, but you will prevail, because your goal is right." (Quoted from "La Havana Kuriero" 21 July 1990, the bulletin issued daily during the Congress.) Next year's Congress is to be held in Bergen, Norway.

This year's Congress was the eighth to be held outside of Europe (3 in the USA, 1 in Canada, 1 in Iceland, 1 in Japan, 1 in China). Africa, Australia, and Antarctica have yet to host the international Congress.

THE EINIHOVICI AWARD

The Executive Committee of the Australian Esperanto Association:

1. reaffirms its support for the Tim Einihovici Travel Foundation set up at the end of the A.E.A. Congress in Brisbane during September, 1988;
2. congratulates Mrs Idyss Einihovici on her energetic contribution to raising capital for the Foundation;
3. expresses disappointment that after two years no candidates have fulfilled the conditions announced in initial publicity;
4. draws attention to the fact that up to this congress (January, 1990) in Melbourne) A.E.A. has not formulated or published any conditions or awards relating to this Foundation;
5. is willing to negotiate with anyone nominating a worthy Australian representative for the 1990 or 1991 Congress;
6. announces its intention to set up an Australia-wide Tim Einihovici Award Support Committee with at least one representative in each state: to raise further capital funds for the Foundation, to distribute publicity to attract candidates for the Award from the year 1991-1992 onwards, and to provide tutorial help for candidates;
7. announces what it considers appropriate conditions for the Einihovici Award 1991-1992 as follows:

Conditions for the Tim Einihovici Travel Foundation Award 1991-1992

- a) Candidates shall be between the ages of 18 and 28 years at July 1, 1991.
- b) Candidates shall register their intention to participate in the Award to their state representative on the Award Support Committee by March 1, 1991, and shall receive information of tutorial help available to them.
- c) The winner of the award shall be selected from candidates who pass

the AEA "Elementa"* Examination with Distinction before January 1, 1992 and a special Esperanto oral examination before March 1, 1992.

d) Selection shall be by the AEA Executive Committee in its absolute discretion.

e) The prize shall consist of:

1. return air travel to the 1992 Congress of TEJO,
2. free accommodation for the duration of the TEJO Congress (approximately 7 days),
3. information of additional Esperanto events that the candidate might attend immediately before and/or after the TEJO Congress at his/her own expense,
4. comprehensive travel insurance for the duration of the travel period.

8. The successful candidate shall be available for a public presentation of the prize, for press publicity on departure from and return to Australia, and shall present in English a 2000-word written report of the 1992 TEJO Congress, and a 500-word Esperanto resume orally on at least one public occasion for each language before February 1, 1993.

*"Elementa": This examination tests students on all aspects of Esperanto grammar and is not to be confused with an elementary examination in any other language.

Ray Ross, Secretary AEA

NEW ESPERANTO ROCK

Eurokka, previously reported in this journal as establishing an Esperanto rock music program on a regional radio station in Donneville, France, has expanded its activities. A new quarterly rock magazine Rok-Gazet' is now being published, subscription 100 Ff = approx. A\$25. It has also released another rock music disk, titled Vinilkosmo with tracks from two well known Esperanto rock groups Amplifiki and Rozmariaj Beboj. Price 40FF = approx. A\$10 including postage. Both magazine and disk may be ordered directly from Eurokka Esperanto Rok-Asocio, F-31450 Donneville, France. Include payment by international cheque in French francs or international money order.

la tablo. Malgraŭ la amasego da homoj jam irintaj tien, restis vasta nombro da presitaj folioj sur la tablo, zorge klasifikitaj laŭ temo: flegistino, kuracisto, dommastrino, ĉarpentisto, komputilisto, rubaĵkolektisto, kc. La nombro da klasifikoj ŝajnis senfina. Preninte folion el stako rubrikita "artistoj" ŝi komencis legi: Mondfama porcelanisto ĉina, edzo kun infanoj.

Jen bona kariero, pensis Gloria, kaj ŝi decidis elekti tiun. Dum ŝi portis ĝin al la registristo ŝi ekmemoris ke ĉion ĉi ŝi jam antaŭe renkontis: en La Respubliko de Platono. "Damne!" ŝi diris. "Alia iluzio. Ankaŭ ĉi tio ne estas reala!" La sceno komencis malaperi, kaj ankaŭ ŝi.

o-o-o

Sento de skuo penetris la cerbon de Marianne, kaj ŝi vekigis kvazaŭ perforte. Kaj ŝi kaj la lito estis malsekaj pro ŝvitado, lagetoj da ŝvito gutadis surplanken. Ŝi ŝaltis la lampon. Tio vekis Peteron. "Kio okazis?" li demandis. "Ĉu okazis nova katastrofo?"

Unuamomente Marianne ne povis paroli. Ŝi firme tenis Peteron kaj ŝia korpo skuiĝis dum ŝi ploradis. Fine ŝi sukcesis diri: "Mi vidis Glorian viva. Kiel en la Tibeta Libro por la Mortintoj. Vi scias ke laŭ ĝi ĉio okazanta post la morto estas kreita de nia fantazio, kaj la libro konstante avertas ke temas nur pri iluzioj, ne kredu ilin kaj pro tio ili ne katenos vin. Se oni komprenas ke ĉio kredata de homoj pri la morto estas fantazio, nur tiam oni havas oportunon eskapi el samsaro."

"Mi ne komprenas," agnoskis Peter. "Sed estas klare ke vi spertis koŝmarojn pri Gloria kaj pri kio okazas al ŝi morta."

"Jes, jes!" kriis Marianne, feliĉa ke nun li komprenas. "Samsaro estas la universo kaj kio ajn alia ekzistas. La tibetanoj volas eskapi, volas eniri nirvanon, kion oni ne povas ekspliki, ĉar temas pri io, kion ni ankoraŭ neniam spertis. Temas pri la Vero Mem. Mi esperegas ke Gloria trovis ĝin!"

"Marianne, kara," malfeliĉe diris Peter. "Vi havas febron, ĉu ne?" Li metis sian manon karese sur ŝian frunton kaj tuj forprenis ĝin kvazaŭ bruligitan. "Jes, febriga," li diris.

"Ne temas pri febro," protestis Marianne. "Temas pri Gloria kaj kio okazas al ŝi."

"Marianne, kara," malfeliĉe diris Peter. "Necesas kompreni ke vi nur imagas ĉion ĉi. Gloria mortis. Ŝi estas mortinta. Por vi, por mi, ŝi estas nun nur memoraĵo. Memoro pri amo kiun ni havis kaj ĉiam havos, sed nur memoro. Ne trompu vin per esperoĵ pri tiu samsaro pri kio vi parolas, aŭ la popolo de Tibeto. Ili esprimas sian fantazion pri la morto samkiel la kristanoj. Sed efektive restas nur memoroj. Kontentiĝu per ili."

"Vi tamen ne komprenas." Marianne ĝemis, malfeliĉa ĉar ŝi estis supozinta ke ŝi trovis komprenon sed aŭdas nur kliŝojn. "Ne provu kompreni. Nur lasu min sola." Ŝi turnis sin sur la lito kaj kunpremis sin kvazaŭ bebo.

"Nu, almenaŭ mi povas mildigi la febron," murmuris Peter. Li malfermis sian keston, elprenis plastan injektileton plenan per antifebraĵo, kaj injektis la medikamenton. Siavice ankaŭ li ĝemis. "La doloron en la koro ni devos plensuferi, karega. Ekzistas neniu magia injektaĵo por forpreni tion."

o-o-o

Gloria malfermis siajn okulojn. Ankoraŭ ŝiaj oreloj aŭdis la tondran sonon de la eksplodo, kaj ŝiaj okuloj plu vidis la fulmon. Ŝi sentis ke ŝi falas, sed ne kiel ŝi anticipis. La ventoj kiuj puŝegis ŝin nun milde karesas ŝin. Ĉu ŝin vundis la eksplodo? Plurfoje ŝi provis rigardi sin, sed ĉiam sensukcese.

Kio okazis al Roland? Ŝi demandis sin kvazaŭ en sonĝo. Sed ŝia mensio ne povis facile enfokusiĝi. Ŝi ne povis vidi la teron, nur la nigran steloplanan ĉielon. Sed tio tute ne maltrankviligis ŝin. Al ŝi ŝajnis ke ne gravas. Ŝi fermis la okulojn kaj lasis sin pace moviĝi sob.

Ŝi remalfermis la okulojn. Ŝi estas en ia kavbo. Antaŭ ŝi estas aperturo kaj tra ĝi venas lumo. Kaj granda bruo, kvazaŭ de multaj parolantoj. Kaj tondraj ĝemoj kiuj timigas ŝin. Io puŝas ŝin al la aperturo kaj iel ŝi scias ke tien ŝi ja volas iri. Rapide ŝi trovas sin ekster la kavbo kaj ŝi sentas subtenon, kvazaŭ per gigantaj manoj. Denove ŝi malfermas la okulojn. Kiel malgrandaĵ ŝajnas la okuloj. Estas malfacile

enfokusigi ilin. Sed ŝi povas vidi gigantojn. Ŝi malklare memoras ke ŝi spertis ĉion ĉi jam antaŭe - unfoje -- dufoje --- ne, multfoje. Sed la memoro rapide vaporigas. Ŝin atingas la sonoj venantaj el la buŝo de unu giganto: "Estas knabo!" Kaj nun ĉio okazinta forgesiĝas.

O-O-O

Peter ridetis kontente dum li dormis. "Mia kara," li murmuris. "Mia kara!"

Marianne vekis lin. "Peter, vi sonĝas," ŝi diris. "Vi devos pretigi vin. Mi jam sentas la naskodolorojn."

"Jes, mi scias," li respondis. "Gloria revenas al ni."

"Kion?" Ŝi skuis la kapon senkomprene, kvazaŭ kredante lin freneza. "Gloria mortis antaŭ naŭ monatoj jam. Ni komencas nun novan familion."

Peter plu ridetis, sed nenion pli li diris. Kune ili eniris la aŭtomobilon frontan naskospitalen. 0

|Originala angla teksto de la poemo:

Six o'clock. There may be a moon tonight.
At dead Ferriere twitches the comatose star.
A peasant knows the early mosquito bite
Like a stiletto into his wincing ear.
The suave impersonal light
Trails its skirts over marshland: No mourners here,
And Nothing mourns at Nettuno: feel the embrace
Of Nothing scrambling ashore at this child's face.

Six o'clock. And the Miserere*. Final Grace.
And Death and the Woman, strangely at one will place
Ambiguous fingers on all of this child's face.*|

*La "Miserere" = Latina liturgia nomo de Psalmo 51 (Psalmo 50 en la Vulgato). Mi rekomendas ke vi legu tiun psalmon, se vi volas kompreni kiel ĝi rilatas al la poemo kaj al la tuta rakonto. - DB)

AKADEMIAJ STUDOJ 1988-1990recenzita de **Donald Broadribb**

Akademias Studoj 1988-1990, red. Rüdiger Eichholz. Esperanto Press, Ballieboro, Ontario, Kanado KOL 1B0, 1990. 560p. broŝ. Prezo: US \$18.25 inkl. poŝtkostojn (=proks. A\$23. Speciale mendebla pere de la AEA libroservo, aŭ rekte de la eldonisto).

Dum du jaroj ni sentis la mankon de nia ĉiujara esperantologia enciklopedio, sed ĉi tiu trijara volumo estas vere atendinda. Esperantio estas "lando" de multegaj gazet(et)oj, inter kiuj estas diskutitaj sen-nombraj artikoloj pri kiuj plejofte sciĝas nur la malgranda abonantaro de la koncerna gazeto. Ĉar neniu indekso de esperantologiaj artikoloj ekzistas (malsimile al la situacio nacilingva pri multaj fakoj), plejofte profesinivelaj studoj pri nia lingvo perdiĝas por ĉiam. Ekzemple, **The Australian Esperantist** aperas en eldonkvanto de 250 ekzempleroj, kiuj rapide elĉerpiĝas post eldono. En 1983 Eichholz elpensis tre utilan planon: publikigi serion da jarlibroj en kiuj povas aperi altvaloraj esperantologiaj studoj kiuj restos haveblaj sur la librobretroj de esperantistoj kaj esperantistaj bibliotekoj.

Kio plej surprizas estas la malalta kosto de la libro, ebligita per utiligo de la nuntempe familiaraj presmetodoj: zorga preparado de siaj manuskriptoj de la aŭtoroj, perkomputila kompostado, foto-redukto, fotolitografia presado.

La artikoloj en la libro variegas, sed eblas konstati kelkajn ĉef-temojn: historio, signifo, kaj formo de esperantaj vortoj; temologiaj studoj diversfakaj; komputiladaj studoj. Pli ol duono de la volumo estas dediĉita al komputil-studoj.

La plej granda artikolo estas la unuaj du ĉapitroj de nova libro de Eichholz, "Enkonduko en la komputoradon por ne-komputistoj", kies celo estas instrui al personoj kiuj neniam uzis komputilon uzi IBM-kongruan komputilon. Tiu libro estas ankaŭ havebla kiel serio de apertaj broŝuroj po US\$11.50 (inkl. sendkostojn). Post tralego de la komencaj ĉapitroj publikigitaj en la recenzata libro mi avertas interesaton preti aĉeti IBM-kongruan komputilon, ĉar necesas praktiki la instrukciojn donitajn de Eichholz dum oni studas la "Enkondukon". Sed Eichholz faras plurajn gravajn rekomendojn, kiujn oni tralegu antaŭ ol aĉeti. Se vi aĉetos tian maŝinon, mi substrekas la konsilojn de Eichholz: helpu vin

amiko kun bona kono pri komputiloj kaj leginta la rekomendojn de Eichholz, kaj aĉetu nur de bone establita kaj nepre fidinda vendkompanio. Neniam fidu la vendiston solan! Rilate al ĉi tio evidentas ke Eichholz celas ke laŭeble ĉiu komputil-uzanto posedu IBM-kongruan komputilon. Kvankam tio sendube helpus interŝanĝi perkomputiligatajn studojn kaj verkojn, mi opinias tion iom utopia. Tre granda parto de la ekzistantaj esperantistoj posedas ne-IBM-kongruajn maŝinojn, kaj nek povas nek volas aĉeti novan aparataron. Kaj ĉar la Commodore 64 kaj la Apple (kaj Apple Macintosh) komputiloj estas popularegaj, mi dubas la aserton ke 90-95% de la komputiloj uzataj en la mondo estas IBM-kongruaj. Ĉar la instrukcioj donitaj de Eichholz validas nur por IBM-kongruaj maŝinoj, persono kiu posedas alitipan maŝinon ne trovos lian instruaron utila. (Se vi estas senscia pri komputiloj, mi devas eksplicite ke ekzistas neniu unueco inter la diversaj markoj de komputiloj vendataj. Ekzemple, la instrukcioj kaj uzmetodoj de Apple/Macintosh estas tre malsimilaj al tiuj de Commodore 64, de Atari, de pluraj Amstrad-aparatoj, de Brother-aparatoj, kc., kaj ne estas IBM-kongruaj. IBM-kongrua komputilo estas maŝino fabrikita de alia kompanio ol IBM, sed kiu pretendas esti simila al IBM-aparato kaj kapabla uzi samajn programojn. Ankaŭ "programoj" = instrukciaro sur disko, kiun oni devas perkomputiligi antaŭ ol povi uzi la maŝinon, estas propraj al specifa marko, kaj ofte al specifa modelo.) Mi ankaŭ konfesu ke mi estas skeptika pri la komprenebleco de la "Enkonduko" verkita de Eichholz se oni ja estas vera komencanto en la komputil-fako.

Eichholz ankaŭ detale prezentas sian projekton de Pekoteko (vidu la recenzon verkitan de John Mills p11-12 de nia maja numero), kaj donas multpaĝan ekzemplon de ĝi, por ke la leganto povu mem decidi pri ĝiaj utilo kaj praktikeco.

Pluraj artikoloj, de diversaj aŭtoroj, ankaŭ diskutas la formon kaj dezirindecon de diversaj komputil-vortoj. Sed ne supozu ke komputado estas la sola temo de la artikoloj en la libro. Mi trovis speciale interesaj la artikolon de Albault pri la aranĝo de klavaroj en diversaj landoj, de Eichholz pri inicial-vortoj kaj akronimoj, de Golden pri la etimologio de la vorto "birdo" en Esperanto, de Portmann pri propono por kompromiso pri la uzado de la litero Ñ, kaj plurajn aliajn.

Ĉi tiu libro estas utila (kaj komprenebla) nur por spertaj esperantistoj kiuj interesiĝas pri lingvistikaj studoj - al ili mi sincere rekomendas ĝin. Je tiu prezo, via mono tute ne estos perdita! ☐

VIA REDAKTORO HONTAS

En nia julia numero la lasta parto de la recenzo verkita de Niĉjo Nicholas estis senintence ellasita. Eĉ pli malbone, la paĝo sur kiu ĝi devus esti aperinta (p20) anstataŭe havis la ŝercraporton de "Odlo Bok-serp". Tio duobligas la embarason de via redaktoro. Mi petas elkore pardonon de la aŭtoro kaj de la legantoj. Jen la ellasita parto de la recenzo:

Tri liaj poemoj eniris la Auld-an Antologion, kaj mi tiujn ne trovis atentindaj. Lia posta verkado ne ŝajnas al mi multe pli bona. Ankaŭ la homaranismo de Boulton min ĝenas, do ne akceptu mian opinion senkritike, sed la latente partieca homaranismo, laŭdado al Vjet-Namo kaj malnovmodaj scenpriskriboj apenaŭ ŝajnas al mi legindaj en komunumo jam elkoninta Auld, Ragnarsson, De Kock, Sadler kaj Balbin. La tempo postulas ion ekstreman; la verkaro de Grigorov ne harmonias kun tia ĉirkaŭaĵo. Al aliuloj eble ĝi tamen plaĉos, min ĝi ne impresas. Enestas ankaŭ tradukaro de diversaj bulgaraj poetoj. Oni trovas pli da vario tema ol ĉe la supraj tri poetoj, kaj la verstekniko preskaŭ tolereblas - kvankam ankaŭ Grigorov kulpis aĉaĵojn ĉe Smirenski kaj Vapcarov. Oni zorgu pri sia merkato!

O-O-O

NOVA MUZIKA GAZETO

La Muzika Esperanto-ligo estis fondita en 1963, sed inter la mezo de 1989 kaj la mezo de 1990 dormis. Nun reaperis ĝia kvaronjara gazeto **Muziko**, bulteno kiu "devas esti interesa por muzikinstruistoj kaj por komponistoj; por muzik-spertuloj kaj por muzik-amantoj; por junaj kaj maljunaj, por ke ĉiu leganto povu trovi ion interesan por si mem." Tre modesta eldonaĵo, sed kun pian-muziknotoj, korespondpetoj, kaj planoj por muzikeventoj esperantaj.

Jarabono al la bulteno **Muziko** kostas A\$16 (kio inkludas bank-kaj poŝt-kostojn). Mendo de la aŭstralia reprezentanto: Kay Andersen, 19 Sherley Street, Moorooka QLD 4105. La adreso de la redaktoro estas: Dimitar Terziev, ul. Milin kamak 58, Sofia, Bulgario.

Jen io unika en la mondo. Ne lasu ĝin morti.

KREI NOVAJN VORTOJN (LAŬ-FUNDAMENT-AJN)de **Marcel Leereveld**

(Parto 3)

A) Esperantiĝendas "The horse came out second best."

"To come out": certe ne "elveni", ĉar el kio ĝi "elvenis"? Nek "eliĝi", aŭ "emerĝi" aŭ "elmergiĝi", samkiale. Nek "debuti" ĉar ĝi konkuris (!) jam antaŭe. Nek "solviĝis" ĉar ne temas pri ekzameno. Nur taŭgus "rezultis": tamen tio ne eblas ĉar ne la ĉevalo rezultis sed la dua pozicio rezultis, por la ĉevalo. Do mi devas serĉi alie, ĉar rezultigi aŭ rezultigi ne taŭgas; nur io kia "la por la ĉevalo dua pozicio rezultis". "La ĉevalo finis..." Ĝustas, sed ne enhavas la sencan de neatenditeco. Do mi fine akceptas la iom longan "la ĉevalo havis la rezulton esti dua alvenanto" (aŭ "...esti la plej bona post (malantaŭ) ...".) Nepre ne "la dua plej bona"!

B) "That behaviour is questionable, so it is out of the question."

Por ŝpari tempon (= falsa ekonomio!) mi povus uzi "demandebla". Sed konkuto ne estas demandebla aŭ nedemandebla en certaj kazoj, ĉar oni ĉiam povas (kaj rajtas) demandi iun ajn konduton aŭ pri iu ajn konduto. Do ĉia konduto, ĉu "questionable" aŭ ne, estas "demandebla". Kaj kaze ke oni demandas konduton, ĝi povas signifi la kontraŭon de "questionable": ĝi estas "unquestionable". Notu la mallogikecon de la angla vorto, kiu eĉ pli klaras en la pli ĝustaj tradukoj "postulebla" kaj "petebla". Se io estas "questionable", ĝi vere estas necerta en la sencoj de honoro, honesto, saĝo, kaj vero. Do por "questionable" mi devus uzi "honorduba" aŭ "honestduba" aŭ "saĝduba" aŭ "verduba". "Out of the question" ne povas esti "ekster (el) la demando", ĉar ĉilasto signifas ke la konduto ne estas parto de la demando; sed tute ne temas pri "demando" (nek pri postulo nek pri peto); temas pri neeble akcepti ĝin, do "ne-akceptebla" aŭ "ne-konsiderebla" (aŭ "konsidermalebla": komp. "kormalsana" anstataŭ "mal-korsana").

C) "I entered a unisex barber shop" estas la tradukendaĵo.

Sed antaŭ ol eniri mi vere bezonus unue demandi por kiu sekso la bu-

tiko estas, ĉar la stranga angla misnomo "unisex" signifas la kontraŭon de tio kion oni volas diri (nome "one sex"). Ĉar la butikoj celas servi la du seksojn, ĝi devas titoli "ambisex", Esperante "ambaŭseksa (barbirejo)".

Ĉ) Tradukendas "Go back! Wrong way!"

Trafiksignaloj devas ne esti longaj; pro tio la (ĉu akceptinda?) neologismo "liva" (= "maldekstra"). Ankaŭ trafaj, tuj kompreneblaj, kaj sendubaj. Do anstataŭ "Reiru" kiu povus signifi ankaŭ "iru ree", "ripetu la iradon" kaj anstataŭ "returniĝu" kiu estas tro longa kaj neklara, mi uzus "Retroiru!" aŭ "Retroe!", aŭ eĉ pli simple "Retro!". Aŭ pli forta, "Retrou". Mallonga por "Wrong Way" eblus "Misvojo!" mallonga sed iom malforta por danĝera situacio. Krome ĝi vere devus esti "misdirekto". Eble ne pli konsilinde, mi tamen preferus tute malsaman tradukon, nome "Malpluu! Danĝer(eg)oi!"; "malplui" signifas la kontraŭon de "daŭrigi", do "retroiri". Danĝero ne nepre signifas ke la vojo estas por la kontraŭa direkto, sed ie sendube estos ankaŭ la averto "No entry!", "Ne eniru!".

D) Mi volas traduki "round trip ticket".

La angla-usona vorto estas misnomo: la vojaĝo tute ne estas ronda aŭ rondira, nek ĉirkaŭ io, sed rekte ien kaj rekte revena. Do ne eblas uzi "rondvojaĝo" aŭ "ĉirkaŭvojaĝo", kiuj estas tute aliaj aferoj. Fakte en neniu de mi konata lingvo ekzistas (eĉ ne kombina) vorto kiu esprimus la du nociojn iri kaj reveni en unu vorto. Nek en Esperanto. Anstataŭe oni ĝenerale uzas "return ticket" por ambaŭ, sed en Esperanto tio signifus la bileton nur por la reveno. Ekzistas unu vorto, tamen, kiu povas, sed ne necese, signifi ambaŭe iri kaj reveni, nome "bumrango" (mi ellasas la "e" de la PIV-vorto "bumerango", ja sone negrava en la angla - ju pli mallonga la esperanta vorto, des pli bona). Do "bileto por bumrangvojaĝo". Mi ŝatas la esprimon, sed hazarde memoras ke en certa maniero en Esperanto oni povas fari "vorton" kies du partoj, kun du apartaj sin ne determinantaj signifoj, samfunkcia kuniĝas kaj do rezultigas duoblan adiciitan signifon. Tiel mi trovas "ir-revenbileto", kiun esprimon mi preferas kiel la plej klaran. Notu ke mi uzas dividstrekon, kiu ja funkcias ĉi tie kiel adicisigno ("vojaĝo de iri kaj de reveni"), same kiel en membro-abonanto", "franca-germana", "am-malamrilato", kaj "ĝi grimpadas-refaladas ĝis la morto". Ĉe ĉi antaŭaj kombinaĵoj (Ankaŭ ĉe "Esp-o", ĉe "aŭto-aerbrems", ktp., kaj ĉe linifina

rompo) la celo de la streketo estas rompi la normalan regulon en Esperanto ke ĉiu parto de kunmetita vorto sence determinas la tuj sekvantan (se ĉi lasta ne estas adjektiveca determinantaĵo); estas konsilinde uzi la dividstrekon en kunmetitaĵoj nur por tiu celo.

La facilanman neologismemon helpas PIV, ĉar la esperanta publiko senkritike akceptas kiel uzindaĵn ĝiajn multegaĵajn neologismojn nenecesajn kaj tiel ekuzadas ilin. Tiu neologismema inklino ne nur nenecese balastas nian lingvon, ĝi samtempe kaŭzas ke ni inklinas ne plu serĉi por nia uzo vortojn kaj esprimojn fareblajn nature per la kunmetado de vortoj kaj vortetoj. Ni povas eĉ rimarki tendencon ne plu uzi zamenhofan kunmetaĵon se iam ie renkontiĝis neologismaĉo (= neologismo nenecesa) por la koncerna nocio. (Mi atendas ies verkon pri tiaj.) Kaj kia malŝparol Ni povus kaj devus krei multajn "novajn" kunmetaĵojn eblajn por plinuancigado, aŭ por forĵetado de neologismaĉoj. Permesu al mi doni kelkajn ekzemplojn (eble jam iam uzitajn sed de mi ne viditajn):

- naĉilingvumi (anstataŭ la monstra mismetaforo "krokodili")
lumfiltra + netravidebla (= opaque, anstataŭ "opaka"). [Eble nuance diferencaj de la oficialaj "diafana"/"maldiafana"? - La Red.]
taĉdormeto (= siesta).
la kreego (= the Creation).
mishoro (= la malĝusta hortempo, the wrong time).
malveki (= ekdormigi).
aŭdigilaro (= |hi-fi| system).
malpost (en "paroladi antaŭ la Kongreso malpost la prezidanto").
inventulo (= inventive person).
malsanĉa (= permanently ill. Nuanco de la oficiala vorto "invalida").
 Li estas ne farema, sed nur ekema (jumps from one thing to another).
ekmalrevi (= to get back to earth, to reality).
ekigo (= "lanĉo").
fameta kaj diskonata (por la du signifoj de "renoma").
dispensi (= to wander in one's thoughts).
paroleti esperante (= anstataŭ la dua signifnuanco de "balbuti").
ekspluvo (= propluva akvo restanta aŭ flueganta sur la tero).
lia subo (= subeco, esti sub aliaj)
la poro kaj la kontraŭo de (= al) agmaniero.
la enaĵoj (= contents) kaj la elajoj (= eloj moviĝas el io)
 Lia parolado ne prias (= is about nothing).
 La turistoj devas poi (= esti en samnombraj grupoj).

TREVOR STEELE SKRIBAS

Karaj gesamideanoj, en septembro mi vojaĝos al Sovetunio pro personaj kaj profesiaj kialoj. Tio ne signifas, ke mi neglektos nian lingvon: estas jam aranĝite, ke mi pasigu la unuajn kvin semajnojn vojaĝante al diversaj urboj de SU, propagandante kaj instruante ĝin. Mi eĉ aperos kiel "ekzotikulo" en radio- kaj televidprogramoj. Krom tio mi esperas regule sendi raportojn al vi el Kievu, kie mi loĝos.

Dum mia foresto nia afero estos en bonaj manoj: Kep Enderby anstataŭos min kiel prezidanton de AEA, kaj Don Broadribb estos la ekzamenkomisionon.

Mi probable revenos al Aŭstralio iam en 1991.

(Kaj al Trevor Steele ni deziras ĉion bonan dum lia foresto. La Red.)

o-o-o

NEKROLOGO

AUDREY CHILDS-MEE (1926-1990)

de Ray Ross

Forpasis, la 16an de majo, en Kibworth, Leicester, Anglio, Audrey Childs-Mee, Honora dumviva membro de A.E.A. Ŝia membreco estis proponita kaj akceptita en la kadro de la 27a Aŭstralia Esperanto-Kongreso en Sidnejo, 1980. En 1979 Audrey estis invitita al Aŭstralio, por propagandi Esperanton kaj samtempe konigi al aŭstraliaj grupoj sian rektan metodon de instruado. Tiujn du celojn ŝi sukcese plenumis dum la Esperanto-Somerlernejo de A.E.A. en Toowoomba, 1979. Sekvis vizitoj al diversaj Esperanto-grupoj en Aŭstralio, kiam ŝi vigle propagandis Esperanton per televido, radio kaj la gazetaro. Pro la forpaso de Audrey, anoj de nia Aŭstralia Asocio perdis kaj amikinojn kaj samideaninojn. Ni omaĝas al la memor' de vera sinjorino.

(Postnoto: Audrey Childs-Mee estis sukcesa aŭtoro de inostrulibroj kaj de verko de infanliteraturo. Ankoraŭ neeldonita estas ŝia traduko de The Magic Pudding. La Red.)

ESPERANTA EKSPOZICIO POR ANOJ DE KONGRESO DE PRIVATAJ LERNEJOJ

de **Max Wearing kaj David Brewer**

Dum tritaga kongreso de aŭstraliaj privataj lernejoj en Hobarto (20-22 aŭgusto 1990) David Brewer kaj Max Wearing staris apud la nove ĝisdatigita kaj rebeligita Turman-ekspozicio pri Esperanto.

La aranĝojn por la partopreno faris D-ro Dudley Parkinson (prezidanto de la Esperanto-klubo en Hobarto) kun financa subteno fare de la estraro de AEA. Ĉar la kongresdelegitoj preteriris la ekspozicion plurajn fojojn ĉiutage, ili ne povis ne rimarki, ke Esperanto ankoraŭ vivas. Dank' al aparatoj pruntedonitaj de David kaj Gail Brewer, la kongresanoj aŭdis kantojn en Esperanto kaj spektis televid-filmojn pri Esperanto - inter ili la lecionaron faritan de la Esperanto-movado en Ĉinio. Oni vidis ankaŭ lecion-afiŝojn faritajn de David Brewer, kaj afiŝon pri la vojaĝpremio antaŭnelonge reklamita en The Australian. Estis ankaŭ lernolibroj, propagandiloj senditaj de la AEA-libroservo en Sidnejo, kaj kopio de la reserĉprojekto de Dianne Lukes.

Por simpleco, tro multajn aĵojn oni neniam montris. Por diverseco, ĉiutage kelkajn novajn aĵojn oni montris kaj la budon oni rearanĝis.

Kompreneble neniu lernejestro anoncis tujan intencon okazigi Esperanto-lecionojn en sia lernejo, sed kelkaj el ili parolis kun David kaj Max, kaj ŝajne interesiĝis pri (ekzemple) DLT kaj la nuntempa disvastigo de Esperanto en universitatoj kaj aliaj lernejoj tra la mondo.

Oni bonvenigis David kaj Max en la solan kunvenon, kie oni preparolis speciale la instruadon de fremdaj lingvoj. Ĉi tiu temis pri meminstruaj programoj en la lernejo Launceston Church Grammar School. Post la kongreso oni montris la Turman-ekspozicion en la biblioteko de The Hutchins School en Hobarto.

Je la fina tago de sia vizito Max donis neformalan prelegon kaj rektmetodan lecionon laŭ la sistemo de Audrey Childs-Mee al tri neesperantistoj por ke David povu lerni ion pri la metodo. Kompreneble nun estas tri pli da Esperanto-interesiĝintoj en Hobarto.

Ni tre dankas al Richard Parkinson kaj Ray Harper pro ilia helpo pri la transporto kaj starigo de la Ekspozicio.

MALDEKSTREMULOJ KAJ ALIAJ!

de Max Wearing

Atentu maldekstremuloj, vojaĝemuloj, korespondemuloj! Nun haveblas kelkaj ekzempleroj de la Amikeca Reto de SAT 1990-1991 (libro de 100p.) kun 268 adresoj en 33 landoj (prezo \$AS10) de Max Wearing, 30 Westbury Street, Hackney SA 5069. ☐

DEZIRAS KORESPONDI

kun aŭstralia samideano/ino pri kutimoj kaj historio

S-ino Klaske van der Meulen

Woerdes 61

9407 C L Assen

Nederlando ☐

rubriko de odlo bokserp

Demando: Ĉu estis eraro en la majo-junia numero, p9 & 27, pri numero 4 de "Provu vian vortoscion", la respondo por demando 4: bebo=svingilo?

Respondo: nia redaktoro diras ke la ĝusta respondo estis infaneto, sed mi malakordas kun li. Kiu ne vidis plenkreskulon ĉirkaŭsvingi beb-on en la aero por amuzi sin? Do se ne svingilo, almenaŭ svingaĵo. Tamen, mi konfesas ke la originala manuskripto ja diris "infaneto" kaj mi devis kaŝe ŝanĝi la tekston por ĝustigi la respondon malgraŭ la protesto de lia Moŝto la redaktoro.

RESPONDOJ POR "PROVU VIAN VORTOSCION"

1.a; 2.c; 3.ĉ; 4.c; 5.b; 6.b; 7.a; 8.a; 9.c; 10.b; 11.a; 12.b; 13.b

LUKA BULTENO

Unu el la plej bone redaktataj gazetoj en Esperantio estas la modestaspekta Luka Bulteno. Se vi deziras amuzon, ĝisdatajn neatenditajn informojn kaj lingvonotojn, provu ĝin. Mendu de Astrid Riessen, PO Box 218, Belair SA 5052. Ne nur junuloj ĝuas ĝian freŝspecan enhavon.

RETROKOMENTE**RETROETNEMOK****ETNEMOKORTER****Reage al la artikolo de Brian Currie (Julia T.A.E.)**

Mi kredas ke tromultas artikoloj pri manko de junuloj en A.E.A. Mia opinie oni tute preteratentas la neceson ke junuloj studu kaj ŝparu en la moderna Aŭstralio ĝis grado neniam spertita de nia (aŭ pli frua) generacio. Ni de antaŭaj generacioj elspesis la krediton de nia lando (por persona komforto), ĝuas longan postemeritiĝan sanon kaj komforton. Subite post elreviĝo pri imperiestraj privilegioj, niaj junuloj sin trovis en mondo renversiĝinta. Ili heredis niajn ŝuldojn. Nun necesas ke du personoj devas enspezi kaj prokraski naskojn ĝis ili sufiĉe gajnas kaj oni postulas de junuloj kapablojn kiujn ni neniam havis! Sekve nia postulo ke junuloj entreprenu idealistan movadon estas naiva. Ili streĉas sin pro financaj kaj familiaj devoj, enparte kiel rekta rezulto de la vivo kiun ni ĝuis! Ni emerituloj kiuj ne plu havas tiajn respondecojn prizorgu idealojn ĝis ili elpagos niajn ŝuldojn aŭ emeritiĝos!

Tom Elliott

REKLAMOJ PRI ESPERANTO

En **The Weekend Australian** de 28-29 julio aperis reklamo pri la Einhovici-Fondusa stipendio por ebligi ke juna esperantisto partoprenu la TEJO-kongreson en 1991. Alvenis 43 respondoj.

La tutnacia televida intervjuo kun nia vicprezidanto Kep Enderby dum la **Ray Martin Show** la 2an de julio vekis interesiĝon en kelkaj spektantoj. Sekve de la programo ĉ. 20 telefonvokoj atingis nian sekretarion Ray Ross petante informon pri Esperanto, kaj 12 kursoj de Esperanto estis venditaj. 4 junuloj (20-30 jaraĝaj) membriĝis en la Asocio.

[La intervjuo mem estis tre bone kaj tre favore farita de Ray Martin kaj Kep Enderby, kiu montriĝis korvarmiga, sciplena, serioza advokato por Esperanto. Ĉar la Ray-Martin-programon spektas ĉiutage pluraj milionoj da personoj, ni devas demandi al ni kial nur tia manpleno da personoj volis pliiinformiĝi. Simile pri la reklamo en **The Weekend Australian**. Ĉu el 17 milion loĝantoj en Aŭstralio nur 63 personoj interesblas pri Esperanto? Vere ni devas plu plugi la teron.

La Red.]

Marianne senespere demandis: "Ĉu oni rifuzis kontaktigi vin?"

"Oni kontaktigos min kiam eblos," Peter ripetis. "Kaj sendube ili intertempe kontrolas por trovi ĉu mi rajtas postuli prioritaton. Kaj oni certigos ke mi ja estas mi, ĉar ili uzos mian sekretan telefonnumeron."

Tiomomente sonoris la telefono kaj Peter reprenis ĝin.

"Parolas la internacia informservo," diris la voĉo. "Mi bedaŭras informi vin ke la flughaveno en Sidnejo ne akceptas telefonkontaktojn. Okazis grava aviadakcidento kaj ili akceptas kontakton nur kun sia serĉistaro."

"Kiun telefonnumeron havas la gepatroj de Roland?" Peter flustris al Marianne. Ŝi transdonis al li libreton en kiu ŝi jam ĵus metis cirklon ĉirkaŭ la numeron de la familio Schreiner en Melburno. Kaj ĉi-foje ŝi premis sian oreilon apud lian por aŭdi la tutan konversacion.

Peter voĉlegis la numeron kaj post kelkaj sekundoj telefonkontakto establiĝis. Respondis Nancy Schreiner. Li transdonis la telefonon al Marianne.

"Parolas Marianne," ŝi komencis diri, sed ŝin interrompis la voĉo de Nancy, kiun ŝi preskaŭ ne rekonis pro la plorado.

"Ilia aviadilo - flugnumero 735 - ni provis telefoni al la flughaveno por trovi ĉu ili estis en la aviadilo, sed oni ne akceptas telefonantojn. Ni nur esperegas ke ili ne eniris la aviadilon. La melburna flughaveno nur diras ke laŭ la komputiloj ili atingis Sidnejon kaj enskribis sin por la flugo al San Francisko."

"Neniu espero eblas," diris Marianne per lacega voĉo. "Ili estis en la aviadilo. Ili mortis. Mi vidis. Estas vero."

"Kion vi diras, 'vi vidis'?" vekriis Nancy.


"Dum mi dormis mi vidis ĉion: la aviadilon, la ŝtormon, la fulmon, mi eĉ aŭdis la eksplodon. Kaj restis nenio. Eĉ ne peceteto. Timego min vekis. Peter ŝaltis la radion kaj oni rakontis precize kion mi vidis, do mi scias ke estas vero. Ho, ni devas preĝi por iliaj animoj, Nancy!"

The Australian Esperantist

Numero 264

NOVEMBRO-DECEMBRO 1990

Registered by Australia Post
Publication no. WBG 2488



Ekzamenrezultoj ... p.3

Al giganto: omaĝe al Gustav Mahler (Niĉjo Nicholas) ... p.4

Kiu diris tion? (Ralph Harry) ... p.6

Recenzoj: Vivi Estas Danĝere; Ĝna Antologio ... p.7

Ekskursoj dum la somerlernejo (Bob Felby) ... p.10

Memorige al Thea Van Den Boogaard (Max Wearing)...p.13

Spertoj (1) (Donald Broadribb) ... p.15

Ion pri Sovetia Televido (Trevor Steele) ... p.24

Diversaĵoj: p.11, 12, 20-23, 25

English Supplement

THE AUSTRALIAN ESPERANTIST

Oficiala organo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio

Redaktoro: Donald Broadribb, 46 Great Eastern Highway, Bakers Hill
WA 6562. Telefono: (09) 574 1307. Fax: (09) 574 1298.

Prov. Prezidanto: Justice K. Enderby, 2 Phoebe St, Balmain NSW 2041.

Vicprezidanto: Vera Payne, 36 Donegal Rd, Floreat Park WA 6014.

Sekretario: Ray Ross, 41 Agnes St, Sunnybank QLD 4109.

Vicsekretario: Herbert Koppel, GPO Box 2122T, Melbourne Vic 3001.

Kasisto: Owen Loneragan, 16 Deverell Way, South Bentley WA 6102.

Libro-Servo: Tom Elliott, PO Box 230, Matraville NSW 2036.

Korespondaj kursoj: John Moore, 7 Pelican St, Emu Park QLD 4702.

Prov. Prezidanto de la Ekzamen-Komitato: Donald Broadribb (adreso sup-
re).

P.R.O. (Oficisto pri Rilatoj kun la Publika): Dennis Murphy, 79 Binna-
long Rd, Old Toongabbie NSW 2146

Membreco: \$25 por individuo, klubo kc.; \$30 por familio (ĉiuj ĉe la sa-
ma adreso); \$15 (minimumo) por pensiulo aŭ studento. Bonvolu sendi vian
kotizon al la kasisto aŭ al la Libro-Servo.

Bonvolu avizi la redaktoron se via adreso estas neĝuste presita sur la
adreslipeto, aŭ se vi ŝanĝas vian adreson aŭ/kaj nomon.

Sendu ĉiujn komunikaĵojn, artikolojn, librojn por recenzo kc. al la re-
daktoro. Limdato por alsendo de presotaĵoj por la venonta numero:
1 januaro.

SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO verku artikolon!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron
de THE AUSTRALIAN ESPERANTIST "ni vere bezonas artikolon pri..."? Do
sendu tiun amatan eseon, ideon, rakont(et)on, esprimon de vidpunkto,
ŝercbildon. Ni ĉiuj volos legi ĝin! Preparante la tekston, bonvolu
atenti la ĉi-sekvajn postulojn: la teksto devas esti klare tajpita, per
nova rubando kaj kun duobla spaco inter la linioj kaj margenoj de
almenaŭ du centimetroj. Tajpu sur nur unu flanko de ĉiu folio. Netaj-
pitaj tekstoj estos malakceptitaj. Por konservi la lingvan nivelon de ĉi
tiu gazeto la redaktoro rajtas korekti ĉiun tekston antaŭ aperigo. Laŭ-
bezone ĝi povos esti mallongigita de la redaktoro. Ni ne povas promesi
aperigon en la tuj sekvanta numero, krom se temas pri kronologie urĝa
teksto.

EKZAMENREZULTOJ

Ĉi-jare Nick ("Niĉjo") Nicholas brile sukcesis ĉe la Klereca Ekzameno.

Niĉjo do apartenas al la malgranda grupo da "kle-ruuloj": Marj Ellyard, Ralph Harry, Fay Koppel, Ray Ross kaj Trevor Steele. Kaj Niĉjo estas ankoraŭ en la dua jaro de sia universitata studo!



Malgraŭ sia juneco Niĉjo montris en ĉiuj respondoj altan lingvan kapablon kaj sendepandan analizon surbaze de diligenta esplorado kaj propra gusto.

Ni varme agnoskas lian elstaran atingon, des pli ĉar li estas unu el la malmultaj junuloj en nia landa movado. Ni deziras al li sukceson en ĉiuj projektoj, nelaste sur la kampo de la internacilingva literaturo.

Trevor Steele

Estro de la ekzamen-komitato.

Ni deziras ankaŭ gratuli Gillian Hopkinson (Qld) pro ŝia sukceso en la Elementa Ekzameno.

MILLICENT HARRY

NEKROLOGO

Mortis en Launceston, Tasmanio, la 22an de oktobro, Millicent Harry, fratino de Ralph.

Millicent lernis Esperanton en Hobarto en la tridekaj jaroj. Ŝi ne multe praktikis, sed ĉiam subtenis la movadon. Antaŭ dek jaroj ŝi persvadis la Unuiĝon de Kristanaj Virinoj por Abstemio (Women's Christian Temperance Union), de kiu ŝi estis la tutmonda prezidanto, akcepti rezolucion favoran al la Internacia Lingvo. Poste tiu organizaĵo partoprenis en la "Labora Grupo" de AEA kaj aperis artikoloj pri la lingvo en ĝia organo.

Ralph Harry

AL GIGANTO: OMAGE AL GUSTAV MAHLER
de Niĉjo Nicholas

Malgrasa judo aŭtokrata.
kun micpio kaj pudoro;
juna edzino ne seks-sata;
posteno alta, kun honoro
(sed, domaĝinde, ne favoro):
somere verkis li - ne gemojn,
jam mondevastis la laboro:
li vere kreis kosmoskemojn.

Komplezi per nestrebo glata
al rigidema gust-doktoro
ne celis li - ĉar delikata
ne povas esti mondangoro,
kaj ne brideblas verkogloro.
Ne volis malpliecajn temojn,
li timis plejon, kun stentoro;
tiel li kreis kosmoskemojn:

herooj kaj renask' beata,
Pan, infaneca fidfervoro,
funebro ĝojen kordilata,
kaj tragedie ŝira ploro,
gajo, jubilo kaj adoro,
ekdubo fronte mortproblemojn,
kaj fine pac' post vivhororo:
li jam finkreis kosmoskemojn.

La kritikado - senkompata
("Jen superfluas tiu koro!");
kaj pro la sort' trifoje bata,
marasmis fine lia koro.
Li entombiĝis sub marmoro.
Ne surskribiĝis li poemojn,
ĉar ne necesis pridekoro:
li vere kreis kosmoskemojn.

Veron li verkis, laŭreata
al nia temp' kaj nia moro.
Patoŝis li, aŭtoritata
pri homaj sento kaj doloro.
Obsedis lin anim-esploro
totala: paŭsis niajn memojn,
kaj la rezulta malrigoro
sincere kreis kosmoskemojn.

Hieraŭ estis ignorata -
hodiaŭ trovas lin furoro,
kaj morgaŭ ... nu, laŭdado flata
utilas sole al retoro.
Sed li, delonge jam vaporo,
per verko tiajn sent-ekstrecojn
dum unu kaj duona horo
kaŭzas ... ĉar kreis kosmoskemojn.

Princ' Gustav! Kara Direktoro!
Mi ne scipovas rekviemojn,
sufiĉu do ĉi metaforo:
Vi vere kreis kosmoskemojn.

KIU DIRIS TION?

(Citaĵkvizo 1)

de **Ralph Harry**

Jen kelkaj eminentuloj. Citaĵoj el iliaj verkoj kaj diroj sekvas.
Penu parigi la personon kun la spritaĵo.

- (a) L.L. Zamenhof
- (b) W. Shakespiere
- (c) Moliere
- (ĉ) Kabe (Kazimir Bein)
- (d) Horacio
- (e) Teo Jung
- (f) Karl Markso
- (g) Mme de Sevigné
- (ĝ) Julio Baghy
- (h) Elizabeth Barrett Browning

1. Se vi min devas ami, estu ĝi pro nenio
Escepte nur pro amo
2. Religio ... estas la opio de la popolo
3. Oni devas manĝi por vivi, ne vivi por manĝi
4. Ju pli mi konatiĝis kun viroj, des pli mi admiras hundojn
5. Dolĉe kaj dece estas pro patrio morti
6. Ni iru kuraĝe antaŭen, ĉar nia afero estas honesta kaj utila
7. La poetoj estas danĝeraj homoj
8. Ŝajne la sinjorino tro insiste ĵuras
9. La vagabondo pro la ĝoj' per kanto oratoras
10. Ne kuraĝon perdu, fratoj.

Respondoj sur p27.

VIVI ESTAS DANĜERE

recenzas Ralph Harry

Vivi Estas Danĝere, de Istvan Nemere. Hungara Esperanto Asocio. 159p., broŝurita. \$15 de la AEA-Libroservo.

Lernanto de lingvo bezonas ne nur grandan literaturon sed ankaŭ distran legaĵon. En esperanto eldoniĝas multaj ekzemploj de detektivroman-
oj. Oni pripensu nur librojn kiajn **Murdo en la Orienta Ekspreso** aŭ **Morto de Trajno**, aŭ la krimmisterojn de Claude Piron.

En listo de nia Libroservo **Vivi Estas Danĝere**, verkita de la hungara Istvan Nemere, estas nomita "krimromano". Fakte ĝi estas streĉa aventura romano, ne pri la eltrovo de krimulo sed pri la strebado de grupo neoficiala kapti militkrimulon, kiu eskapis el la normala justico.

La intrigo estas simpla sed atentotena, la roluloj estas variaj kaj iliaj karakteroj kredeblaj. De tempo al tempo, dum paŭzas la agado, la aŭtoro enmetis ĉarman priskribon de la vidaĵoj kaj sonoj de la scenejo. Do tre ĝuebla romano.

La stilo plejparte fluas glate. Nemere uzas kaj bazajn, eĉ antikvajn vortojn (malmola, flugmaŝino) kaj neologismojn (dura, ŝriki, frida, omena, brutala). Estas ankaŭ esprimoj ne ofte renkontataj, tamen laŭ-regulaj (grandurbo, restigi). Nur malofte oni devas dubi pri la signifo (... trapasinta multajn frontojn, p8; konfiduloj, p9; ne flatu al mi p13; dumpasinte, p15; ktp).

Bedaŭrinde estas ankaŭ preseraroj kaj malglataĵoj malimitendaj: pro-
pramene, p11; ekekhaltis, p15; ili ridegis altege, ke vibris la krista-
laj lampoj, p23; Ili laboris sub tia klimato, p26; pasporton diplomitan
p27; Mi aĉetis mapon kaj metis surtablen, p33; ruliĝis sub unun el la
aŭtoj, p41 - vidu ankaŭ p58 kaj p77; Oni ne povas scias, p46; Ni ne
plu havis jam tempon, p54; ili ne povis sciis, p72; Vi estus certe, ni
ne rezignis (lingvo de analfabeto?), p75; la knabon ankoraŭ dormis,
p82; virino li estis, p86; dekkvar taga malliberejo, p90; estas varmege
(ŝerco?) p93; li estos ... ien en Nottingham, p95; pri tiu laboron,
p103; mitreletoj, p123; Mi ne neas iomete admiris, p141; sekstatura,
p150; mi sentis la odoron, p158 ...

|listo mallongigita - red. |

Bona libro por gruplegado.

ĈINA ANTOLOGIO

recenzas Donald Broadribb

Ĉina Antologio, 1949-1979, red. Zhao Muning. Beijing: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1989. 417p., bindita. Prezo: \$13.60 de la AEA Libroservo.

Efektive, ĉi tiu estas la dua volumo de la Ĉina Antologio. La volumo por la jaroj 1919-1949 eldoniĝis en 1986. Ĉi tiu volumo do temas pri la tridek jaroj post la establiĝo de la Ĉina Popola Respubliko. Tamen, ne aperas en ĝi verkoj eldonitaj dum la Kultura Revolucio (1966-1976), ki- am, laŭ la vortoj de la prologinto, "Preskaŭ ĉiuj honestaj verkistoj estis pli aŭ malpli persekutitaj, kalumniitaj, turmentitaj aŭ malhonor- igitaj ... Dum tiuj ĉi dek jaroj troviĝis preskaŭ neniu valora literat- uraĵo".

La libro estas dividita en tri ĉefpartojn: noveloj (14), eseoj (17) kaj poemoj (20) plus unu "raportaĵo", kaj helpaj biografiaj notoj pri la aŭtoroj. Plejparte la datoj de la diversaj verkoj ne estas indikit- aj. La noveloj estas sufiĉe longaj por esti kompletaj rakontoj (la ave- raĝa longo estas 20 paĝoj), kvankam ŝajnas ke ili estis mallongigitaj por la Antologio. La eseoj estas nelongaj, nur kelkpaĝaj, kaj tiaj est- as ankaŭ la poemoj.

Kion oni atendu de ĉi tia Antologio? Evidente ĝi multe malsimilas al nia A ŭ s t r a l i a A n t o l o g i o, en kiu aperis nur tre mallongaj ekstraktoj el romanoj plus tre malgranda nombro da noveloj, kaj, kompreneble, ankaŭ poemoj. Komparante ilin en mia menso, mi kredas ke la ĉefa diferenco inter la du Antologioj estas ilia celo. La Aŭstra- lia celis konigi la spektron de la aŭstralia literaturo de la komenco ĝis hodiaŭ, kaj tiucele oni elektis "tipajn" verkojn el ĉiuj periodoj, sen atento al la "mesaĝo" trovebla en la verkoj. Male, la Ĉinaj verkoj klare celas konigi la sentojn kaj staton de la popolo tuj post la Revo- ucio, kaj ĉiam kun kerna mesaĝo: "Tiel oni suferis antaŭe, nun ni povas feliĉi pro la nova sociordo". Tio ne signifas ke kritiko pri la kondi- ĉoj mankas - pluraj el la noveloj estas tre pesimismaj pro la daŭranta korupteco de la lokaj kaj regionaj politikistoj - sed la temo "Ni konstruas novan sociordon" estas preskaŭ ĉiupaĝe trovebla. Mi demandas al mi, kial oni bezonis tiom emfazi al la propra popolo ke la nova sociordo estas pli bona ol la malnova? (Ĉar oni ja ne verkis ĉi tiujn rakontojn por la eksterlanda publiko!) Tio ne signifas ke la tradiciaj

temoj de noveloj mankas: amo, esperoj, planoj, seniluziigo, memoroj, kc., sed plejofte ili estas nur duarangaj intrigoj post la prievolucia mesaĝo. Tamen, kelkaj el la noveloj estas ĉarma escepto, kaj eĉ pri-Partiaj rakontoj povas esti literature valoraj. Antaŭ ol tro kritiki, ni memoru la karakteron de la romanoj de Charles Dickens, John Steinbeck, kaj de la dramoj de Tennessee Williams, samtempe sociopolitika, kaj majstroverkoj. Domaĝe, aŭtoro de tia literatura staturo markas en ĉi tiu Antologio.

La redaktoro tre meritoplene prizorgis la verkon. La preso estas ĉiam klara, kaj preseraroj malabundas (nur manpleno en preskaŭ duonmilpaĝa antologio!). La polurintoj de la esperanta stilo iom tro fervore laboris - tro ofte diferenco inter la stiloj de verkintoj malaperis. Kaj, iom strange, ĝenaj anglismoj (!) tro rimarkeblas. Neĉina leganto bonvenigus informon pri la prononco de multaj propraj nomoj. La notojn pri ĉinaj kutimoj kaj aludoj, tamen, mi trovis tre helpaj, multe pli ol tiujn en la Aŭstralia Antologio. Kaj la biografietoj ĉe la fino de la libro estas modelo sekvinda.

Apartan komenton mi deziras fari pri la ilustraĵoj. Unuavide mi sentis ŝokon pro ilia stranga desegnostilo - kiu estas miksaĵo de la tradicia ĉina stilo kaj de l'tradicia eŭropa desegnostilo. Sed iom post iom plonĝinte en la pensmondon de la noveloj, mi trovis la desegnaĵojn trafaj. Evoluas nova desegnarto en Ĉinio, promesplena eĉ kvankam ankoraŭ nematura.

La eseoj estas ĉiatemaj, kaj plejparte interesaj. La poemojn mi ne povas laŭdi. Estas malfacile scii kiaj ili estis en sia origina ĉina formo, sed en sia esperanta formo ili estas banalaj, amatorecaj, preskaŭ senescepte sen literatura valoro. Tio mirigas min, ĉar en **El Popola Ĉinio** regule aperas altkvalitaj esperantigitaj poeziaj tekstoj. Verŝajne pri ilia banaleco kulpas sama faktoro, kiu fuŝis la literaturan kvaliton de multaj el la prozaj tekstoj en la Aŭstralia Antologio: la originaj vortsonoj kaj vortelektoj malaperis dum la tradukado, tiel ke (foje) indaj nacilingvaj verkoj fariĝis nelegindaj en sia esperanta vesto.

Ĉu por vi valorus aĉeti kaj legi ĉi tiun Antologion? Jes se vi havas sociologian intereson pri Ĉinio; ne, se vi deziras literaturan verkon. Sed la tre malalta prezo signifas ke vi ne perdus multan monon pro decido fari propran takson pri ĉi.

EKSKURSOJ DUM LA SOMERLERNEJO

de Bob Felby

De la 7a ĝis la 19a de januaro, 1991, okazos someraj kursoj de Esperanto en Adelajdo. La ĉefaj instruistoj estas S-ino Vera Payne kaj D-ro Donald Broadribb el Perto kaj S-ro Marcel Leereveld el Melburno.

Krom diversnivelaj kursoj de Esperanto okazos ankaŭ aliaj tre interesaj studoj en la posttagmezoj. I.a. D-ro Broadribb diskutos kiel interpreti sonĝojn. Tio ĉi estas nur iometo el la tuto kiu okazos.

Okazos i.a. ankaŭ diversaj ekskursoj. La 9an de januaro okazos vespera ekskurso al "Warrawong", bestoprotektejo private posedata sed kun subteno fare de la registaro, por protekti la medion. Warrawong konsistas el 35 akreoj da veprejo. Oni jam nomas ĝin la plej grava bestoprotektejo. Ĝi estas ankaŭ reserĉejo por la plej vigla konservmovada grupo en Aŭstralio, "Earth Sanctuaries". Tie oni ellaboras metodojn por savi niajn rarajn bestospeciojn kontraŭ malapero.

En Warrawong eblas sperti liberajn ornitorinkojn*, posumojn*, ratkanguruojn, paramelojn*, ktp.

Kvankam ni vizitos la protektejon en la vespero, kiam mallumas, ni tamen facile povos vidi, ĉar la guidanto kunportos fortan lumigilon, al kiu la diversaj bestoj jam al kutimiĝis. Tial ni rajtos fotografi, sed por fari bonajn fotojn oni bezonos tre bonan fotofulmlumilon.

Okazos alia tre bona ekskurso la 13an de januaro. Ni spektos tre malnovan urbon en la ĉirkaŭadelaĵda montaro. Ni vizitos muzeon en apuda urbeto Goolwa, kaj tagmanĝos kun lokaj esperantistaj familioj en vinbergardeno. Tie ni vidos kiel oni kulturas la vitojn kaj eĉ kiel oni produktas vinon.

Grandega kaj bonega ekskurso okazos 19-21an de januaro, transmare al Kanguruinsulo. Oni loĝos malkare en dulitaj hotelĉambroj aŭ eĉ pli malkare en junulargastejo. Transporto estas per pramo kaj aŭtobusoj. Okazos multaj ekskursoj sur la insulo, krom multaj aliaj aranĝoj. Jen via granda ŝanco admiri la naturbelaĵojn de Kanguruinsulo akompanate de multaj el la plej bonaj esperantistoj de Aŭstralio.

*Platypus, Possum, Bandicoot, laŭ la Aŭs.-Esp. Vortaro 3a eldono.

AEA SOMER-LERNEJO

Libroj por la kursoj

Ĉar la AEA Libroservo havas nesufiĉan kvanton da ekzempleroj de kelkaj libroj listigitaj en la anoncbroŝuro por la Somera Esperanto-Lernejo en Adelajdo 7-10 januaro, bonvolu atenti ke:

Por la duanivela kurso, la uzota libro estos la **Aŭstralia Antologio**. \$30 de la AEA Libroservo.

Por la trianivela kurso, la uzota libro estos nur **Sed Nur Fragmento** de Trevor Steele.

Por la laŭplaĉa kurso pri la Analizado de Sonĝoj, la libro **The Dream Story** de Donald Broadribb estas antaŭaĉetebla je \$15 (inkl. send- kaj poŝt-kostojn) rekte de la aŭtoro: D-ro Donald Broadribb, 46 Great Eastern Highway, Bakers Hill WA 6562. Ĝi ankaŭ estos aĉetebla de la aŭtoro, je la sama prezo, ĉe la Somera Lernejo.

OFICIALA INFORMO DE LA AKADEMIO DE ESPERANTO

Numero 14 (Majo 1990)

Pri derivaĵoj de komun/a: komunumo, komunaĵo, komuno

KOMUNUMO: pro la evoluo tiu vorto prezentas hodiaŭ tri ĉefajn signifojn. Nome,

1. Plej eta teritorio organizita por la komunaj interesoj de siaj loĝantoj.
2. Kia ajn homa grupiĝo (loka, regiona, monda) prezentanta komunajn interesojn por siaj membroj.
3. Internacia grupiĝo de ŝtatoj kun komunaj interesoj.

KOMUNAĴO: Io komuna, punkto komuna al du aŭ pluraj personoj.

komuno: tiu vorto neniel povas signifi komunumo 3 laŭ la ĉi-supra difino, por kiu signifo ĝi cetere ne havus specifan adjektivan.

[Noto de la redaktoro: sekve oni parolas pri la EK (Eŭropa Komunumo). La angla vorto "commune" ankaŭ = komunumo. Same "community".]

RETROKOMENTE**RETROETNEMOK****ETNEMOKORTER**

de Vera Payne

Pri la vortfarado laŭ la stilo de Marcel Leereveld mi estas malpli ol ravita. Fakte mi skribis la vorton "horrible" apud la listo sur p23. Kial ne "la Kreado" por "the Creation"? Kreego? Kial? "Malveki" povus signifi "pli profunde endormigi" ktp. Kelkaj neologismoj beligas la lingvon, ekz. "Mi tristas" multe pli plaĉas al mi ol "Mi estas malgaja" aŭ eĉ "Mi malgajas". Pri "unisex" mi havas plian problemon. Por mi, "unisex" ne signifas ambaŭ seksojn, sed ion multe pli subtilan - io inter la du seksoj, t.e. junulo kiu ne malsimilas al junulino kaj inverse, junulino kiu havas la sveltajn koksojn, mallongajn harojn kaj aliajn trajtojn, de junulo. "Bumrango" estas "yuk"-vorto en la "ir-reven"senco, sed li ja trafis la "ir-revenbileto" ĝuste. "Paroleti esperante" povus signifi "malmulte paroli, kun espero". (Marcel estas eksterordinare klera homo kiun mi respektas senrezerve, do mi esperas, ke li ne maltrankviliĝos se la formiko mordetas leonon.)

P27. Via retorika demando [Ĉu el 17 milion loĝantoj en Aŭstralio nur 63 personoj intereseblas pri Esperanto?] bedaŭrinde devas ricevi negativan respondon. Mi ĵus ektrovis, ke la "Language Proficiency Badge" kiun la skoltoj kaj skoltinoj antaŭe gajnis ne plu haveblas - pardonu - ne plu ekzistas. Ŝajne la peno lerni lingvon kaj gajni tiun insignon fariĝis nepopulara, kaj kiam iu temo estas nepopulara, ĝi simple malaperas el la listo de insignoj atingeblaj.

JUVELO DE LA JARO**VIA REDAKTĜRO REKOMENDAS**

PEKINAJ VIDINDAĴOJ. Beijing: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1989. 142 grandaj kolorfotaj paĝoj. Broŝurita. \$22.50 (Speciale mendenda de la AEA Libro-servo).

Se vi partoprenis en la UK en Ĉinio en 1986, ĉi tiu libro donos al vi belajn rememorojn. Se vi ne partoprenis, ĝi estos bela libro por via kaftablo. Mallonga informo identigas ĉiun foton, ĉinlingve kaj esperante. La fotoj estas aranĝitaj laŭteme, ekzemple aro da bildoj pri la "Malpermesita Urbo" kc., kaj antaŭ ĉiu aro estas informo pri la historio de la loko rigardota.

MEMORINDA SAMIDEANINO: THEA VAN DEN BOOGAARDmemorigo verkita de **Max Wearing**

Mi unuafoje renkontis ŝin en Perto dum la esperanta kongreso de 1986, kiun mi partoprenis kiel komencanto. Kvankam ŝi jam havis sesdek jarojn, tamen ŝi ŝajnis esti unu el la gejunuloj de tiu kongreso. Belan, afablan, rideteman, junaspektan, kaj junmensan, estis plezuro renkonti ŝin.

Mia ĝistiam a ekesperantistiĝo en Adelajdo estis iom ŝoleca. La antaŭan jaron, la SA Esperanto-Societo havis nur tri anojn, kiuj ŝajne ne multe ĝuis kuneston, ĉar ili kunvenis nur unu fojon dum la tuta jaro. Grupeto da aspirantaj komencantoj sporade kunvenis sen multe konsulti la plispartulojn, sed mi ĉeestis la tutlandan kongreson kun Bob Felby, la jam sperta esperantisto, kiu plejmulte helpis min.

Thea sin prezentis kviete, preskaŭ sinnullige: estis efektive mi, kiu serĉis ŝin kiel samŝtataninon. Tamen, ŝia familia nomo, van den Boogaard estas nederlanda. Ŝi aŭskultis la malgajan rakonton pri la manko de eblecoj por komencantoj ekzerci sin je la internacia lingvo, kaj iom post iom ŝi komencis paroli pri siaj propraj spertoj.

Ŝia patro estis SAT-ano en Nederlando dum la nazia okupado, kiam ŝi estis nur dekkelkjaraĝa. Ili kaŝis kaj gastigis judan esperantiston en sia familia kelo. Ŝi lernis Esperanton, sed kaŝeme, ĉar gravis ne aliri atenton al la ĉeesto de la sekreta gasto. Thea bone memoris tiun epokon - la timon kaj la mankon de manĝaĵoj.

Finiĝis la milito, kaj la patro mortis. Nek la patrino nek la fratino de Thea parolis Esperanton. Tamen ŝi memoris ĝin. Pro ŝiaj vivcirkonstancoj kiel adoleskantino, markis al ŝi alta formala edukado, sed ĝojigis ŝin lerni kaj uzi fremdajn lingvojn. Ŝajnas, ke ŝi pasigis iom da tempo en Francio, kiel servistino. Ŝi parolis la francan kaj la anglan preskaŭ sen postsigno de la nederlanda - ankaŭ la germanan - sed modesta ŝi restis pri sia lingvoscio.

Antaŭ la fino de la kongreso en Perto en 1986, Thea decidis proponi al la adelajda esperantistaro ĉiusemajnan konversacian renkontiĝon en sia apudmara hejmo. Sed ŝi neniam prezentis sin kiel instruanton, dirante ke ŝi neniam mastris la gramatikan terminaron. Ŝi preparis grandegajn kvantojn da kremkukoj, ĉokoladaĵoj kaj aliaj grasigaj frandaĵoj.

malgraŭ ĉies protestado, tiuj daŭre aperis; kaj ne dezirante ofendi ŝin, la adelajdaj esperantistoj finfine ĉesis plendi, danke akceptis, kaj dikiĝis. "Dum mia junaĝo," ŝi diris, "frandaĵoj tute mankis. Nun eĉ kiel pensiulo mi povas ĝui ilin kun miaj gastoj."

La grava afero estas, ke homoj daŭre ĉeestis tiun neformalan rondon. Bob Felby ĉeestis preskaŭ ĉiufoje, kaj du el la komencantoj (D-ro Peter Ellyard kaj mi) iom post iom komprenis kion ni aŭdis, kaj fluigis nian paroladon. Ĉar mi ne plu ŝoforas, kaj ĉar Peter estas sindonemulo, li ĉiusemajne veturigis min de la urbo ĝis la hejmo de Thea, kaj ni havis okazon plani la pligrandigon kaj pliklerigon de la loka societo. Ni starigis du intensajn kursojn pri Esperanto en la adelajda kolegio de TAFE, kaj reklamis ilin inter profesiuloj kaj la ĝenerala publiko. La instruanto de tiuj kursoj estis Trevor Steele, kiun gastigis dum la kursoj Peter Ellyard en sia propra hejmo. Kun la helpo de Charles Stevenson, kvakero kaj instruisto pri historio, ni starigis ankaŭ ĉiudusemajnajn kunvenojn en la Kvakera Domo en Nord-Adelajdo. Tiuj kursoj allogis novajn komencantojn kaj eĉ kelkajn sufiĉe spertajn eksgeesperantistojn - kiel, ekzemple, D-ron Margaret Furness, kiu poste ĉeestis esperantajn kursojn ankaŭ en Francio dum vizitoj al Eŭropo.

Thea mem faris viziton al Eŭropo por vidi sian patrinon, kiu estis mortanta pro kancero. La fratino de Thea jam mortis pro la sama malsano. Post sia reveno, Thea anoncis, ke ŝi ne povas daŭrigi la regulajn renkontiĝojn, ĉar ŝi decidis havi operacieton. Vizitante ŝin en la hospitalo, ni trovis, ke ankaŭ ŝi suferas pro kancero. Ŝi sin prezentis por la operacio multe tro malfrue. Kvankam la kirurgoj fortranĉis kelkajn organojn, la kancero jam kreskis en neeltranĉeblaj partoj de la korpo. Ŝi restis pacienca, eĉ gajeta - eĉ post kemioterapio, sed finfine ŝi ne kapablis enteni ian ajn manĝaĵon aŭ trinkaĵon.

Post simpla, nereligia ceremonio, oni kremaciis ŝian korpon en adelajda antaŭurbo, sed daŭras la memoro de ŝia gaja, pacienca personeco, kaj ŝia senpretenda, sed valorega kontribuo al la revivigo ĉe ni de Esperanto.

(Nekrologo pri Thea van den Boogaard, verkita de Bob Felby, aperis en nia mart-aprila numero 1989, p4-5. Ĉi tiu memorigo aperas kiel tributo al bona homo kiu senpretende faris multon por revivigi Esperanton en urbo kie la lingvo preskaŭ malaperis.

(La Red.)

SUMMER HIGH SCHOOL COURSES IN SPAIN TAUGHT IN ESPERANTO

Preparations are now taking place for the introduction of high school summer courses to be offered using Esperanto as the teaching language, to begin in 1993, under the auspices of the Language Institute of the University of Santiago de Compostela.

The courses are planned to be available on a regular basis each summer. Subjects to be included are the usual range of high school subjects: mathematics, physics, chemistry, biology, geography, history, law, philosophy, literature, language studies, etc. Some of the specific courses already prepared are Introduction to elementary geometry, Introduction to relativity theory, Formal logic, Elementary statistics, Financial use of algebra.

Work on this project was begun in 1985 under the leadership of Antonio Alonso Núñez, director of the Esperanto courses in the Language Institute of the University of Santiago de Compostela. The University is currently providing a full-time salaried position for implementation of the program.

The timetable for the project is as follows:

- (1) Selection, adaptation or editing, and publication of textbooks for use in the courses, 1985-1993.
- (2) Education of teachers in the use of Esperanto, 1989-1992.
- (3) Education of students aged 12-18 in the use of Esperanto, 1990-1993.
- (4) Opportunities for meetings between student groups participating in the project, 1991-1993.
- (5) General instruction of Esperanto via the mass media, 1992-1993.
- (6) Esperanto examinations for students, 1993.
- (7) First series of the courses, 1993.
- (8) Evaluation and detailed plans for the courses in future years, 1993.

It is expected that the first intake will be about 100-150 students of various nationalities. The courses will be taught by university lecturers and specialists and so arranged as to provide a basic education in the selected subjects in preparation for university studies. →

The summer courses have been approved by the Department of Education and Sciences of the Government of Spain, which has also contributed a token subsidy of 200,000 pesetas (=c.A\$3,500). The inauguration of the courses has been timed to coincide with the International Congress of Esperanto to be held in Spain in 1993. The content of the courses is being worked out in collaboration with the Summer University Courses in Esperanto at the University of Liège and the Communication in the European Community campaign being undertaken by the International League of Esperanto Teachers.

Prospective teachers for the courses, and students, may obtain details by writing (in Esperanto, or with enclosed Esperanto translation) to the Curso de Esperanto, Instituto de Idiomas, Praza de Mazarelos s/n, E-15703-Santiago de Compostela, Spain. It is asked that proposals for participation in the courses, either as teachers or students, be made through the educational institution to which you are attached.

O-O-O

CHINA

Volume 2 of the Esperanto edition of an Anthology of Chinese Literature, covering the years 1949-1979, is now available at the price of \$16.50 from AEA Libroservo, P O Box 230, Matraville NSW 2036.

Chess enthusiasts may be interested in a series of detailed, illustrated articles on traditional Chinese Chess, which have been appearing each month this year in the magazine **El Popola Ĉirco**. Beginning with a presentation of each of the pieces, the layout of the board, and basic rules, the articles have gone on to detail the progress of the game and tactics for various stages of the game. Subscriptions to the magazine may be ordered through AEA Libroservo, address given above, for \$15.50 a year.

Also now available is **Ĉinaj Protektataj Bestoj**, 350p. This book on Chinese Protected Animals covers 176 species of vertebrates. Two pages are devoted to each species, the left hand page gives descriptive information about the animal and its life, while the right hand page is devoted to a black and white drawing of the animal in its natural habitat. Copies may be specially ordered through the Libroservo, address given above.

ANATOMICAL DICTIONARY

One of the most significant new dictionaries to be published this year is the **Anatoma Nomenklatur**, with 6248 Latin-English-French-Esperanto-Chinese parallel listings, prepared and edited by Prof. Li Kexi of the Northwestern Agricultural University in Yangling, Shaanxi, China and Dr André Albault, ophthalmologist and president of the Academy of Esperanto. With 698 large format pages, it also includes separate indexes for each language to facilitate reference. The price is US\$29 = approx. A\$38. The book may be ordered directly from Prof. Li Kexi, Northwestern Agricultural University, 712100 Yangling, Shaanxi, China, or by special order from AEA Libroservo, PO Box 230, Matraville NSW 2036.

0-0-0

SUMMER SCHOOL ENROLMENTS

Two months before the 8th Australian Esperanto Summer School to be held in Adelaide 7-19 January, 1991, Australian enrolment numbers already stand at 20 - half those for the 1989 summer school. (4 beginners 6 intermediate and 10 advanced). In addition 10 overseas Esperantists have applied for visas to visit the school: USSR 2, Hungary 1, Yugoslavia 1, Mongolia 6. Enrolment forms from The Office of Continuing Education, University of Adelaide, GPO Box 498, Adelaide SA 5001; or from Max Wearing, 30 Westbury St, Hackney SA 5069.

0-0-0

NEW AUSTRALIAN-ESPERANTO DICTIONARY

Review by **Leland B. Ross** (U.S.A.)

Australian Esperanto Dictionary, ed. R.L. Harry and V. Gueltling. Australian Esperanto Association, 3rd edition 1990. 55p. \$6. Order from Libroservo de AEA, P O Box 230, Matraville NSW 2036.

This intriguing little dictionary's third edition is in several respects a significant improvement over the second (1955) edition. Most obvious are the addition of numerous, mostly helpful illustrations reprinted from a monolingual Aussie lexicon, **The Macquarie Dictionary** and of an alphabetical list of 122 Esperanto roots **not** defined in the **Plena Ilustrita Vortaro**, with their "Strine" equivalents. The dictionary has also, less obviously yet noteworthily, been expanded by some 155 en-

tries, and a number of the definitions have been made longer and (usually) clearer. Anyone interested in the English language and/or in Australian literature (and speech), fauna, flora, and culture, will find this a very useful and fascinating reference work.

[The first edition of this dictionary was published in 1983 with 700 headings, intended for use by the translators of an Esperanto publication of an Australian Anthology. As is well known, Australian English usage includes a large vocabulary of words unknown or rare in other English speaking countries in which the standard English-Esperanto Dictionaries have been prepared and published. In 1985 a second, enlarged edition containing 1010 headings was published with an expanded aim. It was hoped that the dictionary would be of service to readers of the **Australia Antologio** in other countries who might be inspired by the Anthology to go on to read some of the novels and other works excerpted as representative Australian literature in the Anthology.

The **Australia Antologio** was published in 1988 and has enjoyed considerable popularity. In the meantime **The Australian National Dictionary** was published by the Oxford University Press and brought attention to the fact that many essential Australianisms were still missing from the Australian-Esperanto Dictionary. Also the editors of a new unabridged English-Esperanto dictionary in America asked for a revised and slightly expanded vocabulary of Australianisms to be drawn upon for their work. Thus this third, illustrated, edition, with 1125 entries, was published about the middle of this year.

-Ed.]

ESPERANTO CONGRESSES

A f r i c a

It is with pleasure that we can report that a pan-African Esperanto congress is to be held from 27 December 1990 to January 2, 1991, in Lome, Togoland. Excursions to neighbouring countries will be held from 2-11 January 1991.

N o r w a y

The 76th International Congress of Esperanto is to be held in Bergen, Norway, July 28 - 3 August 1991.

SPERTOJ

(1)

de Donald Broadribb

[En la januara numero de TAE mi presigis fikcian noveleton kiun (prave) iuj kritikis kiel neverŝajnan. Laŭ proverbo, "La vero estas pli nekred- ebla ol fikcio", do mi prezentas eĉ pli neverŝajnan rakonton kiu tamen estas vera. Temas pri evento renkontita de mi dum mia laborado kiel psikanalizisto. Kun permeso mi drame prezentas ĝin, sed kun kondiĉo ke mi uzu falsitajn nomojn. La situacio, kiu ankoraŭ povus ripetiĝi en Ok- cidenta Aŭstralio, estas kvazaŭkoŝmaro por multaj konsilistoj.-DB]

Patro Jozefo skuiĝis kiam la sono de la pordsonorilo penetris lian dormon. Li estis ekdorminta en sia remburita fotelo. Mi ja maljuniĝas, li pensis. Kiomaĝa nun? Sepdek tri. Tro maljuna. Multe tro maljuna por pritrakti ĉi tian problemon. Li skuetis la kapon, penante plenveki sian cerbon. Li devas decidi. Decidi pri kiu ago estos malpli malakceptenda. Sed efektive nur unu decido estis permesebla. Li stariĝis kaj marŝis al la pordo, malfermis ĝin.

"Pardonu la malfruon," pardonpetis Joan dum ŝi kaj Robin sekvis lin al la salono. "Okazis ia akcidento sur la aŭtovojo kaj ni sole povis sidadi ... kaj timi" & ia voĉo malfortiĝis ĝis neaŭdebleco. Ili ja tim- is ion pli gravan ol la trafiko sur la aŭtovojo. Timigis ilin anticipo pri tio, kion diros Patro Jozefo. Patro Jozefo timis precize la samon. Stranga sento. Jam de pli ol dudek jaroj Joan kaj Patro Jozefo konas unu la alian, sed eĉ nun ambaŭ dubas pri la decido kiun li faros. Kaj Robin? Robin kaj li preskaŭ ne konas unu la alian, se oni komparas kun la interkono kun Joan. Robin ekaperis en la vivo de Patro Jozefo antaŭ nur kvin jaroj. Sed eĉ kvin jaroj sufiĉas por akiri amon al ne- konito. Robin eĉ povus esti lia nepo. Povus. Sed ne estas. Pro la ĉasto kaj fraŭleco ĵurpromesitaj antaŭ -- jes, antaŭ kvindek jaroj. Dum ili ordigis sin sur la seĝoj, li turnis sian menson al la vivdramo de tiom da jaroj. Joan estis naskita en ĉi tiu paroĉo. Baptita en ĉi tiu paro- ĉo. Edziniĝis en ĉi tiu paroĉo. Kaj Patro Jozefo ĉiam ĉeestis. Verŝajne la animon de Joan konis Patro Jozefo pli intime ol ĉiu alia homo.

"Vi ne kunportis la bebon," plendis Patro Jozefo. Ne nur por espri- mi sian senton de perdo, sed ankaŭ por enfokusigi sian menson je la aktuala. Sacerdoto suferas multajn perdojn pro sia vivo. "Teo? Bisku- itoj?" li proponis, strebante trankviligi ŝin.

"Bonvolu. Jes." Joan kaj Robin parolis samtempe. La tremado de iliaj voĉoj egaligis la skuiĝon de la manoj de Patro Jozefo dum li iris al la kuirejo kaj revenis kun la tasoj kaj teleretoj.

.....

La problemo enlumiĝis antaŭ du tagoj, kiam Joan kaj Robin petis private paroli kun Patro Jozefo post la meso. Joan bezonis malmultajn vortojn por informi lin pri la situacio. La unujariĝo de ilia bebo, Alice, okazos baldaŭ, kaj ili decidis fari por ŝi donacon kiu estos ŝia trezoro dum la tuta vivo. Prifamilian albumon. En ĝi estos fotoj de ili, de iliaj gepatroj, de ĉiuj praparencoj. Sed kiam ili progresis en la preparado de la albumo ili ekteruriĝis. Dum sia tuta vivo Joan konsciis pri sia adoptiĝo. Ŝiaj adopt-gepatroj helpis ŝin, kiam ŝi entreprenis akiri sian originan Ateston pri Naskiĝo.* Ili preskaŭ tiel fervoris kiel ŝi mem dum ŝi serĉis siajn nask-gepatrojn kaj -parencojn. Sed por Robin estis alie. Li sentis fortan ŝokon kiam li provis akiri pasporton kaj unufoje sciigis ke arkaŭ li estis adoptita. Liaj adopt-gepatroj faris el tiu adopto sekreton, kaj eĉ nun ili rifuzas diskuti ĝin. Ankaŭ li entreprenis akiri sian originan Ateston pri Naskiĝo. Kaj tiel malsekretiĝis -- ke li kaj Joan estas gefratoj.

Eksterordinara koincido, pensis Patro Jozefo. Tamen ne tiel nekred-ebla kiel ŝajnas. Adoptoleĝoj jam plurfoje ŝanĝiĝis dum lia vivo. Dum longa periodo la registaro detruis la adoptodokumentojn post la kompletigo de la adopto. Kaj dumlonge oni konsilis al adopt-gepatroj ke estas plejbone por la emocia sano de la infano ke ĝi neniam sciu pri la adopto. La konsekvenco estis ke neeviteble okazas kelkaj miskoincidoj.

"Tio malvalidigas nian geedziĝon, ĉu ne?" Robin sukcesis diri dum longa plorado. Patro Jozefo kapjesis. "Ni anticipis ke jes. Ni ne scias kiun konsulti. Devas ekzisti ia provizo por escepto. Iu maniero sol-

*En Okcidenta Aŭstralio nova, falsita Atesto pri Naskiĝo estas donata kiam oni adoptas bebon. La falsita Atesto indikas ke la adopt-intaj gepatroj estas la nasko-gepatroj. Nefalsita Atesto estas sekrete konservata de la registaro. Laŭ leĝreformo farita antaŭ kelkaj jaroj, adolta adoptito rajtas akiri kopion de tiu origina nefalsita Atesto, laŭ certaj kondiĉoj. Ĉar la federale pasport-oficejo malakceptas falsitajn Atestojn, ne malofte adoltoj unufoje sciigas pri sia adoptiĝo kiam ili petas pasporton.

vi la dilemon."

Patro Jozefo kapneis. "Neniu escepto ekzistas," li murmuris. Estis malfacile mem ne plori pro la neevitebla malestiĝo de ilia geedzeco kaj pro kio poste okazos. "La leĝo ne permesas esceptojn. Nek la socijura leĝo, nek la eklezia kanonleĝo. Tio estas tute klara. Vi faris nenion kriman, neniun pekon. Kion oni laŭ sia ankora kredo faras, tio ne estas peko. Almenaŭ -- ne laŭ la aktualaj teologoj." Li baraktis kontraŭ si mem. "Sed kiam vi scias ke temas pri peko kaj tamen daŭrigas, nu tio estas alia afero. Ne estus permeseble ke vi plu kunloĝu kiel geedzoj. La socijura leĝo permesas ke vi plu kunloĝu kiel gefratoj. Sed la Eklezio ne tolerus tion. Kaj ĉiukaze, kompreneble, la bebon transprenos ŝtata instanco." Li ĉesis paroli. Li ekkonsciis ke li paroladas kvazaŭ libro de reguloj. Sed subite tiu "libro" estis ferma kaj li vidis la teruritajn, torturitajn vizaĝojn antaŭ si. Li ekkonsciis ke li mem estas interne frakasita de la vortoj diritaj. Kvar koroj rompiĝos, ne nur tri: de Joan, de Robin, de Alice, kaj -- de li mem.

Joan kaj Robin atendis, ke li diru al ili kion fari, informu ilin pri la detaloj de kio okazos. Timante ke li fortiros la bebon Alice disde iliaj brakoj jam ĉimomente.

"Eble ni ne tro hastu," fine diris Patro Jozefo. "Blinda hasto solvos nenion. Eble ja ekzistas iu obskura regulo. Iu speciala esceptoebeco. Iu piednoteto en la kanonleĝo. Io kutime ne instruata..."

"Sed ĉu vi rajtas fari tian decidon?" demandis Joan. "Ĉu ne necesas ke vi informu la episkopon? Ĉu ne li devas aranĝi la nuligon de la geedziĝo? Ĉu la Eklezio ne ordonas ke...vi tuj raportu?" Ŝia vizaĝo estis fantome blanka.

"Mi supozas ke unu-du-taga atendo ne gravos," diris Patro Jozefo. "Mi dubas ke Dio estas tiel hastema kiel la episkopo. Kaj la episkopo komprenos ke ne nur vi ricevis ŝokon. Mi bezonas tempon por pensado. Tempon por reordigi mian animon. Dio faros ian solvon. Malespero estas peko precize ĉar ĝi supozigas ke Dio ne prizorgos siajn amatojn."

Post la foriro de Joan kaj Robin, Patro Jozefo kvazaŭkolapsis en la fotelo. Li fermis siajn okulojn, emocie elĉerpite. Devas ekzisti ia solvo por la problemo. Ili bonafide geedziĝis. Li bonafide celebris la geedziĝon. Li bonafide baptis ilian bebon. Sed ĉu bonafido sufiĉas? Ne-

niu rajtus sugestii ke ili agis malbonafide. Sed - kaj ĉi tion certe diras la episkopo - nun oni scias, do la afero havas novan aspekton. Ne plu temas pri bonafido, se li sekretos pri afero kiu laŭ lia bona scio estas kontraŭleĝa jure kaj kanone. Li ja ĵuris lojalecon al la Eklezio kaj ties instruoj.

Sed ĉu efektive temas pri bonafido? Li sentis forte ke tiu meditado celas kaŝi ion alian. Li ne volas la nuligon de la geedziĝo. Jen la kerno de la afero. Lin motivigas ne teologiaj argumentoj aŭ kanonleĝoj. Lin motivigas tute simple ke li amas Joanon kaj Robinon kaj la bebon Alice. Ili estas lia "familio". Fojfoje li trovis sin supozanta ke la bebo Alice iel estas lia. Multajn horojn li uzis por trovi plejtaŭgan donacon por la unujariĝo de Alice. Multajn pli ol li povus pravigi. Li mem partoprenas en la emocio do li ja ne povas fari senpartian decidon. Des pli lia devo estas telefoni la episkopon kaj transdoni al li la taskon. Des pli li ne povas fari tion.

La preĝejo estis fermita kaj slosita antaŭ pluraj horoj. La lumoj en la apudaj domoj antaŭ horoj estis estingitaj. Patro Jozefo plu meditis. Fine, elĉerpinte, li ekdormis ĉe la tablo en la kuirejo, kun taso da kafo en la mano. Sed lia dormo estis malpaca, kvazaŭ li jam vekigis. La frazo senfine ripetis sin: "Sekve kiujn Dio kunigis, neniu homo malkunigu" el la geedziĝ-ceremonio. Geedziĝo kiu ne estis geedziĝo. Li vidis sin en sonĝo, pledantan. Ĉu Dio kunigis Joanon kaj Robinon? Ĉu la valideco de geedziĝo dependas de la rajto de la koncernaj personoj geedziĝi? Kompreneble ke jes. Sed li, reprezentante Dion en la ceremonio, benis ilin nome de Dio. Ĉu beno de Dio estas malvalidigebla? Aŭ ĉu tio vere estis beno de Dio, se kio estis benita ne rajtis esti benita, eĉ kvankam li tiutempe kredis ĝin rajtigita? Eĉ dum la dormado lia cerbo senĉese rondiris meditante pri la problemo. Kiam la antikva horloĝo en la vestiblo dekludfoje sonoris, Patro Jozefo vekigis, kaj dum lia vekigo fantome aperis en lia menso memoro pri tiu stranga teksteto en la Biblio: ke Jesuo vidis viron laborantan dum la sankta sabato. Jesuo diris al la viro "Amiko, se vi scias kion vi faras, benita estas vi. Sed se vi ne scias, vi estas kondamnita kiel kontraŭleĝulo".

La vizaĝo de Patro Jozefo komencis trankviliĝi dum li memoris tiun tekston kaj la diskutojn pri ĝi en la teologia lernejo, pri ĝia signifo se ĝi efektive estis aŭtentika diro de Jesuo. Ke eble en kelkaj cirkonstancoj la volo de Dio estas ke Liaj Leĝoj estu malobeataj. Eble, li pensis, kiam tiuj Leĝoj suferigas senkulpaĵajn personojn. Aŭ ĉu li nur

senespere serĉas pravigon por nenion fari? Ĉu li riskas sian animon per tia meditado? Konstante revoluas liaj pensoj. Antaŭ nun li kredis ke li fariĝis sacerdoto por helpi suferantojn, proponante al ili la plej grandan helpon imageblan. Nun, estante sacerdoto, li devas proklami al serkulpaj personoj ke Dio kondamnas ilin. Kial, ho kial, li fariĝis sacerdoto?

.....

"Patro Jozefo, ĉu vi malsanas?" La timoplenaj okuloj de Joan rigardis liajn. Li skuetis sin, kio elverŝis la teon el la taso el kiu li pretis trinki. "Estas kvazaŭ vi senkonsciiĝis."

Patro Jozefo zorgoplene metis la tason sur la tablon kaj strebis kvietigi sin. "Ne, mi bone sanas. Mi nur estas iom laca. Mi delonge ne dormas pro ĉio ĉi. Nu, mi tre zorge ekzamenis la aferon. Efektive mi trafis solvon. Neniu peko okazis. Peko, laŭ Dio, estus forpreni de vi la infanon kaj apartigi vin. Mi sendis leteron al la episkopo. Trankviliĝu, vin neniam denove rajtos ĝeni la afero. Do ignoru ĝin. Iru, kaj Dio benu vin nun kiel li benis vin antaŭe."

Robin kaj Joan foriris. Ili bone konis Patron Jozefon. Li neniam mensogus. Se li diris ke neniu problemo plu ekzistas, do ili povas prave forgesi la problemon. Iliaj koroj komencis batadi pli normale.

Patro Jozefo ankaŭ sentis pacon dum li relegis kopion de la letero sendita al la episkopo:

Kara Episkopo,

Per ĉi tiu letero mi fortiras men el mia posteno kaj el mia sacerdoteco. Bonvolu kompreni ke volas tion ne mi sed Dio. Mi ne rajtas ekspliki. Bonvolu respekti mian decidon, kaj preĝu por mi laŭ la vortoj de Kristo, "Amiko, se vi scias kion vi faras, benbenita estas vi". Preĝu por mi.

En Kristo via,

Jozefo Bush.

[Postnoto: laŭ proponata nova adoptoleĝo en Okcidenta Aŭstralio la supre priskribita situacio ne povus ripetiĝi. Ŝanĝoj en la adoptoleĝoj de la aliaj ŝtatoj dum la pasintaj du jaroj nun malebligas ripeton en la plejparto de Aŭstralio (kun escepto de NT kaj ACT). - La biblioteksto menciita en la lasta parto estas el Luko 6:5. Tiu teksto troviĝas en nur unu frua greka manuskripto de la Evangelio laŭ Luko, do kutime ne estas menciata en bibliotradukoj. Sed ĉar tiu frua manuskripto estas unu el la plej gravaj kaj fidataj manuskriptoj de la teksto de tiu evangelio, teologia diskutado pri la teksto estas vigla. - DB]

o-o-o

LA LETERO DE L'AKADEMIO

Numero 12 (Julio-Aŭgusto-Septembro) aperis. En ĝi, Oficiala Informo numero 14 pri la signifo de la vortoj komunumo, komunaĵo, kaj komuno (teksto represita sur p11 de ĉi tiu numero de TAE). Ankaŭ artikoloj pri la aktuala bezono ke ekzistu la Akademio, kaj tri grandaj paĝoj da demandoj kaj komentoj de legantoj, plus respondoj. Kaj interesa listo de la ok Oficialaj Aldonoj al la Universala Vortaro. Koncize:

- 1) Julio 1909, kun 864 radikoj
- 2) Julio 1919, kun 593 terminoj
- 3) Januaro 1922, kun 192 radikoj
- 4) Junio 1929, kun 118 radikoj
- 5) Junio 1934, kun 8 radikoj
- 6) Aprilo 1935, kun 21 radikoj
- 7) Decembro 1958, kun 149 terminoj (el ili 83 en la Fundamento kvankam ekster la Universala Vortaro.)
- 8) 1974, kun 198 terminoj

Entute: 2771 en la Fundamento

1975 (proksimume) en la Oficialaj Aldonoj

4746 proksimume

(proksimume ĉar pluraj terminoj estas "paralelaj formoj", kaj diversaj aliaj estas korektoj kaj ŝanĝoj. Krome diversaj decidoj ne aperintaj en la Oficialaj Aldonoj, ekzemple oficialigo de la sufikso -end en 1953, nuligo de la malkonsilo al la sufikso -io por landnomoj en 1974.)

Kvankam **The Australian Esperantist** nun represas ĉiujn oficialajn komunikadojn de la Akademio de Esperanto, tion ne faras ĉiuj esperantaj gazetoj. Tial mi forte rekomendas abonon al **La Letero**. - DB

Ĉu vi sekvas la novaĵojn?

Kiu organizaĵo en 1989-1990:

- organizis la plej grandan E-renkontiĝon en ambaŭ Amerikoj?
- ligis rilatojn kun sep novaj landaj asocioj el Eŭropo, Afriko kaj Azio?
- pledis por la rumana Esperanto-movado ĉe Unuiĝintaj Nacioj, kaj poste subtenis ties renaskiĝon per libroj, revuoj kaj membrigoj?
- elpezis pli ol 100 000 guldenojn por disvastigi Esperanton en la evoluantaj landoj?
- renovigis sin per la ŝanĝo de ok el siaj naŭ estraranoj?
- radikale plibonigis la aspekton de la plej legata revuo en Esperanto?
- aperigis kaj senpage dissendis ilustritan librokatalogon en dekmil ekzempleroj?
- realigis ĉion ĉi kiel parton de sia Strategia Plano por la dua jarcento de Esperanto?

Nur unu tia organizaĵo ekzistas. Kaj ĝi bezonas vin.

Subtenu la tutmondiĝon de Esperanto. Membrigu en UEA.

Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 13806,
NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando

----- >8

Por membriĝi, plenigu la ĉi-suban slipon kaj sendu ĝin (aŭ fotokopion) al via landa peranto:

Libroservo de AEA, P.O. Box 230, Matraville, NS2 2036

Mi membriĝas en UEA en la indikita kategorio por la jaro 1991 kaj kunsendas mian kotizon:

- MA Membro-Abonanto (ricevas la Jarlibron kaj revuon *Esperanto*), \$52
- MA-K* Juna Membro-Abonanto (ĝis 29 jaroj—ricevas ankaŭ la revuon *Kontakto*), \$52
- MJ Membro kun Jarlibro (ricevas la Jarlibron, sed ne la revuon), \$21
- MJ-K* Juna Membro kun Jarlibro (ĝis 29 jaroj—ricevas ankaŭ la revuon *Kontakto*), \$21
- MG Membro kun Gvidlibro (minimuma kategorio), \$9
- DM Dumviva Membro (ricevas la Jarlibron kaj revuon dum la tuta vivo), \$1300

Nomo _____

Adreso _____

*Naskiĝdato _____ Profesio _____

Dato _____ Subskribo _____

**28a AEA KAJ 57a NZEA KONGRESOJ
11-19 JANUARO 1992**

Universitato de Okcidenta Sidnejo

Unua listo de ĉeestontoj:

- | | |
|-------------------------|---------------------------|
| 1. Herbert Koppel (Vic) | 7. Kep Enderby (NSW) |
| 2. Fay Koppel (Vic) | 8. Dorothy Enderby (NSW) |
| 3. Tom Elliott (NSW) | 9. Raymond Taylor (NT) |
| 4. Mavis Elliott (NSW) | 10. Elizabeth Taylor (NT) |
| 5. Kevin Smith (NSW) | 11. Les Scott (NSW) |
| 6. Raymonde Smith (NSW) | 12. Bess Scott (NSW) |

Listo de la 1a de oktobro 1990

Speciala noto: kiu deziras partopreni en la 56a NZEA kongreso en Masterton 11-14a de januaro 1991, povas akiri aliĝilon de Les Scott, 34 Ocean Road, Manly, NSW 2095.

o-o-o

BIBLIOTEKO DE AEA

Will Firth, kiu vizitis Kahberon dum kelkaj semajnoj post studado en Moskvo kaj antaŭ ol komenci instruadon en Magdeburg, donacis la sekvantajn librojn al nia Biblioteko:

Germana Antologio (ek de la plej frua epoko ĝis ĉ. 1700). Ĉi tiu estas duoblaĵo kaj disponebla al loka grupo kiel konstanta prunto.

Vivi Estas Danĝere de Isvan Nemere.

Serĉu Mian Sonĝon de Istvan Nemere.

1825 bildrakonto tradukita el la rusa.

1905 Prologo, simila bildrakonto.

Maslaček (Leontido), gazeto kun artikolo de Tibor Sekelj kaj bildrakonto "Kiu estas Jozefo?"

Esperanto: Lernolibro de la Internacia Lingvo, Zagreb, 1984.

E. Jaunvalks, Esperanto - starptautiskas valordas kurss. Riga, Zvaigzne 1985

Geza Gardonyi, Steloj de Eger, bildrakonto, Hungara E.A. 1979.

Kio Estas USSR? flugfolio. Eldonejo de Presagentejo Novosti, 1984.

Markarian, R.H.M., Ni Parolu Esperanton. University Tutorial Press, London, 1964, represita 1971 (duoblaĵo)

Instrukciaro por kursgvidantoj uzantaj la Zagebran Metodon. Aŭtoro Zlatko Tišlar.

L.aŭte, dumonata kultura informilo kaj esprimilo esperanta. Laroque Timbaut, Cercle amical esp. agenais, 70-74, 77, 82.

Ni tre dankas al Will. La bibliotekisto ĝoje ricevas pruntpetojn.

Ni ankaŭ ricevis, kiel interŝanĝon de duoblaĵoj, dudekon da klasikaj libroj el la biblioteko de la Esperanto-Societo de Brisbano. Aliaj Societoj kiuj ĝis nun ne sendis liston de la libroj en sia biblioteko estas invitataj tion fari. Tiam la centra Biblioteko povos sendi de tempo al tempo duoblaĵojn, por plenigi la truojn.

Ralph Harry

o-o-o

NOVA ADRESO DE RALPH HARRY

Ekde la 1 Novembro la adreso de Ralph Harry estas:

Doktoro Ralph Harry
Unit 319 Bayview Garden Village
36-42 Cabbage Tree Road
Bayview NSW 2104

o-o-o

JUNULOJ PARTOPRENONTAJ EN LA UK 1991

Laŭ ŝanĝita regularo, gejunuloj ne pli ol 19jaraĝaj je la 1a de januaro 1991 rajtas al senpaga aliĝo en la UK en Bergen, senkonsidere ĉu ili aliĝis al la IJK aŭ ne. La "porjunula kotizo" estas pagenda nur de personoj inter la aĝoj 19- kaj 29-jaraĝaj.

IOM PRI SOVETIA TELEVIDO

de Trevor Steele

Pri la deprimaj vivkondiĉoj en Sovet-Unio mi jam raportis diversloke, i.a. en Social Alternatives. Ĉi-foje mi volas skribi pri pli kontentiga temo, nome televido en ĉi tiu giganta lando. Kompreneble mian kapablon juĝi ĝin limigas mia nekompleta kompreno de la rusa lingvo, sed mi esperas, ke miaj impresoj ne tute maltrafas.

Ĉiuj opinias, ke la programoj estas nun nekompareble pli interesaj ol en la antaŭ-gorbaĉova epoko. Tiutempe, oni diras, spektindaj estis nur iuj filmoj; dum novaĵbultenoj oni marŝigis la hundon. Ŝajnas ke nun ĉiuj televidas. Se "antaŭ Gorbaĉov" fama poeto, kia Jevtuŝenko, povis altiri stadionplenon da homoj per deklamado de siaj verkoj, nun poetoj estas same neglektataj kiel en la Okcidento. Nun televiduloj rajtas diri tion, kion antaŭe nur poetoj kuraĝis kamufle aludi.

La ritmo de sovetiaj programoj estas multe malpli rapida ol nia. Dum niaj politikistoj kutime havas nur kelkajn sekundojn por denunci la stultecon de la oponuloj, antaŭ ol venas reklamo aŭ kontraŭdenunco, sovetiaj politikistoj rajtas paroli dum minutoj pli-malpli pri la temo, ĉar ankoraŭ ne estiĝis la tradicio kulpigi kontraŭulojn pri ĉiuj problemoj (ĝis antaŭ nelonge ĉiuj sovetiaj politikistoj same opiniis pri ĉiuj temoj). Ŝajnas al mi, ke televido iĝis forta demokratiiga forumo: ministroj devas regule intervjuiĝi, kaj foje la demandantoj taŭzas glantan ministran vizaĝon.

Gorbaĉov mem estas tre malpopulara. En Okcidento oni lasas lin paroli du-tri vortojn kaj tiam tradukas la kernon. Ĉi tie oni malofte montras lin, sed kiam li aperas, li parolas senfine, malfortigante la efikon per tro da vortoj. Oni lin rigardas babilema nedecidemulo. Lia sola ŝanco ree populariĝi estus forlasi la malamatan KP kaj rapide enkonduki drastajn ŝanĝojn en la kadukan ekonomian sistemon.

Distraj programoj ĉerpas grandparte el la granda repertuaro de la rusa kulturo, sed estas programoj, kiuj celas "usoniĝon". Fakte estas furora populareco de ĉio usona (kion oni dum jardekoj denunciis "dekadenco"). La "video clips" (laŭvorte!) povus esti el Usono, eĉ se la voĉo de la kantistino ankoraŭ pli gravas ol la formo de ŝiaj femuroj. Ankaŭ reklamoj elsendiĝas, ankoraŭ nur malmultaj. La reklamado ŝajnas nava, senkulpa kompare kun nia. Unue venas solena averto, ke sekvos "re-

klama". Poste oni tre serioze provas konvinki pri la valoro de la traktoro, skribmaŝino, aŭ kio ajn - homoj malrapide ekzamenas la varon, poste funkciigas ĝin kaj montras la bonajn rezultojn. La fona voĉo estas serioza, gajnema. Fine venas la adreso kaj telefon-numero de la kompanio. Kiam la sovetianoj ekscios, ke erotiko-tiklo kaj humur-provoĵ vendas ankaŭ traktorojn?

Aktuala (nova) adreso de Trevor Steele:

USSR-CCCP
KIEV 5
ul. Gerkogo 39, Kb 16
Trevor Steele

(Trevor anticipas resti en Sovetio ĝis ĉ. aprilo 1991.)

SOMERAJ GIMNAZI-NIVELAJ KURSOJ PER ESPERANTO EN HISPANIO

Koincide kun la okazigo de la UK en Hispanio en 1993, la Hispana Esperanto-Federacio planas la unuan serion da diversfakaj kursoj je gimnasia nivelo (t.e. infanoj 12-18jaraĝaj). La Hispana Ministerio de Edukado aprobis la planon kaj donacis 200 000 pesetojn (=ĉ.A\$3 500) kiel helpkontribuon. La kursoj okazos sub la aŭspicioj de la Lingva Instituto de la Universitato de Santiago de Compostela, kiu ekde januaro 1990 pagas salajron por organizanto de la projekto.

Dum la jaroj 1990-1993 infanoj tiuaĝaj rajtas libervole studi Esperanton, kaj ankaŭ instruistoj. Jam de 1985 oni preparas lernolibrojn por diversaj studfakoj (ekz. matematiko, fiziko, kemio, biologio, geografio kc.) kiujn oni en Esperanto instruos al la esperantistigitaj infanoj ekde 1993. Oni anticipas partoprenon de ĉ. 100-150 studentoj diverslandaj.

Kiu volas helpi (ekz. per verkado de studlibretoj) aŭ pli da informo bonvolu kontakti Curso de Esperanto - Instituto de Idiomas - Praza de Mazarelos, s/n. - E-15703-Santiago de Compostela, Hispanio.

Postkomento de la redaktoro: La Hispana Asocio uzas la terminon "Preuniversitataj Somerkursoj en Esperanto" por ĉi tiu entrepreno. Tio signifas ke oni celas kursojn preparantajn studentojn planantajn poste studi en universitatoj.

FLUGFOLIO PRI MEDITADO

Dissendata en Esperanto estas flugfolio instruanta meditadon. Kiu interesiĝas petu ĝin de la Worldwide Meditation and Relaxation Society, PO Box 11276, Wellington, Nov-Zelando. Nepre menciuj ke vi deziras la esperantan eldonon.

UEA-MEMBROJ

UEA anoncis sian planon dissendi sian Jarlibron en januaro 1991 al ĉiuj akurataj kotizpagintoj. Sekve, por ricevi vian Jarlibron jam komence de la jaro, via kotizo devos atingi La AEA Libroservon plejmalfrue je la 19a de januaro. Personoj pagintaj sian UEA kotizon post tiu dato ricevos sian Jarlibron nur meze de la jaro (UEA dissendos al malfruuloj en majo).

Kotizoj: gazeto + Jarlibro, \$52; Jarlibro sed ne gazeto, \$21.

ĈU MI POSEDAS KOMPUTERON?

de Ronald Gates

Responde al letero, en kiu mi nomis mian IBM-specan aparaton "komputero", amiko rimarkigis, ke tiu vorto signifas por li peceton da programo. Tio estus logika, se ekzistus substantivo "komputo" kun la taŭga senco. Sed ĝi ne estus necesa: ekzemple, "maniero" ne signifas "peceto da manio", nek "ansero" "peceto de anso".

Antaŭ ol akiri PIV, mi uzis la vorton "komputilo", same la amiko. Tiun uzadon subtenis Owen Longergan kaj Donald Broadribb per ilia Esperanto en la komputil-epoko (kiu disdoniĝis en 1987 kiel aldono al TAE).

Laŭ la 1970-a eldono de PIV, komputilo estas aparato por mezuri per nombroj la unuojn de ripetiĝanta fenomeno aŭ la kvanton da kontinua fluo, kaj por montri la rezulton de la nombrado dum difinita tempo - tio estas, angle, "meter". Tamen tiun difinon la 1987-a Suplemento anstataŭigis per "nespecifa termino por iu ajn komputiva ilo, ekz. abako, glit-kalkulilo, kalkul-maŝino, kalkulatoro, komputoro"; kaj samtempe "komputi", kun la senco "mezuri" kaj "adicii", cedis lokon al "kompti".

Por vera "elektronika aŭtomato, regata per programo", PIV proponis "komputero"; kaj la Suplemento, dum ĝi konservis tiun terminon, aldonis kiel preferendan la vorton "komputoro".

Mia maŝino nun fariĝos "komputoro". Sed ĉu la ŝajne ofta uzo de "komputilo" ĝuste por tia aparato agnoskiĝos en la sekvanta suplemento al PIV?

Komento de la redaktoro: En *Akademiaj Studoj 1988-1990* Rüdiger Eichholz atentigis ke en la angla lingvo "computer" havas multe pli vastan signifon ol en la aliaj eŭropaj lingvoj, kaj eble tio estas parta kaŭzo de la flaŝeto pri la terminoj. Li sugestis ke oni uzu la vorton "komputilo" por ĉiu ajn aparato kiu utiligas komputadon, kaj ke oni uzu "komputoro" nur por ĝeneralaj maŝinoj programendaj, t.e. la IBM-ecaj maŝinoj, la Macintosh-oj, Amstradoj, kc. Do "komputilo" estus pli ĝenerala vorto ol "komputoro". Oni povus tiunmaniere fari utilajn nuancdistingojn. Sed miaopinie tiuj distingoj ne pravigas novan terminon kiam jamesperanta esprimo ekzistas. Ni ne trokompliku la aferon.

Jam de jaroj mi nomas la maŝinon kiun mi uzas por ĉi tiu gazeto (Brother CE-1050) "vortkomputilo" ĉar tekstprilaborado estas ĝia rolo. Efektive, laŭ mia scio, ekzistas tri specoj de vortkomputiloj: maŝino kies ROM mem enhavas la tekstprilaboran programon (ekzemple mia Brother), maŝino kiu aŭtomate ermemorigas tian programon surdiskan (ekz. la Amstrad PCW-serio), kaj ĝenerala komputmaŝino en kiun oni transigas diversajn surdiskajn programojn ĉu por tekstprilaborado, ĉu por aliaj agadoj. (Oni konstruis la Brotheron kaj la Amstradojn PCW tiel ke ankaŭ tio estas ebla, sed sen speciala programdisko ili aŭtomate agas tekstprilaborade.)

Estas pripensinde ke "komputilo" estas farita laŭ la modelo televidi/televidilo, do komputi/komputilo. Tio havas pli bonan guston laŭ mia lango ol "komputoro", kaj en la praktiko ĝi ne estas ambigua. |

RESPONDOJ POR LA CITAJKVIZO

1.h; 2.f; 3.c; 4.g; 5.d; 6.a; 7.ĉ; 8.b; 9.ĝ; 10.e